

Edwin de Kock

La Konflikto de la Epokoj

Origine eldonita jene:

Titolo	La Konflikto de la Epokoj
Aŭtoro	Edwin de Kock
Kovrilo	Norma Fleitas/Dever Kujur
Serio	Stafeto nr 41
Tekstaranĝo	Erik D'Hondt
ISBN	978 9077066 58 4
UDK	82.3.892
NUR	300
Leĝa depono	D/2018/2924/1

Flandra Esperanto-Ligo
Lange Beeldekenstraat 169
BE-2060 Antverpeno
eldonoj@fel.esperanto.be
2019 FEL, Antverpeno

Kun Revizioj

Nova kopirajto: Edwin de Kock © 2021

Al mia karulino
ankaŭ ĉi tiun verkon mi dediĉas.

Aŭtora Enkonduko

Meze de la kvindekaj jaroj, mi komencis korespondi kun William Auld. Li tiam kovis aŭ ĵus finis *La Infana Raso* (1956), sian majstroverkon. Li min inspiris sekvi lian ekzemplon per la argumento, ke por vera grandeco poeta necesas pli ol mallongaj poeziaĵoj kiel ajn trafaj aŭ bonkvalitaj. Laŭ li oni devas krei verkojn ankaŭ pli ampleksajn. Pro tio mi elfaris *Kvin Elementojn* en 1957-58. Tuj poste, dum la unua jarduono de 1959, mi komencis ankaŭ *La Konflikto de la Epokoj*. Rimarkindas, ke verko tiel Kristana certasence ŝuldas sian ekziston al la influo de ateisto kiel Auld!

Ĉi tiu epopeo celas la veron, estante fikcio. La eventoj en ĝi priskribitaj ne okazis. Mi kompreneble ne kun kvin gvidantoj vojaĝis tra spacotempo. Ili cetere estas roluloj kunmetitaj el elementoj Bibliaj kaj imagaj. La kvina, Abdiel, estas persono tute fiktiva. Aliflanke mi vere kredas pri la granda konflikto de la epokoj inter Satano kaj Kristo, la homdio.

Multaj legantoj, tamen, ne kredas pri ĉi tio, iuj eĉ ne pri la ekzisto de Dio. Nu, la samo validas pri la epopeoj de Homero, Vergilio, Dante kaj Milton. Mi mem ne kredas pri la misdioj klasikaj, sed por la legosperto akceptas ilin kaj per la imago eniras la mondojn de Homero kaj Vergilio. La Katolikismon de Dante mi tre malŝatas. Koncerne la Inferon li, en la senco de la ĉiutaga realo, verkis sensencaĵon. Li malgraŭe estas, ankaŭ por mi, poeto grandioza. Dum mi lin legas, mi volonte akceptas liajn fikciaĵojn.

Samuel Taylor Coleridge (1772-1834), Angla poeto romantika, kritikisto kaj filozofo, dum 1817 priskribis tion, kio okazas en tiaj okazoj, per trafa esprimo: “la vola suspendo de la malkredemo”. Li klarigis, ke por ĝui kaj aprezi literaturan verkon la leganto provizore akceptas la

kredindecon de ideoj, eventoj, roluloj kaj realon al si fremdaj.

Tiel, espereble, eĉ Romkatoliko aŭ ateisto povos rilati al ĉi tiu verko mia.

Kun pluraj interrompoj, kaj precipe tiu de 23 jaroj inter la du partoj de Libro 3, mi laboris super la epopeo dum 58 jaroj, paralele kun mia alia verkado en kaj Esperanto kaj la Angla.

Sed la vera verkotempo estis proksimume sep jaroj. Libroj 1, 2, kaj la unua parto de Libro 3 postulis eble kvar. La lastan duonon mi verkis dum tri jaroj, inter 2015 kaj 2018, kiam mi estis 85-88-jara.

Historia Superrigardo (1959-2018)

Libro 1 (1959–1961)

Libro 2 (1984)

Libro 3, unua parto (antaŭ 1992)

Vojaĝoj kaj Aliaj Poemoj (1992)

Sub Fremdaj Ĉieloj (2007)

Postrikolte (2012-2013)

Kvin Anglaj libroj pri Bibliaj profetaĵoj (2001-2015), 1700 paĝoj. La titoloj aperas sube.

Libro 3, dua parto (2015)

Libro 4 (2016)

Libro 5 (2016–2018)

Libron 1, ĉapitrojn 1-9, mi verkis dum la unua duonjaro de 1959 (ĝi aperis en *Ombroj de la Kvara Dimensio*, 1961). Ĉapitron 10 mi finis dum 1961 (presita en *Fajro sur Mia Lango*, 1967). Unue mi verkis Libron 1 en trokeoj. Poste mi refaris ĝin jambe. La tutan libron mi mem eldonis dum 1984, modestaforme, en kvanto tre limigita.

Libron 2 mi eldonis en 1984.

Libro 3 kreigis poste. Mi ĉesis verki ĝin en 1992.01.07, meze de ĉapitro vii, ĉe la vortoj “abrupte gril’ / silentis”. Por 25 jaroj la epopeo restis nefinita. En 2015, mi daŭrigis ĝin ekde la vortoj “Tiam Ezra faris ion / okulkonfuze rapidege”, ankaŭ en ĉapitro vii.

Mi pluverkis kaj finis la epopeon post la apero de *Testamente*, miaj poemoj kolektitaj.

Origine mi kun bedaŭro decidis, ke *La Konflikto de la Epokoj* restos nekompleta. Mi opiniis, ke homo pli ol 80-jara ne plu vere kapablas liveri poezion altkvalitan. Ĉu mi ekzemple ankoraŭ povas krei metaforojn sufiĉe bonajn, k.t.p.? Sed kara poeto-frato, Baldur Ragnarsson, samaĝa kiel mi, per sia ekzemplo de malfrua verkado kaj persona instigo ŝanĝis tiun mian decidon.

Libron 4 mi verkis en 2015 kaj finis ĝiajn lastajn paĝojn en Januaro 2016.

Libron 5 mi kompletigis en 2017.9.01 sed ĝin multe reviziis ĝis, kaj iom eĉ post, mia 88-a naskiĝotago.

La leganto eble demandos kial mi ne finis ĝin pli baldaŭ sed forturniĝis al aliaĵoj? Temis pri la interludo de pluraj faktoroj.

En la biografia sekcio de *Sub Fremdaj Ĉieloj*, mi skribis: “Sed de tempo al tempo Ria malsaniĝis per pulminfektoj, iufoje severe, eĉ pasigante du sinsekvajn Kristnaskojn en la hospitalo” (p. 235). Malgraŭe dum 1985 ni kune vizitis Eŭropon, kaj mi vojaĝis ankaŭ pli orienten, al Kreto kaj Jerusalemo. La rezulto estis *Vojaĝoj kaj Aliaj Poemoj* (1992). Jam tiu vizito kaj la rezultita impulso verki alimaniere per si mem malpliigis la emon daŭrigi la epopeon.

Sed pli decidaj estis la eventoj ĉirkaŭ danĝera operacio dum kiu la ĥirurgo forigis de Ria trionon de pulmo. Koncerne tion aperis en *Vojaĝoj kaj Aliaj Poemoj* “Matena lunserpeto,” verkita la 28-an de Majo 1986.

Supraĵe ĝi estas nur unu el la multaj japaneskoj kiujn mi kreis, kaj la leganto ne povus diveni la emociojn malantaŭ ĝi. Sed la noto al tiu poemo multon klarigas: “Laŭ posta konstato ni ambaŭ havis sekretajn dubojn pri tio, ĉu ŝi pretervivis la operacion” (p. 136).

Pri tio mi faris voton al Dio. Se li indulgos mian edzinon kaj plilongigos ŝian vivon, mi solene promesis verki en la Angla libron por li pri la Bibliaj profetaĵoj. Ĉirkaŭ 1990 kiam mi emeritiĝis el mia laboro ĉe la Teknikono en Sud-Afriko, mi komencis tiun libron sub la titolo *Christ and Antichrist in Prophecy and History*.

Sed antaŭ tio, mi jam verkis Esperantajn erojn kun temoj religiaj. Ekzemple en *Japaneskoj* (1982) aperis “Profetaĵoj,” kiun librofine klarigis multaj notoj. Se mi ĝuste memoras, pri tio plendis almenaŭ unu recenzinto; sed ili necesis. Tiam, post la voto kaj dum alia vojaĝo al Eŭropo, mi kreis “Rekviemo por la Albigensoj” (1992-1993), eble la plej grava ero en *Sub Fremdaj Ĉieloj* (2007).

En tiaj poemoj evidentiĝis mia intereso pri la Bibliaj profetaĵoj rilate al la historio. Mi supozeble povintus sorbi tiun impulson en mian epopeon, dum mi ankaŭ plenumis la voton. Sed intervenis ankaŭ aliaĵo grava: formigro el Sud-Afriko al Usono, kie Ria kaj mi poste civitaniĝis en 2000. Pri tio legu la bibliografiajn detalojn en *Sub Fremdaj Ĉieloj*. Aldoniĝis pliaj faktoroj.

Unue, niaj pensioj malsufiĉas por vivteni nin en Usono. Tial kaj Ria kaj mi devis instruisti denove, kio nin por jaro, 1995-1996, kondukis al la suda Koreujo. Evidentiĝis, ke ne tute plaĉis al la Usonanoj niaj Sud-Afrikaj kvalifikoj.

Post nia reveno el Koreujo, Ria devis poste studi plu por akiri ĉi tie M.A. plene akceptindan kiam ŝi jam fariĝis 68-jara. Dum kvar jaroj mi povis instrui la Anglan, sed nur partatempe, ĉe kaj la University of

Texas–Pan American en Edinburg kaj la South Texas Community College, kies ĉefa branĉo estas en McAllen, Teksaso.

Due, verki Anglalingve pri la profetaĵoj de la Biblio ankaŭ necesis enspezocelo, precipe post kiam Ria, jam 77-jara, ne povis plu labori ĉe la ĉi-urba Universitato.

Intertempe mi, ekde 2001, pro korproblemoj ne povis instrui sed tio ebligis plentempan verkadon. La votita libro, *Christ and Antichrist in Prophecy and History* (2001, 2013), fine fariĝis kvin verkoj. Ankaŭ aperis *The Use and Abuse of Prophecy* (2007), *The Truth About 666 and the Story of the Great Apostasy* (2011, 2013), *Seven Heads and Ten Horns in Daniel and the Revelation* (2012) kaj *A More Sure Word of Prophecy* (2015).

Je mia surprizo mi ĉi-jare malkovris, ke *La Konflikto de la Epokoj*, pli ol 400-paĝa, estas proksimume tiel longa kiel la *Paradise Lost* kaj *Paradise Regained* de John Milton (1608-1674) kombinitaj. Kvante do mia epopeo superas, sed kio pri ĝia kvalito? Juĝu ne mi sed la legantoj kaj la futuro.

Bazaj Ingrediencoj

La ĉefa aludokampo por ĉi tiu epopeo estas la Biblio, kiel komprenas ĝin la Adventistoj de la Sepa Tago. Kiel eklezio ili estiĝis en la deknaŭa jarcento, sed siajn doktrinojn, kun malmultaj esceptoj, ili ĉerpis el la granda Protestanta tradicio. En ĉi tiu verko tamen rolas ankaŭ miaj personaj interpretoj.

Grava elemento en tio estas profeta Historicismo, maniero klarigi la antaŭdirojn de la Biblio. Tute kiel Luther, Calvin, Wesley kaj aliaj, nuntempaj Adventistoj ankoraŭ kredas, ke la Antikristo estas la papeco. Temas ne pri Romkatolikoj kiel individuoj, sed sistemo. Ĝi ne nur misvojiĝis for de tio, kion vere instruas la Biblio, sed dum jarcentoj multe persekutis aliajn Kristanojn kiuj ne

konsentis kun ĝia vidpunkto. Tio eblis ĉar la papojn helpis la reĝoj kaj imperiestroj de Eŭropo. Surbaze de sia kompreno de la Bibliaj profetaĵoj, Adventistoj kredas, ke en la estonteco religiaj persekutoj revenos. Aktuale la papismo jam forte reviviĝas kun ĉiam pli da amikeco flanke de multaj Protestantoj.

Laŭ la profetaĵoj la fina rezulto estos, strange, ke Usono, grandparte Protestanta, subtenos la Vatikanon konstrui novan mondordon. Kiel parto de tio estos leĝoj por devigi la observadon de Dimanĉo, la unua tago en la semajno, kiel la ripozotagon. Sed Adventistoj kredas, ke ĝi estas Sabato, la sepa tago, laŭ la neŝanĝeblaj Dek Ordonoj de Dio. Ili sekve suferos persekutojn.

Ĉi ĉio estas elementoj en mia epopeo. Ĝia titolo, *La Konflikto de la Epokoj*, estas traduko de *The Conflict of the Ages*, kuna priskribo por serio da verkoj far Ellen G. White: *Patriachs and Prophets, Prophets and Kings, The Desire of Ages, Acts of the Apostles* kaj *The Great Controversy Between Christ and Satan*.

La unuaj kvar el tiuj kvin libroj en historia sinsekvo, lume de la profetaĵoj, komentario redonas la rakonton de la Biblio.

La lasta, *The Great Controversy*, superrigardas la post-Biblian periodon. Ĝin karakterizas sinkretisma interago kun pluraj nekristanaj religioj ĉirkaŭ Mediteraneo, kio kreis la Romkatolikismon. Ĉi tio ankaŭ kondukis al teruraj persekutoj kontraŭ grupoj kiel la Valdanoj kaj aliaj Protestantoj, kiuj insistis pri pli Biblia religio. Fine tiu libro rigardas en la estontecon, antaŭdirante reviviĝon de tiu situacio.

Adventistoj de la Sepa Tago kredas, ke Ellen G. White estis profetino, kvankam ŝiaj verkoj ne tiel gravas kiel la Biblio, kion ŝi cetere ankaŭ klare insistis. Ŝi asertis, ke tio, kion ŝi verkis estas “malplia lumo kiu kondukas al la pli granda lumo” de la Sanktaj Skriboj mem.

Problemo rilate la Bibliion kiel komprenigilon de la epopeo estas, ke nuntempe multaj homoj simple ne legas kaj tial ne konas ĝin. Ofte oni supozas pri ĝi falsaĵojn, kaj ne nur teologiajn. Ekzemple, ĝi ne instruas, ke la tero estas plata, kuŝas sur fundamentoj aŭ havas monopolon de loĝantoj inteligentaj. Bonvolu noti la jenon:

Jesaja 40:22, parolante pri Dio, asertas: “Li sidas super la rondo de la tero...”

Laŭ Ijob 26:7, “Li etendis la nordon super la malpleno, Li pendigis la teron sur nenio.”

Koncerne la kreon, Ijob 38:4, 7 demandas: “Kie vi estis kiam Mi fondis la teron... Dum komuna glor-kantado de la matenaj steloj kaj ĝojkriado de ĉiuj filoj de Dio?” Tiuj estis inteligentuloj kiuj ekzistis jam antaŭ la estiĝo de nia mondo. Verŝajne la matenaj steloj estis anĝelaro. Unu el ili estis la Lumportinto, Lucifero, kiun pekigis lia orgojlo. Pri li ni legas: “Kiel vi falis de la ĉielo, ho brilo, filo de la matenuĝo!... vi diris en via koro: Mi supreniros en la ĉielon, pli alten ol la steloj de Dio mi levos mian tronon, kaj mi sidos sur la monto de kunveno, ĉe la rando de la nordo; mi supreniros sur la altaĵon de la nuboj, mi similiĝos al la Plejaltulo.” (Jesaja 14:12-15)

Kiuj tamen estas tiuj filoj de Dio? En ĉi tiu kunteksto ili evidente estas la reprezentantoj de aliaj mondoj. Ili rolas en la granda rakonto pri Ijob ĉe kaj ĝia komenco kaj pli malfrue en la libro kiu portas lian nomon. En ĉapitro 1:6, 7 ni legas: “Unu tagon, kiam la filoj de Dio venis, por stariĝi antaŭ la Eternulo, venis inter ili ankaŭ Satano. Kaj la Eternulo diris al Satano: De kie vi venas? Kaj Satano respondis al la Eternulo, kaj diris: Mi vagadis sur la tero kaj rondiradis sur ĝi”.

Li al si arogis la rolon reprezenti nian teron, ĉar li fariĝis—kiel Kristo mem lin nomis—la estro de ĉi tiu mondo (Sankta Marko 3:21, Sankta Johano 12:31,

14:30). La apostolo Paŭlo eĉ diris, ke li estas ĝia dio (2 Korintanoj 4:4). En certa senco, laŭ Sankta Luko 3:38, Adamo kreiĝis filo de Dio kaj tial ankaŭ povis reprezenti la homan rason kaj ĉi tiun planedon. Sed la diablo sukcese tentis lin. Pro la peko li perdis tiun tre specialan pozicion kaj mortis. Anstataŭ li, Satano do transprenis lian rolon, ĝis Kristo lin venkis kaj fine ankaŭ detruos. Jesuo estas la dua aŭ lasta Adamo (1 Korintanoj 15:45), la estonta kaj ĉiama reganto de nia mondo.

Nescio pri la Biblio estas grava kialo por aldoni la Notaron, fine de ĉi tiu verko. Sed tre verŝajne ĝi estas aparato nekompleta, tro dependa de miaj supozoj pri tio, kion bezonas eventualaj legantoj. Mi tial bonvenigos aldonojn kaj modifojn far aliuloj, estontaj editoroj.

La Glosaro simile ne estas parto de la epopeo mem kaj verŝajne ankaŭ bezonas pliampleksigon.

Kial Kvinlibra Strukturo?

Origine mi volis verki sep librojn kun sep gvidantoj, sed pro mia pliaĝiĝo kaj timo, ke mi eble ne supervivos por fini la epopeon, mi reduktis tion al kvin. Rolis en tio ankaŭ aliaĵo: du roluloj transprenis ĝian strukturon. La unua, Jesaja, tiom suferis pro vidataĵoj rilate al la persekutitaj Valdanoj, ke li simple rifuzis daŭrigi sian rolon. Proksime al la fino de Libro 4 li deklaris:

Mi volis plu helpi vin, sed nun
ĝi tro terure dolorigas min.
Atendu tie ĉi, ĝis plifortulo,
kiu ne bezonos en si forviŝi
tiom da larmoj, anstataŭos min
kaj finos la deĵoron.

Tio sugestas, ke maleblos roli pli da nuraj homoj. Tiam alvenis la anĝelo Abdiel, kiu ekde tiu punkto

ĝisfine daŭrigis la gvidadon, ludante fortan rolon en la cetera epopeo. Li ankaŭ per sia rolo en la rakonto kaj ideoj transprenas la strukturon de la epopeo.

Problemo pri tio estas, ke Libro 5 estas, laŭ la nombro de ĝiaj paĝoj, multe pli longa ol ĉiu el la antaŭaj libroj, kvankam ankaŭ ĝi havas dek ĉapitrojn. La epopeo tamen konsistas el kvindek ĉapitroj.

Prozodio

Pri ĉi tiu temo mi aliloke jam multe verkis, kion mi do ne bezonas nun ripeti. Tial mi nur mallonge reliefigas kelkajn punktojn. La unua estas, ke la ĝenerala versformo por la epopeo estas jamba; ĉar mi nun opinias, ke la trokeo ne tute taŭgas por vere longa verko. Sed miaj kvinjambaj iomete diferencas de la Parnasanaj. Ili estas malpli striktaj kaj ne malofte enhavas ekstrajn silabojn senakcentajn.

Interne de kvinjambo ofte ĉeestas cezura paŭzeto, pleje post aŭ la dua aŭ la tria verspiedo. Se tio okazas samloke en tro multaj versoj, la ritmo monotoniĝas. Mi provis eviti tion. Kiel? Mi interalie faris al mi zorgojn ne samloke ripeti la paŭzeton en pli ol du aŭ tri versoj.

La verko pleje ne rimas. Anstataŭe rolas rimsurogatoj, precipe asonanco kaj aliteracio. Ĉi lasta ofte estas parta, ekzemple *p* apud *b* kaj *k* apud *g*.

Elizioj estas bona kaj utila variiga rimedo, sed mi provis ne misuzi ilin per troeco. Ili ne plaĉas al mi se maleŭfoniaj. Mi evitas vortotranĉojn lasantajn stumpojn kiuj finiĝas en voĉaj konsonantoj kiel *b* aŭ *g*, escepte kiam la tuj postan vorton komencas vokalo. Sed kial mi uzas ankaŭ formojn kiel *kvaz'* kaj *ankor'*? Por efektoj estetikaj. Mi jam montris en iama eseo pri la diversaj formoj de elizio en Esperanto, ke la fortranĉo de vortfina *aŭ* neniam kaŭzas sencan miskomprenon.

Mi tre klopodas eviti kakofonion pro la kolizio de

identaj lingvoelementoj. Ekzemplo bone konata estas la adasismo, tedaj rimoj per la sufikso *ad*, kiel en “*ŝi sonĝadas dum li simple dormadas*” aŭ substantivoj: *vidado* apud *aŭdado*. Sed la problemo estas pli vasta kaj tute ne limigita al la versarto. Same agacas, aliaj ripetoj de sufiksoj akcentitaj—kion mi nomas silaborimo—en vortparoj kiel *enlitiĝo/vekiĝo*, *alilingvigo/pliigo* aŭ (ho ve!) *ĉiuj tiuj kiuj*. Mi senĉese klopodas eviti tiajn malelegantaĵojn, verse kaj proze.

Ĉu tio estas speciala problemo, eĉ manko de Esperanto kiel lingvo? Tute ne. Ekzemple en la Angla ĉiam minacas bonan stilon la trouzo de *-ing*, ekzemple: “They managed to do so quite successfully, creating controversy over most of Gore’s political positions, including putting forth the widely accepted (but false) claim that Gore said he had invented the Internet.” (Joseph Cummins: *Anything for a Vote*, Quirk Books, 2007, p. 285). Kaj en la Hispana pluraj verboformoj finiĝas per silabo akcentita.

Pri ĉi lasta konsideru la jenon, kiun mi citas el Genezo 3:3, 4, parton de la dialogo inter Eva kaj la serpento. En Esperanto tio tekstas: “pri la fruktoj de la arbo, kiu estas en la mezo de la ĝardeno, Dio diris: Ne manĝu ion de ili kaj ne tuŝu ilin, por ke vi ne mortu. Kaj la serpento diris al la virino: Ne, vi ne mortos.” Sed jen la versio Hispana: “del fruto del árbol que está en medio del huerto dijo Dios: No comeréis de él, ni le tocaréis, para que no muráis. Entonces la serpiente dijo a la mujer: No moriréis.” Tiu *-éis* estas iom malplaĉa ĉar akcentita.

En la Hispana, ĝenerale bela kaj eŭfonia lingvo, intima parto de ĝia verbsistemo, oni pleje devas simple toleri tion, kvankam bona stilisto povas trovi rimedojn limigi tediĝon ĉe la leganto. Feliĉe la Esperantaj verbfiniĝoj *-as*, *-is*, *-os*, *-us*, *-i* kaj *-u* estas senakcentaj. Tial en la supre citita teksto ili ne tiras al si atenton aŭ agacas, sed la

sama ne validas por la participoj *-anta*, *-inta*, *-onta* aŭ *-ata*, *-ita*, *-ota*. Sentema verkisto, ĉu poeme, ĉu proze, uzos ilin singarde kaj evitos apudmetojn kiuj tedas. La samo validas por serio da *mal*-vortoj.

Lingvouzo

Plejgrandaparte la Esperanto de ĉi tiu epopeo, kiel de mia poezio ĝenerale, estas Zamenhofa, tradicia. Mi tre amas ĝiajn vortfaran mekanismon kaj vortordon liberan. Ekzemplojn mi ne citos; la leganto mem trovos ilin abunde. Sed post la Unua Libro la Internacia Lingvo multe evoluis. Tion ni vidas precipe en ĝia literaturo, precipe la poezio originala.

Mi estas la danka heredanto de multaj kies verkoj sekvis la Zamenhofajn, precipe Grabowski, Kalocsay kaj Auld. Miaj ĉefaj vortaroj estis la *Plena Ilustrata Vortaro* (1970), kiun kunaŭtoris multaj kompetentuloj, precipe Waringhien kaj Kalocsay, ambaŭ gravaj niaj poetoj; *Esperanto-English Dictionary* (1967) de Montagu C. Butler; kaj *Esperanto and English Dictionary* de J. C. Wells. Iujn radikojn aŭ vortojn mi ĉerpis el aliaj fontoj, kiel evidentas el la librofina Glosaro.

Mi mem aldonis ne multajn neologismojn. Tamen okulfrapaj estas du prepozicioj: *fro* kaj *pon*. Kial mi uzas ilin? *De* havas almenaŭ tri sencojn kaj bezonas, krom *far*, plian diferencigon, prefere unusilaban. Por prepozicio, *malantaŭ*, kunmetaĵo trisilaba, estas tro longa kaj tute ne eleganta. Sed mi ne atendas, ke oni min imitu, kion efektive neniu ĝis nun faris. Ili ne reprezentas minacon por la lingvo, sed simple apartenas al la deKocka idiolekto. Toleremon mi petas.

Libro 1

I

Sur la radego de la tagonoktoj
mi kuŝis iun horon larmamare,
ligite en tortur' pro propraj pekoj,
kun ve' kaj vundoj de la tuta mondo.
Malgraŭ la suna kampo bunttapiŝa
kaj harsusuro de l' anĝelaj arboj,
sub mi pulsadis terdinam' kruela—
kies kurento miajn pensojn tordis,
sen ajna ŝanco de turmentmildigo.

Sed tiam mian ŝultron mano tuŝis.

Levinte mian kapon plornebule,
mi vastan viron vidis, statustaturan,
kian la misfaranta ter' ne naskis
dum ajna homepoko en memoro.
Sed, brunhaŭtulo bluokula, li
de nia speco ŝajnis kunmetito,
kvazaŭ la trajtojn donus ĉiu raso.

“En kiu ejo via korp' forĝitis?”
Pro miro demandinte, mi silentis,
timante troaŭdacon.

Respondis li:

“Mi estas Henoĥ, iam pratempulo,
komisiita forkonduki vin
el tiu labirint' de viaj pensoj.
Venu!”

Subite malaperis ĉio:

ĉielokula sunpupilo, kiu
gvatadis min dum la animangor',
arbkampoj, larĝaŝultraj montgigantoj
kaj la rivero ĉiam babilema—
viŝitaj tute for, kvaz' en lernejo
farbkreta desegnaĵo fro tabulo.
Kaj ĉirkaŭ ni la astroj floris grandaj
aŭ diste etaj, ĉie en buntabundo.

La kondukanto, nigra silueto,
kvaz' por preventi mian timon, diris:
“Scienc' de milionoj da jarcentoj
subtenas nin, kaj pli Potenca Povo,
kiuj tra vastoj inter la sistemoj
al nia celhaveno vojon donos.”

Sigelis mian langon konsternego,
sed fine mi balbutis: “Kien do?”

“La praan mondon de la universo,
fonton de l' ekzistado kaj amaroj.”

Kaj dum li diris, jen la stellanteroj
moviĝis. Foje tiajn somernokte
kun la patrin' mi vidis, infaneto,
ektimigitajn en ĝarden' lampirojn.

Unu sunego ŝajne al ni saltis,
sed, lumbriaj papilioj, ni
al tiu fajr' proksime preterflirtis
kaj en sekuro rapidadis plu.

Min ekvideto frapis de planedo
kun nigra dorso kiu lumojn portis,
scivolige kaj sorĉe palpebrumajn;

sed kvazaŭ por enŝlosi la demandon
antaŭ ol langosojlen ĝi atingus,
mia gvidanto neis la supozon,
ke cele tiun mondon ni vojaĝas,
nek volis li diskuti ajnon plu.

Ege ni akceliĝis, ĝis la astroj
kunkudris la distancojn lumfadene,
kaj tiam—kvazaŭ inkomar’ subita
ĉion formakulanta—nin inundis
la mensengluta nigro, truprofundo.

“Kuraĝon!” Lia voĉo tuŝis min
kiel la timforlula man’ konsola
de la mortinta, nun pli kara patro.
“Ni jen transsaltis lumrapidbarilon,
spitante oldan tempon, doganiston,
kiu—se terscience vi alfulmus—
pagigus vin per via tuta vivo,
por treni vian korpon pezigitan
unu paŝeton sur la longa vojo
kiun dum ĉi momentoj nun ni iras.

“Kiel naĝanto iam enakviĝas
kaj ne penadas trans rezistan ondon,
sed subpasejon tra la mola akvo
fosas, ni lerte tra plaŭdantaj horoj
kaj galaksia multo pluen plonĝas.”

Kaj antaŭ ol la fraz’ surlipe mortis,
subite reŝaltiĝis astrampoloj,
sed en konstelacioj nekonataj.

Ne plu la juvelanta Suda Kruco
sur la nigra brusto de l’ nokto pendis,

nek polvis blanke laktovoja strato,
irej' por zodiaka hom' aŭ besto,
kies lumbildoj stelsorĉitojn ĉarmis.
Ĉie la figuraĵoj fajris novaj
kun nomoj kiujn mia plum' ne konas.

“Ĉe tiu stel’,” vojmontris la kunulo.

II

Alvene sur la lumbanata mondo
Henoĥ kondukis min kun mia miro
al pacripoza parko, kies kadro
entenis—kvaz' el ĉielarkpaletro—
mejlojn da ravo, da okulsorĉaj formoj.
“Pense pli trankviliĝu, dum mi iras
enmapi niajn ĉi-tieajn planojn;
tamen ne tuŝu ajnon nekonatan,
ĉar trajtoj de tro alta civilizo
tranĉile, fajre, nocus vin—infanon.”

Malaperante, li soligis min,
krom la aeron dolĉiganta birdo,
kantema pens' plumhava de l' Kreinto.

Mensa remaĉo de impresoj, troo
per kiu lukse nutris min la tago,
kvankam ĉi tion mir' digestis pene . . .
Ke sin la praa kaj Biblia Henoĥ
en nian jarcenton la dudekan trudis,
por min forlevi laŭ la ŝtupetaro
de universa scio giganteska,
la tersciencon tute naniganta;
ke fine mi en ĉielmondo Dia
nun nombris branĉojn de ĉi verda arbo—

preme lamigis mian povran cerbon,
kvazaŭ piedo peza sur juglando.

Do Dio (tamen ne superstiĉo triba)
en lum' lokiĝas sur ĉi glorplanedo,
kien el diskurantaj galaksioj—
insuloj fosforeskaj noktomare—
laŭ ĉia civiliza aĝ' kaj lerto
per la ŝipegoj aŭ spacnaĝo korpa
vojaĝas komercistoj de la graco!

Dio... Kvaz' kirka kloŝo infanaĝa
tra mia mens' la vorto eksonoris.
En mi jam interluktis tim' kaj ĝojo
por plena okupo de la korteren'.
Apudis Li. Sed kie mi min kaŝus,
se Li atingus min, Adamon pekan,
en sia paradizo purtenenda?

III

Klarigis Henoĥ, reĉeante: “Nun
ni transiru la planedon dorsvizaĝen.”

“Ĉu ree kiel sag' tranokta, blinde?”

Li jesis: “Tra la centro, laŭ subspaco,
kiu la materion nebuligas.”

“Se eble, tra l' aero, mi vin petas,
por kontentigi mian vidmalsaton—
kaj tiun sakon de sufoka nokto
ne senbezone volvu ĉirkaŭ min.”
Do ŝvebis ni falke. Sube disruliĝis
la bilda pergameno de distancoj,

kies farbaro en l' okulojn pentris
buntajn ĝis ebriigo ilustraĵojn.

Neniu pontoj selis la riverojn
aŭ la sorbaŭmajn montojn. Aŭtovojoj
ne vundis la verdan haŭton de la tero.
Bruoj kaj fumo estis ekzilitaj
el tiu klara lando. Loĝbienoj
preterkuradis sub ni unuope,
ĉar en misurba kun' ne kaŭris pepe
domoj pro la aero poluita,
kiel sur la infera naska mondo.

Nur unuloke Dia metropol'
oblikve sur la horizonto brilis.
“Ne tien,” Henoĥ al la pens' respondis,
“ĉar pekaj plandoj sur la purpavim'
ne tuŝos plu, kaj koroj noktofungaj
en la konsumata lum' de Dio velkus.”

Baldaŭ ni ree al la ter' malsoris.
Jen konstruaĵo, templo aŭ teatro,
sur sia ventro kuŝis sfinksminace,
fenestrokule alfajranta nin.

Mi tremis, kvazaŭ vento el la nokto
mian animon fingrus skvamatuŝe.

“Ho kial la beata planedego
ĉi ejon de la mavo prahororan
fro sia bela dorso ne forskuas?
Kaj kiu cerbo, kavo de malpuroj,
ĝin naskis sur la kompatinda kampo?
Jam veneniĝis eĉ la povra grundo
kiu nutretas la malsanajn arbojn,

tra kiuj morna vento plorsingultas.”

“Ĉu vi eksentas tion? Ni enpaŝu.

“La ribelinto, Lucifer’, ĝin teksis
el ŝtofo de orgojlo kaj malam’,
por fondi diktatoran respublikon
post la eksigo de l’ Eterna Reĝo.

“Disaŭdiĝadis el ĉi kunveneĵ’
al ĉiuj noktonestaj galaksioj
la vulturvoĉo de la fipredanto.
Ekranoj la pavbelan formon montris,
kun frunto kiu brilis pro genio,
ĉies respekton foje aĉetinta
per liaj preskaŭ diaj atingajfoj.
Arde la milionoj lin estrigis
kaj anserstulte svarmis tien ĉi,
ĝis la ĉirkaŭaj montoj iĝis pezaj,
kvaz’ ĉiuj korvoj en la universo
ariĝus kune, por plenŝtopi sin
per la kadavro de l’ murdita paco.”

Eksklamis mi: “La mitoj diris veron!
Orgojle Lucifero tro aspiris:
egalon kun la alta Dimajesto,
kiu lin kaj la liajn elĉiele
kiel sakegon da fatraso ĵetis!
Ĉi tio efektive do okazis?”

“Tamen ne tiel krude, tuj, arbitre.
Svarmadis dum l’ intero fiprojektoj
kaj inkubaĵoj, kun la bazintenco
rubige talpi sub la praleĝar’
plej fundamenta al la kosma regno.

Laŭ li tiaĵoj ne limigu plu
estulojn malkrimemajn kaj liberajn.
Kaj Luciferon ankaŭ tre incitis,
ke Mikaelo princis super li.”

“Mikaelo?”

“Jes, tiu Diestulo
kiu tra longa eterneco nigra,
nekonceptebla—prae antaŭinta
al lamplumigoj de la universo—
jam akompanis la aliajn Du
kaj kiu post l’ epokoj da homlarmoj
sin vestis per nia karno kaj angor’,
por fliki la ŝiraĵojn de la peko.

“‘Ne li, amikoj,’ Lucifero tondris,
‘por kiso rajtas teni la piedon
sinjore antaŭ niaj fajnaj buŝoj!
Rigardu mian korpon Dimulditan,
kiu ricevis saman kreostampon
kiel la lia. Li povus preskaŭ pensi,
se antaŭ mi, sin vidi en spegul’!
Lin pensi dia, tion mi ne povas.

“‘Devigas mian kredon nur la Unu,
la sola Ĉiopatro, ne l’ aliaj:
nek iu Spirito venta, nevidita,
nek tiu mensoganta Mikael’!
Konjektoj pri pratempa distriiĝo,
kvazaŭ lo Dia estus amebego,
ridemon el mi tiras pro la stulto!’”

Mi interrompis: “Sed ĉu Dio ne
fro lia mens’ forigis la nebulon?”

“En grandioza tago sortgraveda
Li la dubantojn al la tron’ venigis.
Ĉirkaŭe sin arigis ĉefaj estroj
de ĉiuj galaksidistriktoj. Tiam
la voĉ’ malofta de la Eternulo
tra la aŭdejo fajrolange fluis
kaj tie en la cerbojn neviŝeble
bruligis la skribaĵon de pravero:
ke Mikaelo estas kre-peranto,
jam antaŭe la formon surmetinta
de la venontoj, kvazaŭ la matrico
por ĉiuj postaj ekzempleroj. Tial
estis, ke Lucifer’—kreit’ unua—
al la miranta vido lin reeĥas.

“Post tiuj vortoj la silento mutis,
longe, ĝis pro hontem’ la orgojlulo
kun kap’ klinita genuiĝis plore,
por ŝirmo sub la ombro de kompatato.

“Dio replantis lin en lian lokon
apud la trono, kie la radioj
de l’ praa Sunvizaĝo brilis flege,
kaj susurado de l’ Spirito milda
ventumis lian febron ĉiutage.

“Sed en li larmoj kun koler’ miksiĝis,
kaj gale fordronigis la pentemon
kaj la humiligitan koron brogis.
Post kelk semajnoj li forlasis Dion,
ĉar baldaŭ li ne povis plu toleri
la aŭskultadon daŭran kaj senvortan
de liaj lafaj pensoj. Li ĉi tie
en solo varmigadis la ĉagrenon,

dum lia mens' elkovis, senkomprene,
ĉiujn monstraĵojn de la estonteco.

“Kaj tiam lia voĉ' pterodaktila
tra l' timigitaj spacetendoj kriĉis,
ke liaj idoj hordu al la nesto
por ribelego akra kaj malkaŝa.
Kurte: li tiun ĉi lokon ĉefurbigis
kaj fondis sendependan komunumon
liberigitan el la leĝoĉen',
la moŝtan Mikaelon forneante
kiel uzurpinton de l' Direĝeco,
tuj ekzilendan el la luma mondo.”

“Post la proklam' de Dio?”

“Lucifero,

eĉ pli ol vi, poeto, ĉiam scias
ekjungi ĝustan vorton al okazo.
'Ho amikar', li diris nubmiene,
'se mi forflirtus tra la universo
al ĉiuj fajrofloraj sunsistemoj
kaj forrestadus ĝis la tempofundo
elverŝus siajn lastajn mielgutojn,
mi ne malkovrus vortojn por vidigi
la dimensiojn de la am' al Dio
kiu la sinon en mi plenĉeligas.
Sed ve'—kaj trista tempo!—jen malsano
la karan Patron ĉe la menso prenas
kaj nun direktas nian universon.

“Tro longe Li kovadis. Jarmiliardoj
da ekzistado mise eluziĝis
je la konjektoj pri la propra esto
kaj tiu praenigmo, ĉu ne eble,

preter la dimensioj de la kono,
troviĝas ie estuloj kiel Li.
Li implikiĝis en la interplektoj
de siaj propraj pensoj. Ho konfuzo,
kio ekestos kiam Di' oldiĝis
kaj tiraneto sorĉe tenas Lin?!

“Min helpu, kaj mi estos al vi muro
kontraŭ la noktenfluo de l' kaoso,
antaŭ ol ĝi forblovus unuspire
la etajn lumojn de la stelkandeloj.
Ni metu ĉiujn abismojn de la kosmo
inter lin kaj la falsan Mikaelon,
kiu nur povus frenezigi Lin,
la fontojn de l' detruo malfermante.
Ĉar kiel ni, la songoj de l' Kreinto,
postvivus tian ĉi malintegriĝon
de la pramenso entenanta nin?”

“Tumulta bleko de la amasego
vivuis la parolon, kvazaŭ kiam
voĉo profundagorĝa elvulkane
sur la orelojn en Pompejo tondris,
por disanonci de la loĝpermeso
nuligon sur la verda montdekliv'.”

Tiam la lukton Henoĥ enbildigis.

Unue la blasfemoj tiel ŝokis
kvazaŭ al fiŝoj dinamit' subakva.
La lojaluloj estis ne konintaj
eĉ unu etan sulkon ĉesurface
de sia longa lagtrankvila paco,
sed nun la peza ondo de perfortoj
sur ĉies menson por respondo frapis.

Por lasta pledo venis Mikael',
sed varmaj larmoj jam ne povis solvi
glacion de la duriĝinta koro;
ĉar Lucifero penis kapti Lin,
sed time sentis la unuan fojon
de tiu atencita, mola Amo
la feran pugnon sur la buŝ' perfida.
Kaj kiam li rehavis la konscion,
la armeanoj de la Eternulo
lokustis ĉirkaŭ li kaj liaj.

Susuro,
kvazaŭ tra somergren' venteto flustrus.
Tiam silento sombra ĉerkotuke
plentegis la konturojn de la loko,
ĝis fine iu, kun vangoj trismalsekaj
pro la disiĝ' por ĉiam fro amikoj,
fariĝis lango de la Didecido,
ke tiuj incitantaj lin formigru,
el ĉi printempa mondo, ien ajn.

Kiel virbov' arene turmentata
ekblekis Lucifero, ĝis la klifoj
klamadis pro la angoraĵ' defia.
La taĉmentar' avancis gorĝograŭle
kiel en lanta nubo tondroŝtormo.

Tiu momento patris la militojn,
kiuj post plukreskado de la tempo
nian planedon tute sangoŝmiris,
ĝis preskaŭ ĉiu arbo, dom', deziro
havas ĉe la radikoj ruĝajn gutojn.

Sed la milit' ankoraŭ infanetis.
Luktadis la titanoj nudamane,

kaj haŭlis per muskoloj kable fortaj
trans la terenon unuj la aliajn,
enspiregante kiel forĝbloviloj.
Ekstumbliis jen kaj jen la korpoj grandaj,
brue, kvaz' faligitaj statuegoj
aŭ montlavango en timeman valon,
ĝis iom-post-iome la silento
ilin balais el la loko for;
pro ke—pli nombraj—la Mikaelanoj
post la penado, kiel aglo kokon,
elportis la aliajn trans la limojn
de l' universo, ĝis kie lozizole
la lastaj lumsilkeroj nebulozaj,
fro l' Dia menso sekreci', al la robo
de la antikva nokto alkroĉiĝas.

Kiel la kardlanugo disblovita
far vento kiu iam lulis ĝin
en la kreskejo de printempkomforto,
ili nun flosis, kaj la nokto maskis
doloron tiel akran kvazaŭ ĝi
eltranĉus ĉiun vundbrulantan koron.

Kaj en lontan' izole lumvolvita,
inter la amasego venkebria,
la Dia Patro, ne la lastan fojon,
ploris.

Tiam la Lucifera mens'
kirliĝis, kaj taŭzataj tempoakvoj
ekportis novajn sulkojn de l' defio.
Magnetis lia voĉ' telepatie,
kun nova vervo ŝargis ilin, tiris
kvaz' grizajn ŝtalfajlaĵojn ĉirkaŭ sin
kaj ekkondukis al najbara suno,

sangokolora kiel ruĝa venĝo,
kiu nun vejnoretis lian cerbon
kaj funde en la okulujoj fajris.
Tie, sur planeteto neloĝata,
izola, frida sub la ruĝa vento,
kiu fajladis la dentecajn rokojn
kaj kombis la senherban mondkranion,
Lucifero replantis sian regnon;
kaj ĉi halegon nun de mi vidatan
ili el plano de memor' perfekta
kopiis, nur tronejon aldonante
por sia reĝiĝinta, dura estro.

Dum ruĝaj tagoj tra la mond' cirkulis
dek kvin fojojn, kovadis Lucifer'
surtrone inter ombroj kaj silento;
sed tiam templogonge li ekvokis
de sia taĉmentaro ĉiujn ĉefojn.
Kaj ili venis, svarme, viprapide,
ĝis la aer' pro ili susuradis
kiel vespertflugile rokkaverno.

Mangestis li, kaj ili oreliĝis,
ĉiun vorteton lian avidante.

“Amikoj, potenculoj, fortaj dioj—
ĉar tiaj vi ja estas, rezistinte
la Eternulon, kiu vin ne venkis
sed nur elĵetis en fina malesper'—
estu kolonoj sub intenco mia!
Ni skuos la remparojn de l' ĉielo!
Kaj se malvenkaj, ni sur nin sobŝiros
la nigrajn murojn de la kosmo mem,
ke la kaoso ĉion heredonta
sciadu, ke ni estis tie ĉi.

Ho kia eta, eta nervimpulso
renversi povas tutan noblan menson,
por konvulsigi nian universon!

“Kial mi diris tion? En etaĵo,
tamen, ja estos nia potencego.
Ĉar vidu: jen en mia mano nestas,
apen’ pli granda ol pasera ov’—
ĉi geniulpensaĵo de kolego—
fortembrio, el kiu povas iĝi
forneniigo de la mondo kara;
kaj mi dubemas, ĉu eĉ l’ alta Dio
kapablus pretervivi tion! Do,
sekrete laŭ subspaca koridoro,
mi baldaŭ flugos por demeti ĝin!”

Ekkrevis tiam ŝtorma malkonkordo,
kvaz’ antaŭ peza pluv’ el nigraj nuboj,
sed baldaŭege Lucifer’ la lerta
mortigis aŭ forskermis l’ argumentojn.
Lin nur obsedis ĉi korfunda timo,
ke kun la Patro forviŝiĝus li,
kiel vana sonĝ’ el frakasita kapo.

Sed ĉiujn menciantojn li priridis.
“Nu, kies menso ekzistigas Dion?
Ĉu vi do vere glutis la fabelojn,
ke Li nin kreis? Kompreneble ne.
Pli granda Nekonaĵo teksis nin
kaj nian nunan sorton—Lian ankaŭ!”

Tiel, kvaz’ fajro fojnon, li denove
dominis ilin kaj foriĝis tuj
kaj plonĝis kiel noktĵetita plumbo
al la pafenda celo.

Sed subspace,
en tiu regiono de malesto,
kie neniu povus trovi lin,
ekkaptis lin la nigra man' de Dio
kaj lin forĵetis el la universo—
ĝis kie ĉiuj galaksioj kune
ŝajnas nur unu dista alumeto
flagretanta en ventoj de la tempo,
kaj pluen, kie ili estingiĝis
al la vido, pro ke la lanta lum'
ankoraŭ ne kapablos rampi tien
antaŭ ol bilion' da pezaj jaroj
limakos tra la mens' eterna.

Tiam
voĉo plenverŝis ĉirkaŭ li la vakon.
Kiel en koro sangmurmuro sonas,
sed multmiloble laŭte aŭdigata,
ĝi lin transondis. “Ho, mia povra ido,
por kio vi frakasos vin, etaĵon,
kontraŭ la mur' de Mia menso? Jen,
mi vidis vian finon antaŭ ol
mi ŝaltis vin, kaj konas ĉiujn bildon,
senteton kaj angoron kiuj nun
kalejdoskopas tra via cerb' skuita.
La orgojlem' ankoraŭ ne forfrotis
vian kapablon penti, sed tre baldaŭ
ĝi jam la lastajn grajnoj el vi lavos.”

Finfine Lucifero elbalbutis,
ĉar en la gorgo lia kor' kroĉiĝis,
kaj tutan mondon de ribelaj pensoj
la larminundo drondiluvis! “Sed...
ĉu vi, la Patro de severa justo,

min ja pardoni povas?”

“Mi povas ĉion.

Mildkora amo tenas la pesilon.
Vi kaj kun vi l’ aliaj forvagintoj,
gratantaj nun en fremda pensfatras’
por aĉe nutri vian kormalsaton,
nur humiliĝu, venu sub la ŝirmon
de la flugiloj de pardono. Mi
regreftos vin en vian lokon, plene.”

“Patro, ĉi tie en tenebro Via
mi konfesemus mian nigran kulpon,
ĉar al la loko ĝi konvenas. Sed
en tiu lumtrempata universo
suno post suno de la menshavantoj
sin fiksus sur min, okuleg’ akuza,
kiu por ĉiam arduis pro memor’,
ke iam mi subfosis Vian tronon.
Kaj eble, ankaŭ, oni min kompatos,
kompatos min, la fieran Luciferon!
Sed Ĉiopova, se vi tamen viŝus
ĉies menson, tiel ke mi por ili
reestos pura kiel freŝa pluvo,
neniam erarinta; kaj...”

“Ne!

Mi ne atencas ajnan menson, kaj
vi devos adiaŭi la orgojlon,
ĝin ekster la beata sojl’ lasante;
ĉar mi revolas la malnovan vion,
honestan kiel pano, simplaniman,
mildan kiel la faletanta neĝo,
humilan kiel io tre profunda!”

“Ĉu vere, ke mi estis tia vermo?
Ho ne, mi ne reramos en la truon!

“Ĉar la estulo iam gustuminta
la oran dolĉon de miellibero,
la sklavpokalon da rutin' acida
ne proksimigos ree al la buŝo!”

“Eĉ mielaĵo povas amariĝi.
Tamen ĉi tion maĉu, Lucifer':
se iam vi denove tuŝos fajron,
por brule eksplodigi ajnan mondon,
mi kiel kandelvakson vian karnon
fro viaj ostoj fandos. Kaj mi sidos
en via mens' por gvati vin!”

Silentis.

Sub la glacia frap' de tiuj vortoj
ekrigidiĝis Lucifero. Longe
li kuŝis tie, ĝis kolero varma
degelis lin. Kaj kiel reptilio
post la tutvintra dormo siajn volvojn
rektigas, kaj denove skvamaj pensoj
vekiĝas en venene ombra cerbo,
Lucifero reiĝis Lucifer',
kun plumordema kor'. Batalinviton
raŭke, tiranosauran, li elĵetis;
sed surda noktorelo senresponde
forglutis ĝin.

Post palpoj al la lum',
ĉar iel memorinte la direkton,
li revojaĝis al la ruĝa mondo.

Pri la klarigoj li avaris. Oni,

el la duonmensogoj de silento,
konjektis, ke li lastmomente cedis
l' antaŭan detruemon nevenkeblan,
pro ida amo al la hejm' iama.
Tamen la vero en li brulegadis,
ĝis lia cerbo iĝis ruĝa torĉo
por tutan universon incendii.

Tiam ambasadore li dissemis
multbilione la kunulojn ĉien,
por vaste plukreskigi la ribelon
en ĉiuj mondokampoj de la kosmo;
sed rikoltante li nenie plukis
la floron de la peko sangskarlatan.

Tamen la miliardoj Di-lojalaj
hezitis. Ĉu ne pravis Lucifer' ?
Ĉu, en rezonoj febla, Dio eble
per pugno argumentis anstataŭe?

Problemo antaŭ li demandosignis.
Lucifero ja estis fortranĉenda,
por resanigi la debilan kosmon;
sed havis ĉi kancero tro profunde
la radikaron en tro multaj koroj.
L' operacio ŝajnus murdo. "Kial?"
oni murmuris, "kiam li lin kreis,
Li do liberan dotis al li volon?
Ĉu nur por nun, tirane, puni ĝin?"

Malgraŭ gigantaj cerboj, la kompren'
ankoraŭ estis juna kaj sensperta,
ĉar la pekado restis teorio.

La pek' ne estas sensa aŭ doktrin',

nek kininaĵ' por glaso de la ĝuo,
sed la rategoj en la mens' nestantaj,
kiuj la historojn de la vivo ronĝas.
Ĝi estas ankaŭ tiu agresemo
kiu buĉadas kaj bruligas urbojn,
la ĝis frenez' torditaj homoj mem.
La egoismo—tio ĝia nom'.

La Patro do elektis longan vojon
serpentumontan tra multegaj koroj,
por paŝi al la intencita celo,
preter tiomo da suferogutoj,
da karnaj ir' kaj veno. Lucifero,
graŭlanta hundo kiu sin ĉene vindas
por finstrangol', tirate ĉirkaŭ arbon,
jarmile longan havos ligliberon.

Al li do estis permesote montri
per la argilo de la historio
konturojn de la mavo—tiel klare,
ke li finfine konvinkiĝos mem,
konsentos al pokalo de forgeso,
ke jam ekzistu li neniam plu.

Tiam ne gratos en plej febla cerbo
ajna dubeto, ke la Patro pravis,
protekte konstruinte leĝbarilon
ĉirkaŭ la mensfortreson, ĉar ekstere
el la ĝangalo de la nervkreskaĵoj
la molan ventron noce alsopiras
la dentoj de vipuroj en la ombro.

Sur sia mondo, nun komfortigita,
ekgraŭlis Lucifer' pri ĉi novaĵo,
sed siajn manojn frotis anticipe

pri iu planedo nova, kiel pom’
por lia venĝavido sur sunarbo
en la ĝardena univers’ de Dio.

Sed kiu galaksio kaŝis ĝin
per ŝirma oro kiel Kristnasklumo?
Ĉiu al kiu la kie’ konatis
envolvis la sekreton per silento.

Kiel neĝerojn disblovitajn do
li ĉirkaŭsendis la kompanojn ĉien
elspionontajn tra la spacabismoj
kaj intersunaj sulkoj, ke li provu
forpluki ĝin el la teren’ de Dio.

Henoĥ distondis la rakontfadenon,
kaj mi sidadis tie, silentante,
scivola sed pro grandaj penskirliĝoj
jam febligite. Muroj ĉirkaŭ mi
ombrante songis pri profunda tempo,
kvaz’ vasta ŝtonotemplo apud Nilo.

“Ĉi ejo monumentos tie ĉi
ĝis sur la lasta sceno de la dramo
nigraj kurtenoj kuntiriĝos fine.
Sed vi laciĝis. Mi vin forkonduku
ekster ĉi vespertejon, por protekti
viajn songojn, ĉar nun vi jam bezonas
la unĝventajon de molpansa dormo,
por iom flegi viajn menskontuzojn,
kiujn tro frape faris mi al vi
per vortoj kaj la nekutima tago.”

IV

Poste mi en altega ĉambro staris
kaj gvatis nekonatan maŝinaron,
kiel Boŝman' algapus aŭton mire.

Jen homoj kaj diversaj homoidoj,
marverda, nigraj, leoparde bunta
(en tuta ĉielarko da koloro)
laŭ ĉiu grando tie kamaradis.
Per mola intergalaksia lingvo
kelkajn minutojn oni babiladis.
Ilian estron, belan kiel truto,
en la fosforprofundoj Andromed'
elfrajis, sur mondo ombra kaj akvoza.

Per man' petinte pri silento, li
funkciigilon premis.

En mi ĝi ŝaltis
unu el tiuj brilaj ammomentoj
por kiuj spiras kaj aktivas ĉiu.

La ĉirkaŭaĵo de mi forsolviĝis,
kaj jen ŝi estis, ĉiuj miaj revoj
en unu ina korpo karniĝintaj!

Ŝultre la nigraj harobukloj pendis,
junhome rozaj estis ŝiaj vangoj
kaj en l' okula verdo dormis tuŝo
de sunsereno sur matenaj maroj.
Ŝi staris en negliĝo, beltalia,
antaŭ dormejfenestro lunaperta
super korteto kun ĝardenfontano,
kies elŝprucojn la gravito fleksis

al arkoj de la belo lummistikaj.

La ĵus fermitan libron ŝi demetis
sur breton kaj sobgenuiĝis. Tiun lingvon
mi ne komprenis. Tamen ŝia voĉo
per lulsilaboj al mi rakontadis
pri Di' kaj l' mondo kaj la propra koro,
longe post kiam lipoj senmoviĝis
kaj tiu bildo malaperis tute.

“Kiu ŝi?” Mi Henohon alparolis.

Strange li turnis al mi la okulojn.
“Ĉi tiu antaŭlonge ĉesis spiri,
jarcentojn pre ol vin la tero formis.
Ŝia rakonto estas forkaŝita
en dike kunvolvitaj pergamenoj
kaj polvprofundoj de la historio.
Sur nia tero ŝin jam ĝis la nomo
la pluvoj de la temp' forlavis tute,
sen tomoŝtona skribo aŭ memor'.”

“Sed evidente tiuj ŝin revokis
per ia lango de scienc' konsterna,
kvaz' oni daŭre konus ŝin intime.
Kaj ŝajne se mi paŝus apud ŝin,
ĝis mia mano al la bild' proksimus,
vivanta varmo saltus ĝin renkonte!”

“Solidografoj estas tiaj, do
la epizodo ŝajnis remuldata
el vera ŝtofo kaj sentiva karno
de la minutoj kiujn ni spektadis.”

“Sed kial?”

“Oni studas nian teron.

La homoj tie estas kvaz’ mikroboj
malsane per la peko infektitaj,
suferigantoj kiuj mem suferas;
kaj la sennombraj galaksiaj mondoj
sub siaj mikroskopoj kun kompato
traekzamenas ĉiun karnan eron
en longa ĉeno de la eventaro
per kiu Lucifero implikiĝos,
kvankam forĝinte ĝin aliacele.”

La spino al mi glaciigis. Mi tremis,
kaj granda frosta vento de la timo
trablovis min, sub penetranta pik’
fro la okuloj akraj, trans kalkulo,
kvaz’ hajlo sur planteto delikata.

Tamen mi rememoris la vizion.
“Sed kie, kiam, brulis ŝia fajro,
kies korpvarman lumon mi sopiras?
Ho montru, montru ŝin al mi denove!”

“La tempo pasas. Jam ni devas iri
al tio, kion ni atendis. Tamen...
por via kor’ ne mankos plia ŝanco
revidi ŝin. Nun ek al tiu pordo.”

“Mi petas, minimume ŝian nomon
permesu al mi kiel karan perlon.
La fantazio povos ĝin parfumi
per ŝia pura, imagita tuŝo,
kaj tra la noktoj de l’ futuro teda
ĝi fosforeskos per magia lumo.”

“Ria. Sed jam ni tardas. Tien ĉi.”

Sen scivolemo, kun la mens’ ankoraŭ
kroĉiĝinta al tiu logimago,
kaj ŝia nomo kloŝe purarĝenta,
mi sekvis lin, sed pridemandis fine:
“Kiaj ĉi ĉambro, tiuj instrumentoj?”

“La prepariloj por la vojaĝado,
kiun kun mi vi devos nun komenci
trans la epokojn homoplenajn, larmojn—
abundajn en la mondomar’ amare—
kaj ĉiujn templiniojn de l’ destino.”

“Tempvojaĝi! Sed ĉu ne maleblaĵo
ĉar paradoksa? Per ĝi oni povus...
nu, elimini sian propran avon!”

“La argumenton mi ja konas. Tamen,
en sian konstruaĵon de la kosmo
la Dia arkitekto preinkludis
kelkajn tre kuriozajn koridorojn.
Kaj jen ni pretas.

“Niajn korpatomojn
nun jam ne regas spacotemp’ normala.
Do kiel observantoj ni kapablos
transgliti la diurnojn kaj jarcentojn,
por vidi kiel ĝermas kaj kreskadas
la granda arbo de la historio,
observi—ĉeestante—la radikojn
kaj ĉiun disbranĉiĝon, ĉiun trunkon
esplori. Kaj vi tiel mem atestos
la praan veneniĝon de la grundo,
kun unu sana Branĉo engreftita,

kaj la fruktojn, la plej diversajn fruktojn
ĉe la klimakso en la mondrikolto.

“Sed tia speciala pov’ dotitas
por periodo limigita. Venu.”

V

Tra la muregoj de l’ ŝlosita ĉambro,
nun sensubstancaj, kvaz’ nebulo griza,
ni foris, pli ol palpebrum’ rapidaj.
Kaj jen denove steloj iĝis strioj,
kaj l’ nigra vato de la nokto vaste
ĉirkaŭ mian kapon revindis sin.

Ekdancis en mi lumoj kaj figuroj,
kaj speciale du vizaĝoj venis
naĝe en tenebresa ocean’,
arume blankaj: Ria, la flustrinta
en sereneco de knabina preĝo,
kaj l’ ironia Lucifer’. Mi tremis
ĉe tia apudiĝo de la bildoj.

Kaj tiam, ek, mi vidis Orionon
kun la prahundo en senĉesa ĉaso
tra nia zodiako tre konata.

Unuflanke, malgranda ormonero,
la propra suno flagris, sortŝargite,
tre ordinaraspekta kaj fatala.
Subite sub ni nia Ter’ globiĝis,
glorsonĝo el safiro kaj smeraldo
en blua, diafana nimb’ volvite,
kvaz’ fea mondo sur magia fundo
de mirveziko, nube ŝaŭmkadrita!

Sed ĉiuj kontinentoj ŝajnis strangaj
kaj ektorditaj, kiel sur pramapoj
kiujn dum la jarcentoj de esploro
faradis la unuaj navigantoj,
ĉirkaŭvelinte sian fremdan teron,
ĉe la reven' kun kargo da rakontoj.

Tiam min kaptis la panik' subita,
kvaz' pseŭdopodo en inkuba sonĝo,
kiam—dum dormo kaj konfuz' perдите—
ĉio de l' eksa tag' parodiigās.

Ĉu eble en malĝustan galaksion
aŭ sakstrateton de la temp' ni vagis
ekster la ordinaran realecon?
Ĉia supoz' sovaĝa tra la menso
kuris—nur unu vero ne bonvenis:
ke tio estas mia naskplanelo;
sed kredi, ke ekzistas nun ankoraŭ
nek mi nek nia tuta historio...!

“Hejme,” teneravoĉe spiris Henoĥ.
“La kontinentkonturoj plej amataj,
en tuta univers' plej verda verdo!”

En la opala lumo de l' mateno,
tra kiu lante ni lanugis suben,
sur lia bruna vang' pluveris larmo.

Tiam ni sur ĝangaltapiŝo staris
inter zumetoj, blekoj kaj pepado.
De trans la arboj dinosaŭra kapo
nin ekrigardis kaj maĉadis plu,
kun birdsimila besto sur la ŝultro.

“Ne timu; ankoraŭ mankas la danĝeroj.”

Ni padis tra la densa foliaĵo
ĝis kie la ĝangal’ abrupte ĉesis,
kvazaŭ per klingo iu man’ giganta
grandegan cirklon eltranĉintus. Tie,
aliaspeca, orkideobela,
la paradizĝardeno etendiĝis.

Mi volis paŝi plu, sed la aero
min ekrezistis.

“Energia muro,
sed jen la enirejo!”

Emocia,
kiel la kondukanto, mi lin sekvis.

VI

En granda florarbedo ni atendis
apud la bela kaj satana arbo,
kies suko tro dolĉa kaj venena
(fonto de nia praa malobeo)
per ĉies ruĝa sangalflu’ laŭtempe
fariĝos riverego da mizeroj.

Ne la frukto, laŭ Henoĥ, sed ribelo
de l’ mano kiu plukos, morton donos;
sed dum mi staris antaŭ la momento,
ĉe tiu disforkiĝo de la vojoj
kiujn la homo povis ekiradi,
kun prea scio pri la elektaĉo,
la vido de ĉi verda vojmontrilo
ĝin haki for eksopirigis min.

Sed la scenejon oni jam preparis.
La ĉielarke bela reptilio,
nun alfluginte, sur la branĉoj kuŝis;
kaj ŝirmis sin pon foliaĵvualo
iu malica, ventroparolist'
malklara—kiel inter cipresarboj
svaga, blanke kalkita tomboŝton'.

Piedpaŝoj, kaj jen ŝi jam ĉeestis.
Pro ravo mi enspiris, surprizite,
ĉar—nudulino de la sama ras'
kiel Henoh, kaj plej glora kvazaŭ nubo
kiam la plena lun' ĝin tralumigas—
al Ria ŝi aspektis...tro simila!

Altstatura sub dolĉa somersuno
ŝi staris en ekstazo, beladora
ĉe l' arbo antaŭ bunta songobesto
kaj flava frukta oro. Tiam softe,
en molsilaba lingvo, kiun ial
(eble pro revekita rasmemoro)
mi komprenis, parolis la serpento.
Kaj tiu melodivelura voĉo,
kiu antaŭe la ĉielojn ĉarmis,
karexis ŝian koron. Kiaj elanoj
kun la neniam supozitaj bruloj
la karnon al ŝi ravis?

Ni aŭskultis
la pramensogojn pri la senmorteco
nature enestanta, eĉ sen Dio,
kaj plia saĝo—ĉar ĉu ne la fruktoj
ĝin faris paroliva?

“Estu dioj!”

Ho jes, ke viaj filoj sur glavpinto
aŭ gase en koto kaj tranĉeoj mortu,
aŭ post la bombradioj ekgustumu
la propran sangon, salan inter dentoj;
ke la filinoj hejme dorlotitaj
dum ĝemoj atencatu, ke virbrutoj
ebrie pugnu ilin aŭ kontraŭ murojn
frakasu cerbojn de la idoj karaj!

Ke ni fariĝu dioj, dioj, Eva,
kiuj krom ĉio bona plej intime
konu intestovermojn de la mavo,
en ni putrigajn—pli ol ajna mond’
alia kiu en la vasta nokto
apud la propra sunofajro kaŭras!

Tie oni neniam estas dioj,
sed ĉiam flanken turnas la okulojn
kaj plu senĝene povas preterpaŝi
la proprajn ekzemplerojn de la arbo
kun ĝiaj esperigaj verd’ kaj oro.

Nun manĝu, manĝu, Eva, nian morton;
ĉar ni, la dioj, devas ĉion koni!

Mi volis krei, sed la lang’ ŝtoniĝis,
kaj volis al ŝi paŝi, ke la larmoj—
kiuj solviĝe ekestis la okuloj—
pledadu pli ol elokvento.

Sed,
kun la vizaĝo forturnita, ŝultroj
ekskuiĝantaj, Henoĥ mian pojnnon

per sia propra man' titana tenis.

Do tiel estis. La korala buŝo
kvaz' en volupto stranga, amatine,
por ĉiuj morton kisis unumorde.
Kaj jen la suno ŝajnis malheliĝi,
kaj venis eta piko en la venton,
kaj ĉie voĉoj de l' ĝangal' ekmutis,
kvazaŭ forpasus io nevidebla.

VII

Mi estis ekferminta la okulojn,
por ne plu vidi ŝin ebrie ĝojan—
la dolĉajn gutojn de la pek' glutantan,
antaŭ momento de la postamaro.

Ĉe l' rerigardo, estis kvazaŭ iu
abrupta scenŝanĝiĝo en kinejo.

Nin nun ĉirkaŭis nur malmultaj arboj.
Tapiŝon verdan la savan' disrulis
ĝis preskaŭ sur la horizonto. Dekstre
enorma urbo, Nov-Jorke alta, bruis—
flustrego de giganto frumatene.
Tra la aero jeto triangula
ekhurlis al la kampoj kaj sin lanĉis
ĝis ekster nia vido.

En perplekso
mi klaron serĉis. “Kie ni troviĝas,
kaj kiam? Ŝajne ni per tempa salto
forfulmis al futuro malproksima,
sed ĉiuj trajtoj de la urbo fremdas
kvazaŭ, nu, io preter la epoko

iam naskonta min.”

Sed ridetante,
tiun supozon Henoĥ foreksplikis
per unu ora nomo: “Atlantido”,
kiu en la antikvaj songoj brilis
kaj per legendoj pasis kiel flustro
al la oreloj poste nekredemaj.

Ni rigardadis de ĉi civilizo
l’ unuan elfloradon, kiun baldaŭ
la mano de atommilito plukos
antaŭ rekresko al pli granda gloro
kaj la koruptoj kiuj ĝin detruos.

Tiam Henoĥ fortrenis la atenton
sur grizharulon ĉe apuda arbo,
kie la tombeltrudo al ni montris,
ke sub ruĝtera litkovrilo kuŝas
korpo en sia lasta, longa dormo.

Estis Adamo, la prapatro, kiu
ĉi-loke iam enterigis ŝin,
el kies mano antaŭ naŭcent rampaj
jaroj li prenis frukton malespere,
por iel eviti la disiĝon duran,
kiun ĉielordono baldaŭ kojnus
inter ŝin kaj lian junviran amon.

Dum tion la kunulo envortigis,
lia rakont’ fariĝis kvazaŭ bildoj
kiujn mi klarvidule alrigardis
per vitropala kristalglobo—en
la cerbo de Adamo. La figuroj
de la jarcentoj prisme ĉielarkis

kaj rekorpiĝis en la memoraĵoj
kiel agado, lokoj kaj vizaĝoj.

Precipe tiu tago de hororoj
dum kiu li unuafoje vidis
la verdan karnon de la arbpopolo
flaviĝi mortkomence en aŭtuno.
Poste, dum la vesperoj, li rimarkis
kiel somer' glorce de forfolias
sub sibla lango de la longa vento,
ĝis restis nur skeletoj de l' espero.

Tiam li sciis, tiam li malkovris
terurvizaĝon de la mortdekreto,
kiu kvaz' vermoovo ankaŭ en li,
tra tagonoktoj kaj la jaroj dormos
ĝis fina vintrovoko el la nordo.

Vane li multajlarne la konsolon
inter la mamoj de la amatino
serĉis, kaj kiam en ŝi ekmoviĝis
la nova vivo, frida antaŭsento
lin ĉirkaŭ lia menso fingropremis.

Kaj tiam—ĉu post horoj aŭ jardekoj?—
kadavro en la brakoj: Habel, Habel!
La sangoflu' el ties kapo, truo
fro kiu ruĝa riverego kreskos
tra nia tuta homa historio—
far li vidota, kaj en la krepuskon
de ĉiuj naskiĝontaj buĉepokoj.

Ho la karesoj de la frida frunto
pon kiu nur tenebra nokto restis!
La infanaĝo kaj la junvireco

denove kun li travivita. Voĉ’
ridplena kiel suno sur saltantaj
akvoj, forfluj manogestoj, koro
kiun abrupte la silento prenis.

Li patris al murdantoj kaj viktimoj,
kaj baldaŭ multiĝantaj posteuloj
riproĉis kaj mokadis lin. Nur iuj,
kiel la pene sanktiĝinta Henoĥ—
kiun forprenis Di’ ancor’ vivantan—
kompatis lian triston, kaj kunprovis
staradi kontraŭ tajdoj de la nokto,
dum en cerbo post cerbo estingiĝis
verfajro kaj sopiroj al la lumo.

Tra ĉio larmis aŭ silentis Eva,
kiu ridvoke tiel kapriolis
iam, en la majmonda paradiz’—
aŭ ŝia pli ol najtingala voĉo
per kantoj teksis sub la sunradioj,
kaj inter jubilantajn arbobrakojn,
araneaĵojn el arĝento. Mute
ŝi kurbiĝadis, dum la duraj jaroj
ŝarĝojn plipeziĝantajn sur ŝin pakis,
ĝis en la tero ŝi sin kaŝis for.

“Konsolas nur manplen’ da promesvortoj
kiujn eksemis en li la Kreinto
ĉe la lamenta paradizelpelo,
pri la venonta ido kiu lukte
la mondon el la fortaj drakoungoj
de l’ triumfinta Lucifero ŝiros
kaj mortfrakasos ties serpentkapon,
kiu laŭplaĉe la naturon tordis—
reformaĉante per malpura tuŝo

por forsklavigi ĉion, kio spiras,
en Dispita, sinturmentanta tero.

“Sed vane laŭ la vico de naskiĝoj
li serĉis, serĉis la infanvizaĝojn
por ia signo, malgraŭ la mokado,
ne konjektante kiom da jarcentoj
devos ancor’ tumulti inter Tiu
kaj lia polvo. Nur ĉe lia morto,
la plej amara glut’ el vivpokalo,
per Dia graco, la vizio venos.”

Mi rigardadis la izolan formon
ĉe kara tombo, dum la urbo graŭlis.
Ekbrulis al mi la okuloj. Tiam
ĉio en la nebulo ekkunkuris
kaj reklariĝis en alian scenon.

VIII

Nun ĉirkaŭ ni la homoj abelujis,
dum vortoj tra l’ aero flirtis zume,
kaj ofte rido kvazaŭ floro kreskis,
forvelkante. Mi sentis min pigmeo
en tiu gigantejo. Scivoleme
rigardoj jen kaj jen ekfrapis min,
sed ĉiam revagadis al l’ antaŭo.

Do tien mi kaj Henoĥ vojon fosis,
ĝis ni alvenis en l’ unua vico,
kie aŭdiĝis maŝinkantad’ obtuza.
Gruoj altegaj, strutaj siluetoj
aĵure apud vasta ŝipkaren’.

Sed tiam tondrofrape la silento

sur ĉiujn sian grandan plandon metis,
kaj formutiĝis la maŝinsoprano.

Fine junulo ridis apud mi
kaj ekparolis dum la homa bruo:
“Do Noa vere kompletigis ĝin,
post cent-dudeka jaro da ŝvitego,
spite al monomanko, la rifuzoj
pri la konstrupermes’, bojkotoj kaj tagoj
kiam anstataŭ laboradi li
al la mokema homamas’ predikis
pri diluvego kiu ĉion glutos.
Lusufro, vi do fine malsukcesis,
kvankam ne vere gravas. Ne diluvos!”

Mi ekrigardis la alparoliton,
tre altstaturan kaj majestan homon
eĉ tie en la loko de granduloj.
Li estis eksternorme belvizaĝa,
kvazaŭ ekviviĝinto el marmoro.
Mi vidis, ke li havas noblan frunton,
sed la orgojlo arkis sur la lipoj;
kaj duondorme en l’ okulprofundoj
kuŝis feroĉa, spinfridiga lum’.
Apen’ al li konvenis kurtaj haroj
aŭ lia Atlantida kitoneto.

“Certe, Jarok. Neeble ke diluvos,
ĉar niaj geologoj pruvis tion.
Sed Noa estas frenezulo ĝena
kiu tro ridindigas la kulturon
de nia progresinta tempepoko.
Oni en la arenon ĵetu lin,
kun pistoleto, por la dinosaŭroj;
aŭ kirke Stelsorĉistoj dum diservo

sur la altaro buĉoferu lin!”

Denove ridis la junulo. “Eble, sed mi admiras tian persistegon kia peladis lin. Se li nur volus, inĝeniero jam jarcentojn sperta, li povus tre utile helpi nin la astroŝipmotoron perfektigi.”

“Ho jes! Sed diru, kiel ĝi progresas?”

“Preskaŭ kompletigita. Ni ĝin testis ĵus antaŭ du semajnoj. Ni vojaĝis, kiel plej hasta fulmo, ĝis l’ orbito de nia naŭa mondo, sed atendos antaŭ ol iri ekster la sistemon, dum kvin aŭ ses monatoj; la tubmetal’ ne taŭgas por flugi pli ol lum’ rapide. Post unu semajno ni raketos lunon kaj daŭrigados la eksperimentojn.”

“Sed kial ne pli baldaŭ? Mi eksentas, kvaz’ ĵusa voĉo flustras al mi urĝe, ke la somera brizo de la sorto, kiu favoris nin, jen ektorniĝis kaj uragane niajn revkastelojn, kiuj ĝis la ĉiela alto turis, balaos en la maron.”

“Hu, Lusufro, ĉu tiu febro de la superstiĉo jam tuŝis ankaŭ vin? Ha, ha, ha! Mi do informu Noan, ke li fine elektrovis unu veran pasaĝeron, aldone al la sep familianoj,

por kunnavigi sur la seka grundo!

“Jen ok personoj jam internas, kun bestoj
en par’ post paro almarŝintaj mem—
laŭ homoj kiuj la pasintajn tagojn
vaĉadis. Tim’ estas drogo halucina.
Ili asertas, ke ĉi grandan pordon
ekfermis poste nevidebla mano,
kaj per sunhela fulmo ĝin sigelis.
Noa nun ŝajne ie en la holdo
finis aranĝon lastan. Se vi kurus,
tamen, kaj pugnus kontraŭ la karen’,
lia kompatato eble hokus lukon
por haŭli vin en lian aventuron.”

La ŝercemo de l’ petolinto ĉesis,
kvaz’ gorĝe ŝtoniĝunte, ĉar Lusufro
lin alrigardis tiel furioze,
ke la okuloj ŝajnis kiel fajro.
Jen akraj surpriziĝo kaj turment’
ektordis la vizaĝon de l’ junulo,
kiu kiel hakita arbo falis.

Virinaj voĉoj ŝrikis pro konsterno.

Terure la rigardo ĉirkaŭ si
elfalĉis spacon kiel akra klingo.
Oni ekfalas teren aŭ retretis.

Kaj tiam li rigardis ankaŭ min.
Ektuŝis min l’ okuloj fajrovipe
kaj ŝajnis en la cerbo eksplodigi
ruĝajn lumbulojn.

La rigard’ al Henoh

flirtis plu, sed la ardo en ĝi mortis
sub nekredema miro de rekono,
kiu ĝin forestingis kiel duŝo.
Kaj tiam, kvazaŭ alumeta flamo
antaŭ subita vent', li malaperis.

“Lusufro—Lucifer'!” mi flustris treme.

Tiumomente tondris, kaj sobplumbis
sur nin l' unuaj grandaj pluvogotoj.

IX

Jam kvardek tagojn poste, ĉe l' kulmino
de la diluvo ĉion digestinta,
kun Henoĥ mi ŝvebadis super maro
kiu nun kiel rosogut' polveron,
aŭ amebego manĝon, ĉirkaŭglobis
la tutan teron.

Ĉie sur ĝi drivis
kadavroj kun aĵoj de la civilizo
dum ĝia historio sorgrimpinta
per giganteskaj paŝoj al plej alta
kaj ebriiga ŝtupo, kiu falis
ĝis la profundoj de putranta vivo
kaj kruelec' apenaŭ superotaj
far nia jarcento la dudeka.

En mi
premkuŝis tomboŝtono sur la koro,
tial ĉar ant' ol Henoĥ min forŝiris
el tiu lasta loko, mi rimarkis
ŝian vizaĝon, kiu hantis min
jam ekde la unua horo.

“Ne Ria,”

la kondukant' klarigis. Sed kiel mi
ne povis ne kunsenti la teruron
de la okuloj kiuj logis, kvankam
en alies korpo? Kaj ŝiaj haroj,
la kaŝtanea kadro de la trajtoj,
jam perdis ŝiajn buklojn pro la pluvo,
kaj magra robo muldis ŝian korpon
plej kompatinde.

Supren ŝi rigardis
kaj preĝis—ho memoro!—sed la vortoj,
sobfrapitaj de l' peze vipa pluvo,
jam ne kapablis flugi al la Patro,
kiu nun ŝajne pro la bru' surdiĝis.

Ho povra papilio senkomprena
kaptita inter radoj de l' destino!
Sur miaj vangoj fluis varmaj gutoj
kun la akvo.

Sed tiam, ek, ni foris.

Do nun mi super la mortinta mondo
tristis pri ŝia korpo kontuzita,
flosanta kie? Sub putriga sun',
ankoraŭ en la gajaj somervestoj,
aŭ ie sub profunda kot'—por kuŝi
kun la rompitaĵoj kaj arbaroj,
prafosilioj laŭ la estonteco.

Ĉu min kompensis tio, ke ĝisfunde
dum l' amaregaj tagoj Lucifer'
kininon de la malespero glutis?

Li ploris pro ĉagreno kaj angor'
ĉe l' ruinigo de la civilizo
kiun li instigadis kaj pri kiu
li al la universo fanfaronis
kiel la enkorpiĝo de l' principoj
anarkiaj, lin iam ekzilintaj
el la ankoraŭ prisonĝata mondo.

Kiam la montoj treme kunfaldiĝis
kvaz' cigaredpapero, kaj ondegoj
en pulsoj trans la kontinentojn rampis,
dum grandmuskola mar' pitone glutis
la baraktantan, konvulsian mondon,
kaj la spirego de la du luktantoj
uraganis kun tuŝoj bombeksplojadaj,
tiam la timvizaĝon li renkontis.

Sub la martelobatoj de la ŝtormo
kiuj kaj jaktojn kaj ŝipegojn rompis,
sed kiujn super la arke' rezistis
la feramboso de la man' de Dio,
Lucifero flirtadis kiel muŝo,
por iel eviti korpfrakasan frapon;
ĉar kiam ajn li provis foreskapi—
kiel la kunkulpintoj—en la spacon,
la Diaj fingroj kapte lin reĵetis.

Nun fine, fine, post la tempestego,
li tamen ian tralasejon trovis
kaj kun la samsortanoj sur la luno
atendis, kvazaŭ paciencaj korvoj,
ĝis la mondakvo elgorĝigos iam
la kadavron de la droninta tero.

Sur la planeda maro ni rigardis,
longe, la flosetantan semskatolon
el kies grajnoj la futuro kreskos.

Sangruĝa suno post la taginspekto
trans distan horizonton pezfarmiste
paŝis for, kaj la scivolemaj steloj
fro trans la nigra heĝo de la nokto
la inunditan mondĝardenon gvatis.

X

La frua sud-Sumera nokto jam
per akraj astrokojnoj rekomencis
orlume premliteri prarakonton
super dezerto kaj la du riveroj.
Ĉe angulo de l' senfenestra Lagaŝ
ni staris dum momentoj. Homoj fluis,
taglacigite, laŭ la stretaj stratoj
al bordoj de la dormo. Venteto nova
timeme tuŝis nin kaj kuris plu
ĝis trans la fajne sulkiĝinta polvo.

Kvaz' sunmakulo inter kunaj fingroj
lampo tra pordofendoj lumis ruĝe.
Al tio transmarsiŝinte, ni enpaŝis.

“Fermu la pordon!” raŭkis al ni voĉo
ebriete.

Sur litaĵar' bestfela
la maljunulo sidis dorsalmure—
laca—kvaz' roko kontraŭ klifa kruto.
La lampo sunis sur la disblovita
neĝo de liaj haroj, kaj ekstere

el mallumaĵoj vento plilaŭtiĝis.

“Aliaj scivolemaj, mi supozas!
Rigardu bone: Noan la antikvan,
pli oldan ol via vilaĝet’ Sumera;
ĉar revokadas nun la terpeceto
fro kiu Dio antaŭ naŭcent jaroj
ŝoveletis ĉi mian povran polvon.
Oftege, sub la noktvaganta luno,
antaŭdiluva ombro, mi serĉadas.
Sed ĝi ne estas inter la tritiko.
Sub iu dezerta duno transrivere
ĝi atendas, aŭ sub la grandaj akvoj,
aŭ eble arbo kaŝas ĝin subplande
sur la alia vango de l’ planedo.

“Tamen, barbaroj, vi ne kredas min,
ke l’ mondo estas turniĝanta pota
kiu tro ebriigas maljunulon.
Jes, mi konscias, ke malantaŭ mi
surstrate vi skuetas saĝajn kapojn,
kiam—memorpelito—mi rakontas
pri la dronintaj tagoj sub la maro.

“Sed vi povruloj kaj mizeraj muŝoj
kiuj dum kelkaj tagoj kadukiĝas
sur via rubejeto ĉe Eŭfrato,
restinta de grandega civilizo,
ĉi mia cerbo estas la arkivo
por viaj mitoj kaj rakont’ argilaj!
Eble la sun’ aŭ luno ĝin jam tuŝis,
sed ne rakontis mi al vi fabelojn.
Kial mi plektus por vi fe-rakontojn?
Ĉar kiel ĉio en ĉi kruda loko
tiaĵo ne valorus mian penon,

krom por pli streĉi jam lacegan koron.

“Bonvolu doni al mi tiun kruĉon.
Dankon. Ĉu vi rimarkis mian kruron?
Iu diablo dum la konstruado
de malbenita tur’ ĉe l’ Olda Babel
brike ekrompis ĝin kaj mian vivon.
Nu, se mi restus for, anstataŭ moki,
tiu momenteraro ne fariĝus
dum la jarcentoj ĝen’ kaj suferado.
Sed tie, en la forlavita mondo,
kiun mi pro la Diordon’ perfidis
kaj do ne rajtis poste pretervivi,
oni kapablis resanigi ĝin,
aŭ rekreskigi novan anstataŭe.

“La karajn junotagojn mi oferis
sur la altaro de la Dia volo,
por dronestingi tiun helan teron
kies ombroj hantadas miajn horojn.

“Sed kial? Ĉu vere al li plaĉas mondo
de distorditaj montoĉenoj, frosto
kaj la profunda sablo—kun sezonoj
ekfariĝintaj tiel malmoderaj—
post kiam la tuta tero estis parko?
Per rasaj mutacioj li kruele,
disunuige, hakis la homaron
ĝis en tribetojn kaj eĉ familiojn
de feblaj uloj stultaj, efemeraj.
Kaj nian noblan lingvon li forŝiris
el la mensoj, ke restu nigraj truoj,
kiujn ne povis fliki dialektoj
baldaŭ evoluontaj laŭbezone.
En multaj mankas eĉ taŭga vort’ por Dio.

Ĉie la postkaoso kaj disfalo.
Kiumotive?

“Tagon, antaŭ longe,
ĉe plaĝo de l’ krespuska, milda maro,
alvenis lia voĉo, kiel vento
kiu tra nia foliaro flustris
apud la forsinkonta patra domo.
Sed ekcedante al la luma logo,
mi ne komprenis pri la nigraj padoj
kiuj estas liaj vojoj. Sed kial
li ĉiukaze nun ne viŝas for
el miaj oreloj sonojn de la pluvo
kaj la malpuraj ondoj kiuj kreskas,
por reinundi mian songĝpejzaĝon?

“La fingro de la nigra konscienco
en mia cerbo fosas kaj tordadas
kaj min neniam lasos ĝin forgesi—
de mondo mortiginton. Sed en larmoj
neniu dronas.

“Nun precipe duras
post kiam la edzin’ perdiĝis, pro...
apendicito!

“Du el miaj filoj
kun siaj posteuloj primitivaj
kiel abeloj trans senmapan teron
migris for, kaj fariĝis jam legendo.
Sole la tria restas, sed—jam aĝa
kiel mi—li senvorte pasas min
sur la komuna strato de la vivo.

“Valoras nur la dormo. Ĝi min portas

proksimen al la lasta, granda dormo,
kies sonĝoj ne ŝokos aŭ torturos.

“Kompleze realdonu mian kruĉon,
kaj tiun pardonon fermu, elirante.”

Ni kunelportis inter ni silenton
en plian, insultantan blovon. Dekstre
peco da luno kiel fingroungo,
malforte briletanta en la nokto,
tuŝis la turon de la Iŝakú.

Trans polvoplenan straton plaŭdpaŝinte,
ni reregardis la fermitan pardonon
al mondo de tro doloranta menso
entombigita sub profundaj horoj,
kies sencon ĝi jam komplete perdis.

“Sed kial, Henoh?” Mi la vortojn trovis,
post kiam mi palpserĉis la aferon.

“Ĉu vi alion do atendis? Jen
la peza ŝarĝo de la okazaĵoj
jam tute rompita lian penan koron.
Ĉar sen elekto, Dio uzis lin,
senteman, mildan kaj teneran homon,
kiel levstangon en tro dura mondo.

“Tial de lia menso la metal’
kurbiĝis, kvankam li ne agas saĝe
kiam li tiel dubas nian Dion,
la Eltrovinton de la universo,
tamen kapablan rerektingi ĝin.

“Malgraŭe la kompata Ĉiopatro,

kiam en fina tago li refaros
la paradizon el ĉi dorna tero,
fro tomba rifuĝejo lin revokos
al mondo kies nomo estos paco.”

“Tamen, Henoĥ, pri tiu mondfrakaso
li argumentis bone. Kial? Kial?”

“Ĉi okazaĵoj havas tempolongon
kaj eĉ laŭspace larĝon tro ampleksajn
por streta kadro de la homomensoj,
tere kroĉitaj al la lok’ aŭ horo.
Sed jam progresis la eksperimento,
kaj disruliĝis fazo la unua
antaŭ okulojplena universo.”

“Sed kion pruvis tio krom arbitro?
Tiu ja estis glora civilizo.”

“Home, nu jes, sed aliperspektive
eĉ la atomepoko povas esti
ĝangalkulturo. Lucifero jen
okazon sian havis, sed nur montris,
ke la scienco, kvankam per si bona,
montriĝas—kiel framo de socio—
tro febla ŝtofo. Sen morala forto
ĝi ekkolapsas sub la pezaj jaroj.

“Nur tiufoje l’ Eternulo mem
abruptahore malkonstruis ĝin
kiel avertilon al la postepokoj,
ke laŭokaze li ja intervenos—
kaj ankaŭ ĉe la flagra terofin’.

“Kaj pensu, plue, ke la mondrakonto,

pro ĝia giganteska skalo, lante
kompreniĝas. Jarcent' ne estas pli
ol paragrafo, unu homa vivo
frazero aŭ silabo, kaj rivelos
la plenan sencon fine nur la tuto.

“Tamen ni nun ĉi tie restis jam
tro longe. Metu ni da jaroj inter
ni kaj tiu tro polva uragan'!”

Libro 2

I

Ĉe piramidoj kaj la sfinksvizaĝ',
ankoraŭ sendifektaj, la sun' ŝaltiĝis
post ruĝvangiĝo sur la horizonto.
Friska pluketis brizo niajn vestojn.
Sed pli ol rav' de l' olda rev' turisti
tien, realigita strangokaze
kaj eksterjare, superŝutis min
lavango da surprizoj.

Ĉar ĉekorpis
subite sur vakejo interduna
la tri figuroj.

“Jen vi do! Ŝalóm,
Mose'! Vi povus nun transpreni lin.
Sed ĉu mi konas viajn du amikojn?”

Tian familieron mi ĉe Henoĥ
ĝis tiam ne rimarkis. Leĝerĝoje
antaŭ kolego klare simpatia.
La trajtoj al li grande pliheliĝis,
kiel sunflave piramidofac'
post sombro sub la steloj montris sin—
dum mateniĝo—vasta laktebeno
pro la kalkŝton'; kaj elektrumtegite
tri pintoj ĉe l' estonta Gize glimis.

Mi en min kuntiriĝis, rigardante
tiun viron abruptan, tro afable
bonvenigitan. Ĉu de nun do vere
min devos kondukadi plu ĉi homo,

kiu min tiom kuspis, pli ol ajna
samplanedan' alia?

Ordinara
aspekto. li semidis, tre malblonda,
nur iomete granda kaj muskola;
sed ne kiel la majesta marmoraĵo
kiun Mikel-Anĝelo dek sep homvivojn
antaŭe en preĝejo ombra lasis
por mia krom alies mir', spirkapta
dum Roma posttagmezo.

La fil' de Amram
prezentis la kunulojn: "Atris, Margu,
de l' Ektelmondoj apud Betelĝuzo,
pri kiuj foje estis la rakonto."

"Do Henoh!" Unu lin gaje almienis,
kontenta, el vizaĝo oldebura—
estul' atleta. "Ni lin akompanis
por trovi kaj al ni inviti vin.
Nia sistemo longe atendadis
tian de vi honoron, scivoljoke,
por pridemandi l' unuan eskapinton
fro kadukiĝo kaj la ŝim' en tomboj—
per kiu ĉies revo iĝas polvo,
eĉ de l' mirindaj, sur la Ter' Malsana.
Ĉu tion vi konsentos?"

Kapklininte,
Henoh min serĉrigardis. "Do adiaŭ
por mi kaj vi, ĝis horo trans jarmiloj,
se vi ne kontraŭtiros tiun Amon
kiu magnetas vin. Kuraĝon!"

Li levis

la polmon, kiel triste mi la mian,
por lasta intertuŝo inter li
kaj mia sperto.

Jen li forviŝiĝis
kun la ekstermondanoj, fro la sablo
kaj ŝarĝoj de la horo pra-Egipta,
al pli feliĉa tero.

Ĉirkaŭ mi
vekiĝis la unuaj tagotintoj,
kaj atendadis, ke mi lin atentu—
kun sia longa ombro—la gvidulo
kaj leĝdoninto de l' popol' Hebrea.

II

Kaj tiam aliaĵo min ekskuis,
kvaz' ventŝancelo en aŭtuno poplon
tremigus. La kor' forkaŭris de l' kontakto.

Li tuj rimarkis. “Kio al vi estas?”

Ĉi zorgo kaj la milda voĉ' surprizis
ĉe iu kies vortoj trans epokoj
glavpinte celis tranĉe en la koron,
per leĝminacoj kaj la sangordon'
forbuĉi sep popolojn altkulturajn—
ĝis timsingulto ĉe la lasta ido—
apud l' antikva Maro de Amurru.

Memori estis ekindigni. Tio
preskaŭ el mi forŝiris, sed ne tute,
la akran timon ponardintan min.

Mi ŝvitis dum la pulsoj en mi saltis.

“Ne ĉagreniĝu se, spirito granda,
mi devos iomete kutimiĝi;
ĝis nun neniam mi rilatis tiel
al ombro ektoplasma de trans tombo.”

Ĉe tio li ekridis, ventroskue,
kaj forsurprizis el mi la teruron;
ĉar tion ĉi mi ne atendus.

“Fant’...

Vi opinias min fantomo, ĉu?
Pardonu min, sed hom’ el via tempo
ĉi kotan superstiĉon de si lavu.
Kaj jen rigardu—venu palpi—min.
Mi estas, kiel vi, pinĉeble korpa.”

Mi ne alpaŝis. “Sed mi klare vidis
per la korskua libro Readmon’,
ke larmizole vi sur Nebo mortis,
en posttagmezo dum—rikoltsezono—
aŭtun’ priverŝis flave Kanaanon.”

Tie la Eternulo fine baris
al li pluvojon, piediran, koran,
post ĉiu vasto kaj dezertojar’.
Pro plorsingulta petopreĝ’ li nur
koncedis al li paŝti la okulojn,
fro Negeb ĝis Karmelo, fro Jordan’
ĝis en nebulojn de la Granda Mar’,
kie mondo okcidenten malaperas.

“Nu, certe, kaj mi volas vin gratuli
ĉar tiom vi komprenis. Viatemp

la Sankta Skribo pleje men konatas
ol dezertvaloj dorse de la luno.
Laikoj ne gustumas mem, tro hastaj
sur havavida vojo al la nokto,
dum pastroj kaj pastoroj tordas ĝin
pro ŝimaj ekleziaj superstiĉoj,
apenaŭ pli validaj nun ol pio
de l' teologoj dum la Olda Regno.
Por tiuj ĝi ne estas vortoj vivaj
sed ia nova Libro de l' Mortintoj.

“Tiajn mensfungojn Lucifer’ kultivas
kun sia bando, kaj por kirka nutro
rikoltas malavare!

“Jes, mi mortis.
Sed jen spureblas ankaŭ plurakonto,
ke kontraŭstare la Fiul’ disputis
kun Mikael’ pri l’ korpo de Moseo.

“Ho kiom mi refrandas tiun horon!
La sunvizaĝo de la praa Reĝo
kaj lia mano kiu min sorhelpis
el tombo, kies faŭko malfermiĝis,
kaj sombra nenieco!

“Kaj vi scias,
ke fine por mi falis la barmuro;
kaj tamen mi sorplandis tiun landon,
poste—sed laŭ alia alirejo.”

Mi konfuziĝis. “Nen, mi ne rimarkis.”

“Kun li, en jaroj de la Humiliĝo—
ĉe mia flank’ Elia, kiel Henoĥ

esceptasorte ankaŭ evitinta
la tranĉoeĝon de la mortfalĉilo.

“Sur sunfarbita monto Mikael’,
en karna vesto, brilis fulmobele
dum tiu tago per antaŭa gloro,
signi moŝtecon de la fina regno.
Kaj du homidoj, foje baraktintaj
en sia marĉo de la pasinteco,
simbolis la futurajn feliĉulojn:
mi relevotojn en jubil’, Elia
certajn vivantojn kiam li revenos.”

La fontoflu’ de liaj vortoj ĉesis
pri ĉi afer’, sed mi scivolis plu.

“Tamen pri la spiritoj, kiel...?”

“Poste.

La tem’ por si retrafos la okazon.
Intere nur meditu—de granda reĝ’—
ne malpli klarajn ol saĝriĉajn vortojn,
ke forpereas pensoj de l’ mortintoj,
kiuj polvlite ne scias ajnon plu.
Sed bedaŭrinde tio estas multe
tro simpla por ke oni kredu ĝin!”

Li forturniĝis, kvazaŭ de l’ diskuto,
kaj montris mane. Ĉe apuda dun’
la tendoj, kiujn mi nur subrimarkis,
pli elombriĝis post kunkaŭro longa
tra la antaŭa nokto. “Jen, ni iru;
leviĝas jam l’ unua altarfumo.”

III

“Ventkane flustris la rivero
proksime al gepatra dom’.
Ino ne volis vagabondi,
sed viro revis, stranga hom’.

“Antikva akvo lulolange,
stelfajroj pure, tra la kor’;
sed la matenon jam ne hejme,
trans jarojn kaj dezerton for.

“Salikoharoj super korto—
pluklaĉas la fontan’ en Ur.
Kiu mastrinas ĉarmajn ĉambrojn
post trem’, salutoj kaj murmur’?”

“Pluvagi pro songĝita Voĉo
al nekonajoj, honta fin’?
Inter ĉi fremdaj, aliborde.
Nun kien, sentegmenta in’?”

“Ventkane flustras la rivero
proksime al gepatra dom’.
Ino ne volas vagabondi,
sed viro revas, stranga hom’.”

La voĉo rajdis sur la lirmuziko
en varmon de l’ matensilento for.
Ni ŝin aŭskultis streĉe fro apuda
ĉambro de tiu tendo, starigita
izole inter ĉiuj horizontoj.

“Ho vi ĉi tien misvaganta kor’!”
murmuris la oldulo nigrokula.

Min, paroleman, al la muto ĉenis
la voĉarĝento kaj ploretsingulto
de tiu belulino, kiu baldaŭ
post la prezento fro ni glitis for.

Ĉar kvankam fremdan, mi rekonis ŝin,
kiun ŝajne al si—jarcenton post jarcento—
rezervis perdo kaj destineventoj
tro grandaj, dum la etojn ŝi sopiris
per kiu revivindas ĉiu tago
elvindiĝanta fro la noktvolvajoj.

“Ŝi rajtas min riproĉi,” suspiris Abram.
“Fine hontigitino, en haremon;
ĉar fie mi, poltrono, per la ver’
mensogis. Nu, duonfratino, certe,
sed ĉu mi ne ŝin ankaŭ edzinigis
en la perditaj jaroj ĉe Eŭfrato?
Do Faraon’, juvelojn-kolektanto,
per ordonet’ forplukis mian perlon.
Se Dio ne plagete vipus lin...

“Kaj nun la nomo de ĉi familio,
kiun la reĝo riĉe olibanis,
jam stinkas ĉie en l’ Egipta lando—
el kiu ni hodiaŭ, forbalaitoj,
rekaravanos sub ĉiel’ senvorta.

“Ŝi ja kunkulpis, sed—eĉ virtocele—
post la honor’ dubinda, iĝi skandalo
tutlanda... Saraj rajte min riproĉas.

“La tuta nokto estis konsumita
per ŝiaj paŝoj, korda tuŝetado

kaj rompaj elbalbutoj de l' poemo.

“Ni retromigros sur la voj’ mistera
tro multajn jarojn longa; sed pri tio
vi ne divenus, gastoj de la horo,
kiuj min morgaŭ jam forgesos tute,
kiam aferoj propraj glutos vin.”

“Sed honorinda patro, vi eraras!”
Moseo digis lian vortimpeton.
“Pro tio, aŭdavidaj, ni alestas,
la saman Dion agnoskante.”

“Ĉu vere?

En Egiptujo! Nu, vi ankaŭ fremdas,
ne brunhaŭtuloj. Tamen la kredantoj
jam preskaŭ malaperis fro la tero.
Ankoraŭ brilas kelkaj fideluloj,
kiel la sankta reĝ’ de Salem, pastro
Melkicedek, la nobla. Sed ne longe.
Baldaŭ la lasta lumo estingiĝos
en plena nokto.”

“Krom ĉe via gento.
Pro tio logis vin la vojaĝado.”

Abram kun mir’ okulis la pranepon.
“Pri la Promeso, kiun mi konservas
ŝlosita en pensejo tro sekreta
por eksterul’, vi scias kion, kiel?
Ĉi tie estas io plej arkana!
Tial bonvolu pli malkovri vin.”

Mose’ serene forgestis la postulon.
“Ne nun. Por tio en alia tempo

maturus la okazo. Nur akceptu,
ke Tiu volas, kies voĉo pelis
por iam alkonduki vin kaj viajn
al finoazo tamen ne miraĝa.
Nur fidu plu.”

“Ho dankon! Ĉu la signo,
kiun mi vane provis eldevigi
fro la obstinsilento de la tagoj?
Fido, denove. Tiel mi jam preskaŭ
nomiĝas! Agi laŭ neviditaĵoj
ĉe l’ rando kie revo iĝas vero.
Tamen mi do pludiros, sendemanda.

IV

“La domo estis ĉarma, duetaĝa.
Kiel ĉi tie, en Sumer’ la filoj
de Ĥam inventis luksan civilizon
por gericŭloj—inter ili certaj
Ŝemidoj.

“Sed en dormodistoj, sonĝe,
min tuŝis tiu Voĉo, remuldante
el fiksiteco sorton por nomadoj,
kaj vektimigis. Duboj kaj la luno.

“Mi meandris tra l’ korto al Eŭfrato,
fluanta kotkviete trans la jarojn.
Kaj tie mi reaŭdis lin. Mi devis
migri, unue norden. La kieno,
tamen, ne estis tiam sci’, nur nubo
mensnaĝa, kiel ĉio de l’ futuro.

“Mi ne detalos pri l’ amuzo, mokoĵ,

ĉe la najbaroj, hezitem' gepatra
aŭ ŝia, nu, lojalo. Kaj post tio—
marĉandoj pri la multaj postlasaĵoj,
brakum' kaj lasta kiso. Ni fariĝis
memor', kvaz' plia bando de Amurru,
kiu kun brutoj trenas siajn karajn
laŭ la trinkejoj apud urbetmuroj
suspektemaj. La riveruj' vindiĝis
suden, kaj kontraŭ niaj propraj kurboj.

“Imagu, tamen, la aliajn voĉojn
fluŝrantajn al mi pri oldula stulto,
dum ĉie apudvojis riĉaj garboj
de la rikoltsezono. Multkoloraj
parceloj ambaŭflanke. Loĝejaro
de frukta rev', profunde radikanta
en tiu durivera paradiz'!

“Pleje allogis la palaca Mari,
antikva apud akvoj ĉarmulin'.
Salutis okcidente la dezerto.
Kaj tiam Ĥaran, urbo provizora.
Ĝis tie la gepatroj kaj la frato
duonkrede indulgis, samvojane
post l' intermita lumo de l' ideo.

“Mi reaĉetis domon. Atendado.
Teraĥo havis sian enterigon
'en grundo civiliza'.

“Tiam, ree,
la Voĉo min pluventis, okcidenten.
Naĥor hezitis, maro de malcerto.
Do fine nur la nevo Lot kunvelis.
Li tendas inter dunoj ĉi-apude.

“Pejzaĝoj malfermiĝis sub veter’
sablervipanta la vizaĝojn aŭ,
post tio, lula apud verda graco
de herboj tremklinitaj, kaj sunornam’.
Kunfluis lante gregoj kaj brutaro,
ofte blekemaj, laŭ la hordeklivoj
al nia sopirata Okcidento;
ĉar fine anoncitis landonomo,
por hanti niajn noktojn, por plupeli
tra ĉiu lok’ alia. Nubelŝprucoj.
Rabistokuloj. Sun’ venene varma.

“Preter Karkemiŝ estis malkuraĝo.
Ni devis iom halti pro debil’:
stomakdoloroj. Poste, jen, Damasko
smeralde alridetis—akvumkampoj
reveki ĉe ni la kultivdeziron.

“Fine la revo tamen frakasiĝis.
Ni vidis, post ĉiu val’, la dentajn murojn
de citadelaj urboj. Antaŭ ni
aliaj jam okupis tiun landon,
la promesitan. Ĉiun bonan parton
gardis la formikejoj lertlaboraj,
militkapablaj. Kanaanidoj ĉie.

“Daŭre ni vagis, inter stretaj limoj,
levis altarojn kaj konvertis iujn,
kreskante kiel migra abelsvarmo
por ie vane serĉi novan neston.

“Iuj Ĥetidoj kaj anoj de Amurru
toleris nin. Negebo bonvenigis.
Sed fine la sekeco per malsato

minacis ĝis l' ekstremo de ĉi loko,
'inter ĉi fremdaj, aliborde'. Prave
demandi: 'Nun kien, sentegmenta in?'"

V

Ni marŝis ĉirkaŭ dunangulon, kaj
emergis en alia horo, diste
kaj inter ŝtonoj super riĉa Valo.

Sed mia postrestema kor' kroĉiĝis
ankoraŭ al la ĵusa iamejo
de du kunhomoj far ni postlasitaj
en sol' kaj malespero.

“Mi ne scias
kien vi nun forŝiris min trans jarojn
da homa ve', sed mi fariĝis peza
pro l' paro kun dezertofin', anstataŭ
fruktiĝo post la florpromes', malplena —
kvaz' vento pasus por ne esti plu!”

Li min rigardis, triste pacienca.
“Vi ofte tranĉas vin per troigadoj
kaj hasta juĝo pri ĉi epizodoj,
kvazaŭ per ili ĉiom fokusiĝus
la tuta vivo aŭ signifoplen'.
Homido ne tro vidu per l' okuloj
sed pensolume, tra trankvila lenso
de l' eterneco. Ĉio iĝas senca
en la kontemplo, kiu estas nia
matur'. Persono kiel mi ne povas
ne sondi sub la sombra brovotiro
vian ĉagrenon, ĉar vi rekulpigas—
kaj mise—l' Eternulon.

“Konsideru,
ke Abram estis men ol viro kiam
vertorde li plektis la mensogoreton
per kiu poste li kaptiĝis mem.
La ŝnurojn Dio kvazaŭ aranean
ŝpinon disblovis. L’ edza embaraso
kaj la doloro por la kara, tamen,
estis repago pro negoca falso.

“Sed observadu ĉefe la persiston
de tiu koro, eĉ dum erarvagoj,
kvaz’ kompasnadlo ĉiam retremanta
tra ĉiu sku’ aŭ miso, en la ĝusta
direkto, por logi plu la karavanon
de liaj revoj—kaj al cisa celo
kaj transen ĝis Dilmun’. Kaj tio estas,
kvankam ŝancela, tamen ne trompil’.

“Cetere, li kaj liaj jam rikoltis
plifeliĉiĝon en ĉi Kanaano,
nun antaŭ vi, kaj eĉ—per unu nokto—
respekton novan. li kuraĝe frapis
kaj forkurigis tutan rabarmeon
reen al Mezopotamio. Multajn
li liberigis. Kaj Dio ilin dotis
per altaj nomoj: Abraham kaj Sara.
Li ŝejkas tie, trans la altetaĵoj.
Ankaŭ unuenaskiton li jam havas,
la filon Iŝmaelon.

“Sed sufiĉe.
Rigardu suben.”

Plena juvelujo.

“Jen Sodom, Adma, Coar, Ceboim,
Gomora—kvinurbaro de la Valo.”

Aliaj nomoj por la paradizo.

Ĉie la akvobriloj interbrodis
la tapiŝaran bunton de la agroj,
murmuraj pro estuloj sen kalkul’,
dum arboj verdapeltaj vastageste
solvokis al Ŝamaŝo diadiska
elverŝi oran pluvon fekundige.

Sed mian ravon tuse pordofrapis
Mose’ apude, kiu min malfermis
al sia perspektivo.

“La infero!

Morgaŭ la fundamentoj de la Valo
forkrevos, kaj la ter’ sorsputos ĉion
per laforuĝoj dum tortur’ eksterma.

“Tordiĝos brule vivantar’, kaj fumo
kun cindro en naztruoĝoj eksufokos.
Ŝtopitos ĉiuj en silenton for,
dum tiu tuta plezurejo sinkos
sub la maldolĉon de la Sala Mar’,
kiel ekzemplo tra jarmiloj, kio
konsternos, gorĝokapte, buŝsekige,
la rigardontojn trans ĉi regionon,
pli ol dezertigitan far la vortoj
per kiuj Dio ĉendos pro malben’.”

“Ĉu tial vi alportis min ĉi tien?
Fiulo, mi ne volas vidi ĝin!”

Li mordis la lipon kaj rigardis for.
“Ŝajne mi devas memorigi vin,
ke vi ne estas simpla tempturisto,
veninta por laŭplaĉe mirgapuli
tie kaj ĉie nur la belsupraĵojn
aŭ artofarojn de la kurioza,
multlerta homo, kiuj tiom trompas.
Kaj mi ne estas ĉiĉeron’ glatbuŝa,
aŭ sen okupo.

“Revolvlu viajn pensojn
ĝis via konfuziĝo kaj angor’
en la dezerto de la propraj jaroj,
kie vi perdis vin.

“Kaj venis Henoĥ,
por el ĉi sovaĝej’ konduki vin.
Sed tio devis iĝi longa raŭto
trans multajn korovastojn de l’ realo;
ĉar la aferoj fine estas ĉiuj
implikiĝintaj kunen, kaj vi mem
komplike vojperdinto.

“Paciencu,
kaj provu—kvankam vi ne tre sukcesos—
buŝumi vin, por iel min protekti
de l’ dentaj vortoj, kiam via kor’
deziras mordi. Ankaŭ mi ja sentas,
dum mankas al vi justo de l’ kompren’.

“Tamen mi nun distiru la kurtenojn.
De la amalto Iu vin rimarkis,
kiu neniam trovas ĝin facila
forĵeti unu el la kreitaro

laŭ sia bildo, sed kun si baraktas—
longe—konservi, savi iel ajn;
do li al vi destinis en kompato
la kvin gvidantojn (Henoĥ la unuan
kaj min la duan) tra la historio,
ĉiun por homepok’ aparta; ĉar
per tiu nombro nia mondrakonto
ĉapitriĝas. Por homoj kia vasto
de gloro kaj de larmoj nesondeblaj,
kvankam aliapense ĝi aspektus
eĉ ne semajno en la eterneco!

“Sed pri ĉi urboj: vin ne erarigu
la bela haŭto de l’ aŭtunvidaĵo;
puso sub la surfaco akumulis
infektan morton por la tuta lando.

“Tial la Kuracisto enskalpelos,
por tranĉe elpurigi fiojn for,
eĉ kaŭterante.

“Sed la ceterulojn
de l’ Amoridoj ŝildos man’ en graco
dum kvar jarcentoj pli, por sin returni
fro peka dolĉo kiu mortvenenas—
kvankam la tempon ili nur forfrandos,
malĉastigante ĉiujn dum diservoj,
kaj sur altaroj buĉos siajn karajn
al vana penso.

“L’ Eternulo dume
ilian landon gardos, kaj ne cedos
al la idar’ de Abraham—frustrotoj,
kiuj fremdule okulumos ĝin.
Nur poste, per Josu’, la glavo fine

enhakos ankaŭ ilin: operacio
kiu atendas ĉiun fiaskontan
nacion tra la jaroj en spalir’.

“Pro tio Sodom, en la senzorgeco
de sia Valo, estas nun kaj ĉiam
alia nomo por sennombraj urboj:
Knoso, Ninevo, Babel, Persepolo,
‘l’ eterna Romo’, Vaŝington... brulontaj
aŭ rubamasoj de iama revo.

“Sed ne subite. Tie ĉi jam ĝermis,
kaj tra maturo pasis for, tre multaj
generacisezonoj. Kaj atentu,
ke ankaŭ nun—trans terondumoj, tie—
ĉe Mamre, Mikaelo plu hezitas,
kaj lasas Abrahamon lin propeti
por reindulgi la belulon Sodom,
se loĝus en ĝi eĉ nur dek piuloj
(Kvankam la nombro mankos, efektive).

“Morgaŭ la fajro mordos finan punkton
post ĉi rakonto de perdita gento.”

Ĉe tio mi la kapon rebalancis.

“Malgraŭe mi ne volas vidi tion!

“La tutan historion mi satlegis.
Almarŝos du anĝeloj ĉi-vespere
bivaki sur la placo, kiujn Lot
gastigos, kun geja flustro ekster pordo—
kaj ĉio poste.

“Tial ne insistu
per tiu montro mem torturi min

en akra duro de la horo, kiam
la nuraj faktoj tiom dolorigas.”

Li longe konsideris min. “Nu, bone.
Ĉi tion ni transsaltos. Sed momenton.”
Li rigardadis, kun ombroj en l’ okuloj,
la distajn domopunktojn kaj pejzaĝon
dum lasta posttagmezo. “Bela! Bela!
Kaj ankaŭ Dio tion tre domaĝis.”

VI

Post tio la horloko kunfandiĝis
en la nebulojn de la temptransiĝo,
kaj jen—ĉirkaŭe—resolidis novaj
konturoj.

Voĉosurfon mi ekaŭdis.

La lumo de pluveta vesperiĝo
al ni tra murkvadrato sen vitraĵoj
viskozis. Intermite apenaŭa
kaj griza vento lekis mian haŭton.
Mi trovis nin sidantaj. Inter ni
la tablo de taverno, kaj apude
kunhomoj.

“Majstro Li, bonvenon, fine.

Pokalon sor! Per pajla, spicaroma
biero Sar el via seka gorĝo
forlavu la dezerton, kun l’ aliaj
distancoj. Poste min informu pli
pri la popoloj ĉe l’ Rivero Flava,
kaj via fabla Jin. Ĉu tra la lando
eventoj spuris tiel ke memoroj
jam trezorejas, ĉar la homoj multe

alvenis kaj post horo lasis ion;
aŭ ĉu ankoraŭ tie la rakonto
nur komenciĝis?”

Iuj apud ni.

Mi celis per l' okuloj la brunulon
kun nuda torso super vest' linaja.
Peza, kubisma barbo. Liaj dentoj
dum la parol' tre blankis, moviĝemaj;
kaj ambaŭflanke apud la okuloj
deltis la bonvolemo.

Kontraŭ li

ridetis dolĉe safranroba Han',
kun rekta spino, pozo tute ŝtala,
kvankam sur liaj verto kaj tempioj
jam neĝe jaroj akumulis sin.
Trablovo la kandelolanganon tuŝis,
kaj ie estis grilo.

“Via gasto,

kaj tial feliĉulo! Veramej',
la lok' ne havas multajn hieraŭojn,
laŭ mia cerbo—kvankam kiu scias?
Kaj al la vilaĝeto Jin ankoraŭ
mankas imperiestro...

“Mi admiras

vian strategojn rekte tratranĉitajn,
kun la masivo de grenejkvadratoj,
domsiluetojn ĉie netaranĝajn
kaj vian akropolon. La Bankuv' ...

“Ĉe ni? Eble iam, sed la regiono
ne konas vian gracon, aŭ la ŝipojn

plugantajn ŝaŭme sian longan sulkon
al Ur kaj transaj varfoj pli lontane.

“Pli interesaj al vi povus esti
la grimpoj tien ĉi trans montomulton
sub ĉielvastoj: ŝtoniĝintaj ondoj
de blua disto kaj proksima verdo—
per kio plandoj ellaciĝas brule.

“Sed iam, ie, post altbrovaj klifoj
kaj krutaj vangoostoj sen kalkul’,
subite en mateno malfermiĝis
palpebroj de laĝeto, kie popoloj
susuris per la spir’ el transa mondo.
Ho strange, la loĝantoj estis blankaj
kun la akceptomildo de amikoj!”

“Moseo,” mi alflustris la kompanon,
“kie ni estas?”

“En Mohenjo-Daro,
por diri al vi nomon proksimuman.”

“Do ĉe Induso. Sed tio nur signifas
‘monteto de l’ mortintoj’, kaj ĉi tiuj
pluspiras, tute kiel mi aŭ vi!”

“Vi nur forgesis kia vi nun statas.
Per la konscio de la Eternulo,
en kiu vi partoprenas, kozoj eksaj
restadas ĉiamaĵo. Sed malgraŭe
ĉi nuno iam dum morgaŭo estos—
ĉe olda riverujo—forlasita,
senhoma rubamaso da silento.

“Tamen plu grava, do ne malatentu
ĉi polvon kaj respirigitan horon,
dum samsortule vin ĝi alparolas
kelkajn minutojn; ĉar, senlipiĝinte,
ne sole ĝi refalos al la muto,
el kiu siatempe ĉiuj trovas
la destinitan formon, por pledeti
pri permanento kontraŭ la eterno.
Aŭskultu. Niaj voĉoj ilin ĝenas.”

Kaj ili nin rigardis, efektive—
ankaŭ la laborista tri’, kitele,
kies okuloj fro alia tablo
kun interes’ transpalpis nin, fremdulojn.

“Ho majstro Li, mi dankas! Per ĉi vortoj
vi nun eksponas varon eĉ pli valoran
ol via mirinda silko aŭ la jado
per kiu koroj arte juveligas
printempsopirojn por ne pasi for.

“En tiuj montoj estas multo alta,
kaj iam antaŭ jaroj mi komerce
tanĝis de ili la unuan ŝvelon
ĉe l’ grimpkomenco, kies voj’ rubandon
disvolvas zigzagantan falve sor
en transojn kaj al suproj, ĉiam pli.

“Mi ekfariĝis strange maltrankvila
pro pelo alten, ŝtupi fro valkampo
kaj aĵoj kiuj tro estis mi, por serĉi
unu el tiaj lokoj kie oni
ĝispalpas preter preno aŭ profit’.
Kvaz’ oni aŭdus kanton en la kozoj...

“Sed mi revenis al ĉi kotaj bordoj,
kaj akvo kiu lante plukirliĝas
kiel la tagoj, por pli okulumi
la varojn alvenintajn, aŭ la mastojn
ŝrumpantajn for. Kaj foje mi, junulo,
cerbumis pri kunvelo, forŝironte
la koroankron el ĉi restadejo.

“Ho per ŝipcigno kverka sub kanvas’
remilpiede mi ekplaŭdus trans
la horizonton ĉiam pli lontanen,
fro nia ordinaro kun la voĉoj
zumantaj afereme tra la tagoj!
Sed la gepatroj estis tro prudentaj.

“Do nun mi povas nur vojaĝi for
per pensopruo, aŭ per karavanoj
ŝarĝitaj de alies rakontaj’.

“Maristoj al mi diris pri popol’
ĉe Nilo, kiu el senjara ŝtono
skulptis gigantajn preĝojn. Oriente,
trans oceano larĝa kiel mondo,
troviĝas kuza gento kies pio
kun pen’ popolas sian insulhejmon
per rokokapoj triste longvizaĝaj.
Krom tio, multas ĉie solenejoj
en kiuj granitblokoj aŭ menhiroj
per cirklo de silento alparolas
l’ eternon.

“Kara gasto, ĉi sciaĵoj
fro trans la distaj randoj de la tero
ĝisflustras mian menson, kaj mi ne
ripozas. Krom agnoski la Patrinon

kaj saĝa kulto de la Detruanto,
mi sentas ian kavon en la kor’,
sen io por plenŝtopi la vakuon.

“Sed kion ili kredas en la montoj,
aŭ vialande, kie la riveroj
nutras aliajn pensojn ĝis rikolto?”

La Han’ grimacis, silentete. Fine:
“Ho Veramej’, sezonoj de la hom’
ĉe ni alportis nur manplenojn magrajn
de la pli riĉa, dezirata rizo
por nutri la animon.

“Kompreneble
oni meditas pri la du principoj:
de bon’ kaj mavo, lumo kaj tenebro,
la frapo per martelo sur amboson
jam pretan anticipi. Preter tio
iuj konjektas eĉ pli ĝisfundeme
pri praa ŝtofo ekster la konscio
aŭ ajna vort’, fro kiu nian vivon
elmuldas Io.

“Kelkaj montaranoj
supozas, ke l’ animo peke migras
multforme tra nekalkuleblaj jaroj
per ĉiaj korpoj, jen de hom’ aŭ besto —
kaj planto eĉ—por serĉi finripozon
en Tio, ki’ estas eble nur Nenio.

“Oni ne certas, kaj la tuto sonas,
laŭ mi... nu, tro minormuzika.

“Laste,

tamen, min tuŝis kelk pli dolĉaj notoj
sur spiro el la Okcidento—nome,
ke loĝas ie en aŭ apud Ur
tribeto aŭ eble viro unuopa,
kun homa, do pli bona religio.

“Sed onidir’ pri tio enseliĝis
ĉi tie, ekrajdante multajn mejlojn,
por grimpi sob en plej surprizaj ejoj
kaj koroj—ankaŭ pri scia komercisto
al kiu velas ĉio tre valora,
kiel la kuriozaj vortokargoj
de malproksimaj varfoj.

“Mi ĝin aŭdis

fro gregvaĉantoj sub multjara neĝo,
ermit’ ĉe Lasso ekster klifkabano —
kie en somerbriz’ radetoj preĝas —
kaj la azengvidintoj trans la altan
pasejon, gruze apud dista fajro,
dum bestoj tuisis en aer’ tro minca,
kaj la silenta pluvo de la steloj
pendadis super ni. Mi pensis do,
ke ĝuste vi min povos plej informi!”

Ĉe tio Veremej’ suspiris peze.
La ŝultroj sobfleksiĝis pli antaŭen.
Li turnis la okulojn en silenton
kaj la distancojn, kvazaŭ nun li vere
vojaĝus for; sed baldaŭ li revenis
al tiu apudulo atendanta.
“Sed ŝajne konsumiĝis multaj jaroj
de tiam. Tiuj homoj, ja de Ur,
ne plu trenetas la konatajn ombrojn
trans ĝiajn stratojn. Ili disnomadis,

subite, kaj glutitis en la svagojn
de nekonataj regionoj, kaj
ne certas ĝuste kial.

“Se mi povus,
mi enŝipiĝus—jes, eĉ nun, oldulo
kaj grasiĝanta! Tamen eksaj horoj
kun sia homtrezor’ aŭ la aferoj
ne estas kiel montoĉen’ solidaj,
por pacience atendadi nin
ĝis kuntrafiĝoj de l’ feliĉo; sed
tro baldaŭ kiel loza nubamaso
disperdas la principon kaj konturojn,
kvaz’ iu vento ilin pelus for.

“Domaĝe, majstro Li. Vi venis vane,
se pleje ĉi informon vi elserĉas;
kvankam mi ĝoje—post la pergamenoj—
nun fine de vi legas la vizaĝon.

“Ankoraŭ restas de la Sar. Eltrinku,
kaj ni ekiros. En la dom’ atendas,
por speciala gasto, komfortilo
ne tre kutima: lito, modernaĵo
kiun mi ĵus importis de ĉe Nilo.
Almenaŭ tion el la fremda foro
feliĉe mi proponas. Se vi volus,
sklavinon ankaŭ.”

“Bona, ĉi biero,”
murmuris tiu multevojaĝinto,
triste rideta.

Kandelbrula flar’,
kaj mure inter la aliaj ombroj

flirtis—fro ie el pra-Hinda nokto—
vesperta formo. Ĉi parolfadeno
estis finita. La konversacio
jam ĉifoniĝis, kaj en embaraso
disfalis la kudraj’.

Oscedis iu,
kaj baldaŭ trans la ŝtonoplankon seĝoj
ekknaris. Tiam la tableto vakis,
kaj du figuroj tra taverna fum’
balancetiĝis en ekstervastojn for.

VII

Tri laboristoj staris antaŭ mi.
“Ĉu vi kunmarŝos, aŭ ni portu vin?”

Kvazaŭ skuito el profunda dormo
mi gapis en konfuzo, rimarkante
ke la ulaĉo sur la brakoj havas
porkecajn harojn. Ranca. Sed muskolis
la fingroj kiuj mian ŝultron mordis
ŝtaldente, kiel ĉasistkaptil’ sciuron.

“Sed kien?”

Li ekhenis malagrable.
“La vizitant’ scivolas pri la Kralo,
en kiu fremdaj viroj antaŭloĝas
la renkontiĝon kun la praa Panjo
sur buĉaltaro! Busak, vi rakontu.”

Preskaŭ skeleta, kvankam kun makzelo
kiel la homo de Neandertal’,
li estis hoknazul’ vulture kalva—

kaj raŭka, anhelema, sen emfazo.

“Nu, kompreneble oni ĝin apenaŭ
nomus hotel’. Vi tamen ne solecos.
Hodiaŭ ni ĉaskaptis tutan gregon
da uloj, kiel vi, sen gastamikoj.
Morgaŭ la fruaj preĝoj estos dikaj
je ĝoj’ kaj sango. Pastroj ĉe l’ Bankuvo
treege okupitos, purlavante
la multajn korpojn senintestigatajn,
antaŭ kunmanĝo dum la komunio.

“Al vi, la malfeliĉaj, ne komfortos
la tempo de l’ tranĉilo aerŝtona,
kiun Ŝi iam en la praaj jaroj
elĵetis al ni trans ĉielremparon
por tiu celo. Tamen vin konsolu,
ke ĉiuj al Ŝi fordonitaj ankaŭ
eniras Ŝian amon, kaj eternon
da nedirebla paco.

“Kaj krom tio,
vin en la Kralo sub la lun’ vizitos—
kie la ombroj flakas—junulino
belkorpa, kun parfumo kaj delicoj,
meznokte fro la templo elsendite
por porciumi al vi lastan dolĉon
de nia lando. Nun vi devas veni!”

Mi kriis, kaj la fingroj mian ŝultron
nerezisteble haŭlis. “Helpu min,
Moseo!”

VIII

Mi subite estis for,
staranta kun li sur trankvila placo.

Kvadrataj konstruaĵoj ĉiufланke.
Sed homojn mi ne vidis multajn, kiel
dum la Dimanĉoj en Matatiele.
Sorŝprucis nur la voĉoj de infanoj
ludantaj ĉe baseno. Fontanplaŭdoj.
En lanta ŝaŭmo, nubamase, bildoj
transvastis super ni kaj riverego
sub somersuno.

Sur ĝi stagnis pramo,
kaj ŝvelorajde kontraŭ kajo kaŭris
bambukontura ĵonko, alrampinte
el malproksima rodo. De altaĵo
apude sonis granda homĉeesto.

“Dankon, Moseo! Tamen kie nun?
Ĉi loko tro aspektas kvazaŭ ni
pasumus en la sama urbinfer’
de tiuj homdiabloj.”

“Trankviliĝu!
La eĝo de la karnomaĉa fero
ne tuŝos vian ventron. Vi sekuras,
kvankam teruro estas mem tranĉilo.
Kaj jes, ni pluas en Mohenjo-Daro.”

“Sed kiel malproksimen ni forsaltis
en la futuron, fro la tri kanajloj?”

“Nur kelkajn horojn, la matenon poste.

Kaj vi, pro tiu unu epizodo,
ne tro acidu kontraŭ tuta urbo
kaj civilizo kun tre belaj trajtoj.”

Mi koleriĝis. “Pri la kvinurbar’
la asprojn vi ne superlakis tiel,
sed tute sen indulgo raspis sange.
Kaj kial nun ni staras tie ĉi?
La suno brilas, sed la ĵusa nokto
pluombras en mi; kaj mi ĝin konfesu:
mi timas, pro la trio tro proksima.
Ajnamomente ĉirkaŭ stratangulon
mi povus vidi ilin almarŝantaj.
Forpluku min el ĉi koŝmar’, mi petas!”

Li klakis per la lango. “Ĉu poltrone?
Mi jam ĝin diris: vi estos sendanĝera.
Por vi la horo havas nur ĉi nubojn,
riveron kaj mirindon de l’ Vojaĝo.
La tri cetere, kun la proletaro,
pri nemenciendaĵoj sin okupas
sur tiu alta akropolo. Kiam
kun sia bruo ili al ĉi stratoj
sobgrimpos, por la taskoj ĉiutagaj,
ni estos diste kaj jarcentojn for.
Ni restas iom, ke vi ne mistaksu.

“Vi flaris putran vundon de l’ malsano,
sed ankaŭ subaŭskultis la batadon
de noblaj koroj. En ĉi trista loko,
kaj ĉie trans planedo de serĉantoj,
la Patro (kiu ilin ja generis)
agnoskas kiel siajn vere multajn
infanojn, kiujn tamen Lucifer’—
la inventanto de la religioj—

venĝeme sensciigas, por morbigi
ĝis tia aĉo, kian vi spertetis.”

Surprizoŝok’ forvapis la koleron.

“Mi tute ne komprenas. La gepatroj,
kaj ĉiuj predikantoj de la kirko
en Cedarville, dum mia infanaĝo
vivtenis kaj kreskigis mian fidon
per dogmo tre alia.”

“Jes, mi scias.

Anstataŭ nutra pano de la vivo.
Per maltolero, kiun tiu sama
Satana moŝto gaje doktrinigis,
Kristanoj ĉie trans la spacotemp’
venenas siajn karajn, kaj ofendas—
eĉ krucmilite buĉas—fratogentojn.”

Mi pensis pri Biblio grandformata
de la patrino, kiu katekizis
ĉe kandellumo. “Sed la Sankta Skribo?”

“Ĉu mi ripetu? Nur malmultaj vere
gustumas mem aŭ trovas ĝian dolĉon,
sed al ĝi enportadas la amaron
el sia propra koro—kaj alia
koro de antaŭ tiu ĉi planedo,
pri kies hat’ vi scias.

“Se vi legus

sen okulvitroj de la tradicio,
vi vidus en ĝi ankaŭ amridetojn
al la paganoj.

“Por prilumi ilin
Dio el Ur forlevis Abrahamon
kaj metis lin kaj liajn ĉe krucvojoj
de l’ olda mondo. Kanaano kuŝas
kontraŭ la maroj de la historio,
ankaŭ la suda. Tie pleje polvas,
kvaz’ ĉiutaga fumo, trairejo
por predaj aŭ fuĝantaj militistoj,
tien-reeno de la karavanoj
kaj ĉia kor’ vojaĝe aventura
inter la ziguratoj kaj la sfinkso—
du juvelpunktoj alte civilizaj
sur la falĉil’ antikva kaj scintila
de l’ Fruktodona Duonluno.

“Plie,
pensu pri Jona, la profet’ kun galo
pro Dia emo al Asirianoj,
homaranismo en Jesaja kaj psalmo
kun tia fraz’: ‘La Eternulo notos,
enskribante la popolon: ĉi tiu
tie naskiĝis.’

“Kaj ĉu vi memoras,
ke kiam Mikaelo refariĝis—
proleta stalobebo en Bet-Leĥem—
fremduloj alkamelis pon la stelo,
ĉi pramisteron iel malĉifrinte
el noktorunoj aŭ la propraj libroj?

“Ĉar Di’ ne senplue forlasas iun ajn,
personon aŭ popolon, perdiĝintan
fro l’ pado—nek ploranton en mallum’.”

Ĉe tio fro mi fuĝis ĉiu vorto,

krom ĉi demando: “Sed ĉu Veramej’
ĉeestas tie sur la akropolo
kun naŭzaj kanibaloj?”

“Por ne iri
al ĉi ekstremoj, li jam antaŭlonge
iĝis vegetarano, per antikva
kaj sankta voto. Multaj tion faras.

“Funde ja ĉiuj—eĉ paganoj—scias,
ke suferigi homojn nenecese
ne pardoneblas pro la kultaferoj.

“Do antaŭ la transiĝo, tion ĉi
per firma frap’ alnajlu en la menso:
ke ĉiu nur volanta estas lia;
kaj ĉiajn maskojn de la religio—
eĉ plej groteskajn—Li pro am’ tolerus,
se ilin sur lin metus la infanoj
honeste sen pli ĝusta, hela sci’.

“Sed ĉio havas limojn. Kruelecon
kaj rektajn malnoblaĵojn li rifuzas,
pri kio ĉiuj en la kor’ konservis
praskribon datiĝantan fro multe antaŭ
la Du Tabeloj de la sankta monto,
aŭ temploj kaj sistemoj.”

Tre kvietis.
La nuboj drivis el okulatingo.
Indus’ trankvile portis siajn ŝarĝojn.
Pretersusuris, blanke, sep kolomboj.
Momento inter la momentoj kara.

Sed tiam alte, super niaj kapoj,

angora voĉo kriis longe, ruĝe
en la silenton. Ĝojmurmur' leviĝis
kun foraj muzikeroj, kvaz' mielo
sovaĝa, kaj trans krutojn al ni fluis.

IX

Kaj ŝajnis kvazaŭ la muzik' pludaŭrus,
sed nun en lok' alia.

Monto paŭtis,
aŭstervizaĝa super ebenaj'
dezerta. Urb' el tendoj distoŝrumpe
blokiĝis nete sub kaj preter ni.
Jen kuŝis la popolo de Moseo!

Veluris duonhoro post la suno,
sed antaŭ ol vespero formakulis
la vidprecizon.

Al ni rokobrete
sorzumis voĉoj en konfuza ĝoj',
kiel sub mimozo la abeloj lekas
fro panfragment' siropon sur telero,
kiun lunĉintoj ekster dom' forgesis.

Sopranajn flutotrilojn, bastamburon,
ridojn de temp' al tempo kontraŭdiris
brutarekblekoj—propra melodi'.
Svage sorlantis fumplumetoj ĉie,
kaj per aermoviĝo mi ekflaris
rostajon.

Mi relevis la rigardon,
tamen, al tiu Monto, kies pinton

kun la apudaj krestoj nub' enorma
ĉapelis. Nigra, kvaz' el Ĉina inko.

Sed baldaŭ, dum timeme mi atentis,
ĝi iĝis arda—perlamota lumo—
kaj kiel flor' malfermas sian koron
laŭgrade rekonturis la surfacojn:
kanvason, rokoĝojn, orbovidon
kaj religiebrion de amaso
kiu nun bakhantine sub ni dancis,
alvokdistance.

La muzik' balbutis
dum kelkaj taktoj, kaj forflustris time.
El saltoj marmoriĝis palaj pozoj
de diskurontoj.

Gongis granda voĉo:
“Stultuloj, ne ĝin fuŝu nun; plufestu,
ĝis la aŭroro! li aprobas vin,
kaj iluminos tra ĉi tuta nokto
de preĝa pi' kaj interkorpa amo.”

Voĉo aŭtoritata, dolĉpersvada,
kun kaŝaj ironi' kaj pradefio,
fro tute apud ni.

Ni do ne sole
okupis tiun rokaltajon! Spektis,
ne multajn paŝojn for, la kvin figuroj.
La centra, plej antaŭe, reĝe gestis
al tiu kultantaro.

Heliante,
ili sorklinis al li la vizaĝojn

en malfermiĝo kaj admirmurmur’.

Skarlata robo—kvaz’ ekleziestra—
kaj multjuvela, kiun or’ agrafis.
La granda korpo estis nur majesto
kaj belo.

Lin mi ŝoke tuj rekonis,
kaj ili—tute ŝafaj—ekobeis
sian paŝtiston, Princon de ĉi mondo.

Lante ĉe l’ buŝanguloj de Lucifer’
la karno en malicrideton floris.

Muziko reparolis al la Monto.

“Vi vidas kiaj dupoj, kaj poltronoj;
sed kompreneble ili faras nur
laŭ siaj apetitoj de la karno.
Se logas mia voĉo, tio estas
ĉar ili, pro la propraj glandoj, flustras
al si mensogojn. Ĉu ne tre fascine,
kiom la homoj ĉiuj kultivadas
sintrompon. Ŝajne ekzistadbezono:
ĝuatan mavon ili ne agnoskas
sed sur ĝin metas maskojn de la bono.

“En tio ni superas; plenkonsciaj,
ni kraĉas en vizaĝon tiel belan.
Kaj vi aliaj, rampu pli proksimen!”
Imperiestre li manvokis nin.

Turniĝis kvar vizaĝoj ventoflage,
kaj ankaŭ lia, poste, kun rikan’.

Mose' hezitis—levis la piedon.
Mi sentis anserhaŭton, sed malgraŭe
la ŝu' sub mi ekgrincis en la gruzo.

“Vi haltu tie!” Unu kriobjetis.
“Ne proksimiĝu! Lucifer’, vi scias,
pri la ordono de la Alta Moŝto,
kiun eĉ vi ne rompos sen vin ŝiri—
kvaz’ manon eĝoj de botel’ rompita:
‘Alimondanoj ĉiel sin detenu
fro la aperoj al la mortidevaj,
krom ĉe aranĝo prea, eksplicita.’

“Laŭ mi vi jam ofendis oratori,
kaj jen observu nun pri tiuj: unu
plej klare estas el mortanta karno
kaj skeletiĝe, post nelonge, ŝimos.
Se ili tretus tien ĉi, ni devus
forfulmi, kaj raportus vin sur Skraŭe
en luminsulo nia, unu el du
flosantaj apud via galaksio.”

“Atendu, Kere—ankaŭ vi, Samuna!
Alfrontas io kaj estuloj strangaj,
eĉ tute ekster la regulolibro
aŭ la kutima kodo de l’ realo.
Mi nun klarigos. Tamen proksimiĝu!”
Nin alveluris la profunda voĉo.
Ni intergvatis nin de pli apude.

La du de l’ Nebulozo Magelana
en la Ŝemidaj vestoj tiutempaj
aspektis kiel, sed ne estis, homoj—
kun haŭtkoloro iom tro rubena.

L' aliaj ambaŭflankis Luciferon.
Al li parencaj, ili fiksrigarde,
per silentemaj buŝoj, malafable
konfesis sin perditoj.

“Nur imagu,
ke ĉi hometon iam mi rimarkis
ĉe la arke’, kun Henoĥ, tiun tagon
en kiu via ne tro kara Patro
agrese kontraŭ mian revon lanĉis
akvobombadon kaj talpegoŝovojn,
disloke, sub terkrusto fundamenta
al ĉio.

“Kaj de tiam miaj buboj
subvidis, ke li strange ĉirkaŭsaltas
inter la horoj kaj jarcentoj, eĉ
trans kontinentojn.

“Ankaŭ estis fojo
kiam la sklavoj, kiujn mi ordonis,
lin inter fortaj fingroj ŝlasis. Tamen
li eksolviĝis plej abrupte for
kaj lasis ilin kvaz’ homojn kiuj songĝas.

“Kaj eĉ pli strange li!” La montrofigro
pikis al mia kunulo kaj skuiĝis
akuze. “Jen homa duplikato. Ha!
Kaj vi regulemuloj certe scias:
eĉ pli minacas la Kanon’ pri klonoj.

“La Centra Mondo tiom min katenas
kaj ĉirkaŭbaras per la leĝkradaĉoj,
sed mem ne tro observas la limigojn!
Ĉi tiu ulo—kiun vi supozas?

Moseo dua!

“Krome ili ambaŭ,
retroblovite, velas tra la tempo;
kaj tiu inspektado kolerigas,
krom se ĉi povon—kia magi’ juvela!—
forplukus ankaŭ mi. La ludo tiam
fariĝus, nu, treege interesa.”

“Neniam!” vorto de l’ Hebre’ incizis.
“Kaj kial la Farinto ĉenu sin
pri la siaĵoj, kvazaŭ estus Li
kiu krimis? Sed vi iom miskomprenas,
krom pri la tratempiĝoj. Mi ne estas
amebajo, sed restis unu sama
persono: tie ĉi kun vi, sed ankaŭ
okdekjarulo alte sur la Monto—
jam laca pro la ŝarĝo de la karno
velkinta, kaj eĉ pli pro la popol’
ribela.

“Ilin vi al stult’ erudis,
tra la jarcentoj apud verda Delto,
kvazaŭ hieroglifoj de l’ naturo
legeblus nur Egipte, artidole;
kaj nun vi manipulas, ke Dia man’
forstreku—post l’ unuaj glorĉapitroj—
ilian nomon el la historio,
dum l’ aventur’ ne pli ol komenciĝis.

“Ne interrompu min! Ni ne amikas.
Vi tial reenglutu la demandojn
jam en la buŝo. Mi al vi ne ŝuldas
klarigon pli, almenaŭ tute ne
pri l’ estontuloj.

“Lasu tiun ĉi
el la epok’ pri kiu la kiamon
kaj aĵojn li protekte kontraŭ vi
forŝranku en profunda korokel’.

“Por miaj fratoj fro lontana mondo
mi havas mensoflustron, malŝlosonte
la pensojn, por rapida enaŭskulto—
nefaĵo, pro la pek’, al ĉi aliaj.”

Fulmetoj mambokule kaj eksibloj
ĉe tri, sed li kun ambaŭ fro la steloj
sin interpretis super la kubuto
kaj ridetadis. Sombris nubesperim’
sur la aliaj fruntoj.

“Ni alestas,
por spuri—ĝuste kiel vi—sekvaĵojn
de ĉi apostateco. Se vi volus,
kune. Dum lanta nokto erodiĝos
kaj ni atentos la tagiĝon, eble
ni iom malimpliku tiun temon
en la teksaĵo kiu vaste estas
pri vi kaj ni.

“Sed ĉi kompano mia
jam tro laciĝis por elteni longe
la multajn interplektojn, varpe-vefte,
en niaj argumentoj, plej komplikaj
laŭ cerbo malhavanta la jarcentojn
de propra sperto, kiel ni ceteraj.

“Sed antaŭ ol litigi la rokejon
de kiu Lucifero nin forvokis,

rimarku kiel ĉirkaŭ la bovido
geedzoj—post disiĝo—kun aliaj
ĉemane, pro seksardo krablas for
en kavojn, pon la rokojn aŭ al propraj
tendoj, por fiki inter la infanoj!”

Spekulative Lucifer’ murmuris:
“Nu, tiu plezurjuko de la homoj
min multe interesas—jes, persone;
krom tio, ke ĝi ofte min provizas
per prembuton’ por ilin funkciigi
eĉ kontraŭvole. Ofte mi suspektas,
ke pro la manko mi malhavas ion
mirindan. Ba, sed ili estas bestoj!
Nur vidu tie. Kaj la lun’ konvenas.
Ĝi tiras plej profundan vivotajdon
ĉe plaĝoj de la karno.”

Mi rigardis.

Ĝi kuŝis larĝa sur la horizonto
kaj plenis, kvazaŭ oro plej malfalsa.

X

*La vorto prakoncepta, la unua mio
streĉkirlas estopunkton—horojn, spacon—
el malio,
multecon fro lo nula,
ĝis lumon burĝonigas nokto senokula.
La flakoj inkandeskaj flosas, fride?
Diskuro, buloj eksterbride;
kaj vasta siluet’ ne homa (tamen homo)
sin klinas super la planedo, super
kromosomo—
praprogramero de la historio?*

*En genoj brulas, brulas ĉio.
Kaj tra la vastoj ter' spiralas,
al kruco. Agla formo kriĉe falas
ĝis trans Schwarzschilda limo,
kapon sube,
senfine en la nigran truon de la memo.*

Nube

*la Reĝ' kun trapikitaj manoj.
Ŝrikado en finflamoj. Orurbe la hosanoj.*

Surpojna mano el la sonĝoputo
sortiris min—Moseo. Larĝadiska
suno, el ruĝa oro kiu sangis.
“Nun estos tago por la ver' kaj viroj;
do vi rigardos!”

Kun li staris Kere.

Samuna nin atendis ĉe la rando.
Sed Lucifer' kaj liaj estis for.
De tie ni traspektis ruĝan tagon,
el kiu—kunsuiĝe, sinforviŝaj—
kalejdoskopis giraj homobildoj,
tumultofare.

Frue ĉe l' bovido
jam per la nova sun' reĉendis sin
muzika fajro. Balanciĝe korpoj
enkorusiĝis. Voĉoj arĝentpuraj
kaj plumba raŭko.

Tiam la ŝofar'
ekblekis por silento, aŭskultige.

Kun blua robo antaŭ la popolon
alpaŝis la ĉefpastro en sandaloj.

Moveto de la vento misaranĝis
la barbon kaj la nimbajn harojn. Pie
li benis, unumane.

“Nun, gefiloj,
vere inaŭguriĝos la statu’
de Dio, per diservo! Interame
ne tiom mergu vin en la ebrion
pro logaj membroj kaj la kunvarmiĝo,
ke sense vi forkirlos el la menso
la Bonfarinton. Tial, Izraelo,
jen Elohim’! Per dek faregoj Ĝi
el sklavodomo vin al ĉi libero
portis.”

Incensofumo. Turnoventis
muziko, polvo, piedad’. Rumoro.
Manplaŭdoj. Kole, brake, maleole
la braceletoj. Vestoj malfermiĝis.
Ĉirkaŭtrudiĝe koksoj, buntpetale.
Kaj oni vaste ĝemis.

Realtajdis,
kiel antaŭe sub vesperotuk’,
lascivo—sed nun multe pli malkaŝe.
Nur iuj, tamen hontaj, sin fortrenis
al privatejoj; sed amase korpoj
sur la ŝtoneta grundo intergruntis,
dum senpalpebra sunokulo fajre
vidadis—kvazaŭ en amfiteatro
gejunularo, kiu pro haŝiŝo
kaj muzikaĉa drogo senbridiĝas
popfeste.

Tondroj sur la Monto, kien

mi vipis la atenton. Ĉerkotuko
kvaz' nubo, sed nun vasta fulmoglavo
diste hakhakis ĝin latunzigzage.
Sed oni pleje ĝin ignoris. Nur
la ĉefpastro gestis feble—timanten'
de blato sub lumfasko, senelire
ĉasita en angulon.

“Perfida frato,
nun pendas super vi la kalkanum'
de Dio! Kiom miaj larmoj pledis
por pardonigi vin, la ĉefkulpinton,
ĉe kiu pent' apenaŭ povis savi.”
Subgraŭlis la kompan' proksime.

Tamen

li glutis la indignon.

Pluajn horojn.
Velkinte, multaj rampis for; sed ĉiam
aliaj grege kunverviĝis. Grimpis
la febrogrado, kaj la sun' dezerta.

Mi ŝvitis, tiam pro dormem' oscedis,
kie mi poste sidis kontraŭ ŝtono...

Abrupte ĝi min vekis, vibro dorse
de tondro sub la grundo.

La tertremo
deskuis rokojn kaj starantajn homojn,
amase. Histerio. Sed sin levis
la komunumo al silento, pro
homduo sobgrimpanta pli proksimen.

“Kaj nun ni vidos min,” Moseo spiris.

Kaj vere: la figur’ unua, kies
piedpintoj serĉante intersaltis
la ŝanceliĝajn ŝtonojn kaj forglutis
niadirekte la interan spacon,
gigante.

Sur granitperonon. Grizaj
la karno, trajtoj, poz’, kaj rokrigidaj—
tri metrojn super la bovida flagro.

La homosvarmo jam ne zumis.

Nur tiam

la fajron mi rimarkis, bruligitan
por la ofero. Apud ligno kuŝis
ligita formo feble baraktanta
kaj iam homa.

Inter ŝtonaj manoj
la olda nemezulo el la Monto
portis la du tabelojn, kun brulskribo
de la literoj kiuj homlingvigis
la neŝanĝeblan volon por planedo.

Tion li levis. “Jen la fundamento
por viaj hieraŭoj kaj futur’,
la centraj klaŭzoj de la Interligo.
Sed ĉar vi ne deziras vivkontrakton
kun la Ekzistiganto, sed nulige
ĝin rompis, mi nun ankaŭ jen frakasu
de ĝi la skribmaterialon mem!”

La pecoj klakfortintis antaŭ li.

Silento. Tiam voĉotajd' sorŝvele
alŝaŭmis lian rokon. Teologio
de l' sinkretistoj.

Sed silika plu,
li ĝin prisurdis, nur elokventis fare.
Li saltis sob, ŝovante la bovidon
en propran fajron. Fro inter la mallertaj
gestoj de grasa viro protestema
li ŝiris glavon, kaj lerthake tranĉis—
latuna leko en la sun'—felŝnuron
dolorstringintan ĉirkaŭ sveltaj pojnoj
de l' juna ino. Kaj ĝin movis plu,
dum fulma klingo verve zigzagadis.

“Mi pulvorigos tion, kaj infuzos
por vi el or' trinkaĵon. Sed unue
al mia livo, se vi kore pentas;
kaj dekstren—tie ĉi—la senkulpuloj,
kies genuoj tute ne sin fleksis
por malpuriĝ' per ĉi religiaĉo!”

Ekondoj en la komunum', protestoj
barakte, manoj por reteni manojn;
sed la amas' amebe iĝis tri.
Ploris virino; sed obstinis multaj,
vizaĝoj duriĝintaj kiel ŝildoj
kontraŭ proponoj repaciĝi tiel
per sinsubmeto.

“Restu ĉi-apude,
nur ne denove ŝanceliĝu for.
La lango de la glavo ne parolos
al vi.” Li gestis per la liva mano.

“Kaj vi aliaj, mia propra tribo,
per sankta faro vi konsekros vin
hodiaŭ. Ĉe altaro de l’ Vivanto
de nun vi estos pastroj, porĉiame;
sed jen unue vi forbuĉu homojn
per klinga juĝovorto, kies akron
neniu povos kontraŭdiri fine!”

“Alportu viajn glavojn. Tiam serĉu
fro tend’ al tendo, kave, en kaŝejoj.
Fortranĉu ĉiun kiu ĵus elektis
resti kancero en la povra karno
de ĉi popol’. Neniun ajn indulgu:
amikon, fraton aŭ la karulinon
al kiu vi, post nupto dum vesper’,
murmuris dolĉajn vivpromesojn, toste
per la arĝentpokalo de la luno.”

Mi volis turni min, por forrigardi
al rokoj malpli duraj ol ĉi horo;
sed ĉe l’ orelo fera voĉ’ ordonis,
ke mi atestu.

Tiel la buĉejoj,
post kiam oni la unuajn gorgojn
distranĉas por viando. Dum kadavroj
kun haŭtoj vundŝiritaj jam fridiĝas,
la funkciuloj ne al si permesas
tro senti, plenumante sian devon.

Sed scias ĉiuj bestoj atendantaj,
eĉ se pro ruzo ekstervidigite
en kral’ de kiu oni ne eskapas.
Muĝemaj ili flaras mortodoron

neniam, kiel la verŝita sango,
laveblan for; ĉar ili bone sentas,
ke baldaŭ venos ankaŭ propra vico
por kontentigi volon senkompatan.

Kiom da kuroj ĝis kolbat' obtuza,
dum homblekado—kiu forfebliĝis,
en ŝprucaj glugloj de la hela sango
kaj lastaj membrospasmoj!

Poste, tamen,
finiĝo.

Mi rifuzis la rigardon
de tiu apud mi. “Nur lasu min,
kaj ne klarigu plu; mi ne komprenos
de vi aŭ Dio ĉi dialektikon,
kiam samaĵojn mano jen transmildas,
jen—pugnigite ĉirkaŭ glav'—mortpikas!
Mohenjo-Daro kaj ĉi tiuj ŝafoj...
kia la diferenco? Izraelon,
krome, la Eternul' svatigis siaj.
Sed ĝuste ilin...”

“...kiuj prorokule
en Egiptuj' kaj ekster ĝi vidadis
lian eventospuron, kaj de l' Monto
aŭskultis tiun Voĉon, silabantan
la Leĝon laŭte. Poste li persone
manskribis ĝin, ke ne sekretariu
nura homido, eĉ Bibliverkanto
el polvo. Krome, ĉi plej daŭrajn devojn
li ne al papirus' konfidis, nek
al pergamen'—skrapebla far venontaj
ekleziuloj, kies koroj jukos

alŝovi proprajn emojn—sed flamfingre
por ĉiam en praŝtonon tekston tuŝis.

“Ne en Mohenjo-Daro, sed ĉi tie.

“La dua ordono klarione klaras,
kaj la mortintoj mem, entuziasme,
vivuis lin Sinjoro, kontraktante:
‘Ĉion diritan de la Eternulo
ni faros kaj obeos!’—kvardek tagojn
antaŭe. Tial, sub forna sun’, mi grimpis
por alta rendevuo. Kaj nun ĉi veo!

“Sed kio estu al la ribelantoj
kiuj plenscie, en la lumo mem,
obstine turnas sin al tenebro for?”

“Nenio pli! Mi konsideros tion,
morgaŭ aŭ iam. Intertempe mankas
al mi la apetit’ por rezonaĵoj
abstraktaj. Tro plenigas mian gorĝon
la sangogusto. Eble vi foriru.
Neniam la rilato inter ni
komfortos!”

Io dolorigis lin,
tre kvazaŭ mi lin vipus; sed li lante
kapjesis al si mem. “Vi pravas. Jes.
Alia nun jam povos ŝarĝi sin
per via peza personeco. Adiaŭ!
Samuna, Kere, ĉu vi venas kune?”

Subite kaj sen gesto ili simple
ne estis tie plu, malaperinte
kvaz’ inter du palpebrumoj. Iom tiel

ekbrilas, posttagmeze, sunlumer'
en vangkaveto de la blonda akvo
kaj post moment' por ĉiam sparkas for.

La solo min sufokis. Strango stringis
la koron. Fremda spacotempo. Sub mi
la ebonaĵo kun kadavroj dise
sternitaj. Kaj mi sciis: la ceteraj,
velkinte, ankaŭ iam pleje falos
sub la dezertosuno.

Alte giris
vulturoj.

Kio estos al mi nun?

Libro 3

I

Subita krio murdis la silenton,
kaj estis mi. Tia la hororo
de muso kiam kato ĝin ekhavas,
aŭ antidorko kiun boavolvoj
komencas stringi.

Apud mi li altis,
kolono tute blanka: Lucifero!
Sed li subridis, kaj malstreĉe levis
pacigan manon; ĉar li tuj rimarkis,
ke mia peza karno kuntiriĝe
ekvolis for, en duonsido tie.

“Vi ne timegu tiel, elektinte—
mem, mi supozas—kun pigmekuraĝo
eksterrondiĝi, inter la titanojn.
Sed eble ankaŭ mi malstaru iom
kaj kun vi klinu dorson ripozige
kontraŭ ĉi dome altan rokon.

“Strange,
tamen, ke la kolos’ ĝis nun evitis
atenton mian; ĉar la aglo ĉiam,
jam alflugante super la terenon,
ekkaptas en la kapon akrokule
ĉiun arbuston—kie eble formo
povus kaŝkaŭri—, kavon, terkanturon
aŭ ŝvelan, ŝrumpan ombron apud ŝtono.

“Sed sense ankaŭ nin, la superulojn,
batanta sorto povas iafoje

igi obtuzaj, nu...nur iomete.

“Kaj nun rilate vin—ho malstreĉiĝu
kaj ne insultu min per viaj pensoj.
Mi estas civiliza, ogro ne!”

Li montris al mi kaj per lanta movo
malfermis ambaŭ pugnigitajn manojn
gigante Herkulesajn. “Vi ne trovus,
sur ajna el la mondoj kiuj svarmas
ĉirkaŭ la sunoj en ĉi loka aŭ
alia galaksio, fingrojn pli fortajn;
sed mi maldegnas pri potenco tia,
havante mian menson, kaj la pravon
persvadi.”

Kiel birdo hipnotanta,
se inter branĉojn glitas tre proksimen
serpento buntvenena, mortmakula,
mi estis fascinita. Mi forgesas
kiom da tempo erodiĝis tie;
li al mi multe paciencis.

Ĉirkaŭe
la lum’ paliĝis el la cindra tago,
dum super ni jam ardis tiu stelo
per kiu, post la sun’, reĉendas sin
la koroj. Iŝtar ĝi estis ĉi-epoke
por siaj homoj, kvankam alihore
naskiĝontar’ ankoraŭ sen ekzisto
elfantazios pliajn nomojn.

Mi sentis,
ke miaj lipoj malfermiĝas trance.
“Sed kio povas esti inter ni?”

Senstresigante, la basvoĉ' karesis:
“Nenio, se ne amikeco. Ĉar
ni estas tre similaj, vi kaj mi;
kaj la vizaĝo de la Eternulo
nin ambaŭ almienas ŝtormonube,
kun firankoro, kiu baldaŭ tondros
kaj ŝutos sian hajlon kontraŭ vin.”

“Kial?” Mi pluparolis kvazaŭ songe.

“Aŭskultu!” Li kunplaŭdis per la manoj.
“Hej, vi vekigu!”

Mi trovis min vekita.

“Ĉar pensi estas dubo kaj ribelo,
kaj via sango surfrompiĝe tajdis
kontraŭ la rokojn de la Dia kor'
pro kompatemo por alies sango,
la Patro, tre kolera, punos vin.
Vi estas forlasita, ĝis la venĝo—
kovata nun—el ia embuskejo
ekmordos per pikdentoj venenitaj
en la rankoro, kiun li flegadas
por ĉiu, kiu kontraŭpensas lin.

“Kaj tia hom' ne povas longe daŭri,
krom se por li ĉi mano estas ŝildo
kaj madz' rebata, ofte lin klabinta.

“Mi igu via ĉampiono, estro
kaj suvereno, kiu povus riĉe
pripluvi vin, vasalon, per bonaĵoj.
Krom la sekuro, plej necesa nun,

abundokorno mia al vi verŝus
precize ĉion far vi sopiratan.
Mi tutan mondon en la mano tenas.

“Vi volas...kion? Mi disponas jen
pri ĉiuj dolĉoj de l’ plej bela ino,
kun multo, multo pli, por via karno;
amase la metal’ magie flava,
kiu aĉetas ĉion; mensa fajro
por ĉendi vian famon trans planedo;
kaj, alte super tio, pov’ potenci—
havaĵe—tutan basan plebon, kies
sola, videbla dio estus vi.
Aldone mi vin povas rejunigi
kaj ege streĉi vian kurtan vivon.

“Por juveluji al ĉio ĉi konvene,
mi ankaŭ kunproponas la reĝecon
de brila lok’: Damasko, kun ĉirkaŭaj
teritorioj, estu via feŭdo.”

Kia miraklo povas savi, kiam
alvipas tranĉa tim’ kaj tento tiras?

Neniu konas siajn spertprofundojn
kun memoraĵoj el sinkintaj tagoj
kaj intertreno de l’ motivoj. Apikas
mergitaj en ni montoj kaj abismoj
de la sekreta memo, vasta kiel
planeda oceano.

Dum momentoj
mi emis kaj ne emis, ŝanceliĝa
foli’ sur flako, kiun tien-reen

kirletas vento aŭ subtila tajdo.
Kiom profitis al mi ĉiuj tagoj
jam enpagitaj ĉe giĉeto—tro
postula kaj ne ĉiam tre afabla—
de la Ĉielo, kiu eble nun
sin fermis kontraŭ mi?

Mi proksimiĝis
al la logaĵo. “Tamen, ĝuste kion
vi mem postulas? Certe ion karan.”

“Nur helpu min pli bone helpi vin.”
El lunvadi’ sen akvo vulpo blekis.

La pensoj pli ol postaj vortoj en mi
balbutis pro necerto: “Kiel do?
Ne komprenante, aŭ nur tro... Ho kuro,
kuro de la ĉevaloj de la nokto!”

“Nu, mi vin ne komprenas, pro aludo
sen ligo kun la lingvoj de la nuno,
kiujn mi konas—kiel la homkoron.
Mi scias do, ke vi alportas ĝin
el temp’ futura. Bone. Ĝuste tion
de vi mi plu avidas.

“Do malvolvu
la pergamenon pri venontaj tagoj,
kun teksto kies runoj plej erude
vortigas homojn kaj agojn riĉsignife,
ĝis fraz’ post frazo por mi kunĉapitros
kion vi scias kaj malkaŝu nun.
Kaj pensu kiel speciale estus
por vi instrui la plej eminentan
menson kiun vi iam ajn renkontos!”

Profunda frosto ie sub la koro.
Mi ege timis kaj malfidis lin.
Ĉu tiel, pra-Judase, mi transdonu
al ulo tia tutan historion
da homoj, ke ĉi antaŭkono nefe
ebligu al li ĉiajn manipulojn,
knedonta ilin laŭ misvolo lia:
eĉ alabastran inoformon, kiun
preĝantan lune mi en nokto vidis
de jaro nekonata—kaj nun daŭre
atendas plu retrovi—, ankaŭ Viron
pendontan sur la kruco kompatinde?

La nekonaj’ por ĉiuj restu tia.

La gorĝo sekis kiel olda korno.
“Ne,” mi elraŭkis, “tion ne demandu!”

“Ĉu vere?” li remokis. “Mi ja pensis,
ke eble vi pruvigōs oks’ obstina,
en kies dika kapo (ĝis l’ ekbuĉo)
kuŝas, anstataŭ la racio, ia
lanta, sinkontraŭdira konfuzaj’,
eĉ stulta, malvigla sentimentaleco.

“Sed dum ĉi tie tempon vi disipas,
la granda muelilo de la mondo
giras kaj giras plu. Novaj eventoj
jam amasiĝas, tro sen mi. Rapide
rekonsideru. Ĉar vi ne forgesu
pri via sol’ kun mi, kaj ke mi povas
persvadi, hm, laŭ multaj manieroj!
“Ekzemple...” Li grefe siajn fingrojn fleksis,
ne tre subtilminace, kaj sin levis

kvazaŭ por salti pli proksimen.

Tiam

strangaj' teruron el mi viŝis.

“Lin lasu!”

La voĉo pon mi saltis el la roko,
kiu ŝoviĝis de ni ambaŭ for.

“Mirjan, denove!” Lucifer' koleris.

Estulo apud kiu elefant'
estas minibesto, kiel apud ĝi
buldogo. Sed la formo troe fremdis
por vortopentri per imago tera.
Iom pri ĉielarko ĝi pensigis
kaj iom pri giganta araneo.

“Nu, kompreneble! Ĉu vi ne atendis,
ke baldaŭ mi laŭsnufos vian spuron,
post viaj tromisfaroj tie ĉi?
Entuziasmo forgesigas nin!

“Fro Skraŭe, per subspaca sciigilo,
urĝa galaktogramo vokis min
el la Hundejo apud Siriuso.

“Antaŭ tre multaj jaroj, anticipe,
la Eternul' elkovis nin, sep Golbojn—
kreaĵojn la plej fortajn en la kosmo—
por iam gardoboji kontraŭ vi
kaj via bando, kiam tro salivaj
vi saltos lupe en homgregon, lian
sur ĉi planedo, kiel ajn vagintan
per misoj de li for.

“Nur pensopuls’,
kaj ek mi jen—trans pli ol ok lumjaroj—
pre ol l’ intenco al vi mem klariĝis
rerampi tien ĉi. Do viaj fingroj
ne konas egalaĵojn ie ajn?”

“Se al plia kun mi lukto vi sopiras,
mi kaŭras preta. Tamen vi memoros,
eble, antaŭajn fojojn, eble ankaŭ
ke tiam mia tuŝo estis fajro.”

La princon de l’ falintoj furiozo
skuis. Tiel la pinoj kiam sekreta
kaj trans margolfon alveninta vento
malkaŝe ekmuskolas en arbaro,
dum glimas super ĝi trankvila lun’.

“Li estas mia, ĉar la Eternulo
forĵetis lin!”

Se mi kapablus legi
mienon de vizaĝo sepokula
en tiu diluita nokta lum’,
mi certus pri la ironio.

“Ĉu?
La mensogintoj ofte tion faras.”

Moroza, Lucifero silentetis,
paŭte en duba lum’; sed resinrega
li baldaŭ ridis. Silkis lia voĉo.
“Nu, kion mensogintoj ofte faras?
La bestulaĉ’ pretendas pri gnomiko!”

Ĉe ĉi insulto Mirjan nur murmuris:
“Ho, mi ne spritas speciale, sole
uzadas la okulojn. Kaj de ili
mi havas multajn, por observi vin.

“Ha jes! Nu, ĝuste kion ili faras?”

“La mensogintoj fine mem ekkredas
la proprajn falsojn, kiel faras vi.”

Denove Lucifero paroksismis
sub la acida luno, kvazaŭ li
la Golbon grefus. Sed la grandaj pugnoj
al liaj flankoj falis, malfermiĝe.

“La devo mordi min, se mi agresus
per korpatako rekta, ne rajtigas
ĉi bavojn kontraŭ min, vian superulon.

“Mi kompreneble ne dirtigos min
per la plej eta korpkontakto inter
mi mem kaj vi, ŝlimhaŭta Golbo. Do,
la aŭdienc’ finiĝis. Sed vi certu,
ke pri ĉi ofendego mi akuzos!”

“Kaj tion vi tre bone scias fari!
Rampstreku vian ĉiam nocan padon
nun de ĉi tie for, dum mi kondukos
la vojaĝanton fro la mont’ funebra
sur lia vojo iomete plu,
al dormoloko seninkuba, kaj tago
kun renkontiĝo kiu ne teruros.”

II

En la moderna lando Israel',
resaniĝanta post la mismastrumoj
de du jarmiloj, ĝibas sudaj holmoj
kun kalvmakuloj kaj krania nudo.
Sed unuloke ravas, fervojraŭte—
inter Jerusalem kaj Tel Aviv
Edenrubando. Tie la vekigo
en frua jaro antaŭ la Sinjor'.

*Mildaj momentoj inter la herboj—
verde odora, senĉesa nun';
briz' apenaŭa kulmojn karesis.
Super krutaĵoj pendis la sun'.*

*Dialekton jam longe arkajan
kontraŭ ŝtonflankoj zumis la roj'.
En la rebrilon rano eksaltis.
Tegis valkurbon matena ĝoj'.*

Kaj tiam mi ekaŭdis la piedojn
ŝugrince sobglitantajn laŭ deklivo,
ĉe mia dekstro. Kurtan ŝtonoĵeton
for, la figuro haltis. Vesto blanka
super menoro, pon arbedo flave
flametanta en multincensa Maj'.

“Saluton! Ĉu la dormo 'stis agrabla?”

Per sana viglo, senceremonie,
li paŝis pli apuden, por eksido
sur ŝtona bret'.

Mi suprenbrakis min,

kun la printempoplana kap' ankoraŭ
beltrance, kvankam ne sen scivolem'.

“Jes, dankon. Eĉ pli agrablis la vekigo
en paradizopeco. Vi, mi supozas,
estas por mi la tria kondukonto
tra silikejoj de la historio,
sur kiuj nun mi devos knari plu
al dista fino—tamen ĉu kun celo?
Mi ne kapablas vidi tra l' obskuro
fro vintrofajroj, fume ventblovata
trans nigrigitan stepon de l' animo.”

“Celo troviĝas. Kiel nun, ĉi tie,
la tutan mondon kaj la kosmon mem
transondos iam helfarba primaver'.
Jes, ankaŭ vin! Ne pensu tiel vintre.

“Sed jen unue mi prezentu min:
Ezra. Min naskis Babilon', ĉe plaŭdoj
Eŭfrataj, kiujn amis Abraham
kaj la Princino. Ĉiam poste ŝi ilin
ne povis en la kor' ne aŭdi plu.

“Tien Nebukadnecar al ekzilo
ĉenitajn, sune kaj tra polv', retrenis
inter soldatmokantoj la rompitojn
kun pensoŝarĝ', silenta ploro, preĝoj,
el rubamaso de Jerusalema.

“Do iuj el ni stucis la radikojn,
por ne tro kreski en la aluvion
de tiu durivera region'.
Kaj mi brulkore, jam fro l' infan tempo,
pridemandadis ĉiun maljunulon

kaj feniciajn tekstojn riĉmemorajn
de niaj pergamenoj, pri kialoj
por ĉi kolapso. Kiel vir' kaj pastro
mi krome faklertiĝis, kolektanto
de la verkaĵoj kiuj estis ni
dum la jarcentoj antaŭ tio, kun
esper' perdita pro la fuŝaj reĝoj,
profetbaraktoj kaj malmulta glor'
en lando nun lontana—mem farante
librojn pri ĝi. Sed pleje mi revadis
vojiri kun la jubilplenaj Judoj,
kiam piedojn pie replaŭdantajn
tra polvo sub la pikradia sun'
revokos en Jerusalem la Rok'
altara, fro kiu devis suprenfumi
al Dio ofervoĉoj de l' popolo.”

De kie li heredis tiujn buklojn
ruĝorajn, krom la haŭto tute blanka?
Belskulptaj trajtoj, kvazaŭ de Helen'!

“Kaj tiel estis. Poste mia korpo
nutretis nian magriĝintan landon.”

Tim' aseĝajis. “Tamen vi pluvivas,
fantomo—aŭ...spirito—ĉu?”

Suspire

la ŝultrojn li faligis. “Superstiĉa
ankoraŭ! Post la mort' la cerbo putras
unue, kun memoroj pri la memo.
Tial, pro nekonsci' kompleta, longe
mi ne ekzistis kiel mi. Jarcentoj
kun homtumulto kaj la multfaremaj
tagoj por mi ekestis, resolviĝe,

kiel horloĝtiktako inter du
sekundoj. Ĉar nenion la mortintoj
scias, estante speco de nenio—
kvankam Dipatro, kiu postsopiras
siajn infanojn, pri ili mensoŝranke
konservas, zorge, ĉiujn memdetalojn,
por repaterni ĉies personecon
en matenlumo de la releviĝo.”

“Sed tio estos ĉe la mondfin’!”

“Ne nur. La sanktan paĝon vi ja legis—
ĉu ne?—pri la momento ĉe la kruco
kiam, post tenebriĝo, de Mortinto
la kontuzita kapo brusten falis.
La fundamentoj sub la mond’ abrupte
skuiĝis, kaj poste rearanĝis sin
por nova homebleco.”

“Kompreneble.
Mate’ bildigis ĝin filmece.”

“Ankaŭ,
ke forŝoviĝis polvaj terlitajoj
tombeje kontraŭ l’ Monto Olivarba,
kie jam tiutempe tiom dormis;
kaj kiam li deskuis la katenojn
de l’ morto en ĝardenkaverno, multaj—
rekorpiĝinte (ho surpriz’!)—sin levis
kaj ĉirkaŭmarŝis en Jerusalema
kaj miris tra la tuta Palestino.

“Sed kvardek tagojn poste, kiam li
dum bluĉiela Ĵaŭdo preter nubojn
sin lanĉis en la spacprofundojn for

al akcepto reĝa far la praubego,
tiujn li kun si portis, triumfire:
kaptitojn iam de la mortprizon’
sed jam liberajn nun por viv’ senfina—
unuajn garbojn kiuj garantias
rikoltabundon kiam li revenos.

“De ili estis ankaŭ mi, kaj same
aliulo ankor’ gvidonta vin.

“Sed venu. Tiu sun’ jam tuŝas alton
de kie, taglanterno elpendigita
en tenebreja vasto, ĝi prilumos
destinmomentojn kiujn spektos ni.”

III

Ĉi-foje ni ne saltis tra la tempo,
nur glitis lante super montokrestoj,
vadispuroj kaj valpelveto—base
bildoj en skribrulaĵo—orienten
kun norda klino, live de la suno.

Al ni subŝovis sin kaj post momentoj
el la okuloj, reŝrumpante, tiris
la kamelharaj tendoj, strikultivo
kaj la brutaroj: pecoj da popolo
multloke disĵetita trans la tero;
sed ankaŭ urboj, ĉefe de aliaj
gentoj. Antikvaj dinastiaj stratoj
kaj placoj kie generaciojn svarmis
farlerta, babilanta loĝantar’.

Ĉirkaŭe muroj paŭtis grize aŭ
krenelrikanis kontraŭ la mateno.

Pasante, la figurojn mi rimarkis
kirasajn, gardostare; kaj unu fojon,
kvaz' pro intenco, lanco rebrilaĵe
supren haktranĉis al mi en l' okulojn.

Ni baldaŭ ĉe la celo malelanis.
Ŝtona kaj arbusteta ebenaĵo.
Popolamas'. Momentojn ni pendŝvebis
super homkapaj punktoj kungrupitaj
kaj tiam alteriĝis, nevidate—
sed nur ĝis meze de la disputado.

“Itamar malŝparegas nian tempon
per tiuj babilaĉoj pri l' Anĝelo,
kaj nun pro li mi devis lasi gregon—
kun mola ino krom la knabineto
senvirigitaj, uvraj al rabgvato,
kies avido hate nur atendas
okazon por fortreni ian predon
kriantan al fremda lito aŭ altar'!”

L' okuloj de la juna parolinto
ekflamis nigraj. Pluk' senpacienca
abrupte ĉe la ŝultro reordigis
la falvan veston oldan, kun la ŝir'
kudrita ame de nelertaj manoj.

“Esli, formetu ĉi koleron. La karajn
konservos en sekura ŝirmo—ĝuste
kiel dum niaj ĉiujjaraj festoj,
por kiuj viro devas alpilgrimi—
la ĉeestado de la Eternulo,
kiu kaŭrigas la Kanaanidojn
pon dikaj ŝtonoj, kiujn kunmasonis
kulpsentaj koroj el sia tim' senĉesa.”

“Ebed, mi devis mianeste lasi
du kolombinojn. Dina tiel junas,
ke ŝi, patrin’, ludemas kun la ido
kvaz’ fratineto aŭ amata pupo,
dum tiu ĉi ankoraŭ rigardadas
la tutan mondon en mirplena puro,
kvazaŭ ĝi estus paradiz’ kaj ni
ne elpelitoj. Ho la dorlotinda
dum ĉi monatoj karaj de l’ komenco,
malscia pri la morto aŭ serpentoj!”

La maljunulo provis tuŝi lin,
sed spasme tiu sin fortiris. “Oĉjo,
vi jam ne scias. Viaj nunaj revoj
forturnas la okulojn en la ombrojn
preter la suno. Dume ni ankoraŭ
devas barakti kun sovaĝa lando
kaj erpi la venton.”

“Ho senhonta knabo,
insulti honorindan patriarkon!”
ensaltis voĉ’ alia, kaj leviĝis
konsentmurmuro.

“Al la tem’ revenu,”
tenoris blankbarbulo anhelema
kaj minca sur bastono. “Onidiroj
pri la Anĝelo de l’ Sinjoro oftas,
fro kiam dum disvagoj tra dezerto
Mose’ konsolis la nomadiĝintojn
per Tiu, kiu akompane ilin
kondukis el sklavjaroj sekpiede
sub fajra nubo tra la Ruĝa Maro,
kaj fine tamen ĝis la land’ alportis

transrandiĝanta je miel' kaj lakto.”

“He, he!” Fajle enmordis seka voĉo de grasa krispharulo, kiu ŝvitis sub varmiĝinta sun’. “La solan lakton kiun mi glutis en ĉi polva loko mi devis proprafingre melki mem el cicoj de kaprino malafabla, kikema, ĉar la idon mi prirabis; kaj kiam unufoje inter rokoj mi tro aŭdace grimpis mielejen, piklance forpiedigis min abeloj rapide. Tre bonŝance tiun tagon sub la dekliv’ la rojo havis akvon, per kiu min provizis la sezono.

“Ho, se ĝi estus, kiel pleje, seka...! En tion mi ekplonĝis kaj ĉerp-ĉerpe per rapidemaj manoj ege plaŭdis kontraŭ taĉmentojn de la diabletoj.”

Ridoj, kaj unu vokis: “Brave, Buz! Pri tiu heroaĵo ni jam aŭdis.”

“Ĉit!” Estis Ezra, kaj ĉe tio al li svingiĝis la okuloj. “Pri l’Anĝelo... Se mi komprenas ĝuste, Itamar mem lin trafis en arboja intermonto cis Gilgal. Poste ĉe aliaj lokoj samaĵojn spertis pluraj pli. Hodiaŭ, pro la ordona bleko de l’ ŝofaro, kiun ekblovis la ĉefpastro, ni kungrege aŭdos tiujn atestantojn.”

“Kungrege, jes!” Senpaciencis Esli.

“Obeaj, facilkredaj, stultaj ŝafoj.
Itamar, ĉar Levido, ne bezonas
per ligna kaj malakra plugileto
grati trosekiĝeman agron, aŭ
en varma vento monten akompani
la bestojn, enuigajn krom malsataj.
Ne, li kapablas multe ĉirkaŭsidi
en ombroflakoj, dum ni lin nutradas,
kaj tro mediti pri—”

“Kaj la aliaj?”
demandis Ebed. “Mankas nur detaloj.
Ofte ni ne tro pensu, dum pli decas
atende lasi la trankvilan menson
kuŝadi, kiel en Ĥeŝbon’ laĝeto,
aperta por speguli ricevitajn
imagojn de l’ ĉielo. Aŭ, se ne,
ni iom preparolu la Anĝelon
pli ĝuste, kiun tute ne inventis
la fil’ de Amram aŭ la ombraj, eksaj
homoj sidintaj ĉirkaŭ sia fajro,
de longe cindriĝinta en dezerto
sub la ĉieaj steloj.

“Ĉar memoru,
ke jam al Abraham dum la varmego
forsveniginta eĉ cikadoĉirpojn,
kie li sidis antaŭ sia tendo
en ombromagra arbaret’ ĉe Mamre,
ekmarŝis solidiĝe el miraĝo
tri ĉieluloj. Unu estis Sankta
Sinjor’, per kiu Dio iafoje
en la homaĵoj intervenas, age;
kaj liaj vortoj havis la potencon
ĥamsine forparoli la fekundon

kaj urbojn de la Valo, krom estigi
por ni prapatron per uter' velkinta.

“Li estis Tiu, kies kor' elserĉis
Hagaron, inon aĉe mistraktitan
de niaj antaŭuloj, kiam ŝi
jam preter ĉiuj larmoj trovis, ke
la solo kaj mizeroj fine voris
eĉ ŝian Egiptan haton; kaj, al ŝi
kompate, li destinis tiun tagon
por Iŝmaelo la Arabajn idojn
kaj Beerŝebe akvon el sekaj’.

“Kiam ekkreskis Isaako, spros'
de seka trunko, kiun longatempe—
prescia—l' Eternulo promesadis
sed priskeptikis Abraham kaj Sara,
ĉendiĝis en ĉi koroj granda kanto
pri la futuro iam fruktiĝonta
fro tiu ido.

“Tamen unu nokton
ektranĉis en la patron murdordono.
Filon ŝafecan li kondukis mute
dum tri neimageblaj tagoj plumbe
al mont' moroza en Morija, kie
dentaĉas grize holmo homkrania,
por buĉoferi lin, verŝonte ĉiujn
eserojn el oldula vivo. Tiam,
dum sun' fulmigis la tranĉilon super
la kap' de Isaako, proprapense
jam mortanta—krom tranĉa klingenpremo—,
trumpetis voĉo sava.

“Jen l' Anĝelo

havigis la virŝafon anstataŭan
kaj pro l' obepreteco reanancis
futurajn idojn frajmultegajn, nin.”

Esli graŭletis hunde. “Ne prediku
pri la bonaĵoj de la nuno!”

“Ĉit!”

ekakris Ezra. “Ni volas plu aŭskulti.”

Unue la junulo koleremis,
sed io—eble la fortika korpo
memcerta aŭ mien' aŭtoritata
de mia akompananto—lin mutigis.

La rakontinto rigardetis. Tiam:
“Prapatro Jakob dum stelsola nokto
ĉe la vadej' Jaboka, postrestinte
en antaŭtimo pro Esáv—trompita,
venĝema frato, kiu lin atendis—
meze de la luktado kun si mem,
dum blindaj palpoj fine tuŝis Tiun
kaj firme tenis. La matenruĝo trovis
lin triumfinta super vivdoloroj
kaj la perturboj de lo nure homa,
kun nomo nova, kiun ni portadas.

“Kaj jen memoru, kiel li mortsojle
sur sia lasta lit' en Egiptujo,
pro distaj retrovagoj per la menso
tra ĉiuj vivpejzaĝoj multveteraj,
murmuris pri l' Anĝelo, kiu lin
forplukis el mavaĵoj kaj danĝer'.

“Cetere, ĉi Estulon specialan

eĉ nelgatempe, krom Moseo mem,
renkontis ankaŭ kelkaj aliuloj.

“Unu matenon ĉe Jordan’ Josuo
elpaŝis, cerbumante pri metodo
trabreĉi iel tro solidajn murojn
soldatkronitajn de la palma urbo
sur ebenaj’ fekunda—kie longe
persistis, jam el tempo plej antikva,
popolo tiel riĉa je la lerto
forskermi l’ atakantojn bonrezulte
kiel farmi la teron aŭ subulojn
en tiu tuta regiono.

“Tiam,
en loko ne tre diste de l’ remparoj
kun kaskaj vizaĝetoj kalkulantaj
ĉu li ĝisvagos stulte sagdistancen,
li vidis antaŭ si subite vastan
viron, skvamferan en kiras’ kaj kasko,
el kies pugna mano pintis akre
nuda glavego monstra, tiel longa
kiel la lanco de normala homo.

“Ĉu estis unu el la Anakidoj,
gigantotribo kies anoj loĝis,
timigaj, inter kaj soldatis dunge
flanke de l’ pluraj gentoj en ĉi lando?

“Josuo, ĉiam kuraĝulo, glutis
sed vokis: ‘Ĉu vi estas malamik’
aŭ unu el la niaj?’

“Tiu averte
ordonis: li depluku la sandalojn;

sanktis la tero, kiel por Moseo
iam montflanko, kie per orflamoj
neestingebliis arbitraj' dezerta.
Ĉu nun ne tiu Sama lin atendis?

“Estis l' Anĝelo, Diagenerale
veninta kun taĉmento superhoma
ektiri la muregojn tute el
iliaj ŝtonradikoj for, renversi
fro Jeriĥo la ŝirmon de jarmiloj.”

La vortoflu' post tio forsekiĝis,
kaj kelkmomente oni ne parolis.

“Tiaĵojn oni al ni ja transdiris,”
entranĉis kurta mezaĝulo ĝiba
per voĉ' soprana. “Kaj eĉ antaŭ tio
l' Anĝelo por la patroj tre klopodis
deteni Bileamon, misprofeton,
kiu orame al la Moabidoj
sin vendis, por malbeni Izraelon—
sed tiel nur aĉetis sian morton,
buĉoto poste sur la batalkampoj;
ĉar li perfidis la iaman servon
al Dio. Fine eĉ azen' parolis...”

“Precize, kiel nun!” ekmokis Buz.
“Sed ĉu ni fine devas ĉion kredi,
infane, dum la vivo tie ĉi
nin ne karesas sed frapas dure.
Legendojn pri l' Anĝelo ni do lasu
al uloj senlaboraj. Itamar...”

“Sufiĉe!” Ezra mastre levis manon.
“Sur la estrado iu jam signalas,

ke ni atentu. Ĉu ĉefpastro Lael?”

IV

Unue estis li, sed nur momentojn.

La buntvestulo kun la mitro blanka
gestis kaj gestis por adresi nin,
sed devis reprovadi.

Kontraŭlavis
murmurotajdoj.

“La Anĝel’ hodiaŭ...
Aŭskultu min!...Hodiaŭ la Anĝelo...”

Tio, pro la ripetoj, iĝis kvazaŭ
balbuta. L’ amaso malkontentiĝanta
lian memfidon muĝe forvelkigis.

Tiam en kunaj gorĝoj laŭte spasmis
spirego. Muto.

Apud la ĉefpastro
subite Iu staris altstatura.
Glavon li portis, grandan kiel trabo,
senĉese deĵetantan okultranĉajn
sunerojn. En majesta akompano
de liaj vortoj, man’—grandfingre pugna—
leĝere, ferakcente movis ĝin.
Mi ĉion ĉi memoras kvazaŭ brilon
duonkaŝitan. Li aspektis kiel
ĵus forpaŝinta el transtera loko
de perlolumo, kiu fro lia haŭto
ne tute estingiĝis. Iel, daŭre,

li ŝajnis glimi.

Iuj plej proksime,
falinte teren, la vizaĝojn kaŝis.

Perdiĝis ĉiuj sonoj homamasaj,
eĉ l' etaj, kiuj susuretis tie
aŭ softe frotis inter vestofaldoj.
Brizeto inter gruzo kaj herberoj
retenis sian spiron. Ŝajnis ekhalti
cirusoplumoj dume alvelintaj
sur la bluega ĉiel'fon'. La suno
atentis.

“Stariĝu kaj rigardu min!”

Surpiediĝoj plumbaj. La vizaĝon
lumeman ili pleje evitadis,
sed peze al ĝi ŝovis la okulojn;
ĉar lia voĉo kvazaŭ mildigita
tondro profundsilabe tuŝis ilin.

Tiel fro landinterno alta foje
fumbruis l' Akvofaloj Viktoriaj,
kaj tridek jarojn poste multajklife
ĉe Iguaçú el distoj min enplonĝis
la granda voĉ' rivera. Ambaŭfoje
tre same estis posttagmez' el oro
kaj somerblu', dum vaste alparolis
unu homkoron tuta kontinento
kaj dialogis miliondetale.

“Malplaĉas via dubo!

“Iuj mokis,

eĉ galis kontraŭ Itamaro mia,
pro vi heroldigita, por mesaĝi
pri mia veno, kaj la torĉportintoj
pluaj, en van' ĉe vi provintaj veki
pri mi memorobrulon, kvankam mi—
mi mem—kurigis ilin, atestantojn.
Kial, eĉ tiakaze, vi ne povas
okulojn en alies kapoj kredi?"

Ĉi-punkte li ekdigis por momentoj
sian vortriveron, nin trabuintan,
kaj fulme okulserĉis nian grupon,
por trovi Esli, kiu tuj paliĝis.

“Vi dubas eĉ Laelon, la ĉefpastron
neniam al vi mensogintan.

“Skeptik'
aŭ kredo fine tra la menso fluas
kiel la vol' elektas; ĉar sub ĉio
la font' ne estas pensoj sed deziroj,
el kiuj tiom de la hom' bobelas.

“Ne kredu do, sed jen vi vidas min!

“Ŝtonkoraj...tro parencaj al prapatroj
de iam, longe jam kaputiĝintaj
polvo kaj ostoj apud kvardekjara
voj' al ĉi lando, liberejo, kiun
al ili kaj al vi donacis Dio,
post la servut' sablanda, kie voktoj
premegis ilin ŝovi pezajn blokojn;
kaj vipoj karnon mordis, senkompataj
al 'ah' aŭ 'iom lasu min ripozi!'

“Fine nur mi, l’ Amanto, estis mola.
Moseon mi alvokis de la ŝafoj
en Sinaj, kie sub la montamaso
arbust’ malkonsumiĝe flametadis,
lin faris mia mano kaj multfrape
sur la makzel’ Egipta per doloroj
persvadis fieracân faraonon—
kun koro el granito—ilin lasi
forstumbli, depostulintajn riçan ŝargôn:
salajron dum vivlongoj retenitan.
Mi estis la kompan’ de tiu ĝojo,
rajdante super ili multajn jarojn:
tage nubeca ŝirmo kontraŭsuna
kaj dum la noktoj ardo kaj vartem’.

“Ho kial, Izraelo, karulinjo,
vi tiel ofte min forpuŝis, kun kor’
indiferenta kaj adulta? Mi,
ĵaluza, frapis vin, kaj rekaresis.

“La vento veas ĉirkaŭ tiu monto
senhomigita, kie vi promesis
por ĉiam esti mia. Nu, hodiaŭ
ni ree renkontiĝas. Estas mi,
la edzo post jarcentoj plu konstanta,
kvankam vi insistegas min neglekti!

“Aŭskultu! Mi nun faros aliaĵon,
ĉar vi ĉiesuline ne atentis
la Leĝon, kontraŭ la sufer’ remparon,
aŭ avertadojn pri la koruptiĝo
pro amindumoj kun ĉi idolanoj:
kelkajn generaciojn mi vin lasos
fifrandi la inklinon, ke vi trovu
la sperton instruanto men indulga

ol mi.

“Mi volis al vi ŝpari l’ etiĝon,
kun suferado, dum tro multaj homoj
estos malplenaj ombroj kiuj pasas,
pro interbretoj kun perdita gento.
Tial mi tranĉordone al vi diris:
‘Forfalĉu ilin kaj plej zorge fosu
el ĉiuj partoj de ĉi bona grundo,
sarkante ĉion tute. Kaj mi mem
elpelos ilin antaŭ vi...ĉar iuj
migros, por loĝi en aliaj lokoj
translimaj. Tiel vi ne parenciĝos
kun ili, por malĉasti en diablaj
kultoj kaj dolĉmuzike al idoloj
fordoni viajn infanetojn—miajn—
vekriadantajn dum la murdoferoj.’

“Sed ĝuste la boiĝon vi preferis,
kiu kontaĝas la ceteron. Krome,
ĉar vi ne plu rekonas, ke pureco
fortigas aŭ ke Dio estas granda,
vi ŝrumpis en l’ imago pri vi mem
kaj nane jam komencas ilin timi.

“Kial, ho kial vi faraĉis tion?

“Rimarku do. Future mi ne multe
vin helpos ilin venki kaj ekstermi,
aŭ peli for!”

Ĉe tio la ĉefpastro,
kiu ĉi tutan tempon apudstaris,
kokoniĝinte en silenton, kaj plu
pri si ne atentigis ajnamove,

tusetis. Minimumapaŝe li
kuraĝis sin altrudi pli proksimen.
“Sinjor’, al mi permesu nun propeti,
kvankam ne pli ol polvo antaŭ vi;
sed, nu, mi ja oficas interule.”

“Fidela Lael, viaj vortoj ĉiam,
libera pasigilo, trovas min
aŭdpreta, ĉar aŭtentaj, sinceramaj
por ĉi popol’ al vi apenaŭ danka.”

“Ho Moŝto, mi tre petas, la koleron—
ja merititan—de ni klinu for.
Ni frukte profitigos plian ŝancon.”

Momente sunis la Anĝelmieno.
Li rigardetis lin teneratrajte,
sed poste ironiis.

“Plia ŝanco!
Jarcentojn Izraelo almozadis
pri pliaj kaj pliaj ŝancoj...por disipi,
ebriuline per la dorlotpekoj.
Nenion lernis. Sed nun disciplinos
la propraj elektaĉoj dolorsperte.”

“Sinjor’, ne lasu nin detrui nin!”

“Per tia preĝ’ vi estas multeplaĉa.
Tiel Mose’ kaj Abraham propetis
iam por homoj karaj, kiuj tamen
insistis kvaz’ fatrason sin forĵeti.
Ĉi preĝon mi konservos apudkore,
ne forvelkontan; ĉar memorigil’
perfuma ĝi restados, tiel longe

kiel la Dia menso ne forgesas
pri vi kun ĉi koncerno por aliaj.
Laŭ la Sinjoro ĉiu tia homo
ne pasas kiel ĉi-sezonaj floroj,
sed en la nova ter' ĉiamuliĝos.

“Koncerne ĉi popolon tamen karan
mi kompreneble ne forpuŝas tute,
sed daŭre penas logi al la lumo.
Tamen, ke ĝi dum ĉi epok' baraktos,
tra dornaj tagoj, tiel nepre estos.”

Lael fariĝis larma. “Sed devigu,
malhelpu al ni, por ne esti stultaj!”

“Ĉu la Amanto iĝu perfortulo,
por tiel amorigi la maleman?”

“Ho ne! Jam dekomence la homvolon
mi ne devigas, ĉar per ĝi libera—
kaj nur tiele—la elekto estas
en ĉiuj suverena sinkreilo,
por iĝi infan' de Dio, aŭ diabla.”

Subite Lael staris tie sola,
kaj baldaŭ lia ve' infekto pasis
de unuj al aliaj. Super ni ĉiuj
la sunon obskurigis nubo peza,
kaj ploris tiu tuta komunumo.

V

*Agrable kuŝi kie la evento
ne plu kontuzas, peze, sange;
sed karesetas sun' survange,*

kaj turtoj naĝas sur la firmamento.

“Mi dankas, Ezra. Sub ombroarbo, rande
de la tritiko dudekkvar-karata,
ni espereble nun ripozos, ĉu?
Kaj, konversante, povos malimpliki
fadenojn de l’ signifo, kies tekso
konturas bildojn por mi tre konfuzajn.”

“Vi tro intensas! Tamen vin instruos
alkutimiĝo vidi, laŭgrade, pli
profunden per okuloj de la koro.”

Silente kuŝis antaŭ mi montetoj
kiujn mi post jarmiloj revizitos,
kaj tra la valo grimpis voj’ antikva
vostspasme el la regiono. Tie,
kelkajn homvivojn plu, ludados liron
kaj pri diaĵoj kaj destin’ cerbumos
ŝafista knabo kiu kronon portos.

Sed dume la struktur’ embriiĝanta
ne montris tion, nek la sorton poste—
jarmilon plu—de lasta princ’ Davida,
kiu fro kruconajloj pendos nuda
kaj en doloroj pri la mondo ĝemos.

“Ni iom kunparolu, atendante.”

“Dum ni atendas...kion?” Mi scivolis.

“Vi vidos baldaŭ. Kelkajn de Bet-Leĥem.”

“La lokon mi rekonis.”

“Nun troviĝas

tumulta tempo, kiam Izraelon
prirabas dum ĉi tia fruktsezono
akride dezertuloj, sen domaĝo
pro zorgoj kaj esperoj tutan jaron
super la agro. Aŭ popol’ interna
rikane premas sian kalkanumon
sur nukoj de la triboj, kiuj foje
estis venkantoj sub Josu’.

“Malgraŭe

Izraelanoj kun Kanaanidoj,
kaj eĉ najbaraj gentoj, nuptofande
aŭ per malĉastoj unupoliĝas.

“Krome kanajloj tre laŭplaĉe agas.

“Kompate la Anĝelo iufoje
etendas manon por malgraŭe levi
la tribojn ĝis la tero sobtretitajn,
kiam lin ege ŝiras helpopetoj.”

“Li tamen savis? Sed mi opiniis...”

Ezra min fiksrigardis, kapjesante.
“Per la Juĝistoj, homoj ofte mem
ne ekzempluloj, ĉar terure mankis
pli bonaj: Ŝimŝon kaj, ho ve, eĉ Jiftaĥ!”

“Tre kurioze. Kia normoŝrumpo
ĉe Dio absoluta kaj severa!
Kaj ankaŭ mi l’ Anĝelon klare aŭdis:
li agos fere, por tre sindetene
ne savi ilin de la idolanoj;
ili kliniĝu antaŭ punovergo

kaj lernu per spertfrapoj dolorigaj.”

Li paŭtis. “Vi lin aŭdis—klare, jes, sed ne bone, aŭskultinto malnuanca.

“La Potencul’ ne ŝatas, nur kelkfoje devas, dentigi la minacojn. Unu... nu feblon...Li rivelas: Li ne povas rezisti la pekintojn kiuj pentas.”

“Krome li estas general’ subtila kaj laŭ fluktuoj de l’ konflikto granda adaptas sin taktike, iafoje (almenaŭ tiel ŝajnas) eĉ strategie, ŝanĝante la armilojn—pro homfuŝoj, pro lerto Lucifera; sed, neniam cedema, saman finan venkon celas.”

“Nu, la Anĝel’ maltrankviligas min, estante superulo, tro majesta por tiel fro nenie al ni paŝi senplue en konatan mondon, kun zorgoj de nia eta karno—kvaz’ amiko. Li simple pelas la konscion en mi sur la genuojn, subigito trema. Cetere li dogmemas pri valoroj laŭ mi tre malnovmodaj. Sed precipe kiel kun ni estulo tia povus paroli buŝ’ al buŝo, hom’ al homo?”

Ezra suspiris. “Jes, pri vi mi aŭdis, ke vin iritas vortoj kiel *leĝo* kaj antaŭ ĉio *puno*. La jarcento muldinta vin kun krokodilolarmoj manpremas en kompato la murdantojn

sed levas ŝultron pri hakilo sanga
en ies kapo; kaj la teroristojn,
kiuj bruligis homojn per benzino
pro nealiĝ' al sama politiko,
laŭras, ornamas honornome kiel
liberobatalantojn, patriotojn.
Tamen vi ne atendu, ke l' Sinjoro
aŭ ni ceteraj tra la universo
en gusto degenera partoprenu.

“Sed pri la komuniko obstaklita
pro diferencoj inter hom' kaj Dio
vi pravas. Li mem konscias la problemon
kaj distfuture ĝin malnodos plene
kiam la Dia Vorto, Dia penso,
en nian feblan karnon sin tradukos,
por adekvati, homa metaforo.”

“Tion aŭ similaĵon mi jam aŭdis,
sed ne komprenas.”

“Nur atendu. Poste.”

Silento longa pendis inter ni,
dum la kapetoj de tritikokampo
blonde jesadis en aŭtuna ĝojo,
kaj la momento spiris pacodoron.

“Jen niaj homoj!”

Almarŝis la duopo,
kun kvar servistoj tre muskolaj, glavaj.
Ridete brilis la vizaĝ' de Ezra.
“Boaz kaj Rut. Mirinde vidi vin!”

La vir' bronzaŭta haltis en konfuzo,
kiel la sekvantaro. "Mi supozas,
ke niajn nomojn povus al vi doni
ĉiu lokano de Bet-Leĥem. Eblas
eĉ ruze ŝteli ilin. Sed vin, fremdulojn,
neniam mi aŭ la edzin' renkontis.
Do kial ĉi saluto? Ha, 'mirinde'!"

Antaŭenpaŝe graŭlis gvardiano
tre bruna, preskaŭ nigra.

"Ne, atendu,
Saul'!"

La voĉ' hoboĵis mildordone.
Ĉarme levitaj mano kaj vizaĝo,
dum la matura lumo posttagmeza
fajreris inter ŝiaj rufaj haroj.

Ho Ria, kial fremdaloke, kial
tra tiom da epokoj plej lontanaj
unu post la alia—ĉi virinoj
rigardas min, kun preskaŭ viaj trajtoj,
dum konfuzita koro en mi serĉas
por trovi, ne trovante?

"Jes, trankvilu,"
konsentis Boaz de la griza barbo.
"Saul', vi estas tro entuziasma.
Se ne en bando kiu rabavidas,
plej ofte la fremdulojn niagrande
mi bonvenigas. Tiel eĉ alportiĝis
por mi la ĉeftrezoro."

Li ridetis

al ŝi en la okulojn. Apud liaj,
kaj buŝangule, estis sulketiĝo
de haŭto jam ne juna.

Ŝi reradiis
tenere kaj kontente.

Tiam Ezra
reprenis la parolon. “Jes, pro tio
ni venis vian agron, kaj pro l’ ido.”

Saulo koleriĝis. “Al mi permesu,
mastro. Jen pruvo. Idon vi ne havas!
Kanajlo, kun mensogoplena buŝo,
mi jukas vin fordraŝi. Tial tuj...”

“Sufiĉe!” bruskis Boaz. “Vi, gardantoj,
ne scias ĉion. Do reiru hejmen.”

Konsterno, kaj malemo. “Tamen, mastro...”

“Min ne mastrou, kaj mi ne klarigos
krom vin informi, ke ni ja sekuras.
Nun kio? Ne staradu tie. Ek!”

Kelkajn momentojn ni rigardis kune
la dorsojn fro ni etiĝantajn for.

“Mi estas Ezra kaj ĉi tiu Edwin,
ne Izraela, kiel kompreneble
Rut kaj verdire parte ankaŭ vi.”

Boaz la brovojn tre sulkigis. “Ezra,
de kie vi elplukis ĉi sekreton
pri mi? Bet-Leĥemanoj, kiuj scias,

en klaĉoj ne avaras pri detaloj
de mia mirinda Rut—vi tute pravis
rilate ŝin per tiu vort’ saluta—;
ĉar ŝi Moabon, la patrujon karan,
forlasis kun la bopatrin’, Naomi,
por kulti fremdan Dion fremdalande.
Jam dekomence ŝia tuta esto
fariĝis por ni ĉiuj, ne nur mi,
parfumo ekzotika, kaj speciala
ben’ destinita de la Eternulo.

“Pri ŝi la komunumo tre fieras,
sen scio aŭ koncerno pri gepatroj.
Min—nu riĉulon—oni estimetas,
sed la deveno...? Ĝuste kion, Ezra,
pri tio vi elfosis, kaj precipe
pri l’ ido? Ankaŭ kiumaniere?”

“Ho Boaz, min pardonu. Mi klarigos,
kiom ĉi aĵoj eblas. Sed unue—
ĉar niaj kruroj jam postulas tion—
ni sidu ĉi-taluse sur herbtapiŝ’,
kiun brodas disstelitaj kampfloretaj,
sub la sezondorlota, dolĉa suno
kaj la aprobo de la Eternulo.

“Pri vi ni ambaŭ, mi kaj tiu ĉi,
ja konas la rakonton, eĉ ĝis preter
la nuno. Ni krome scias, ke de Boaz
la patro estis Salma, kaj lin naskis
Raĥab loĝinta foje en Jeriĥo.”

“Jes, Kanaana, krom putino kulta!
Fremdulo, kial vi turmentas min?”

“Ho ne, vi homo ege Di-amata;
kontraŭe ni volas el vi ŝpati for
ĉi misradikon de la amareco.
Raĥab fro viv’ tenebra kaj fuŝita
sin unu printempmatenon heliante
turnis al Dio, kies tuŝ’ sur koro
refaras pura. Fine li transmutos
ŝian al multhonora nomo, kiu
kun via kaj de Rut juvelos brile
ĝis en l’ epoko kiam la homaro
fariĝos ree sana.”

“Ĝuste kial
vi diras ĉi strangaĵojn—ĉu profete?”

“Nu, io tia.”

“Hm. Nun pri la ido...”

“kiun post sep monatoj Rut brakumos.”

Boaz kapjese iĝis pli pensema.
“Tiel ja estas...kaj mister’ ĉi tie.
Pro tio la servistojn mi marŝigis.
Ĝin scias nur Naomi, Rut kaj mi.
Ĉu vi kapablas legi niajn pensojn
aŭ skribulaĵojn de futur’ kaŝita?”

Ĉe tio mi entuziasmis fuŝe,
saltante en l’ aferon. “Jes, ni frandis
eĉ veran libron kun la nomo Rut,
tre belan parton de la Sankta Skribo!
Via infano estos filo, Obed,
prapatro de tre longa reĝlinio
krom de la mondsavanto. Via nepo

nomiĝos...”

“Eĉ ne unu vorton pli,
ĉar ankaŭ Lucifero kunaŭskultas,
kaj ĵus ridete frotis siajn manojn!”

Neniam Ezra estis tiel aspra.

La dirutaĵon mi dismordis.

Boaz

nin pikis per l’ okuloj. Sed perplekse,
senvortigite, li la kapon klinis
antaŭen, kaj l’ dekstrajn fingropintojn kune
kontraŭ la frunton premis. “Pli precize
informu kiuj vi do estas? De kie
vi alestiĝis?”

Ezra spiris peze.

“Mi scias, ke ĉi tion vi ne emos
akcepti sub la suno ordinara
kiu nekutimaĵojn malhejmigas;
sed, nu, ni estas el futura tempo.”

“Vi tute pravas: homo malfreneza
al tia rakontfuraĝ’ ne apertitas.
Ni iru, Rut!”

La manon li etendis,
por forkonduki tiun karan formon
el mia vido. Sed necerta ŝi Ezran
esplorrigardis.

Kaj tiu: “Nur ĉi tion
aŭskultu plu, kaj eble vi ja kredos.”

Boaz hezitis. “Bone, sed ne longe,
aŭ fantazia vago sur mensvojo
kie, pardonu, mi ne volas spuri.”

“Mi do aludos aliaĵon. Boaz,
ĉu vi memoras la malhelan horon
nur ĉi-matene, kiam ŝin postdorme
vi devis al vi premi, plorsingultan
pro sonĝo pri gekaraj hejmlasitaj?

“Poste kun ŝi enpense vi rigardis
la orienton, kie suno ruĝe
malfermis la palpebrojn. Vi ambaŭ sciis,
ke ies preĝoj en patrujo Moab
je ĝuste tiu hor’, por ŝin retiri,
ne ĉesis suprengrimpi. Ŝin iufoje,
malgraŭ la nova heredaj’, lamigas
senkuraĝiĝo, dum tra vaka tago
obsede flustras postlasitaj voĉoj.
Duone konsolite, ŝi plorpetis:
‘Tenu min, Boaz. Ne min lasu stumbli
eĉ en la sonĝarbaro de vi for,
aŭ dubi la direkton.’ Vi respondis:
‘Tra la tritiko, tiun flavan tagon,
mi vidis vin al mi vaganta. Ankaŭ
mi mem ĉi tie fremdas. Tamen kune
ni estos hejmo unu por l’ alia!’”

“Li scias, kara!” Stela ekscit’ en ŝiaj
okuloj ekscintilis.

Kvazaŭ sonĝa,
li kun vizaĝ’ reheliĝanta mire
eksklamis: “Eĉ ĉi tio! Kaj la ceter’

pri libro, reĝoj, la Venonto?”

“Jes!”

konfirmis Ezra. “Tien ĉi ni vojis
por iel ŝin sed ankaŭ vin konsoli,
krom vidi homojn moŝte gravajn: haven’
el kiu velos multaj reĝaj ŝipoj
de Izrael. Ne fremdulinu, Rut.

“Sed unu aferon. Pri ĉi rivelaĵoj,
vi kompreneble jukos transbabili
ion al genajbaroj. Tio estus
natura. Ankaŭ tre danĝera. Tial
neniun vorton. Nur Naomi sciu.

“Remparu kontraŭ uloj malbonvolaj
kaj la sieĝ’ de eblaj miseventoj
per saĝo kaj silento. Gardostaru
super la gloro kiu iam estos.

“Fine, ni lasas kun vi certan signon
per nia maniero iri for.
Adiaŭ, karaj!”

Kaj ni malaperis.

VI

“Vi estas du, ĉu ne? Al mi permesu
kunsidon dum la plenvizaĝa luno
tragrimpas tiujn branĉojn en la parkon
de David. Sed mi min prezentu: Joab...
por mia kuzo reĝfarinto, iam
la ĉefo de l’ armeo. Por min danki
piedo moŝta nelge min forpuŝis.”

“Ezra, kun gasto fremda.”

Apud mi
lia voĉ’ akceptis la nove alveninton,
kiu mallerte preskaŭ sin faligis
sur la gazonon molan, netonditan.
Mi flaris alkoholon. Lian langon,
iom trenetiĝeman, ĝi lubrikis.

Mi havis antaŭsenton pri problemoj.

“Lasta adreso, eble la plej granda,
krom ĉi partio koste de l’ palaco
far homo grandioza kaj majesta.”
Mia gvidanto evidente volis
alidirekten stiri la parolon.

“Majesta!” Joab sian gorĝon raspis.
“Dum la infanaj ludoj li kaj mi
portadis vestojn ne purpurajn, nur
el feloj. Kiel alie? Ĉar ŝafistoj
ni estis, tiom, ke ni pleje mem
odoris ŝafe.

“Ĉio tre ŝanĝiĝis:
medio, vestoj, manier’ paroli,
krom du aferoj: lia poeteco—
vermo tro formaĉinta lian tempon—
kaj li. Li mem neniam aliiĝis.

“Mi nun memoras, ke pro ĝuste tio
la tre reĝina Miĥal kun malŝato
sin turnis for, ĉar David vulgarule
dancis publike kun aliaj viroj,

sed ĉefe la knabinoj. Ĉu ne ĉiam
kun ili populara?

“Dua ekzemplo:

Bat-ŝeba, iam dolĉe peka pomo,
kiun ŝtelplukis li el la ĝarden’
de la najbaro, ruĝe murdaĉita
far lia ruza menso. La leteron
Uria mem alportis tre fidele
al Rabano, kaj tie mi aranĝis
la buĉon.

“Nu, vi vidis ŝin hodiaŭ
senhontan apud li: reĝin’. La pomo
jam iĝis familia arbo, portis
la novan reĝon, eble dinastion!”

Pro duba lumo mi ne povis legi
mieniojn.

Tamen Ezra iritiĝis.

“Vi multe tro rapidas. Iom bremsu
la forkureman radon de via lango,
ke ni postspuru iujn temojn—ĉiu
aparta, nu almenaŭ kiel mi
komprenas la aferojn!”

“Ha! Ĉu vere?”

“Jes, vere! Do ni ilin disfadenu.
Vi ambaŭ marŝas nun al la ombriĝo,
sed teme de la glor’ en du direktoj.
Pri la vojaĝoj pleje gravas ne
la originejo sed fine nur l’ alveno.
Fripono, kial vi minacas min?”

Laŭtskrape apud mi frotiĝis glav’
el sia ingo, kaj abrupte gril’
silentis.

Tiam Ezra faris ion
okulkonfuze rapidege, kaj jen
ekkuŝis Joab minus la armilo,
senspirigite, momentojn sub la luno.

Sed baldaŭ, vortinunde, la koler’
en li trarompis digon de l’ surprizo.

“Lerta ruz’, kiu trompis la okulojn
de ĉi oldul’. Sed dum l’ antaŭaj jaroj
de mia jun’ soldata tiaĵojn mi
forskermus. Tiutempe estus vi
kiu renversiĝus. Mia glav’ fidela
lekus viajn intestojn for, kaj l’ grundo
avida nun jam trinkus vian sangon.”

“Kiel iam de l’ nobla Abner. Davidon
vi tiam ŝargis per daŭra sangoŝuldo
ankoraŭ ne pagita. Li tro dependis
de vi kaj via frato, militestroj
kapablaj sed perfidaj. Li sin trovis
senhelpa, do forŝovis la aferon
por kvito en futuraj tagoj, sed
ĝin ne forgesis.”

Joab spasme spiris.
“Ĉu vi supozas, ke sub Salomono...?”

Kapjese en la duonlumo Ezra
pli mildis, kompateme. “Estus plej bone,

kun genuiĝ' pardonon peti, baldaŭ.”

Joab plorĝemis. “Rampi kiel vermo!
Sed ĉu ne estas manier' alia?”

Suspiris Ezra. “Bedaŭrinde ne.
Kaj nun ni devas esti for. Jam vokas
nin plia rendevu' .”

“Atendu iom!”

“Maleblas.” Kaj per tiu bruska vorto
mia gvidant' leviĝis. Li ekmontris
vojkurbon el la parko. Tra la silento,
kiu nin ĉiujn ĉirkaŭpugnis, mi
lin pezpede en la nokton sekvis.

VII

“En kiu jar' ni estas, kaj ĝuste kio
al li okazis?”

“Orgojlo lin mortigis.
Li fine, rifuĝanto, en la sanktejon
kuris, kaj tie sendit' de Salomono
kiel obstinan bovon buĉis lin.”

“Malgraŭ valor' antaŭa por la regno?”

“Sed ne forgesu provon surtronigi
Adonijan. Se ĝi sukcesus, tiu
reĝimrenvers' forfalĉus Salomonon.
Joab, perfidulo, restis danĝera.

“Sed kiam ni estas nun kaj kie?”

“Observu

plataĵon de l’ tereno, kotan akvon
en irigacikanaloj kaj la agrojn
riĉajn je ĉiaj fruktoj kaj legomoj.
Brilas la suno sub ĉiel’ sennuba
fajrere sur la zigurato. Ĉi tie
dum sep jardekoj hejmos la popol’
Hebrea.”

Mi miris. “Babilon’! De kie
Abram iam el Ur formigris. Fine
Nebukadnecar retrenis liajn idojn
al inter la Riveroj.”

“Ĝuste, Edwin,
sed intertempe ili fremduliĝis.”

“Malgraŭe, tamen, por generacioj
novaj, kiujn la region’ elkovis,
ĝi refariĝis hejma.”

“Kompreneble
vi pravas. Tial poste malvolemis
la plejmulto, ke oni ilin gvidu
duan fojon al Kanaano—kiam
la sepdek jaroj kiujn Di’ ordonis,
laŭ profetaĵ’ far Jeremia, trasablis
ĉi tie la horloĝon de l’ destino.

“Sed ne pri tio mi parolos nun.
Ni retrorigardu anstataŭe kelkajn
jarcentojn da fuŝita pasinteco
kiun enloĝis reĝoj Izraelaj
kaj Judaj, kiuj du regnojn fiaskigis.

“Post la Juĝistoj ili plue semis
malobeemon al la Dia Leĝo
idolane, eĉ per oferoj homaj,
ĝis la popol’ rikoltis la ekzilojn.

“Malgraŭ manpleno da esceptoj, ankaŭ
la reĝoj friponiĝis, ekde Saul’
ĝis Cidkija de la dinasti’ Davida.”

Mi interrompis: “Tamen kiaj juvelaj
homoj estis Ĥiskija, Joŝija kaj...”

“Jes, jes, sed kontraŭ tio mi listigus
longan spaliron de l’ alia speco
aŭ ulojn kiuj kelktempe dolĉe fruktis
sed poste putris.

“Ĉu vi pri Uzija
legis? Kvindek du jarojn li reĝadis
kun multaj sukcesaĵoj. Dio lin
prosperigis, sed kiel iam Lucifer’
li cedis al la tento fieriĝi.
Malgraŭ ordono de la Eternulo,
li en la templon trudis sin, por bruligi
oferincenson, kion rajtis fari
nur pastroj. Ili kontraŭstare provis
forpuŝi lin, sed vekis nur koleron.
Tiumomente lian frunton frapis
lepro, kiu lin manĝis malrapide.”

“Sed, Ezra, ne forgesu pri Manase
(filo de tiu mirindul’ Ĥiskija)
dum liaj idolanaj jaroj—kvindek
kvin—kies scepro iĝis torturilo.

Li fajre oferdonis proprajn idojn
kaj grandamase buĉis la virtulojn.
Eskapis eĉ ne la profetoj, kiel
Jesaja de la poezi' el oro.
Tiam alhordis la Asirianoj
kaj Manasen en ĉenoj al Nineve
marŝigis. Tie tamen en karceroj
Dio vizitis lin kaj konvertitan
replantis en Jerusalemon. Li provis
laŭeble rebonigi ĉion.”

“Miraklon,
Edwin, kvaz' konvertiĝus Idi Amin,
Pol Pot aŭ eĉ Hitlero. Por la Sinjoro
neni' maleblas. Tamen serpentovoj,
kiujn l' iama koro de Manasse
demetis, malgraŭe elkoviĝis. Morde
l' idaro mortvenenis nian ŝtaton
Judan, al mi karegan.

“Sed al David
ni nun revenu kaj al Salomono.
Kiel vi scias, la unua estis
al Dio multeplaĉa. Tamen ankaŭ
li de tempo al tempo fiuliĝis,
ĉefe en la afero pri Bat-ŝeba.
Sed Salomono multe pli. Li iĝis
la granda malsaĝulo.”

“Kion vi diris?
Mi povas nur supozi, ke ĉi vorton
vian mi misaŭdis.”

Sed li kapneis.
Mi estis perpleksita.

“Ezra, se iam
pri ĉi aferoj mi rakontus skribe,
la legantoj rigardus tiun vorton
kiel preseraron. Laŭ la Biblio
li estis la plej saĝa reĝ’ kaj homo
sur la terglobo, ne ‘granda malsaĝulo’.
Ekzemple la reĝino de la sudo,
el Ŝeba, kun kargo da demandoj krom
donacoj karavanis Jerusalemon,
Nu, ankaŭ cele al rilat’ komerca,
sed ŝian menson tien pleje logis
lia prudent’ profunda kiel maro.
Per tio li ŝin tute venkis.”

“Certe.
Intelligentulo eksterordinara.
Sed poste reĝ’ kaj homo stulta, stulta.
Atestas la faraĵoj. Kaj rigardu
kiel antaŭ duonjarmil’ Moseo
pri li profetis en la Readmono.”

“Ĉu vere?”

“La Sinjoro lin bildigis
ekzakte, anticipe, kun averto.
Li sciis, ke en Kanaano iam
sub jugo de l’ Filiŝtoj Izraelo
avidos propran reĝon por ĝin rompi,
per unupoligo de la triboj,
malgraŭ, ke tiu sistem’ al Di’ malplaĉis.”

“Kial?”

“Ĉar reĝo pakas pezajn ŝarĝojn

sur preskaŭ ĉies dorson, iufoje
murdas pro tim' de eblaj subfosantoj
kaj, sopirante dinastion, plantas
arbeton kiu certe portos krom
bonaĵoj ankaŭ, neeviteble, putrajn
pomojn.

“Juĝistojn la Sinjor’ preferis
por Izrael’ sed reĝojn li permesis.”

“Strange.”

“Por ĉiu, homo aŭ anĝelo,
la ĉeftrezoro estas vol’ libera,
krea kapablo, elekti proprajn farojn
kaj fuŝojn. Sen ĝi oni ankaŭ ne
inventus aparatojn ĉiam novajn
nek verki simfonion aŭ poemon,
kontraste kun ceteraj bestoj. Alie
homoj estus robotoj el karno, kiel
abeloj kiuj faras mielĉelojn
ĉiam identajn ĉiugeneracie.
La Plej Alta nin kreis, por ke ni
en tia mirindaĵ’ simulu lin.
Ni povus do fariĝi, se ne dioj
almenaŭ diaj—aŭ, ho ve, diablaj.”

“Kiel Lucifero?”

“Ĝuste. Sed nun
pri l’ profetaĵo de Moseo temas.
Jam antaŭ ol taĉmentoj Izraelaj
ensvarmis venke Kanaanon, Dio
konis ilian tutan historion,
kun aĉa juk’ ekhavi reĝon, kion

li tute malaprobis. Sed malgraŭe
al ili koncedis tiun rajton, kvankam
kun ordono ke ili lin elektu
el inter si, ne el popolo fremda.
Krom tio li avertis lin pacame
eviti predemon kaj la militismon.
Kaj tial nek ĉevalojn, nek edzinojn
li amasigu—kiel Salomono.”

“Sed kial ne? Lia patro David same
rikoltis riĉon per falĉilo sanga,
dum la armeo lian imperion
prede kunforĝis. Ĝuis ankaŭ li
haremon da virinoj.”

“Sed ne mil!”

Salomono kunjungis sian seksan jukon
kaj aliancojn politikajn. Krom
siaj konkubinoj (trident!), li enlitigis
princinojn post princino. Ĉu lascive?
Eble por unu nokto, iufoje
dum kelkaj tagoj. Tamen ofte temis
cinike nur pri liaj ŝtataranĝoj
kun la paganoj cis kaj trans landlimoj.

“Tiujn virinojn li laŭplaĉe uzis,
malzorga pri sopir’ natura al propraj
edzoj. Por iuj ankaŭ ne naskiĝis
eĉ unu infaneto. Kaj tiutempe
ne multaj idoj povis supervivi.”

Mi interrompis. “Laŭ la Bona Libro
li *amis* multajn fremdulinojn.”

“Ba!

Ĉefe ŝajnigo. La psikologion
de la virinoj li ĝisfunde sondis,
sciante flati, ekspluati. Tie
la Sankta Skribo iom ironias.
Tamen li ŝpinis tiumaniere
araneaĵon en kiu li mem kaptiĝis.”

“Kiel, Ezra?” Mi sentis min sinkanta
en marĉon da konfuzo.

“Reĝidinoj
apenaŭ estas homoj ordinaraj.
Jam ekde l’ infanaĝo ili lernas
la virojn serpentruze manipuli.

“Por ili en la glora lando li
konstruis fisanktejojn, kie ili
dorlotis siajn fremdajn diojn, ne
tre diste de la templo por Javeo.
Dum la unuaj jaroj tio lian
konsciencon raspis. La bestodioj
invadis lian dormon kaj trarampis
liajn songojn. Sed kiam li oldiĝis,
la inoj lin forlogis ekumene
siajn ceremoniojn partopreni
kun la supoz’, ke eble la idoloj—
eĉ la plej groteskaj—sub siaj maskoj
vizaĝon kaŝas de l’ transpensa Unu.

“Feliĉe certan tagon timŝok’ rivelis
al li, ke la piedoj lin alportas
ĝis rando peciĝema de l’ abismo.
Li preskaŭ transkapiĝis por la fina
ekplonĝo en senfundan nokton. Tamen
lin savis returniĝo lastmomente.

De tie li forstumblis kaj rekuris
el ĉi vanaĵoj al la Eternulo.”

“Tio okazis—kiu maniere?”

“Kun belulin’ ĉe templo de Moleĥo
kie la ĝojmuzik’ dronigis gonge
la ŝrikojn—lia bebo ekbrulanta—
dum ŝi seksarde apud li sin premis
kontraŭ lian kokson kaj ĉiam plie
emis kaj emis. Ŝin spronis religio
de sekso, sango kaj alies brulo.
En tiu moment’ li ŝian varman manon
kaj ŝin de si forskuis kaj abrupte
ekmarŝis for.

“Sed propra konvertiĝo
kun pledoj al popolo forlogita
malsufiĉis por repuŝi la dolĉan
tajdon de korupto. Tutaj amasoj
da homoj kiuj ĝin frandis englutigis
dum lia regno kaj tempe de la reĝoj
sekvantaj—ĝis cunome la eventoj
ilin al tiu ĉi lok’ de rekomenco
reportis for. Ho kiel stulta, stulta!”

VIII

“Ezra, mi lacas kaj volas remaĉeti
la furaĝon de ĉi pasintaj horoj.”

“Sed kie vi deziras la ripozon:
sub palmo, tie sur la zigurato
aŭ sub tegment’ de domo nun malplena?”

“Varmas ekstere. Tamen mem elektu.”

Aperis ĉirkaŭ ni objektoj, muroj,
kiajn mi foje vidis en muzeo
arkeologia. Tre agrable friskis,
kaj dolĉe min eklogis lit’ antikva.

Malestis songoj, kio min dankigis.
Ĉu estis nur momento? Min ektuŝis
de Ezra mano milda sur la ŝultro.
Fenestroaperture lun’ oblikvis
kies vizaĝ’ antikva tie glimis.
Tra miaj jaroj, ekde ĉi jarcento,
neniam ĝi ŝanĝiĝis, nur ni homoj
kiel herbo verda sed sekiĝema
pasas kaj pasas.

“Unue ion manĝu.

Kaj poste ni eliros sur tegmenton,
kie juvelas la stelaro, por
pritrakti nian pecon de l’ eterno.”

Sed pri reĝoj li iĝis vortavara,
nur diris, ke l’ iama Izraelo—
nordlanda ŝtat’ dektriba forŝirita
post Salomon’—eĉ pli fetore stinkis
en la naztruoj de la Eternulo,
ol sude la lander’ Judujo, pro
senĉesa kun fidioj sinkretismo.

Tie Jerobeam provokis Dion
per du ekzempleroj de la orbovido
kiu ĉe la mont’ Sinajo ekmuĝe
marŝis el la imago de Aaron—
duon-Egipta. Ree voĉ’ defia

kriis: “Jen, Izrael’, la Elohim
kiu al tiu ĉi liber’ kondukis
el sklavolando!” Tiujn senvarie
kultadis ankaŭ ĉiuj regantoj poste
en la Nordo, por ke iliaj homoj
ne al Jerusalemo kun ĝiaj altar’
kaj reĝoj vagu for. Kaj pluse baldaŭ
iliaj koroj delogiĝis al
Baalo krom aliaj merdodioj.

La Dian revon ili fatrasigis
krei popolon sanktan, specialan
sur la krucvojo de l’ antikva mondo,
lumturo por la naciaro ĉirkaŭe.
Kaj ploris, kiel ofte, la Anĝelo.
Do sepcent jarojn antaŭ l’ enkarniĝo,
per la viŝtuko de l’ Asirianoj
li neniigis ilin el la lando.

“La dek perditaj triboj,” mi komentis,
“pri kies retrov’ iama revis multaj.”

“Ne tiuj uloj!” Ezra plej emfazis.
“Kiel sur Tigrisa akvo bobeloj
ili krevis kaj jam ne estas plu.
Sed preter tio aliaĵo veras:
neniu tribo plene malaperis.”

Denove kun ĉi stranga hom’ min frapis
konfuz’. “Mi ne komprenas.”

Ezra ridis.

“Nu, estas simple. Paŝtu vian menson
sur la skribitajn verojn de la Vorto—
ne kiel multaj kiuj nutras sin

per mitoj. Ĉu vi ne legis pri Elija,
profeto supozinta, ke nur li
ankoraŭ al la Sinjoro plene plaĉas?
Sed Dio diris, ke en Izrael’
malgraŭe lumis sep mil fideluloj
kiuj ne genuiĝis antaŭ Baal.
Cetere ankaŭ ne al Orbovido
aŭ diaĉ’ alia. De jar’ al jaro
tiaj formigris suden. La Biblio
mencias eĉ iliajn tribonomojn.
Kaj tie kun la samfidanoj ili
laŭgrade, kunfande, unupoliĝis.
Memoru ankaŭ Anna, profetino,
kiu temple la beban Kriston benis.”

“Kio pri ŝi?”

“La Nova Testamento
rakontas, ke ŝi apartenis al
la tribo de Aŝer, unu el la nordaj,
do ne perdita—eĉ se tiu vico
da reĝoj en Izraelo kaj Judujo
antaŭ ĉi multaj aĝoj estingiĝis
por pleje plonĝi en tenebron for.”

Ekestis paŭzo en la Babilona
nokto, maldaŭre. Tiam, el ĝardeno
sube, leviĝis voĉ’ de najtingalo
dum super ni trembrilis steleterno.
Per gesto kaj vizaĝ’ turnita tien,
Ezra direktis min al tem’ alia.

“Dum tiuj jaroj da mallum’ nacia,
sanktaj profetoj, la parolportantoj
de Dio, verkis vortojn kiuj ĉendis

torĉojn vojmontrajn en la estontecon.
Iliaj antaŭdiroj laŭliteraj
aŭ per simboloj riveligiĝis esti
homhistori' skribita futurtense.”

“Ezra, pri tiaj asertoj mi skeptikas.”

“Ĉu? Kaj ĝuste kial?”

“Ĉar la futuro
ankor' ne estas, tial ĝin diveni
korekte post, ni diru, eĉ jarcento,
kiu formikas je grandaj homamasoj
kaj eventoj—defias la imagon,
nek sondeblas en ajna maniero.”

“Sed temas pri la menso de l' Sinjoro
en kiun la profetoj nin invitas.
Por li, la estontaĵoj jam ekzistas
en ia transtempeco.”

“Tamen, nu...”

Li surpieden saltis. “Evidente
mi devos al vi *montri*. Ni fulmu for.

IX

En halo ni troviĝis, frumatene,
inter timemaj oscedantoj. Abundis
vestoj Babilonaj, kvankam ne mankis
aliaj.

Junulo apud mi demandis
de la najbar': “Ĉu ankaŭ vialiten

soldat' ekvenis por forpluki vin
el via dormo?"

Mute li kapjesis.
Tamen la sulketoj sur lia frunto
sugestis maltrankvilon, kaj l' okuloj
teruron.

Entranĉis tiam voĉ' alia
de viro kun akĉento kaj vizaĝo
ne kutimaj. "La tron' ankoraŭ vakas,
sed laŭ l' oficiro kiu min alportis
Nebukadnecar mem venigis nin.
Li ŝajne dum la nokto spertis ion
pli malagrablan ol koŝmaron. Baldaŭ
ni tamen vidos lin por mem konstati."

Kaj jen li estis. Viro nigrabarba,
atleta, ĉagrenita kaj sardona.
Liaj okuloj la kunvenigitajn
transkuris kaj, neniel amikemaj,
ektuŝis en vizaĝon post vizaĝo.

"Laŭdire vi do estas la saĝuloj
de l' imperio. Sorĉe per magi'
vi povas ĉion sondi, eĉ la astrojn
kaj la regnon de l' mortintoj. Ĥaldeoj
aŭ ne. Mi lukse subtenadas vin
dum vi ne perlaboras kalamane
sed rite esoteras. Nu, hodiaŭ
vi povos pruvi, ke vi mian panon
merite manĝas kaj ne kiel blatoj
kiujn oni naŭze sub bot' frakasas!"

Ĉe tio la eskorto apud li

sur la estrado ridetaĉis, kvaz'
ili sciis ion. La etos' glaciis,
prologe al danĝero.

Nebukadnecar

leone graŭlis: “Mi pasigis nokton
kies dormo de mi fuĝis kun songo
grava. Mi ĝin forgesis. Vi pro tio
nun estas tie ĉi. Remetu ĝin
en mian menson. Tiam, vi povos ankaŭ
klarigi ĝin.”

Konsterno tra la halo,
kaj multaj flustroj.

“Pli laŭte, ke mi aŭdu!

Eble unu vin reprezentu. Asjas,
vi estas, malgraŭ via stranga nomo,
Ĥaldeo eminenta. Vi parolu.”

“Ho reĝa Moŝto, kion vi demandas,
tio, nu, malfacilas.”

“Por ankaŭ vi?”

“Moŝto...”

“Malpli da *moŝto*! Ĉu aŭ ne
vi povas ĝin rakonti, mian songon?
Se jes, mi tuj rekonus ĝin, kaj granda
estus la rekompenco, sed se ne...
saĝuloj parazitaj, vin dishakus
mia gvardio. Kaj viaj luksaj domoj
fariĝos necesejoj!”

Asjas silentis.
La reĝ' sin tiam turnis al la resto.
“Ĉu aliulo?” Lia montrofringro
pikis niadirekte, ĝis al la hom'
ekzota kiun mi antaŭe aŭdis.
“Via nomo?”

“Babu!”

“Ne Babilona.
De kie vi al ĉi korteg' bloviĝis?”

“El Hindujo.”

“Hm...! Ĉu vi kapablas
per ia scio eksterordinara
por mi elfosi l' enterigitan sonĝon?”

Konscia pri tiom da okuloj sur li,
esperoplene petegantaj, Babu
balbutis. “Reĝa Moŝto, nialande
ni ankaŭ ne...kaj eble scias nur
la dioj senmortaj.”

“Plia ĉarlatano!
Ĉu iu ajn alia?”

Oldul' respondis.
“Forfalĉi nin ne spurus vian sonĝon,
kiu ŝajne denove en la nokton
malaperis, por ĉiam senrevene.”

“Nu, gvardianoj, ĝis la sunleviĝo
konservu ilin tie ĉi kaj tiam
buĉu! Sed intertempe ankaŭ serĉu

tra Babilon' 'saĝulojn'. De ili eskapu
eĉ ne unu.”

Li sakris kaj forbruis
kolerofrustre, sed lasis la soldatojn.
Atakis ĉiujn malesper', kaj laŭtis
la lamentado.

“Ezra, min forportu!”

“Ne timu. La plej bela parto de ĉi
rakont' ankoraŭ venos. Nur atendu.”

Du horojn poste frapoj sur la pordo.
Aldonaj homoj enpuŝiĝis. Eksonis
raŭka rido: “Jen kvar 'saĝuloj' pli.
Ĉi-foje Judoj.”

“Ahá! Estas Daniel
kun liaj tri amikoj: Ŝadrah, Meŝah
kaj Abed-Nego. Fine proksimiĝas
la malnodiĝ' de dramo mirindega.”

Daniel, junul', estis hom' decida.
Asjas detalis al li pri la sonĝo
kaj mortdekreto. Tiam, post konsulto
kaj mallaŭta preĝo kun la amikoj,
senplue Daniel marŝis al Arjoĥo,
estro de l' mortigontoj. Li proponis
aŭdiencon kun Nebukadnecar, por peti,
ke ĉiuj vivu kelkajn horojn plu
dum kiuj li kun la amikoj serĉos
de Dio helpon. Tion la reĝ' aprobis.

La pordo iom knaris kiam iu

malfermis ĝin kaj flustris la ordonon.
Ĉiuj okuloj sekvis Ŝadraĥon, Meŝaĥon
kaj Abed-Negon. Dum momentoj voĉ’
aŭdiĝis. Daniel. Sed baldaŭ la pordo
refermita nin ŝtopis en silenton.

Tede horo post horo fortreniĝis
kiel miatempe en flughaveno
pro ŝtormo pasaĝeroj atendadas.
Min glutis dormem’ ĝis Ezra min skuvekis.
Fenestron jam ruĝigis la mateno.

Tiam, subite, jen la kvar amikojn
oni enpuŝis. Baldaŭ poste ankaŭ
la reĝ’ alestis. Kvankam li scivolis,
li ankoraŭ mave mienis, daŭre
skeptika. “Nu, mi pretas aŭdi vin!”

Daniel diris: “Ne povas ĉi saĝuloj
klarige sondi vian sonĝmisteron.”

La reĝo interrompis ironie.
“Sed vi?”

“Mi same estas nura homo
kaj tial ne kapablas pli ol ili.”

“Do viaj preĝoj al la di’ Hebrea
simile vanis. Restas mortdekreto.
Gvardio...!”

Daniel eklevis fingron.
“Ne tion mi asertis. Dum ĉi nokto,
la Eternulo per vizi’ al mi
redonis ĉion de via reĝa Moŝto

perdita. Krome ankaŭ la signifon
li igis klara.”

Saltis Nebukadnecar
de sia trono. “Nun mi havas mil
orelojn avidajn aŭskultadi vin!”

Ekscite zumis la tuta hal’ kaj tiam
silentis.

“Sur via lit’ kuŝante, vi
pripensis viajn gloron kaj potencon
super multaj landoj, ekde Eŭfrato
ĝis okcidente ĉe la Granda Maro.
Sed ĉio pasas. Tial vi scivolis
pri l’ venontaĵoj. Kio sekvos vin?
Kaj Dio, Rivelanto de sekretoj,
ĝin al vi montris—ankaŭ, ke vi sciuj
la pensojn en via kor’ kaŝitajn. Tiam
la nigraj ondoj de la dormomar’
leviĝis kaj forportis vin. Sed baldaŭ
el la nebuloj antaŭ vi gigantis
la formo de vir’ multbrila kaj terura.
Ĝia kapo estis el fajna oro,
la brust’ kaj brakoj el arĝento, la ventro
kaj femuroj el bronzo, kaj la kruroj
sube el fero. La piedoj kaj ties
fingroj konsistis el miksaĵ’ de fero
kaj potargilo. Dum vi rigardadis,
subite ŝton’ el monto deŝiriĝis
kaj frapis la piedojn de l’ statuo,
frakasante. Kaj poste ĝi muelis
ĉion: la piedojn, krurojn, femurojn
kaj ventron, brakojn kaj bruston, kapon. Vento
leviĝis kaj l’ pulvoron blovis for.

En via sonĝo restis nur la ŝtono.
Ĝi kreskis kaj fariĝis granda monto,
pleniganta la tutan teron. Tion
vi vidis.”

“Jes!” ĝojkriis Nebukadnecar,
“precize tion.”

En la halo voĉoj,
aplaŭdoj, spasmaj ploroj. La saĝuloj
ekesperis, ke la glavpint’ ne plu
iliajn gorgoĵojn celos.

Daniel
daŭrigis. “Nun bonvolu la signifon
aŭdi, ĉar ĝuste tion, reĝa Moŝto,
Dio al vi kaj al la mond’ mesaĝas.”

Nenio sonis dum Nebukadnecar
kaj ĉiu orel’ englutis liajn vortojn.

“La Eternulo, kiu la mondon kreis,
posedas ĝin kaj suverene estas
ankaŭ la Dio de la historio.
La venkojn kaj eventojn sur la tero
li scias aranĝi, kaj laŭ sia saĝ’
al kiu ajn li volas disdonadas
ĉiujn ĉi tie landojn kaj popolojn.
Per Mezopotami’ plus multo pli
da belo kaj abundo, fro la montoj
kie la sun’ emergas ĝis la maro
de l’ okcidento en kiun ĝi ĉiunokte
plonĝas, antaŭ nelonge li ekdotis
vin. Vi estas tiu kap’ el oro!”

Kelkajn momentojn paŭzis Daniel,
dum kiu la reĝa krop' pufiĝis pave;
sed baldaŭ siajn brovojn li kuntiris
kiam daŭrigis la junulo: "Post vi
leviĝos dua regno malpli brila,
la brusto kaj la brakoj el arĝento."

Ĉe tiuj vortoj, triste kaj mallaŭte,
la reĝ' murmuris, kvankam ne pri si
sed la forpas' de l' glora Babilono.

Pli longe ĉesis Daniel paroli,
kaj Ezra basavoĉe min demandis:
"Ĉu vi memoras legi, ke finfine
Nebukadnecar por si mem kreigis
statuon, de l' kapo ĝis la piedfingroj
el fajna oro? Por ĉi tiun songon
kaj Dion kontraŭdiri."

"Jes, kaj provis
bruligi la de Daniel amikojn.
Rifuzis Ŝadrah, Meŝah kaj Abed-Nego
adorkliniĝi antaŭ l' oridolo,
sed en la forno ekaperis kvara
kun ili Person' ĉiela, la Savanto.
Nur tiam Nebukadnecar ĝis la kerno
de sia kor' sin al la song' submetis.

"La dua regno, tuj post Babilono,
estis la Medo-Persa imperio",
klarigis Ezra. Tiam, surlipigante
fingron, li gestis al Daniel diranta:

"Post l' arĝento brilis metal' eĉ malpli
valora: kupraj ventro kaj femuroj.

La tria regno. Sekvos ĝin la kvara,
kiun la fero reprezentas. Tiu
regno ĉion, kio kontraŭos ĝin,
disbatos kaj frakasos.”

“La Grekoj. Tiam,
bestiaj kaj rabemaj, la Romanoj”,
Ezra deklaris per mallaŭta voĉo.
“Sed kio laŭ la songo venos poste?”

Kvazaŭ por respondi, la juna profet’
klarigis al la reĝo, ke ne sekvos
sur ĉi planedo postromia regno
unueca, sed deko da nacioj.
Rompebla potargil’ kaj fero ne
miksiĝas.

Ilia en la songostatuo
kunmetaĵ’ aŭguras, ke malgraŭ multaj
intergeedziĝoj kaj ĉiaj manovroj
de l’ politik’, Eŭropo okcidenta
neniam kunfandiĝos. Kaj pro tio
ankaŭ ĉiu klopodo federacii
la homaron fiaskos.

Tion mi sciis
el mia epoko pro rivela libro
de Uriah Smith, Adventista frato,
kies tombŝtonon ĉe Battle Creek mi vidis
dum bluĉiela somertago. Sur ĝi
la mortodato montris, ke lia lasta
spiro mian unuan anticipis.
Sed tre simile verkis Hipolito
pli ol dek sep jarcentojn antaŭ li.
Kaj nun, privilegia hom’, mi aŭdis

de Daniel mem la praklarigon!

Li

parolis laste pri l' mirinda ŝtono,
kiu sen homĵetinto en la sonĝo
el alta monto ekloziĝis kaj rekte
sur la piedojn kun ties fingroj frapis,
Poste ili kaj la tuta statuo
al fajna pulvoro reduktiĝis. Vento
ĝin tiam el la kosmo kaj ĉies mens'
disblovis for. Kaj l' ŝtono iĝis monto
pleniganta la teron.

Daniel

konkludis: “En la temp' de tiuj reĝoj
Dio de la ĉielo mem starigos
regon, kiu neniam detruigōs;
kaj ĝia reĝado ne transiros al
popol' alia. Tiel la Plejaltulo
al la reĝo montris la estontaĵojn.”

Silentis tiu tuta hal' da homoj,
kun ĉiuj okuloj sur Nebukadnecar.
Tiam en mian menson glitis bildoj
el la ankoraŭ neskribitaj paĝoj
de la Kristana Nova Testamento:

Jesuo dum la nokto antaŭ sia
krucmorto, promesanta la Revenon,
kaj du Apokalipsaj finĉapitroj
pri l' nova Jerusalemo sur tero nova,
kiuj glorldume punkton metas post
la Bibliakonto pri la homo.

Ĉe tio

la reĝ' de Babilono ĵetis sin
vizaĝaltere antaŭ Danielon,
kvazaŭ li estus dia, kaj laŭdegis
la Eternulon. Saviĝis la saĝuloj,
sed ilin li submetis al la juna
profeto, kiun li krome super sian
landon eklevis. Tamen Daniel
petis, ke tion administru amikoj
Ŝadraĥ, Meŝaĥ kaj Abed-Nego. Li mem
en la kortego kun la reĝo restis.

X

“Mia urbo! Mia urbo!” ĝojkriis,
preskaŭ kantis, Ezra, post nia ĵusa
alitempeniĝo kaj forsalto tien.
Antaŭ ni la rekonstruita templo
kuŝis sub varma posttagmeza suno.
En unu ĝia korto ni troviĝis,
ejo por la nejudoj, kiel mi.

Por malkonfuzi min li anticipis
miajn demandojn. Preskaŭ sescent jarojn
ni plonĝis en la estontecon. “Novnoma,
rehomigite, Judeo nun reiĝis
en la mistera sino de la tempo.

“Dume cunamis dua imperio,
de l' Medoj kaj la Persoj, tra ĉi landoj;
sed ĝin abrupte digis, altajdante,
la Grekoj, kiujn oponis Makabeoj.
Poste alfluis, por morte frapi nin,
la Romianoj, kiuj nian ŝtaton
provis definitive viŝi for.

“Sed ankaŭ tiam, kiel ĉiuepoke,
brilegis lampo de la profetaĵoj,
ĉiam pli lume. Baldaŭ ekde nun
la virgulino naskos la deziron
de la nacioj, la Reĝon de la aĝoj.

“Jarcenton antaŭ ol Nebukadnecar
sonĝis kion Daniel enlibrigis,
Miĥa trumpetis: ‘Bet-Leĥém Efrata,
malgranda en Judujo, devos de vi
al Mi eliĝi por Izrael reganto,
kies deveno estos fro la praa
tempo, la jaroj de la eterneco.’

“Tiam, proksimume, prediris ankaŭ
Jesaja: ‘Al ni, infan’ naskiĝis, filo
estas donita. Sur lia ŝultro la
regado estos. Mirinda li nomiĝos
kaj Konsilisto, Potenculo, Patro
de Eterneco, Princ’ de Paco. Li
la regadon pligrandigos, por pac’ senfina
sur la trono de David, ekde nun
kaj por ĉiam.’

“En alia ĉapitro ankaŭ
la jenaĵo: ‘Sur lin la Eternulo
ĵetis la kulpon de ni ĉiuj. Kiel
ŝafidon al buĉo oni lin kondukis
kaj, kiel ŝafo muta antaŭ siaj
tondantoj, sian buŝon li ne malfermis.
De sur la tero de vivantoj oni
fortranĉis lin kaj pro la kulp’ de mia
popolo li frapiĝis. Post lia morto
tombon inter malbonaguloj kaj
la riĉaj oni al li donis. Tiel

la Eternulo lasis lin turmenti.
Kiam lia animo sur sin estos
preninta elaĉetan punon, idaron
li vidos kaj li longe vivos. Per lia
mano sukcesos la intenco de
la Eternulo, kaj la laborfrukton
de sia animo li satiĝe vidos.
Dio al li kiel lian akiraĵon
multajn donos, pro tio, ke li mem
animon sian al la mort' elmetis
kaj estis kalkulita al krimuloj.
Dume sur si de multaj li la pekon
portis, petante por krimuloj.”

Post tio

kelkajn momentojn la kunulo paŭzis
kaj tiam per rompita voĉ' reprenis
la parolon, sed ploreme.

“Teruris

la elaĉeta prez' por ni pagita,
eĉ antaŭ la pendado sub la suno
sur manoj kaj piedoj trapikitaj
per najloj al la kruco, post dufojaj
skurĝoj. Krom tiuj vipoj de fremduloj,
lin daŭre batis la mokemaj langoj
de homvipuroj, estroj de la propra
popolo. Kaj ĉi ĉion li elportis
por mi, por vi!”

Larmene Ezra paŭzis,
kaj profunde en mi ekploris io.

“Ni pensu iom pri lia suferado,
kiel foje David. En unu psalmo,

preskaŭ mil jarojn antaŭ ĉi ofero,
per sekaj lipoj de la Posteulo
li kriis: ‘Ho mia Dio, mia Dio,
kial Vi min forlasis, kial Vi estas
malproksima de mia savo, de miaj
plendaj paroloj? Sed Vi ne respondas,
Vi kiu loĝas inter la glorado
de Izrael. Hundoj min ĉirkaŭas,
kaj faŭkaj buŝoj fie bojas: ‘Li
apogis sin al la Eternulo; tiu
lin helpu, savu, se Li amus lin!’
Kaj ‘miajn manojn kaj piedojn ili
trapikis. Ili dividas miajn vestojn
inter si, pri mia tuniko lotas...’”

Memorante, ke ĉio ĉi diritis
pre ol kaj dum la horoj sur la kruco,
mi konsterniĝis. “Ĉu tiom jam da jaroj
antaŭ Kristo profetis pergamenoj
Hebrelitere pri l’ Nazaretano,
kaj ke li krome estos reĝ’ eterna?”

“Jes, Edwin. Homo dia, sur la tron’
de tiu regno pri kiu iam songiis
Nebukadnecar.”

“Nu, tiaĵojn mi
jam aŭdis, Tamen tiuj ĉi demandoj
ronĝas min: Ĉu la ĉiela Patro
vere devis sian amatan filon
tiom torturi—kaj, cetere, kia
estul’ li efektive estas? Ĉu
kapablas iu ajn por aliulo
morti substitue? Kaj ĉu ne eblis
nin iel alimaniere tiri

el nia tera puto de mizero?”

“La fil’ de Dio venis volontule kaj sin por ni fordonis. Tiu tenebro kiu la krucon ĉirkaŭnoktis, restante tri horojn da torturo, en si kaŝis ankaŭ la Patron suferantan. Ĉion li sentis sed ne povis sin riveli; ĉar la Savanto devis sola trinki el galpokalo de la mort’ eterna por ĉiu homo, kiu estus alie perdit’ ĉiama. Kvankam li ja *kredis* pri sia releviĝo, li ne povis dum tiu temp’ dolora *senti* ĝin.”

Ĉe tio mi anhelis. Li daŭrigis:

“Ĉiu persono devas morti por si mem. Tial neniu substituo povas okazi, krom de la Kreinto; ‘ĉar en li,’ kiel Paŭlo Akropole al la Atenanoj diris, ‘ni vivas kaj moviĝas kaj ekzistas.’ Jesu’ nin kreis antaŭ sia enkarniĝo. Laŭ la Evangelio de Johano, ĉio estiĝis per li, la Vort’ eterna. ‘En li estis vivo, lumo de l’ homoj.’ Kaj kiam li homkorpe mortis, mortis ni ĉiuj, sed per lia releviĝo pro lia pradiĉ’ nemortipova, ni povas same senmortiĝi. Jesuo krome estas duoble fil’ de Dio.”

Stranga diraĵo. “Kial?” mi demandis.

“En senc’ ĉiela sed ankaŭ kiel homo.
Ĉu vi atentis la genealogion
de la Mesio?”

“Kiun? Estas du.”

“La veran, biologian, tiu laŭ Luko.
Ĝi diras, ke Jesuo estas la fil’
de Set, la fil’ de Adam...la fil’ de Dio.
Post kiam la eterna Vort’ karniĝis,
la spaliron de l’ homoj ne komencis
plu pekinta prapatro Adam, sed
la Savanto mem sen manko aŭ makulo.”

Minuton mi silentis; liaj vortoj
por mi forblovis preskaŭ ĉiujn nubojn
ĉirkaŭ la temo.

Ankoraŭ restis unu
demando. Kvazaŭ li povus legi miajn
pensojn, li aldonis: “Ĉu tamen Dio
por savi la homaron ne povis sekvi
alian vojon ne tiel dornoplenan?
Bedaŭrinde ne, pro Lucifero.”
Mi perpleksiĝis, sed li pluklarigis.

“La pekproblemo estas, kiel moner’,
dufaca, kvankam nedisigeble unu,
aŭ kiel malsano kiu, krom infekta,
havas kaj simptomojn kaj kaŭzon pli
profundan. La misaĵoj unuopaj
pardonon bezonas, sed produktas ilin
fuŝita mem’ reganta en la koro.
Por kuraci tion necesas drasta
transpren’ far la Spirito Dia. Ankaŭ

agnosko pri miseco, submetiĝo
kaj kunlaboro flanke de l' pekinto.

“Sed tion ĉi maldegnis Lucifero,
jam tro orgojla, kaj li anstataŭe
postulis por si mem kaj ĉiuj kun si
pardonon senkondiĉan. La Sinjor’
rifuzis, dekretante pri forigo
de l’ infektaĵo el la universo
per kaŭterizo. Kiuj ne ŝanĝiĝos
tiujn li kun bedaŭro eliminis.

“Ĉe tio la fiulo, kapablanta
ĉion subtile tordi, insistis, ke
la Dia Leĝ’ pardonon ne permesas,
nur punon, sen escept’ aŭ kompromiso.

+

“Je la surprizo de la universo—
de Lucifer’ ŝokita ne malpleje—
la Eternul’ akceptis ĉi logikon.
Tamen la Filo kara por la homoj
sin substituis. Tial la Sinjoro
la vean vojon al la kruc’ laŭiris,
lasante sangan spuron tra niaj koroj
kaj la jarcentoj.

“Sed nur por homoj. Ili
ankoraŭ povas cedi, al la am’
de Dio submetiĝi. Kvankam ne
por la demonoj, kies kor’ el ŝtono
jam perdis ĉiun emon remoliĝi.

“Anĝeloj estas mirinduloj, ankaŭ
la falintaj, sed penti tiuj ĉi

ne plu kapablas. Por ili pli facilus
marŝi tra muro.

“Atendas ilin damno
kaj per mondfina fajro punforviŝo.
Pro tio homojn ili malamegas.
Laŭ ili nia speci’ mizere basas
kaj estas subtretindaj kvazaŭ vermoj.
Sed alte valoras nia trezorego,
potencialo kiun ili perdis,
de viv’ eterna.

“Lucifer’ enviis
eĉ unu el la kunkrucumitoj flanke
de la Savanto. Per dolortorditaj
lipoj li lastmomente petis: ‘Sinjoro,
kiam vi al via regno venos
memoru min!’ Jesuo en angor’
kun ĝojo tuj akceptis ĉi unuan
frukton per siaj suferoj akiritan
kaj respondis: ‘Mi vere al vi diras
hodiaŭ: vi kun mi en la paradizo
estos.’”

Kelkajn minutojn ni silentis
antaŭ la templo dum la sun’ sobiris.

Tamen restis enigmo.

“Ezra, Dio
estas multe pli granda ol la kosmo,
dum ni et-etas sur ĉi randa mondo.
Kial malgraŭe la Fil’ oferus sin,
kaj dejnus sin per korp’ eterne ĉeni
al la fuŝema homoraso kaj

ĉi spacotempo materia?”

“Pro
amego preter pensatingo, malpli
sondebla ol la universo mem.

“Por Dio pli valoras unu homo
ol tuta galaksio. Ĝi forbrulas,
sed vivo por savito ĉiam daŭros
dum la senfina ĝojo de l’ Sinjoro.”

Libro 4

I

“Saluton, Jesaja!” Post la temptrasalto
Ezra plezure alridetis lin,
kiu reciproke manon levis. “Nun
mi povas malŝarĝiĝi je ĉi tasko
interesa sed iufoje peza.”
Li turnis sin al mi. “Kun li pluiru.
De la profet-poetoj kiujn mi
renkontis, li min pleje plaĉas. Li
orvoĉe pri la Reĝo suferonta
kantis. Same kiel mi li ekvivis
denove kun la Krucumito. Tiu
dum glormaten’ el tombo kaj suferoj
en la eternon ĝoje marŝis, ĉar
ne plu la kompatinda ras’ homida
bezonas morti. Tiel multaj, kiujn
la faŭk’ terura glutis, reestiĝos.”

Jesaja kun ridet’ kapjesis. “Dankon,
Ezra. Kaj kompreneble ĉi fidfraton
el la futur’ mi kun plezuro gvidos.”

Ni staris sur la Monto Olivarba.
Etendiĝis sub ni Jerusalema.
La paca frumatena sun’ karesis
la blankmarmorajn murojn de la templo,
kiun Herodo la fiul’ konstruis.
Kun ĝuo kaj admir’ mi rigardadis.

Kaj tiam Ezra diris: “Adiaŭ do.
Se vi fidelos, tio pli ĝuste estos
‘ĝis revido’—eble sur brila strato

de nia rekreota tero, kie
saniĝos ĉiesmense eĉ la plej
profundaj de la vivo vundoj, en
patrujo nova kaj ĉiama. Tie
krome pri la perditoj al ni karaj
la lastajn larmojn li forviŝos.”

Tiam,
fulmosubite, li estis de ni for.

Paŭzinte, la kunulo nova min
penseme rigardadis kaj rimarkis
pri l’ foririnto: “Brava, brila homo.
Tiom pri l’ prao kaj la pasinteco
de nia popolo li serĉante fosis
el ŝimaj manuskriptoj kaj oldulaj
cerboj post kiam la Babela reĝo
detruis nian sanktan templo-urbon,
por ke pluviu nia heredaĵo
kaj ne rubiĝu kun Jerusalema.
Parton de la Tanaĥo li kunigis
en granda zorgo aŭ komponis mem.
Per ĉi rakontitaĵoj li prilumis
multegon por la mensoj kiuj poste
vojaĝos tra la mondo, kiel vi.

“Jes, Jesaja, sed ankaŭ via libro,
lumturo de la sav’, tre multajn gvidis
tra rifoj en ĉi vivomar’ danĝera.”

“Mi dankas. Tamen multe pli da laŭdo
meritas Tiu en kies lasta jaro
sur la planedo vi troviĝas nun.”

II

Min pikis akra desaponto. “Sed
mi ege ŝatus spekti lian tutan
mirindan karieron!”

“Bedaŭrinde
nur kelkaĵojn la nuna cel’ postulas.
Ne mi decidis. La vojplan’ formiĝis
ne cele nuran tempturisman, sed
por levi vin el puto de l’ banalo
al la koniĝo pri destino alta.
Se vi fidelos, la okazoj venos
renkonti lin persone. Tra l’ eterno
ankaŭ, per iloj de la estonteco,
ni re kaj re rigardos lian vivon.
Sed tie ĉi vi devos vidi lin
ĝemantan pendi inter la ĉielo
kaj tero kiu lin rifuzis, amare,
por pli konstati kiel lia sango
povos forviŝi la demandosignojn
kiujn metis demon’ malantaŭ ĉiun
de la Sinjoro faron kaj promeson.

“Tial vi devos kun mi trarigardi
ses horojn por la homaro decidigajn
ekster la muroj de Jerusalemo.”

“Ne! Ne!” mi raŭkis konsternita.

Sed vane.

Alfrontis min subite rokkranio
rikana, kiun mi kun ŝok’ rekonis.
Antaŭe, dum ankoraŭ dista jaro,
1985, mi staris tie

inter la bruoj de la busstaci'
Araba.

Sed ĝi estis nun malplena,
aŭ preskaŭ. Kvar soldatoj kun Romiaj
kaskoj atendis por la kruda faro,
pro ordon' antaŭen almarŝinte.
Apud ili kuŝis martel' kaj grandaj
najloj.

Jesaja, dum mi rigardadis
kun horor' anticipa, por ni trovis
randloke rigardejon, kiel ankaŭ
rokon sideblan. "Vi eble elĉerpiĝos",
li en mallaŭta, preskaŭ flustra voĉ'
klarigis, geste.

Baldaŭ proksimiĝis
bruema homamaso kun miksaĵ'
de inaj ploroj kaj ekridoj laŭtaj.
Viraj voĉoj mokis la mortigoton.
Mi lin rekonis pro la dornokrono
kaj stumbligita marŝmanier' rompita.
Apud li siajn krucojn portis du
sakrantaj mizeruloj. Ilin soldatoj
antaŭen vipis, sed por li la krucon
jam surŝultrigis al la Kirenano.
Jesuo, pro la skurĝoj krom mistraktoj
aliaj, plurajn fojojn sub ĝi falis.
De Simon kelkaj vortoj kompatemaj
tiris atenton. La soldatoj lin
devigis anstataŭi.

La Sinjoro
diris ion kaj halte aŭskultigis

ĉiujn: “Filinoj de Jerusalemo,
pro mi ne ploru sed pro vi kaj viaj
infanoj...” Ankaŭ la ceteraj frazoj
de tiu juĝ’ terura trans nin fluis.
Mi tremis. En malpli ol duonjarcento,
ĉirkaŭplantinte tie krucoforston,
la sanga man’ de Romo disfrakasos
ĉi urbon kiu murdis la Mesion.

III

Kun miro mi lamentis: “Ho, Jesaja,
kial la popolestroj ŝarĝis sin
per tia kulp’ terura? Kial ili
ne lasis sin persvadi? Mirindaĵojn
ili aŭdis kaj vidis. Eĉ Lazaron,
mortinton jam stinkeman, li revokis
el la mucida tombo—ree vivan.
Malgraŭ tio, anstat’ adorkliniĝi
kun kron’ por Reĝo longe atendita,
ili konspiris murdi lin kaj ankaŭ
Lazaron, por per dua entombigo
forkaŝi tiel grandan pruvon. Kial?”

“Pro propraj deziraĵoj kaj orgojlo.
Ĉar li venis kaj agis diference
ol ili insistis kompreni la Tanahon.
Li volis ilin unue savi de
ili mem, nur poste de l’ Romanoj. Sed
obsedis ilin penso fosilia,
kvaz’ ili havus ŝtonon en la kapo
anstataŭ cerbo—kaj en Brust’ kruela
alian. Opini’ obstina povas
tute rezistiĝi al ajna fakt’
aŭ pruvo, kontraŭluma blindigilo.

Ĝi naskas koleregon, kiu mem
estas mensmalsano. Tiel, por defendi
sian fieran Talmudecan pravon,
ĉi uloj lin mortigis. Koncerne tian
mensostataton sentencis Salomono:
'Ĉu vi vidas homon, kiu estas
saĝa en siaj okuloj? Estas pli
da esper' por malsaĝulo ol por li.'
Kaj tiu reĝ' sagaca tute ne havis
ajnan paciencon por la stultuloj.
Malgraŭ iliaj sci', erudicio
kaj inteligento, precize kiel
pratempe tiu ribelint' unua!"

La procesi' ĝisvenis l' ekzekutejon.
Unue oni sur la grundon sternis
la malbenitan lignon. Silentiĝis
la homamaso. Tiam lertaj manoj
ekkaptis, unu post l' alia, la du
krimulojn, kiuj aĉe ŝirkriegis,
dum ilin suben puŝis la soldatoj,
rapide senvestigis kaj sur la traboj
iliajn membrojn nemovigeble ligis,
senvorte kaj brutale kompetentaj.
Poste obtuzis la martelobatoj
super la ŝrikantoj, kaj ostoj krakis.
Fortuloj korpopezajn krucojn levis
kaj en truojn antaŭe pretigitajn
faligis. Veoj, veoj! Iu ridis
sub ironia, altiĝanta suno
de la Romia paco.

Tiam estis
ankaŭ lia vico. Li mem ekkuŝis,
ke oni tute senvestigu lin

kaj siajn brakojn kun suspir' etendis.
La martelulo paŭzis, surprizite.
Ŝajnis kvazaŭ la temp' koaguliĝus
kun ĉio kelkajn sekundojn haltigita.
La najlojn li ankoraŭ povis rifuzi
kaj lastmomente lasi la planedon
enabismiĝi.

Sed per tio ĉiuj
pereus—ankaŭ Henoĥ kaj Elija,
neniam la mortgalon gustumintaj,
krom speciala mirindul', Moseo,
revivigita anticipe al lia
savo. Plie Ezra, ankaŭ Jesaja...

La Kristo, tamen, aglo de l' ĉielo
povus reflugi al sia praa gloro
preter la steloj. Sed li ja akceptis
la akrajn pintojn kaj plorĝeme preĝis:
“Patro, pardonu ilin, ĉar nesciajn
pri tio, kion ili faras.”

Tie
mi do trastaris ses torturajn horojn
kun la gvidanto, Tamen kial mi
ne senkonsciiĝis? Kaj mi ofte volis
esti en lok' alia, ie ajn;
sed ĉiufoje kiam mi petegis
ne spekti kaj ne aŭdi tion plu,
Jesaja per vort' aŭ kaposku' rifuzis.

Li pendis, pendis, nuda kaj soifa
dum longa, malrapida dolorado,
al preskaŭ ĉio ĉirkaŭ si silenta,
nur kelkajn frazojn eligante, kiujn

la kvar evangelioj eternigis.

Tagmeze ĉerkotuko de mallumo
subite sur lin falis, por forkovri
la en kaj ekster li torturojn; kaj
kun sia aŭtor' la tuta kreitaĵo
suferis. Estis kvazaŭ la planedo
for de la sun' en tenebregon plonĝus.

Anstataŭ mokoĵ de la homamaso
eliĝis ĝemoj kaj timvoĉoj. Klare
la konsternitoj malamantaj lin
deziris de ĉi lok' kaj nuno fuĝi.
Jesaja apud mi komentis seke:
“La dignaj estroj kiuj lin perfidis
palpserĉas vojon de li for. Li povus—
ĉu ne?—descendi por detrua venĝo.
Tamen ili lin ankoraŭ, ĝisfine,
daŭre malemaj, ne komprenis.

“Nun

fro ĉiu tera vido lia Patro
la lastajn horojn de la Filo kaŝas.
Krome li mem ekvenis tien ĉi
kaj apud li en la mallum' suferas.”

Sanktegis tiuj horoj. La atendo,
tamen, fordrenis mian forton ĝis
mi elĉerpote sur la roko kolapsis—
baldaŭ, hontinde, ankaŭ endormiĝis.
Sed poste ŝultrotuŝe vekis min
Jesaja.

La suno brilis, reŝaltita.
De la kruco Jesuo triumfoĉe

kaj tra la tuta univers' trumpetis:
"Estas finite! Patro, en viajn manojn
mi transdonas mian spiriton."

Tiam

lia vizaĝ' ekbrilis, pli ol la sun'
tagmeza, kaj li kapokline mortis.

Subite jen refluis la mallumo.
Fulmotondris. Granda tertrem' faligis
la bandon ĉe la kruco, kunskuante
sampopolanojn kiuj murdis lin
kaj la ekzekutistojn fremdajn, krom
la kanajlaro algapinta lin.

Sed fine ĉio pasas, ankaŭ tio.
La tago ree iĝis ordinara.
Ĉe la krucoj la uloj kompletigis
siajn taskojn.

Pro Roma politik'
kompleza al la Juda religio,
neniu devis pendi dum Sabato.
Tial la korpojn ili dekrucigis.
Unue la rabistojn, kiuj ankoraŭ
vivas. Iliajn krurojn oni rompis
brutale kaj kriige, por ke ili
ne rampu for. Post la Sabatripozo
soldatoj ilin ree surkrucigos.
Dume sen akvo ili kuŝos tie,
pecoj de l' dolorplena homrakonto.

De Jesuo, tamen, ĉiu vivero
jam estingiĝis, ĉar kontrolocele,
unu soldat' tralancis lian flankon,

el kiu dise sang' kaj akvo fluis—
pruvo pri morto pro rompita koro.

Kaj ĝuste tiam du gravuloj de
la sindri' en kriza hor' aperte
kuraĝis montri sin disĉiploj liaj:
Jozefo el Arimate', riĉulo,
per rajtigilo fro Pilato akiris
la korpon de Jesu' por enterigo
en sia tombo nova. Nikodemo
kun mirho kaj aloo en la manoj.

Kovrinte la kadavron, kaj helpate
de fortaj viroj kiuj amis lin,
Jesuon ili portis for. Kaj sekvis
ankaŭ la virinoj el Galileo
servintaj lin kaj liajn dum la jaroj
de lia laborado. Mi kaj Jesaja,
diskrete nevideblaj, marŝis kune
al la sama ĝardena rokotombo
en kiu mi, post preskaŭ du jarmiloj,
eklegis vortojn de l' evangelio
Matea: “Li ne estas tie ĉi,
ĉar li leviĝis”.

La korpon ili vindis
en tolajn tukojn kun la aromaĵoj,
tenere lin sur ŝtona lit' kuŝigis
kaj por la tombofaŭkon fermi antaŭ
ĝin grandan radaspektan rokon rulis.

Kaj tiam sin anoncis la Sabato:
la ruĝa suno trans la horizonton
sangis. Interne senkonscie dormis
mortinto homa. Sed en li pacienco

atendis Dia estul' nemortipova.
Denove li ripozis, post rekreo
per kiu la homar' eterne daŭros,
dum ekstere tiuj amantaj lin
en la vesperon forturniĝis, por
obei same la sanktan Leĝon. Tamen
iliaj okuloj malkapablis vidi
tra larmoj la mirindan postmorgaŭon
en kiu ĝoj' neatendita floros.

IV

Sciante tion, ni restis iom plu,
sed tiam al niaj pensoj entrudiĝis
Romia gardistaro kaj servistoj
de l' sindri' kun ŝnuroj kaj sigelo
por fiksi sur la ŝtonan tombŝtopilon.

Mia kunul' rimarkis ironie:
“Kun ŝoko la kanajloj ekmemoris
kion forgesis la disĉiploj aŭ
malkredis: tiun lian antaŭdiron,
ke li en la tria tago reviviĝos.
Nun ili timas, pli ol la vivantan,
la murditan Kriston, kaj ajnan rimedon
serĉas por forkarceri lin eterne
en mortkaverno. Sed kiel flam' trabrulas
pajleron, li Dimanĉon reemerĝos
al nova viv' triumfa kaj senfina.”

“Postmorgaŭ! Kiom mi frandos vidi tion!”

“Bedaŭrinde ne.”

“Kial, Jesaja,

oni min tiel frustras, detenante
fro la dezirataĵoj de la koro?”

“Ĉar ĉi eventon homoj ne bezonas
vidi sed devas pro atestoj kredi.”

“Tamen tiu gvardio ĝin ĉeestos!”

“Sed senprofite. Subaĉetote, ili
forvendos tre malkare, kvaz’ Judasoj,
sian ŝancon por ĉiam ekzistadi.
Mi pluekspikos sed alialoke,
ĉar baldaŭ tie ĉi kalejdoskopos
troaĵoj, kiuj malatentigus vin.”

Subite ni nin trovis kontraŭ la flanko
de l’ Monto Olivarba. Sub ni kuŝis
trankvile Jerusalema. Komencis ĝin
pribrili frua sun’. La ĝardentombo,
tamen, al nevideblo ŝrumpis for.

“Bone. Ĉi-perspektive ni relevu
la fadenon de tiu temo grava.
Vi, kiel ĉiu alia kandidato
por viv’ eterna, la evangelion
prefere aŭdu de la apostoloj
aŭ ties tra l’ epokoj sekvantaro.

“Ekzemple legu kion verkis Luko,
fosinte la detalojn el memoroj
de homoj kiuj lin renkontis post
lia rea enmondiĝo, ekde kiam
li montris sin al la virinoj. Ilin
fruhore al la tombo am’ repelis.
Sen ajna pens’ pri ina digno ili

kuris kaj kuris al la apostoloj,
kiuj rifuzis kredi la novaĵon;
ĉar ili—estulinoj ‘malsuperaj’—
pro strangaj emocioj supozeble
nur fantaziis.

“Kiam la Savanto
tra ŝlositaj pordoj aŭ mur’ solida
aperis en la ĉambro, kie ili
sin kaŝis pro timo al la Judoj
(kiun malhavis la virinoj), li
ŝalomis, sed ankaŭ ilian ardan ĝojon
per riproĉo malvarme interrompis,
ĉar tiujn senditinojn al li karajn
ili ne kredis.

“Kaj pensu pri Tomaso,
kiu tiun vesperon ne ĉeestis
kaj tial tre skeptikis pri l’ raporto
de dek atestantoj al li tre konataj
kies oreloj lin aŭskultis kaj
okuloj vidis manĝi, kiel pruvo
ke vere estis materie li.
Ok tagojn poste, samamane,
li inter ili ekĉeestis. Li vokis
al si Tomason, por palpi lian korpon.
Tiu kun ĝoj’ elkriis: ‘Mia Sinjoro
kaj mia Dio!’ Ankaŭ al li Jesu’
riproĉis: ‘Ĉar vi vidis min, vi kredas;
feliĉaj estas tiuj, kiuj ne vidis
kaj tamen kredos.’”

“Jes, mi tiel legis,
Sed kial Jesaja, tio aparte gravas?”

“Mortis la apostoloj kaj la tuta generacio kiu proprasperte povus rakonti pri li kaj la liaĵoj, folioj kun la jaroj forvelkintaj. Sed la atestojn el la Sankta Skribo nenio povos forbalai. Tamen mi rimarkas, ke ankaŭ vi tomasas, almenaŭ iom.”

“Supozeble jes, ĉar kiel ni povas do distingi inter faktoj kaj onidiroj?”

Jesaja frustre suspiris. “Tion Petro, ne mi, respondu. En epistolo sia li deklaris: ‘Ni ne sekvis subtilajn elpenaĵojn kiam de la Sinjor’ Jesuo Kristo la potencon kaj alvenon al vi ni konigis, sed ni per okuloj propraj lian majeston vidis. Li ricevis de l’ Dia Patro honorigon, kiam el la ĉielo kaj brilega gloro al li sankta voĉ’ deklaris: “Ĉi tiu estas Mia Fil’ amata, en kiu mi plezuron havas.” Ni mem ĝin aŭdis, estante kun li sur la sankta monto.”

“Tamen, tamen...”

“Ne tiom min tamenu!
Kun la escepto de Johano, ĉiuj apostoloj siajn atestleterojn martire per la propra sang’ subskribis. Ĉu tiom, dek unu, da ili, vere pretus

elteni mokojn, oftajn persekutojn
kaj eĉ torturon mortigantan por
persisti pri mensogo?”

“Hm jes. Ili
sen ajna dubo kredis. Kaj pri Petro
postvivas tradicio, ke ĉe Romo
li krucumitis kun la kap’ malsupre.”

“Bonvolu nur imagi, se vi povas,
la lastajn pensojn en tiu mens’ mortsvena.
Kaj ankaŭ estas aliaj’ gravega.
Petro aldone skribis: ‘Ni havas krome
la vorton profetan, eĉ pli certan. Se vi
atentos ĝin vi bone faros; ĝi estas
lampo lumanta en malhela loko,
ĝis ektagiĝos, kaj la matenstelo
leviĝos en viaj koroj.’”

“Temas do
denove pri l’ profetaĵoj.”

“Jes, ĉar ili
montriĝis la plej firma fundamento,
roksolida, sur kiu tra l’ epokoj
la fido de l’ Kristanoj konstruiĝis.”

“Vi supozeble provos tion pruvi.”

“Certe. Ĉu la statuon vi memoras
pri kiu antaŭ sescent jaroj songis
Nebukadnecar, kaj de Danielo
la klarigojn, kiujn vi mem kun Ezra
aŭskultis?”

“Kompreneble jes, kaj tio tre impresas.”

“Eĉ pli ol vi ĝis nun imagis. Do volu lasi min fokusi vian menson sur vortoj kiujn verkos Hipolito, Romano naskiĝonta nur du jarcentojn post ĉi tiu tago. Li studos de Daniel la profetaĵojn kaj elvortigos unu paragrafon mirindan, kiu kune interpretos du ĉapitrojn de ties libro, kiuj vicigas tute samajn imperiojn. L’ unua estas tiu multmetala statuo de la Babilona reĝo; l’ alia, bestokvaro kiu multajn jarojn poste el maro suprengrimpis en songon de l’ oldiĝinta Daniel. Konsideru ĉi tekston Hipolitan:

“La songstatua kap’ el oro kaj la leonino estis la Babilonanoj; la ŝultroj kun la brakoj el arĝento plus la urso reprezentis la Persojn kaj Medojn; la latunaj ventro kaj femuroj, kiel ankaŭ la kvarflugila leopardo kvarkapa, signifis la Grekojn ekde la epoko de Aleksandro; la feraj kruroj kaj l’ besti’ terura, timeginda, esprimis la Romanojn, regantajn niatempe; la piedfingroj parte el argilo, parte el fero, kaj la dek kornoj estas la emblemoj de la regnoj kiuj ancor’ leviĝos, dum l’ alia korneto, kiu inter

ili kreskas, simbolas l' Antikriston
en ties mezo; la ŝtono, kiu frapas
la teron kaj sur nian mondon juĝon
alportas, estas Jesuo Kristo.”

“Jesaja,

mi konas la de Hipolit' klarigon.
Ĝi estas mirindaĵo ĉar identa,
aŭ preskaŭ, kun tiu de Uriah Smith,
naskiĝonta dek sep jarcentoj post lia
morto. Nur misteras ĉe li l' elekto
de la enigma vorto *leonino*.
Malsamas tiupunkte la virbesto
rolanta en la libro de Uriah.
Ĉu sur tion vi povas lumon ĵeti?”

“Ĝi simple estas lingva bagatelo.
Verkante en la Greka, Hipolito
sekvis la Septuaginton, via Smith
Anglan tradukon el la Tanah' Hebreaj.
La du klarigoj do identas, tute,
kvankam montriĝis unu diferenco
enorma, inter ĉi kleruloj.”

“Kiu?”

“Iliaj deirpunktoj en la tempo.
Kiam Uriah suriris la scenejon,
li povis grandparte retrovidi;
preskaŭ ĉio en tiuj profetaĵoj
per la historio jam plenumiĝis.
Por li restis nur la reven' de Kristo
kaj ties poste establota regno.

“Sed Hipolit' travivis siajn jarojn

kiam la sun' ankoraŭ brilis super
l' antikva Romo. Ĉirkaŭ aŭ interne
de l' forumo kaj ĉie plenigantaj
apartamentojn pluretaĝajn, homoj
atentis la siaĵojn, antaŭ ol
forfluos vivovarmo el korp' post korpo
kiu polviĝos, ĝuste kiel ĉiuj
poste, ĝis nia granda Reĝ' revenos.

“Por Hipolito, la profetitaĵoj
plurdetale restis nur tiaj kaj
atendis realiĝon per eventoj
ankoraŭ sen substanco. Pri ili li
nur fidis, sed neniam vidis. Dume
lia rigardo en la estontecon
penetris. Tamen la Romia aglo
super kaj ĉirkaŭ Mediteraneo
ankoraŭ ŝvebis. Tion li deklaris,
kiam la piedfingrojn kaj dek kornojn,
antaŭsonĝitajn laŭ l' antikva libro,
li interpretis kiel regnojn iam
plurnombre estiĝontajn. Do li ne
atendis plian imperion. Krome
ion malprobablan li antaŭdiris
kio tamen estiĝis: l' Antikristo,
kiu unue kiel eta korno
inter kaj meze de tiuj regnoj kreskos.”

“Sed kiu estos tiu?” mi demandis,
perdita pro perplekso kaj konfuz'
en nebulo de troa historio.

“Mi miras, ke kun via retroscio
el via temp' estonta vi ne tuj
rekonis lin, la Tiberanon! Ĉu

ties tiaro ne scintilis meze
de la aliaj Mezepokaj kronoj

Liaj vortoj ekskuis min. “La papo?
Nu, jam dum la epok’ de Hipolito
en Romo episkopoj seĝon havis,
laŭdire sanktan, sed tiam nur modestan.”

“Jes, Edwin. Krome la imperiestroj
paganaj ilin persekutis kiel
ĉiujn Kristanojn. Sed pro Konstanteno—
post Hipolito—tiu seĝo ĉiam
pli al trono transmutiĝis. Kaj fine
la ĉefpontifiko iĝis reĝ’ fiera,
il papa re, kun proprigita ŝtato,
kiu de la belega Italujo
ampleksis pli-malpli trionon.”

Tion

mi devis agnoski. “Tamen kiuj el
la papoj meritis tiun misaŭguran
titolon de *Antikristo*, kaj ĝuste kial?”

“Ĉiuj, ĉar temas pri sistemo. Papo
post pap’ pretendas esti plia Petro,
kvazaŭ reenkarigi, kaj estante—
laŭ Konsilio—neeraripova
pri ĉio teologia aŭ morala.
Li malkapablas nomi ajnan ulon
inter l’ antaŭaj ‘sanktaj patroj’ *murdinto*
se tiu ekstermigis herezulojn.
Ĉiuj ĉefpontifiko, eĉ personoj
ĉarmaj kaj ŝajne bonaj, partoprenas
en unuj la alies krimoj kaj devos
iam kuniri en la finan flamon.

“Ili duoble kulpas.

“Bestie ili
dum jarcentoj turmentis la homaron
ŝtiparobrule aŭ Inkvizicie
en ‘aktoj de la Fido’—kiujn diabloj,
alivestitaj kiel eklezianoj,
prezidis—post ol uloj sanktoficaj
per lertaj instrumentoj streĉe korpon
ekrompis aŭ elfosis la okulojn,
por konfesi ‘herezon’ feliĉigan.
Tia estis la kredo, ke l’ Sinjoro
pardonas, petite simple en la nomo
de Jesuo, sen kost’ aŭ pentofaro
peza, kiun altrudas postulema
pastro. La iloj eksponiĝas en
muzeo ĉe la ĉirkaŭmurigita
Karkasono, kie la Albigensoj
provis vane forbari la armeon
de la murdema pontifiko.

“Krome
tiu miseklezi’ per strangaj tordoj
preskaŭ ĉion en la Biblio falsis,
tre ofte al doktrinoj de diabloj,
kiel tiu fiaĵo malpermesi
la geedziĝon. Kiel estulojn seksajn
Dio kreis virojn kaj inojn, unuj
por la aliaj, kun familiigo
cele al feliĉo—ne frustracio
aŭ triste senfrukta monaĥina solo.”

“Sed, Jesaja, mi havas Katolikajn
amikojn kies trajtoj kaj konduto

reflektas la sanktan vivon de Jesuo.
Ĉu ankaŭ ilin la inferofaŭk'
atendas malfermita?"

“Ne, ĉar multaj
el ili estas bonaj de Di' infanoj.”
Kaj ne demandu, ke mi reekspliku.
El la volvaĵoj de via cerbo ludu
denove kion Moseo al vi diris
en Mohenjo-Daro. La Eternul'
memoros kie kaj kia ĉiu hom'
naskiĝis, kun ties tuta mensa fono.
Precipe la malscion se honestan
li neniam punos. Kaj ankaŭ Paŭlo
ĉe l' enirejo de la Akropolo
informis Areopage la saĝulojn:
'La tempojn de la nesciado Dio
preterrigardis, sed li nun proklamas
ke ĉiuj homoj pentu'—kvankam li krome
neceson subkomprenigis ne ferme ŝtopi
la orelojn, kio ja tute eblas,
interne de la kapo. Tiel estas.”

“Jesaja, kiel lerte vi forĵonglas
punktojn maloportunajn. Ĉu ne ankaŭ
por iuj papoj tio ĉi validas?"

“Edwin, vi nun komencas tedi min.
Obstina kiel la laŭsentenca mulo,
kun mens' skeptika kaj ne ĉiam tre
inteligenta. Pensu, ke la papoj
ne estas ordinaraj Katolikoj.
Antaŭ la elekto levanta ilin,
ili estis princoj de l' eklezio
kaj multesciaj.

“Revenu kun mi tamen
al Hipolito, homo rimarkinda.
Plenfide en Daniel, ĉapitroj du
kaj sep, krom la cetera vort’ profeta,
li estis ebligita antaŭdiri
okazontaĵojn, kiujn vi kun Smith
future konos kiel historion.

“Do ankaŭ tio pri la revenonta
Kristo estas fidinda, roksolida
fundamento, sur kiu vi kaj ĉiu
saĝulo povas konstrui viajn vivojn
rilate al la venontaĵoj, por fina
ĝojo sen larmoj, morto aŭ doloroj,
dum li reĝados sur tero refarita,
kies ĉefurbo nomiĝos Jerusalem.”

V

La altiĝinta suno kiu ŝaltis
ĉi novan tagon nun pli hele brulis
super la urbo. Ĉie homoj svarmis
formiksimile en tasketoj gravaj
sed niaaltece tute neaŭdeblaj.

Ie la Dekunuo kaŝis sin,
sengvidaj, kaj ne sciis kion fari.
La virinoj, far ili repuŝitaj,
malgraŭe plu, sen tim’, la ĝojnovaĵon
anoncis al ĉiu aŭdpreta aŭskultanto.

Dormis inkube respektinda Anas,
ĉefpastro Kajafas kaj brava Romia
prokuratoro kun lavemaj manoj.

Poste llin teruris tio, kion
malgraŭ la subaĉet' pluflustris iuj
soldatoj, pri l' eventoj ĉe la tombo.

Sed kie estis li, la Revivanto?

“Momente ne sur ĉi planedo,” Jesaja
informis, min ege mirigante.

“Ĉu?”

“Memoru, ke li al Maria diris:
'Ne tuŝu min, ĉar mi ankoraŭ ne
al mia Patro supreniĝis.' Tiam,
rapidege, multe pli ol ekfulmo
aŭ nura rapideco de la lumo,
li forvojaĝis fro ĉi tiu tero
al la pramondo, centro universa.

“Atendis anĝelaro bonveniga,
ravita. Tamen ilin li forgestis
kaj marŝis al la lumo ĉe la trono,
volante tie aŭdi la certigon,
ke lia ofer' por nia homa raso
erarvaginta estis akceptita.
La gloron ĉirkaŭ tiu Prapersono
li eniris. La Patro lin brakumis,
kaj per ĝojplena voĉ' proklamis: 'Ĉiuj
anĝeloj lin adoru!'”

“Baldaŭ poste
li rerapidis al sia posedaĵo,
ĉi mondo proprasange reaĉetita.”

Silente pri l' Dihomo mi meditis.

El tiuj vastoj reĉeante, li lante,
la ok mejlojn, dum ĉi posttagmezo
kun Kleopas kaj la kredant' alia
piediros al Emaus. Survoje—
paŝon post paŝo—el la Vort' profeta
li pruvas, ke la mesi' ne tuj reĝiĝos,
sed unue devis, savante nin,
en la abismon plongi. Kaj nur tiam,
altablĝinte por la vespermanĝo,
post dankpreĝo super rompita pano,
li rekonigos sin kaj malaperos.
Samanokte li en Jerusalema
sin montros ankaŭ al la apostoloj.

Post kelkaj minutoj plu, la kuniranto
suspiris. “Ni povas supozeble nun
el ĉi epok' ekiri, aŭ ĉu pliaĵo
ankoraŭ nebuligas vian menson?”

Mi ĉirkaŭ mi rigardis, hezitema.
Jam tiutempe la Monto Olivarba
estis en multaj lokoj tomboplena.
“Jesaja, dankon. Bone vi prilumis
la komprenojon. Tamen teruris
la prezo de sufer', por li, la Patro
kaj ĉiu—ankaŭ la kompatinduloj
kiuj ĉi tie dormas. Efektive
la tuta planedo estas unu granda
tombejo, ĉar tavolon post tavolo
subkuŝas homrestaĵoj, ostoj, polvo...
Do restas la demando: ĉu ne iel
estis alia voj' el la dilemo?”

Post tiom da klarigoj liaj okuloj,

profundaj je kompreno kaj eterno,
desapontiĝis. “Vi supozas...kion?”

Kiel ampol’ elektre heligita,
ekbrilis mia menso per ideo.
“Mi scias! Se la Farinto simple ne
nin kreus: Luciferon aŭ Adamon,
aŭ iun ajn—la tutan universon
de menshavantoj, nur la galaksiojn...”

“Jes, tio eblus, sed estus aĉa solvo,
lasanta sole por la Eternulo
kosmajn ludilojn, kvankam li sopiris
pli da kunuloj.”

“Certe. Hom’ de Dio,
vi multe pli ol mi inteligentas
kaj scias. Tamen mi en mia eto
suferas kaj multe timas pro la risko
fine perdiĝi kun rostiĝ’ eterna.”

“Eterna? Ne! Ĉi tio estas alia
doktrino de l’ diablo, subfosanta
la kredindecon pri la Dia justo,
amo aŭ proporci’. Se mizerulo,
trabaraktinte, ni supozu, sepdek
aŭ okdek jarojn sur ĉi mondo—plena
je aĉoj, fioj, fuŝoj—kaj tentate
far homoj kaj demonoj, fine mortas
ne pli malbona ol li estis virta,
ĉu la Savanto ne kompatas lin?
En iuj, eble multaj kazoj, tiaj
eĉ ne estas relevotaj.

“Revenu

al la temo. Bedaŭrinde, vi povus
perei, pro elektaĉo nenecesa,
malgraŭ ke l' kompatema Triunuo
vin amas kaj destinis por l' eterno.”

“Ĝuste. Mi eble malsukcesos. Ho,
se mi naskiĝus sur alia mondo,
feliĉa, nefalinta kaj senmorta!”

“Maleblaĵo!”

La vorto de Jesaja
min duŝis malagrable.

“Kial ne?”

“Edwin, vi estas vi ĉar du gehomoj
en unu loko kaj moment' kuniĝis—
spermatozo' kroĉita al ovolo.
La sola ŝanc' ekzisti por ni ĉiuj
ŝuldiĝas al la praa pek' Adama
kaj absolute ĉio, kio sekvis.
Siajn fadenojn la histori' en unu
reton kunŝpinis. Do se ajno ĝin tuŝus,
tordetus aŭ en iu lok' traŝirus,
tia ŝanĝeto neniigus vin.

“Vi eble konas la ekzemplon faman
pri la pluveto kiu, ekstersezone,
ĉe Vaterlo Napoleonon preventis
antaŭenigi la Armeon Grandan.
Avancis anstataŭe Princo Blücher
kun helptrupoj Prusaj. Tial triumfis
Velingtono. La eta kaporalo
kun siaj revoj enmarĉiĝis kaj

forsinkis en la nokton sur insul'
obskura. Sen tiu akvo kaj kotigaj
flaketoj, kiuj ĝenis la ĉevalojn,
l' imperiestro ankaŭ la Anglojn venkus.
Eliminiĝus du jarcentoj poste—
kun ili kompreneble ankaŭ vi.

“Sed ne okazis tiel. Parto de plan'
mirinda, de la Eternul' gvidata,
pluveto devis fali sur Vaterlon;
ke fine plenumiĝu lia volo.”

“Sed mi ne ŝatas esti sensignifa,
peon' en iu ŝakludo kosma kun
la Diablo!”

Ekgrimacis la profeto.

“Ne. Vi miskomprenas. Estas por vi,
por ekposedi vin ke ili ludas.

“La riskon do ne timu plu aŭ pensu,
ke pendas super vi hakilo. Li
promesis, ke tiun, kiu al li venas,
li neniam elĵetos. KREDU, fidu,
ĉar li vin amas, multe pli ol vi.
Li pagis sin por vin aĉeti kaj
per la homiĝo sin elmetis al
terura risko, ke li misirinte
povus sian unuecon forfuŝi
kun la Patro kaj la Spirito Sankta.
Fiaskus tiel la tuta universo.”

“Jesaja, spite al tio, mi emas pensi,
ke la Sinjoro tamen iel kulpas
pri la aĉa kun Lucifer' konflikto,

aŭ luktoj en ni inter sanktiĝem’
kaj la pasioj de la karno. Ĉion
la Eternulo ja inĝenieris
per kio la devioj for de l’ bono
kaj la bel’ ebligis.”

“Nur tiupunkte
vi pravas. Dio mem ne erarvadis.
Malgraŭe li akceptas respondecon,
surŝultrigante kun la kruco ankaŭ
ĉi tiun ŝarĝon. Preter tio, tamen,
ni povas nur imagi. Sed pli bonas
ne elekti mizeruligi vin
pri l’ misteraĵoj de la universo.”

Mi gorĝe sed senvorte grumblis. Akre
li memorigis pri Biblia verso:
“Ĉu la potu riproĉu la potiston
aŭ pridemandu: ‘Kion vi faracas?’
La kosmon ne elpensis mi aŭ vi,
estante de ĝi nur parteto kaj—
en ĝia svarma galaksia vasto—
kvaz’ du atomoj. Cetere, ĉi diskuto
per sia vortelvers’ jam tro streĉiĝis.
Tial ni lasu ĝin. Vi ĉiukaze
estas elĉerpita.”

Li tute pravis:
la tago min lacigis. Do mi petis
alilokiĝon, kaj mi devis dormi.

VI

Mi revekiĝis kiam surpalpebre
ektuŝis min la suno. Ĝia lumo
frumatene ludadis kun la ombroj
moviĝemaj inter la verdaj faldoj
de l' altaj Alpoj, kien, al fekundaj
valoj, sin levas la bela Italujo
en nordokcidenta region', sorbinta
jarmilon post jarmilo da memoroj.
Tie homoj, kun ĝoj' aŭ dolorplene,
siasorte kiel subsuna neĝo—
mem kvazaŭ ombroj—venis kaj venadis
por baldaŭ en mallum' degeli for.

El mia rigardado vokis min
la voĉo de Jesaja.

“Do reatenta
vi scivolemos pri kie kaj kiam ni estas.”

“Ho, saluton, Jesaja! La kieon
mi jam rekonis: la valo de Angrogna,
kiun mi dum 1985
vizitis. Ĝi tiam aspektis tute kiel
hodiaŭ, kvankam tiuposttagmeze
jam estis konstruaĵoj ancor' mankantaj.”

“Ĝuste. Sed laŭ via konjekto *kiam*?

“Se mi renkontus homojn de ĉi loko,
tio min eble divenigus.”

Kaj li,
ridete: “Ni almarŝu tiun bandon

da rifuĝintoj ĉe la enirejo
de la kaverno sub ni, al la dekstro.”

Ilin mi tiam la unuan fojon
rimarkis, kaj ne malproksime. Mi
scivolis pri la vorto “rifuĝintoj”
kaj pridemandis, sed kun kaposku’
li simple ekmarŝis por nin tienigi.

En tiu grupo—eble cento da
geviroj kun infanoj diversgrandaj
kaj siaj magraj aĵoj apud si—
tre multaj estis blondaj. Kiam ni
proksimiĝis, ili eksilentis kaj
nin scivoleme rigardadis. Jesaja
gestis, por ke ni sidu inter ili.
Baldaŭ iliaj estingitaj voĉoj
reĉendiĝis kaj oni nin ignoris,
ĉar per vojeto ĉirkaŭ alta roko
alfluis pliaj homoj. En lingvo fremda
junulo apud ni, scivola pri
la novuloj, ion laŭte ekdemandis.

“Ik im Ursula!” Kontralthoboje
ŝi sin anoncis kaj staris antaŭ ni
princiniene, kvankam lac’ kaj zorgoj
nubigis al ŝi la vizaĝon. Klare
ŝi estris tiun bandon, kies viroj
pleje surhavis maŝkirasojn kaj
surkokse glavojn portis.

Mi konsterniĝis
kaj al mi murmuris: “Ĉu eble Ria?”
Sed kun l’ aliaj alvenintoj ŝi
alproksimiĝis kaj eksidis. Tuj

el nia vido tio ŝin forglutis
kaj lasis min kun palpitema koro.

Mi provis stari, por revidi ŝin,
sed mia kuniranto fortamane
sur mia ŝultro premis, devigante
al plia anonimo. “Ne ŝi!” li flustris.

Sed kial tiuj formo kaj vizaĝo
min tra l’ epokoj hantas? Do malgraŭe
ŝi scivoligis min.

Jesaja, tamen,
mian atenton lerte fordeturnis
al nia tem’ antaŭa: ĝuste *kiam*
ni estis tie ĉi. “Laŭ vi, la frazo
‘ik im Ursula’ signifas verŝajne...
kion?”

“La nom’ latinis, sed ŝi ne
aspektas kiel Romanino. Ŝi devas
esti Ĝermana, sub influo ia
de l’ imperio.”

Tio al li plaĉis.
“Sed kion sencas la unuaj vortoj:
‘ik im’?”

“Hm... *ik* en la Nederlanda
signifas *mi*. Ĉi tiu loko, tamen,
kun evidenta rifuĝiĝo, tian
ideon ne permesas. Kaj enigmas
la vorto *im*. Ŝi plej verŝajne sin
prezentis propralingve, iom drame.
Do tiu tuta frazo tradukeblas

kiel ‘mi estas Ursula’. La Gota!”

“Bonege!” Jesaja diris. “Tial ni esploru pri ĉi jaroj kaj la sorto de l’ rifuĝintoj apud ni. Sed ili jam tro pri ni interesiĝas. Sekve ni do reflugu de ĉi tie for.”

Kaj jen, subite, ni retrovis nin pli alte, en la sama loko kien ni saltis el la lasta jar’ dum kiu Jesu’ ankoraŭ estis ĉi-planede.

Tie sur rok’ sidante, mediteme Jesaja plu rigardis ilin, trista.

Mi interrompis la silenton. “Nun, mi supozas, trans ĉi montoj venkebrie Bizancaj trupoj en triumfo finas rekonkeri Italujon fro l’ Gotoj barbaraj, kiuj antaŭ multaj jaroj invadis la Romian imperion. Kaj tiuj mizeruloj sub ni ĉi tien fuĝis.”

Videble tio lin ĉagrenis.

“Barbaroj ne kaj invadintoj ne!
En 376, ĉar Hunoj ilin
puŝpremis ĝis kaj kontraŭ la landliman
Danubon, teruritaj Visigotoj
permeson petis kaj akiris ennaĝi
la imperion. La Romanoj pensis,
ke tiuj, kun la legianoj, povas
bufri kontraŭ la Hunoj, kiuj same
ilin minacis. Invadintoj ne,

sed invititoj.

“La afer’ misiris.

Valens, l’ orienta imperiestro,
ordonis trakton home kompateman
por la malsataj, suferantaj Gotoj;
sed Maximus kaj Lupicinus, la ĉefoj
de l’ tiuregiona registaro,
koruptaj rabobestoj, sur ili predis—
por unu pan’ pagigis per juvelo,
por hundviando per homo: sklavo, eĉ
per filo aŭ filino. Supervivi,
anstataŭ morti pro malsato, iĝis
neeviteble la plej alta leĝo.
Nur sian glavon ĉiu saĝa Goto
rifuzis por ajno interŝanĝi.

“Baldaŭ

ekbrulis hato, bataletoj, flamoj
de konflikto. En 378,
ĉe Adrianopolo, Fritigern
pro furioz’ kaj malespero—kunigis
armeen kaj legiojn supozeble
nesupereblajn venkobatis. Pereis
du trionoj de tiuj Romianoj,
ankaŭ Valens, kies kadavro dum
aŭ eble post la batalo malaperis.

“Per tio, sci’ fatala enmondiĝis
inter la Ĝermanoj, ke ili povas
sur batalkampo venki eĉ Romanojn!
Fine, dum 478, jarcenton
post la Adrianopola fiasko,
kaputiĝis, almenaŭ Italuje,
la imperio. Tie, Odoaker,

Herul' Ĝermana, estis reĝigita;
sed antaŭ ol akcepti tiun kronon,
li detronigis en la Okcidento
Romulon Aŭgustulon, kun ŝercnomo
ironia—li estis nura knabo—
kaj eĉ pagigis al li pensionon.”

Mi miris. “Kial? Pleje tiukaze
nova reganto super Romianoj
traglavus la antaŭan. Fakte, ankaŭ
ĉiujn parencojn kaj amikojn liajn.”

Jesaja grimacis. “Tamen ni memoru,
ke ne Roman' li estis, sed Kristano,
kvankam ne Katolika. Li cetere
sciis, ke Oriente, ĉe l' Ora Korno
alia imperiestro, malamanta
lian religion, en Italujo
per okuloj dungitaj spionadis.
Al tiu Odoaker la insignojn
ŝipsis de la detronigito kun
mesaĝo pri humila subuleco.

“Zeno, tamen, rimarkis, ke ĉi tiu
tro prosperis, kverkego kies ombroj
etendiĝantaj eble iam baldaŭ
atingos ĝis la Dua Romo. Ĝiaj
radikoj povus ĝin subfosi kaj
renversi. Tial li ĵongle kontraŭ li
manipulis aliulon danĝeregan,
Teodorikon, l' Ostrogoton, kiu
tro proksimen al Konstantinopolo
puŝis. Do, rajtigito de l' ruzulo,
tiu kun taĉmentar' entuziasma
sin trudis en Italujon, celumante

Odoakeron. Poste li laŭleĝe
ĉi ĉarman regionon regus kiel
reprezentanto de la imperio.

“L’ armeo sub Teodoriko trafis
kaj ĉie, dum tri jaroj, venkobatis
la kontraŭulojn. Sed malantaŭ marĉoj
Ravenna, la ĉefurbo, protektita,
defiis, neprenebla. Odoaker
proponis pacon, kaj ke ambaŭ regu
la landon. Teodoriko amikecon
ŝajnigis. Tiam, feste ĉe Ravenna,
li en ties propra palac’ ekverŝis
lian sangon kaj ankaŭ buĉis lian
familion.

“En tia maniero,
Teodoriko sin establis, sed
kiel reĝon. Teorie li agnoskis
l’ imperiestron en la Oriento,
dum li laŭ propraj plaĉ’ kaj gusto agis.”

Indigno en mi flamis. “Fia homo,
barbaro!”

Tamen kontraŭ tiu vorto
Jesaja montrofingron levis. “Nu,
por iĝi kaj restadi reĝo, li—
kiel multaj—murdis; sed ne nomu lin
barbaro. Li adoris la Grekromian
civilizon kaj ĝian gloran arton.
Vi iam mem vizitis ĉe Ravenna
pri tio ankoraŭan atestilon,
noblajn bazilikon, poste ŝtelitan
far rabemaj Katolikoj. Latine

ili murmuris tie siajn mesojn
dum kiuj pastroj, eŭkaristie sombraj,
per pan' kaj vino remortigas Kriston.
Antaŭe tiuloke laŭdoj incense
ascendis dum Sinjoromanĝoj en
la Gota al li, kiu mortis unufoje
sed nun eterne vivas. Li malŝatis
esti kadavro kaj trakuŝi pli
ol tagon en tombo. Do li abomenas
pri tio ĉiutagan respertigon.
Al li pli plaĉis tiuj Gotaj voĉoj,
kaj li malĝojas ĉar la Bizancanoj
masakris ilin.”

“Sed, Jesaja, kiel
iliaj diservoj povus lin honori?
La Gotoj, Arianoj, krude kredis,
ke estis tempo kiam la Filo ne
ekzistis—ke la Patro kreis lin.”

“Pri tio mensogis iliaj ekstermintoj,
kiuj murdis de siaj kontraŭuloj
krom korpoj ankaŭ la reputacion!
Sed historiojn la venkintoj verkas.
La Gotoj tamen instruis, ke Jesuo,
antaŭ la enkarniĝo sian Patron
kunulis por ĉiam tra la eterneco.
Aŭ, kiel vi esprimus la aferon,
kiam la spacotemp' kaj materio
ankoraŭ mankis. Veras, ke laŭ ili
la Patro iel al la Fil' superas.
Kaj fakte Paŭlo pri la restariĝo
skribis, ke post ĝi eĉ la Filo al
la Patro sin submetos, ‘por ke Dio
estu ĉio en ĉio’.

“Kaj antaŭ ol
vi pridemandos, mi anticipu: mi
ĝis nun ĉi profundaĵon ne elsondis.
Tamen almenaŭ tio ĉi. Per sia
diec’ la Patron li egalas, sed
li alprenis homan korpon kaj por ĉiam
pro ni sobiĝis al malplia ordo.

“Ĉiukaze, tiuj Gotoj ne estis
antikvaj Atestantoj de Jehovo
sed viaj kredgefratoj. Ili same
observis la Sabaton, malobeaj
al la pap’ en Romo, kiu insistis—
jam antaŭ Konstanteno—ke Dimanĉon
la ter’ sanktigu. Tio estas lia
tago kaj ne de la Sinjoro. Do
vi povas tre fieri aparteni
al ilia bando. Kaj krome skribis
iliaj malamikoj pri la alta
moralo kaj kondukt’ ekzemplodona
de ĉi ‘herezuloj’.

“Sed, bedaŭrinde,
ili estis unu el la tri kornoj
pri kies forŝiro songis Daniel.
Ho ve, fanatikul’ teologia,
Justinian’, per siaj generaloj
Belizaro kaj Narses, Italujon
mortigis—l’ imperion kaputigis,
kiun la Gotoj volis revivigi.
Pro la kampanjoj kontraŭ l’ Vandaloj kaj
ĉi tie, la tre longa nokt’ inundis.
Sed li, vultur’, postsnufis sangan spuron
kaj korpojn putriĝantajn. Laŭ Prokopio

dum dudek jaroj la sunokulo vidis
en ĉi mizerigita lando kiel
dek kvin aŭ eble eĉ dek ses milionoj
da Gotoj senviviĝis.

“Vi observas
nun restaĵon fuĝantan tien ĉi
en brakojn de l’ protektaj montoj—kiujn
Kreinto antaŭscia amasigis
rempare—por supervivi. Mediolanum
jam falis. Ĉi tien baldaŭ la buĉuntoj
alkuros, sangsoifaj, por dishaki
tiujn mizerulojn. Sed Ursula
kaj kelkaj kun si la rimedojn trovos
repli ilin, ekzemple arsenalon
de la ŝtonegoj. Desupre ruligote,
ili frakasos multajn kapoŝelojn
kun cerboj murdon kaj voluptoĝuojn
avidantaj.

“Posteuloj de l’ Gotoj,
ankaŭ—de temp’ al tempo—aliuloj
en ĉi valoj multajn jarcentojn azilon
trovos, kultivante fruktodonan
teron. Dume, super la fihaladzo,
kiu el transa Romo supreniĝas,
en la aero de la montoj freŝa
ili al Di’ fidelos. Kaj por tiuj
la Savanto, la brila matenstelo,
tra la mallum’ leviĝos en la korojn.

“Cetere, jam pli frue ol ĉi-lande
reĝigis sin Teodoriko aŭ eĉ
Odoaker, blovis tra la ebenaĵo
de l’ norda Italujo kaj en la Alpoj

teologiaj ventoj kiuj venis
malkatolike el Novtestamenta,
ĉiela kampo. De tie la okuloj
de Jesuo transkuras ĉi planedon,
kiu en la komenc' per li kreigis,
kaj siasange li ĝin reaĉetis.
Ĝi neniam foras, duoble lia,
de lia zorgo. Tial li atentis
ĉion, kio beligas aŭ makulas
ĝin, kaj iufoje krome ĉi tien
anĝelon komisias, por protekti
aŭ venĝi, ankaŭ de temp' al tempo homon
kun kor' kaj buŝ' plenplenaj je kuraĝo
kontraŭdiraj.

“Dum ĉirkaŭ Rom' miasmo
de falsa religio plidikiĝis,
etendiĝante al preskaŭ ĉiu lando
en Eŭropo, kaj por multaj la sunon
obskurigis, la verportantoj tiaj
prilumis torĉe la tenebron.

Inter

l' unuaj en ĉi norda regiono
estis Helvidio. Antaŭ la jaro
400 li baze de l' Biblio neis
pri Maria ĉiaman virginulecon.
Krome iujn koruptajn manuskriptojn
li malakceptis kiujn Hieronimo
uzadis por traduki la Vulgaton.
La mond' ankoraŭ pri li scias nur
ĉar lin atakis tiu kolerema
'sanktulo'. Ĉiujn tekstojn el lia plumo
formanĝis iu Katolika fajro.

“Post Helvidio la Sinjor’ ĉi-Norden
Jovinianon komisiis. Lin
Hieronimo hatis eĉ pli fervore
pro sama neo pri l’ virginuleco
ĉiama de Maria. Aldoniĝis,
ke laŭ Jovinian’—monaĥo kiu
la dorson al la asketismo turnis—
la kunvivado de geedzoj bonaj
tiom al Dio plaĉas kiom fraŭleco,
kaj ke la Eternulo dankajn manĝojn
aprobas ne malpli ol la fastemon.
Joviniano multon legis, ne nur
ekleziistajn dokumentojn, kio
eĉ pli malamatis lin. Pro tio
li devis suferi kiel herezul’,
mortante antaŭ Helvidio.

“Sekvis

atute tria de tiuj fruatempaj
pra-Protestantoj por ĉi regiono:
Vigilantio. Kiel Helvidio
kaj Joviniano, ĉi tiu amis
la Sanktajn Skribojn. Aparte lin forpuŝis
la kulto de relikvoj, alpreĝataj
kadavropecoj, ĉiuj laŭdire sanktaj.
Lin krome malĝojigis, ke religiaj
dupoj fride kuŝas en monaĥejaj
ĉeloj, solaj, anstataŭ sur geedzaj
litoj—kredante tion virta. Li
vizitis Hieronimon, kiu gloris
la asketismon kaj ne lavis sin.
Li tial stinkis. Puloj kaj pedikoj
lin sanktuligis sed abrupte fornaŭzis
Vigilantion. Ankaŭ liajn verkojn
forviŝis kontraŭuloj, nigriginte

lin kiel herezulon; kvankam lin citis
Hieronimo, gala mensoganto.

“Sed la papismo, kanceriga suno,
tiutempe ĉiujn ĉirkaŭ si landojn
durigis per la keratozo de
estonta morto. Nur ĉi tie ne.
Eĉ antaŭ la restaĵo de la Gotoj
eksonis tiuj voĉoj, kies eĥoj
en ĉi Alpej’ ankoraŭ ne formortis.

“Sed denove rigardu sub ni tie.
La fiuloj venas. Finiĝis ankaŭ
por ni kial’ ĉihore resti plu.
Ni do refoje alitempiĝu for.”

VII

La historio estas oceano
profunda, kaj por ĉiu homa mens’
senborda. Nur la Kreinto de l’ ĉiomo,
ĝin plene sondas.

Mi estis atendanta
novan lokon al kiu min Jesaja
transprenos, sed ankoraŭ sidis tie.
La figuretoj sub ni—pro l’ distanco
mikrohomoj—nun estis for, kaj ie
parfumis floro, kiun mi antaŭe
ne rimarkis.

“Jesaja, ĉu ni baldaŭ
forfulmos?”

Lian vizaĝon printempigis

rideto. “Edwin, ni jam estas tie,
du jarcentoj plu en la estontecon.
La ĉirkaŭaĵ’ aspektas por vi sama,
kvankam multaj eventoj tramondiĝis.
Post tiuj bedaŭrataj Gotoj, en
ĉi valojn fluis pli da rifuĝintoj.
La lukto supervivi tiujn epokojn
kiel fumo el brulŝtipar’ atestas
antaŭ la universo, daŭra akuzo
kontraŭ l’ teroroj de la Tiberuloj.

“Jam nova kriz’ minacas. Sed antaŭ ol
kontempli ĝin ni kurte transrigardu
l’ enormajn flusojn kaj forfluojn kiuj
la landojn tratabdis ĉirkaŭ kaj piede
de l’ Alpoj, kvankam sen sukceso lavi
el ŝia alta nesto tiun virinon
kiun por mil kaj ducent sesdek jaroj
Dio dotis per la flugiloj aglaj.
Ŝi povis tien ĉi krom aliloken
fuĝi de la murdema ruĝa drako.”

“Pardonu, sed al kio vi aludas?”

“L’ Apokalipson. Tiu drak’ antikva,
aŭ serpentego, estas la Diablo
pon ŝi dum tiu temp’ sputanta akvon
da hordoj kiuj celis ŝin dronigi.”

“Sed kiu estas ŝi?” mi lin demandis.
“Laŭ l’ Katolikoj tiu ĉi simbolas
la Virgulinon—sekve ilin mem.”

“Ho kiel oportune!” Li rikanis.
“Ŝi estas la frutempa de la Sinjor’

popolo, adorinta lin jam ekster
l' Edenpordego, ankaŭ Izrael
kaj tiu eklezio senmakula
de la komenca Kristanismo. Ŝi
rifuzis en la temp' de Konstanteno
kaj poste apostatiĝi. La plimulto,
tamen, eĉ de la gravaj episkopoj,
fro Kristo forlogiĝis. Oni preferis
kun lia religio miksi erojn
paganajn por rikolti popularon,
poziciojn, imperiestran oron—
rekrementon anstataŭ viv' eterna.

“Jam fruepoke do la eklezio
disduiĝis. Unu malgranda parto
restis al sia Sinjor' fidela. Baldaŭ,
persekutate, ĝi al tiuj ĉi montoj
aŭ aliaj solecaj lokoj fuĝis,
eĉ ekster l' imperion. Sed la dua,
putin' en riĉaj vestoj kaj juveloj
koitis kun la reĝoj de la tero,
rajdante sur la drak' skarlata. Li
postkuris murdocele l' amatinon
ĉastan de la Savanto, tien ĉi
kaj ien ajn. Pri ŝi, ĉu ne, vi legis,
ke ŝia robo sunobrile blankas
dum ŝi ĉirkaŭ l' tempioj stelokronon
portas, la ankoraŭa karulino
de l' revenonta reĝo.

“Sed kion la Sankta
Vort' prediris pri ŝiaj finatempaj
posteuloj? Eĉ pli kolere tiu
drako militon ĉendos kontraŭ ili,
obstine fidelaj al la Diordonoj,

havantaj krome l' ateston de Jesuo,
la spiriton de profetado.”

“Nu,
precize tiujn versojn alproprigas
la Adventistoj, kiuj sin opinias
la restinta idaro de l' virino.”

Jesaja fiksrigardis min. “Ĉu l' faktoj
ne konfirmas? El tiuj ordonoj unu
postulas observadon de l' Sabato
antikva, laŭ Leĝo ne ŝanĝiĝipova;
kaj malgraŭ mokemuloj Dio ilin
dotis mirinde per profetkapablo.
Satan' malamas ilin.

“Tiel ankaŭ
la plej feroça lia dorlotbesto
el ĝia kuŝejo borde de Tibero
refoje kaj denove en ĉi Alpojn
murdistojn lanĉis.

“Post kiam komenciĝis
la fina temp', en jaro profetita:
1798, la sankta restaĵ'
avertojn vokos kontraŭ la bestio
kaj ĝiaj adorantoj, kiuj kultas
per ĝi la drakon. Kaj pri l' fideluloj
l' Apokalipso duan fojon diras,
ke ili la de Di' ordonojn tenos—
kaj l' fidon de Jesuo. Ĉar sen tio
maleblas al la Eternul' obei.”

“Pli lante, mi vin petas! Tio, Jesaja,
tro detala, jam ŝtopis mian kapon,

kiu ne povas pli enpreni, kiel
la krop' de kompatinda koko dum
mia infanaĝo. Avide ĝi englutis
maizerojn. Tiam ĝi spasme spiris,
mortonte. Mi memoras, ke l' patrino
operaciis per razila klingo.
Poste ŝi la vundon per ordinara
nadlo kaj fadeneto kudris, flegme.
Ĝi iom sangis, kaj mi preskaŭ svenis!”

“Nu, revenu al la temo. Precize
kio al la de Kocka menso troas?
Kaj mi promesas ne razili vin.”

“Bonvolu ne krue!”

Pacience

li tion ĉi ignoris, atendente.
Mi hontis. Tiam: “Ekzemple tiu dato.”

“1798? La fina jaro
de l' afliktego longa far la papoj,
demone inspiritaj, periodo
specifa. La Bibli' pri ĝi avertis
sep fojojn. Unue Daniel
duloke enrulaĵigis ĝin. Tiam,
sescent jarojn poste, l' Apokalipson
Johano verkis papiruse. Li
aldonis kvin menciojn brule urĝajn,
diverscifere esprimitajn: tri
kaj duona jaroj, kvardek du monatoj
kaj 1260 tagoj. Ĉar en
la profetaĵoj, laŭ la Sankta Skribo,
tago simbolas jaron. Ĉe Helderberg
vi instruiĝis, ke ĉi periodo

amleksas do 1260 *jarojn*.”

“Jesaja, mi vin interrompu. Iuj Kristanoj rifuzas tiun jartagecon Historicisman. Por ili tio estas 1260 tagoj laŭliteraj, tri jaroj kaj duono kalendaraj, rilate al la dudeksepa verso de Daniel 9. La Adventistoj kredas, ke tio antaŭdiris la Savanton, mortontan sur Romia kruco, meze de lasta jarsepo kiu kompletigas sepdek jarsepojn Izraelajn, en la sama ĉapitro detalitajn. Tiuj, kontraŭe, pensas Futurisme, ke temas pri l’ Antikristo. 1260 tagoj laŭ ili egalas la tri jarojn kaj duonon, finparte de l’ jarsepo.”

Mia

kunul’ sardonis. “Laŭ ili kuŝas krome abismego jarcentojn larĝa inter la sesdeknaŭa jarsepo kaj l’ sepdeka. Kiel povas transsalti ĝin prudento sana? Tamen aritmetiko simpla kolapsigas ĉi tiun tutan putran penskonstruaĵon. Kiom da tagoj plenigas tri kaj duonan jarojn? Tute ne 1260. Kalkulu tion. Estas 1278! Ĉi ekstra dekoko da tagoj mokas tian fuŝklarigon. Tiu periodo do devas esti simbola tempo kaj ne laŭlitera.”

“Sed kial tiu stranga sumo, tia

ekvivalento, tri jaroj kaj duono?”

Ĉe tio, lia vizaĝo tre heliĝis.
“Per ĉi demandoj vi ĝojigas min!
Ĉar tiom da jaroj la fiuloj nian
Sinjoron fariĝintan hom’ afliktis.
Li mem deklaris pri la juĝotago:
‘Kiom vi faris al unu el ĉi tiuj
miaj fratoj la plej malgrandaj, tiom
vi faris al mi.’ Mi do al vi demandu:
Kia puno, laŭ via supoz’, atendas
la mortigemajn kiuj el la papa
Romo fervore multajn fojojn ĵetis
soldatojn en ĉi montojn por turmenti
la ‘herezulojn’ kiujn li amegas?”

VIII

“Por grimpi trans altaĵojn de la Nordo
el Italujo al la Gaŭla—poste
Franka—regiono, plej taŭgas vojo
transmemore antikva. Tie Keltoj
en sia horo enhordiĝis, tiam
tramarŝis la Aŭgustaj legianoj
kaj distfuture, sur la neĝ’ alglitos
Napoleono kun arme’ invada.
Ĝi multajn nomojn portis, lastatempe
la Granda Pasejo de l’ Bernardo Sankta.

“Dum 753 transfuĝis vintre
stumblema papo al Pepin’ la Kurta.
Stefan’ la tria. Krom membroj de l’ kurio
li havis kun si ankaŭ, kiel decis,
donacojn kaj—por montri al la reĝo—
manuskriptojn pli valorajn ol tuta

vagon' da oro, ol ajna monfarejo
sur la planedo dum jarmilo poste.

“Antaŭe sciigite, scivolemaj,
atendis lin Pepino, la reĝin'
kaj korteganoj. Tien li peliĝis
pro hato por l' agresaj Longobardoj,
ĉar ili, malgraŭ sia lastatempa
katolikiĝo, sen respekt' aŭ honto
volis avide vasaligi lin.

“Li tial tre deziris, ke Pepin'
kaj siaj Frankoj fortabrakaj sturmu
en Italujon, por la dentojn rompi
de l' Longobardoj. Sed li celis pli:
ilian subjugigon al li mem,
posedon de iliaj riĉaj agroj
kaj senmajstrecon. Nenies fremda scepro
faligu sian ombron sur lin plu,
el aŭ Bizanco aŭ Parizo. La pap'
fariĝu ankaŭ propraŝtata reĝo.

“Por tian revon realigi, ilojn
li jam posedis kaj kun si alportis:
la du mirindajn dokumentojn, ĝemelajn
kvankam laŭaspekte ege malsamajn.
L' unua, kaj la pli valora, estis
polva, kaduka, mucideta. Ŝajne
la temptineo baldaŭ ĝin formanĝos
kun ĝiaj sanktaj vortoj kvarjarcentaj.
Estis la Donaco de Konstanteno.
Ĉu vere? Tamen ne. Falsaĵo freŝa
ĝi estis, kiun Stefano komisiis
kaj fantaziis konfidence lerta
kleriko Rome antaŭ l' transalpiĝo.”

“Fripono!” Mi ekkriis.

Li kapjesis.

“Sed por konstati kiom, aŭskultu plu!
Ĝi estas plenŝtopita je mensogoj:
Konstanteno, l’ unua imperiestro
Kristana, antaŭ sia konvertiĝo
ekhavis lepron. Tiam l’ apostoloj
Petro kaj Paŭlo lin dum song’ vizitis
kun ĝojmesaĝo, ke la pap’ Silvestro
de tiu fimalsano lin purigus,
se li konsentus Katolikiĝi. Tiel,
laŭ l’ fraŭda dokumento, ja okazis.
Solene, per trifoja subakvigo,
Silvestro baptis lin, kaj jen la lepro
subite estis for.”

Mi indignis. “Sed
tiaj’ neniam Konstantenon tuŝis,
kaj tiuj apostoloj, ĉar mortintoj,
ne povus reaperi. Forputrinte,
ili, laŭ la Biblio, tute perdis
konscion, ĝis la korpa releviĝo
kiam Jesu’ denove venos. Krome
tiun imperiestron ne Silvestro
baptis, sed episkopo Ariana,
malkatolika, ĵus antaŭ lia morto!”

“Jes ja, Edwin. Kaj tiujn fiktivaĵojn
invente kunaŭtoris Lucifero,
pramensoganto, kun ĉio en la fraŭda
verko, precipe la Donaco mem.

“Laŭ ĝia teksto, Konstanteno danke

por ĉiam pro la senlepriĝo donis
al Silvestro kaj ĉiuj post li papoj
de sia imperi' la okcidentan
parton. La tronon tie li vakigos.
Konstruiĝos por li, Bosporostrande,
ĉefurb' alia, en la Oriento.
En Romo reĝos nur la pontifikoj
kun sceptro super ĉiuj regionoj
de Italujo plus aliaj landoj,
ĝis kie la sun' sobiras, kaj pretere,
eĉ, supozeble, trans la okcidentaj
kontinentoj. Aŭ tiel argumentos—
surbaze de l' Donaco—Borĥa papo
kiu fiere dispartigos inter
navigistoj Iberaj, Katolikoj,
ambaŭ Amerikojn, laŭ la traktato
ĉe Tordesillas. Per novaj marovojoj
ĉirkaŭ la planedon la Portugaloj
kaj Hispanoj la teron ja malfermos.
Nur bedaŭrinde ke la Protestantoj
vulture sekvos, elsnufante samajn
predojn! Multloke ili tiujn korvojn
forbekos. Sed mi vagis de la temo...
Per ĉio honora kaj riĉiga dotis
la papojn ĉi dokumento de Stefano.”

Mi interrompis, perpleksite. “Tamen
kial la Franka reĝo persvadiĝus
elspezi kontraŭ tiuj Longobardoj
fortostreĉojn kaj de sia popolo
sangon, se l' regiono akirita
ne estus lia, sed la entrepreno
nur al la pontifiko avantaĝus?”

“Nu, kompreneble. Sed Stefano ruzis.

Ankaŭ al si li jam demandis tion.
Memoru la alian dokumenton,
kiun li krome el Romo trans la Alpoj
kunportis. Sur veneno bela ĝi
promesis, orlitere, ĉiajn benojn
kaj por Pepino, pekemulo, vivon
eternan—se li la pestajn Longobardojn
al la pap’ subigus”

“Ho vortoj, vortoj!”

“Sed ĉu vi scias kiu verkis tion?”

“Supozeble, la sama fiaŭtoro
kies fraŭdplena cerbo la Donacon
elŝlimis.”

“Ho, vi estas cinikulo!
Estis la apostolo Petro mem,
kaj laŭ la papo li persone venis
el la ĉielo kaj tiun manuskripton
al li transdonis ĉe altar’ en Romo.
Stefano krome, ‘sankta patro’, ĝian
aŭtentikecon garantiis, eĉ—
kaj tio ĉi la Frankojn tre mirigis—
la manskribon de l’ granda apostolo.”

“Senblage! Mi aŭskultas.”

“Ĝi efektive
estis leter’ kaj komenciĝis jene:
“Petro, apostolo, kiun elektis
Jesuo Kristo, al nia favorata
filo, la reĝ’ Pepino, lia tuta
armeo, ĉiuj episkopoj, monaĥoj,

abatinoj kaj la popolo...”

“Kiom
ĝi flatis! Sed, Jesaja, ĉu celtrafe?”

“La historio jesas, atestante,
ke per tiaj artifikoj la papoj
proprietigis al si ŝtaton. Krome
ili melkis la mezepokajn landojn
ĝis la Reformo. Nur kvin kurtajn jarojn
Stefano daŭris kiel pontifiko
kaj tiam al la vermoj apartenis,
sed lia influo ŝanĝis la jarcentojn.”

“Mirige!” mi aldonis. “Kaj la ŝlosilo,
kuŝanta kore de l’ Donaco, per kiu
tuta spalir’ da papoj sin altigis
al supereco religia kaj
priŝtelis mone l’ okcident-Eŭropan
trezorujon, estis la tri blasfemaj
Latinaj vortoj: *vicarius Filii Dei*,
‘la vikario de la Fil’ de Dio’”.

“Jes, la titolo de l’ Spirito Sankta!
Nur li, ĝis la Sinjor’ revenos, surtere
lin reprezentas kaj devas l’ eklezion
gvidi, laŭ instruo de la Biblio.
Sed la Apokalips’ precize tion
pri l’ Antikrista besto antaŭdiris
per fokuso sur 666.
Laŭ la Romia numeralsistemo,
tiu titolo havas ĝuste ĉi
cifervaloron.”

Ni silentis. Tiam,

subite, ni ne estis tie plu.

IX

Ni tiun tagon multe marŝis. Taŭgis ankoraŭ, ĝenerale, la vojsurfaco. Lok-loke, tamen, temp' aŭ sunmartelo ĝin fendis. Dum la jarcento deka, Romo fariĝis urbo triamonda, ankaŭ malpura. Iufoje odoraĉo ofendis la naztruojn. Forĵetaĵoj, eĉ hundkadavro, simple kuŝis tie. Kelkloke inter la ruinoj bovoj la verdan herbon maĉis. Kvaz' medite ili nin rigardis. Kiam ni iom staris, nin kelkaj homoj pretermarŝis. Ilian dialekton mi ekaŭdis. De la Latina ĝi jam distancis, kvankam ĝi ankoraŭ ne, per lango post lango frotate, moliĝis dolĉe en l' Italian.

Ĝis la Forum' Romana. Lacigite, mi kun Jesaja haltis por sidiĝi, konsiderante la momentojn, jarojn kaj ĉio kiuj vaporigis for. Kaj mi memoris la alian fojon, lontane en la estontecon, kiam mi kaj la karulino sidos tie kun tre similaj pensoj.

Tiam li suspiris peze. "Multe da vetero ĉi tie, krom en ĉiu kvartal' alia, jam forbalais la foliojn, polvon, homojn de pli ol mil kaj kvincent jaroj.

Ĉi-urbe regis reĝoj, respublikaj
konsuloj kaj imperiestroj. Nun
la papoj. Ili bone speguliĝas
en la disfalo, ŝrumpo kaj malpuro,
kiujn vi spektis apud tiuj stratoj.

“En la Nordo, dume, pli freŝa vento
daŭris, ekzemple ĉe Turino. Tie
la episkopo Klaŭdo en la naŭa
jarcent’ ikonoklastis. Pro la Dua
Ordon’ de Dio, li per vortmartelo
frakasis la idolojn Katolikajn.
Li krom tio pliajn doktrinojn falsajn
atakis, Protestantismo de la Alpoj,
longegan tempon antaŭ la Reformo.
Laŭ ĉio, kio iel supervivis
de liaj skriboj, la evangelio
tra lia mens’ ankoraŭ fluis klare:
la simpla kredo pri justigo, kiel
post sepcent jaroj Martin Luther same
instruos. Komprenoble tiun piulon
kondamnis la kanajloj en ĉi urbo
kaj lin prikraĉis per la fiakuzo
de Arianismo. Ilin atendas
la fina fajro, kies flamoj rostos
la mensogintojn kontraŭ l’ geamatoj
de la Sinjoro. Klaŭdo jam ripozas
pli ol jarcenton, atendante lian
revenon.

“Intertempe tie ĉi
kondutoj putris, mensoj koruptiĝis
kaj dominis, eĉ papojn, tri putinoj
el la famili’ de Teofilakto:
la senmoraliginta Teodora,

kun du filinoj. Unu estis samnoma
kiel ŝi. La alia, Marozia,
se eble eĉ pli fiis. Sed ni iru,
por rigardeti ĉi-epokan papon.”

Ni estis en ĝardeno apudmura
de la Anĝelo Sankta. Basoblikve
la suno sidis sur la horizonto
kaj larĝvizaĝe adiaŭis. Ravis
la rozoj kaj lilioj. Vesperodoro
de pli da floroj kaj plantabundo plaĉis.
Scenejo, hor’, perfektaj por delogo.

“Vi spektos gejunulojn amoremajn
al la korpoj unu de la alia,”
klarigis la profeto. “Kaj ĉi benko
angula estas aŭdloko oportuna,
dum por ili silentos niaj voĉoj.”

“Ili, kiuj?”

“La baldaŭ alvenontoj:
princin’ kun juna papo, la deknaŭa
Johano, mem la filo de Sergio
la tria, pontifiko virinema.
Ĉi tiu al li patris pro pasia
nokto, tute simila al la nuna,
per Marozia, la adulta. Nun
ŝi estas, ĉar ravega, la edzino
de l’ Roma reĝo Hugo. Senatorin’,
ŝi kompleteme, krom la propra korpo
uzas ĉiujn. Ĉi rendevuon ŝi
aranĝis por filin’ de Hugo, Alda,
kun sia filo, kiu pri ŝi ardas.”

“Kiel Itale!”

Tion li ne ŝatis,
sed nur flanken diris: “Ĉi antaŭjuĝon
bridu! Kaj jen alvenis la princino,
kiun la ‘sankta patro’ tiom volas
enlitigi. Nun vidu kaj aŭskultu.”

Ŝi tre beltrajtis, kun talio svelta,
en robo el sateno kiu blanke,
maninvite, tentis; kaj li ne estis
turpa, nur iom pli ol dudekjara.
Post amindumo ridetema, li
subite genuiĝis antaŭ ŝi
kaj sian tiaron kun la papŝlosilo
ekmetis tie. Anhelante, iom
balbute, li elverŝis sian amon
lascivan. Ŝi respondis: “Via Sankteco
ne bezonas timi, ke mi misuzos
oferon tiel gloran aŭ difektos
la karakteron respektindan en vi
de l’ vikario de la Fil’ de Dio.”

Kun ekscito li surpieden saltis
kaj ĉirkaŭbrakis ŝin kaj forkondukis
por malĉastado ie sub la luno.

Momentojn mi meditis. Tiam mi
scivolis. “Pro kio vi tiaĵon montris?”

“Diverskiale. Vidu antaŭ ĉio
ĉi Romon, kie luksas papoj sanktaj,
laŭ la doktrin’ Satana, ke por Dio
gravas nur la ofico pontifika,
neniam nuligebla eĉ per kondukt’

plej naŭza. Pensu plu, ke ĉi Johano—
ankaŭ tre multaj papoj kiel li,
aŭ alimaniere fiaj—kuraĝis
per torturistoj, buĉoj kaj brulŝtipoj,
jarcenton post jarcento longa murdi
virtulojn kiujn amis l’ Eternulo.
Kaj ĉu li, ĉe la mondoĉefo, al tiaj
malfermos la feliĉpordegon, dirante:
‘Venu, vi benataj de mia Patro,
heredu l’ regnon por vi preparitan?’”

“Apenaŭ. Sed Jesaja, la fraŭleco
de la religiuloj Katolikaj
estas problema.”

“Eĉ multe pli ol tio.
Li kiu ĉi planedon faris, kun ĝi
inventis ĝiajn vivsistemojn. Tial
la viro kaj virino estis faritaj
unu por la alia, multrilate
komplementaj, ankaŭ kun celo grava
ne ekstermiĝi, generante novajn
homojn. Fraŭleco do, por la plejmulto,
estas stadi’ transira. Junulo ĉasta
laŭ nia naturo iĝu ordinare
edzo kun unu sia amatino,
kiel nebela raŭpo papilio.”

“Sed, Jesaja, do tial ĉi Johano
ne povis ne deziri sian Aldan,
pro tiu virnatur’ englandigita.”

Li min rigardis malaprobe kaj,
post paŭzo, ekacidis: “Ŝi ne estas
lia Alda sed destinita por

alia viro multe pli honora.
Kaj konsideru. Ĝuste tiuj papoj
dekretis kontraŭ geedzeco, kiun
ekde Edeno la Sinjor' ordonis.
Krome ŝi ne estos por li l' unua
aŭ eĉ la lasta, kvankam li ne longe
daŭros.”

“Kio okazis poste? Diru.”

“Ho ve por li! Li estis la viktimo
de ĉarma flor' Venusa, muŝokapta.
Estiĝas dolĉa fajro kiam viro
arde ektuŝas inan korpon. Lipoj
kaj langoj faras sian ludon. Nudo
rapide sekvas kun enkarna fulmo.
Tamen, se oni pekis, ofte ankaŭ
amariĝo. Iufoje eĉ unu
semeto de l' malbono, pliiĝinte
produktas rikolton da mizero.

“Subite

tiun papon, voluptebriigitan,
ĵaluza glavo frapis: Alberiko,
la duonfrato. Lin en nokt' alia,
kiel ĉi tiu lunoplena, naskis
Marozia, en kuŝo diferenca,
ne plu pro ĝu' ĝemante sed dolore
al la potenca duko de Spoleto.
Nu, tiu duonfrato pri tiaĵoj
sciiĝis kun kolero. Baldaŭ poste,
li kiel aglo super kokinejo
falatakis Romon kaj ĉi geulojn.
La reĝo Hugo el la urbo fuĝis.
La papon Alberiko kelkarcere

ŝlosis en la palaco Laterana
kie li mute for de l' suno ŝimis
du jarojn kaj, ankoraŭ junulo,
pereis.

“Aldan, post hezit' mallonga,
li edzinigis.

“Tamen pri l' patrino
neniu dubo bridis lin. Malgraŭ
la multaj ŝiaj ploroj kaj petegoj
li ŝin enprizonige ŝtopis for
en ejon duonluman ĉi-kastele.
Kaj tie ŝin dum kvindek jaroj plu
akompanis nur ŝiaj pensoj kaj memoroj,
krom kiam la manĝaĵportant' kun torĉo
venis. Ekstere ŝiaj tuta mondo
kaj homoj pasis, lante kiel nuboj.
Ŝi iĝis pli ol naŭdekjara, vrako
de tiu korp' delice virorava,
laste nura sako da minca histo
kaj ostoj en ĉifona vesto. Fine,
dum la printemp' de 986
decidis papo, Gregori' la kvina,
dudektriarulo, kaj lia kuzo
Otto la tria, dekkvinjariĝinta
imperiestro, ke ŝi jam sufiĉe
por siaj pekoj pagis kaj ŝin dejnis
malekskomuniki. Do ili pastron
ekspedis kun ĉi tiu ĝojnovaĵo
por absolvi...kaj ankaŭ aliulon
por samahore ekzekuti ŝin.”

Profunde mi malĝojis. “Kia kompatato!
Ho, kiel vanas tiu religio

kaj ŝia vivo!”

“Eble. Eble ne.”

Tenere li ridetis. “Ŝi kaj Jesuo dum tiu jarmulteco pli kaj pli okazojn trovis por proksimiĝi unu al la alia.”

“Ĉu ŝi do saviĝos?”

“La kaŝitaĵojn de l’ sekreta menso rivelos fina tago. La Savanto, tamen, decidis; ĉar al li la juĝo laŭ la mandato Dia apartenas.”

“Jes ja,” mi diris, sed skeptike—kion li tuj rimarkis.

“Se Manase, kial ne ankaŭ ŝi?”

“Ni jam menciis lin sed kiel al ĉi virino rilatigas?”

“El ĉiuj reĝoj de Juduj’ antikva Manase, kiun naskis Ĥefci-Ba por tiu bonegulo Ĥiskia. Li aĉege al Dio sian dorson turnis, Baalon kultis, por la fia Aŝtar en la gloran templon idolon metis kaj eĉ infanojn siajn bruloferis. Pleje la Sinjoro ne lasas tiajn tre longe daŭri sed al li permesis terure longan regnon, kvindek kvin jaregojn sur la trono. Kaj li verŝis

sitelojn da sango en Jerusalem
de bonaj, sanktaj homoj. Ho, ni preĝis,
sed Dio multajn jarojn ŝajnis surda.
Ĉar mi protestis, ankaŭ min li murdis
per malagrabra maniero morti.
Ŝtopinte min en kavan ŝtipon, du
mokemuloj lante, lante min trasegis.
Fine la Sinjoro l' Asirianojn
alvokis. Estroj de ilia reĝo
ekkaptis kaj katenis lin. Per ĉenoj
ili lin forkondukis al Babelo.
Tie en sia mizero li memoris
la Dion de la patroj kaj de li.
Humiliĝinte, kaj plorĝeme, savon
li petegis. Tiam la Eternulo
lin revenigis al Jerusalem
kaj lia trono.”

Ĉe tio mi silentis,
dum lia vizaĝo helis. “Tial eble
eĉ Marozia. Sed nun ni iru.”

X

Denove en la nordo. Bluĉielaj
Alpoj. Ni kelkminute pendoŝvebis
super la klifa rando de abismo
kaj kvazaŭ el aeroplano vidis
centojn da metroj sub ni rokojn kaj arbojn,
bonsaje pro l' profundo etigitajn.

Tiam ni taŭgan rokobreton trovis,
kaj tie ni atendis. Dume mi,
tre surprizita, aŭdis lin murmuri:
“Se l' religion Dio ne bezonus,

li ĝin kontraŭus.”

Brovon mi eklevis.

Tuj rimarkinte, li aldonis: “Ĉiu Kristana ŝtat’, por esti tia, leĝojn forĝas kaj iel vipas al konformo kaj tute kiel Satano persekutas. Ĉar puto venenita, la homa kor’ elbobeligas tro facile haton anstataŭ amon al la proksimulo pro iu diferenco, eĉ malgranda, en mondrigardo aŭ teologio. Vi tion denove vidos tie ĉi.”

Mi moviĝetis malkomforte. Certe survojjs io neagrabla.

Tiam

lia voĉo ektranĉis la cerbumon. “Ni tamen unue tra la historio iom retropaĝu. Ĉi tiuj montoj brakume, dum epoko post epoko, ŝirmis la rifuĝintojn. Unu tia en la dek-dua jarcento alkurinto estis Petro Valdo, laŭ kies nom’ koniĝis tuta grego da Valdanoj.

“Denove kaj denove en ĉi montojn la papbestio de l’ Apokalipso sputis taĉmentojn da fervore piaj murdistoj, ‘sanktan patron’ adorantaj, kun bela instrumento en la mano— glavo, hakilo, ajno kiu pikas— por fari sian religian devon. Krom antaŭ tio perforti belulinojn

kaj per predo plenŝtopi sian kropon.

“Unue la regantoj sekularaj
de l’ Valdanoj malemis kunlabori.
Ili alte taksis ties konduton
moralan kaj mirindan produktivon,
kiu riĉigis kaj la regionon
kaj per impostoj ankaŭ ilin mem.
Sed fine Bonifaci’ la naŭa povis
trabreĉi tiun malentuziasmon
kaj sian plej amatan dorlotbeston
Borelli, la inkvizitoron, kun trupoj
tien ĉi ekspedis. Ili reportis
triumfe al Grenoble de l’ Valdanoj
150 virojn kiel ankaŭ multajn
inojn diversaĝajn, eĉ infanetojn,
kaj per ili la flamojn nutris—atute
persvadan teologian argumenton
por homamaso, kiu mute tremis.

“Tiu sama Borelli en la jaro
Jubilea, 1400, al sia papo
dolĉe Kristnaskdonacon donis. Ree
kun li alhordiĝis soldatoj, kiel
kanajloj iufoje dum Judea
nokto subite venis por Jesuo.
En la valo Pragelo kie altas
la Alpoj, la Valdanoj opiniis
sin sekuraj pro neĝ’ profunda. Tamen
la kohorto penetris ankaŭ tien
tra l’ frido pro feroĉa fajro kiu
brulis en siaj Katolikaj koroj.
Povruloj sen armiloj, kiel perdrikoj
far subita ĉasfalko timigitaj,
tra la vespernebul’ humide griza

fuĝis pli alten en la montoneĝon.
La plej feliĉaj ŝirmetejojn trovis
sub rokobretoj aŭ en vintrokavoj,
sed multaj mise kuris. Super tiuj
vakis nur la ĉielo nuda.

“Neni’
ombrelis, kvankam la kurteno blanka
de sobfalanta neĝo kaj nebulo
forbaris la bestojn kiuj ilin ĉasis.
Tiuj baldaŭ restumblis al profundoj
kie kraketis fajroj en kamenoj.
Sed alte super ili, neĝe sternite,
multaj fintreme kadavriĝis. Poste,
sub la matena sun’, iliaj karaj
kaj la konatoj ilin serĉis. Tie
patrinoj kuŝis kiuj per la lasta
korpvarmo kaj alpremo kontraŭ si
en vano provis teni siajn bebojn
aŭ infanetojn vivaj. Estis geedzoj
en fina ĉirkaŭbrako frostiĝintaj
kaj koramikoj unu kun l’ alia.
Iuj ankoraŭ spiris, sed malvarmo
de ili fingrojn mane aŭ piede
dismordis, dum aliaj tute blindis.
Tiun Kristnaskan predon por la papo
en Pragelo la Valdanoj neniam
forĝesis.”

Tio el mi ŝokis ĉian
komenton, krom murmuro: “En la nom’
de Kristo?”

“Jes, kaj lia ‘vikario’,
sed efektive la reprezentanto

de Satano. Kaj tio estis nur
la komenco. Ni do nun antaŭen saltu
okdek ok jarojn en tiu ĉi rakonto,
kiam Bonifacio kaj Borelli
jam ambaŭ putris. En riĉornamaj tomboj
la ĉiam viglaj vermoj frandis ilin
dum dormo de l' damnitoj, atendantaj
la releviĝon... kaj la fajron.

“Nova

duopo en 1488
pri eĉ pli piaj faroj ambiciis.
Inocent' la oka kaj Kataneo,
la ĉefdiakono ĉe Cremona, emis
imiti la gloraĵojn de la tria
Inocento, kiu la Albigensojn
voris—ankaŭ ekstermis la kulturon
Provencan. Ili sekve do projektis
forbalai same ĉiujn Valdanojn
el la Eŭropaj landoj kien ili
dissemis sin per vendistaro lerta
kun varoj altvaloraj.

“Krom juveloj

ili portis, kaŝitajn en sekreta
poŝo de siaj roboj, savoriĉajn
Biblierojn pri la vivo eterna
pro fido en Jesuo, ĉefe versojn
el la Evangelio laŭ Johano.
Ĉar ili estis reformistoj, simplaj,
efikaj, longe antaŭ Hus kaj Luther.

“Norde de l' Alpoj ili koloniis
krom sude en la monta Kalabrio
kie l' Itala boto pintas. Sed antaŭ

ĉio ili floris en ĉi fruktriĉa
regiono, kie la kolegio
de la barbeoj tiajn misiistojn
trejnadis en la valo de Angrogna.

“Precipe por ĉi-loke forfumizi
la ‘bestetaĉojn’—al la Sinjoro karajn—
Kataneo kaj la vultura papo
elkovis krucmilitan planon. Karlon
la okan, kiu en Francujo reĝis,
kaj l’ duan dukon de Savojo (ankaŭ
Karlo) ili delogis partopreni
pro Katolika pio. Inocento
salajrus ilin per pardono plena,
friponojn al la ĉiel’ survojigante,
precipe kiam herezulojn ili
ekstermos, sen purgatori’. Ĉi-lasto,
loko imaga, mal-Biblia, estis
por la Roma eklezio mirinde
utila kaj kun granda monvaloro.
Krome li amoplene disponigis
al tiuj bonaj moŝtoj malavare
la rajton rabi aŭ konfiski agrojn
kaj laŭplaĉe, sen pek’, perforti inojn
kies gorgojn soldatoj poste tranĉis.”

“Kaj ĉio nome de la vera fido!”
Mi estis tre kolera.

“Kompreneble.

Sed kiu konas sin? La koro estas
malluma kelo. Tie ni nin trompas.
Jesuo antaŭdiris tian tempon
kiam la mortigantoj de l’ disĉiploj
supozos, ke al Dio ili plaĉas.

Kiom ĝojas pri tio la diablo,
inventanto de fiaj religioj!

“Tamen la pian kampanjon ni nun sekvu
de Katane’ kun ambaŭ tiuj moŝtaj,
papamaj ĉampionoj. Ili projektis
alsalti dudirekten, nuksrompile,
por ekkonverĝo en la val’ Angrogna.
La Franca reĝo el la nordokcidento
falkos sur la komunumon. Samtempe
Savojaĵ trupoj el la sudoriento
vulture predos. Ĉar en Pra del Torno
la veraglino nestis ĉe l’ kolegio
barbea, demetante siajn ovojn
el oro, kiuj baldaŭ elkoviĝis
en la junaj de l’ misiistoj mensoj.

“La totala armeo nombris ĉirkaŭ
dek ok mil soldatojn, plus milojn pli
da homaj hundoj, kiuj boje kuntrotis
por leki sangon kaj kadavrojn ŝiri
de l’ morthakotoj, ŝajne malkapablaj
efike sin defendi. Tia estis
la kirasita pugno de la papo,
kiun li levis por per unu bato
frakasi kaj ekstermi la Valdanojn.

“L’ armeo Franca, pretiĝinte, supren
kaptosaltis, tra la Dofinaj Alpoj
kie restaĵo Albigensa, post
mortiga ŝtormo el la kruela koro
de Inocent’ la Tria, ree kreskis.
Li dormas ĝis malplaĉa releviĝo
kaj la infero kiu lin atendas.
Ilia religio tre similis

al tiu de l' Valdanoj, malgraŭ ke
papistaj malamikoj misreportis
ilian kredon kaj ilin primensogis
kiel Maniĥeanojn, bruligante
ĉiujn librojn iel ajn kontraŭdirajn
kaj kompreneble ankaŭ ilin mem.

“Komandis tiusektore La Palú,
nobel' kapabla, kruelulo. Li estis
homa rabobirdo, ĉar ankaŭ li—
kiel multaj tiaj senkoruloj—nur
havaĵavide, per la stomako, pensis. . .”

Ĉe tio, ek, Jesaja spasme spiris
kaj ŝiris la rakontfadenon. “Edwin,
pardonu min sed mi ne povas plu!
Kontempli aŭ priparoli ĉi hidaĵojn
tro multe tranĉas min. Mi devas iri.
En la ĉiel' salvitoj fro la tero,
ateste rigardante, ofte ploras
malgraŭ hardiĝo pro sezonoj kaj
sezonoj da homoj, kiuj velkas for.
Sed mi volontuliĝis surgrundiĝi
ree en tro tortura mondo, kiun
ni iam por pli bona pon ni lasis.
Mi volis plue helpi vin, sed nun
ĝi tro terure dolorigas min.
Atendu tie ĉi, ĝis plifortulo,
kiu ne bezonos en si forviŝi
tiom da larmoj, anstataŭos min
kaj finos la deĵoron. Adiaŭ do
aŭ ĝis revido en Jerusalem
la nova.”

Li subite malaperis,

kaj jen mi sidis inter Alpoj, sola.
Tra mia menso, tempe miksiĝante,
ludkarte implikiĝis horobildoj.
En la Uson' futura, lando kiu
ankoraŭ ne ekzistis, fidlibero
iom pli longe daŭros. La orgeno
kaj l' voĉo de la karulin' Sabate
en sud-Teksasa urbo al la Sinjoro
laŭdon levas, kaj estos kvincent jarojn
de nun.

Sed tie ĉi Valdanoj devis
denove de mordemaj hundoj kuri
kiujn bestio ĉe Tiber' instigis.
Ĝi longe vivas. Laŭ la apostolo
Paŭlo jam liaepoke ĝia feti
en la utero de la tempo kikis.
Li antaŭdiris ĝian plueniĝon
ĝis la Reveno, kiam la Sinjor'
per sia gloro mortbruligos ĝin.
Mi sciis do, ke dume en tiu urbo
sud-Teksasa nian kirketon karan
la bestio—kies vundita kapo
resaniĝis—plej certe ne indulgos,
pro la Sabat' Biblia, malamatan
ĉar ni defiis, jarcenton post jarcento,
ies ajn rajton Dian leĝon ŝanĝi.

Kaj tiam, mizerulo, mi ekpreĝis:

“Korfavoru nin, Sinjoro.
Manon etendu,
helpanton sendu
por ĉi krizaj lok' kaj horo.”

Libro 5

I

Subite sidis apud mi fremdulo,
laŭveste homo mezepoka. Time
mi saltis surpieden. “Kiu vi estas
kaj kion volas?”

Ankaŭ li leviĝis,
lante kaj senstrese, kaj li etendis
salutocele sian dekstran manon.
“Abdiel,” li diris.

Sed mi ne volis,
ĉar ege suspektema, tuŝi ĝin.

La manon li retiris kaj denove
sidiĝis, ridetante tre amike,
sed senvortis. Mi evidente al li
ian respondon ŝuldis. “Nom’ Hebreaj?”

“Kaj el la Biblio.” Li plu ridetis.

“Ankaŭ Miltona. Sed, sinjor’, pardonu.
ĉar kapti la sencon de ĉi nomaludo
kuŝas ekster la spertosfer’ Valdana.
Vi estas ja lokulo?”

“Mi ĵus alvenis.
Mi tamen scias, kion tiu Angla
verkego diros pri anĝel’ fidela
kiu rifuzis kun Lucifer’ forfali.
Nur bedaŭrinde, ke liaj versoj kalvas
malĉarme, sen multaj fortaj metaforoj—

oftaĵo ĉe John Milton.”

Mi konsterniĝis.

“Kiel vi konas la futuron kun homo ankoraŭ sen ekzisto?”

Li respondis
gajmiene: “Ĝuste kiel vi mem!
Ĉar mi jam estis tie. Mi nun venis,
sendite pro tiu via nelga preĝo,
por plukonduki vin interne de
kaj trans ĉi montoj.”

“Relevit’ alia
sankte vivinta, sed kiu ne famiĝis
kiel Moseo, Ezra aŭ Jesaja.”

Li milde sian kapon skuis. “Edwin,
mi neniam mortis.”

“Ĉu kiel Henoh?
La Sankta Skribo, tion mi ja scias,
ne rakontas ĉion pri la justuloj
de la antikva tempo. Tamen diru
kie kaj kiam vi naskiĝis?”

“Neniam.”
Trankvile li rigardis min. “Por mi
la vivo trans la astroj komenciĝis.”

La ŝoko min sidigis. Li mian ŝultron
tuŝis. “La plenan veron mi elverŝu.
Ĉu vi memoras kion via patrino
al vi rakontis kiam vi ankoraŭ

estis juna knabo. Dio al ĉiu
destinas anĝelon, kiu lin aŭ ŝin
de la naskiĝo gardas? Mi estas tia.”

Mi rigidiĝis, kaj glacio ŝajnis
enfrapi mian cerbon, sed ankaŭ dubo.
Li estis tiel ordinarstatura
kaj ĉiutageca. Krome, ĉu anĝeloj,
la nefalintaj, ne povas legi mensojn?
Li sciis kion mi al mi asertis.

Ĉe tio li ekdiris, leviĝante:
“Vin evidente ĝenas mia grando,
nun tre modesta, kaj vi krome pensis:
‘Li estas tiel ordinarstatura
kaj ĉiutageca.’ Tamen vidu nun!”
Li paŝis iom de mi for, kaj jen
subite staris tie grandegulo,
multe pli alta. Lum’ anstataŭ vesto
ĉirkaŭis lian korpon.

Mi forkaŭris
de tia gloro, Sed momentojn poste,
reordinariĝinte, Abdiel
min trankviligis. Ree la atenton
li fiksas sur la vojon antaŭ mi
tra sovaĝejoj kie pilgrimantoj
baraktas inter dolorigaj dornoj,
same kiel mi, al la futura
post ĉiuj ĉi turmentoj viv’ eterna.
Kaj tiam li komencis plurakonti
ĝuste ĉe l’ punkto kie ŝanceliĝis
Jesaja kaj fuĝis al ĉielbalkon’
fro kiu la jam savitaj pli distance
povas spekti sed ne suferi tro.

II

Li diris: “Ni ankoraŭas en la jaro
1488, kaj la anĝeloj
hodiaŭ ploros, kvankam Lucifero
kun sia hordo tion ŝmace frandos
kion vi kun kuraĝo vidu.”

“Do
ni nun ascendu al kie La Palú
kun siaj sanglekemaj hundoj jam
ĝisgrimpis.”

Ĉe tio, ni tuj ekiĝis tie
kaj nevideble ŝvebis. La buŝ’ proksimis
de kavernego alte inter montoj.
Jam en ĝin fuĝis miloj da Valdanoj
kun ŝafoj kaj brutaro. Tralikiĝis
internen akvo. Ili povus tie
nutradi sin almenaŭ dudek kvar
monatojn, dum grandegaj rokŝtopiloj
kaj la glavar’ de viroj fortabrakaj
ĉe l’ enirejo forbarus postĉasantojn
kiuj entrudiĝus. Do kiel ili
atingus tien? Antaŭ la kaverna
platformo ja proponis starejton
sed super profundaĵoj. Tie facile,
pro unu piedglito aŭ mispreno,
sorgrimpanto povus refali milojn
da metroj. Valdanoj vigle gardostaris
por distranĉi fingrojn aŭ unupuŝe
per klingo en stomakon forsobjeti
la alvenuntojn.

Tamen La Palú

ĉi ĉion sciis per spionoj, krom
Valdana perfidulo, kiun timo
aŭ Judasa subaĉeto konvertis
fro Krist' al Romo. Sub inspir' Satana
li forĝis multe malpli riskan planon.
La dorson de la monto li kun siaj
ascendis ĝis la kapo. Poste ili
sobgrimpis al la krutegaĵo kiu
superpendis la sub si enirejon,
ŝtelire, kelkajn minutojn de l' Valdanoj
ne viditaj.

Kun Abdiel mi spektis
konsterne kiel per ŝnuroj la soldatojn
oni soblasis, ĉe kio la Valdanoj,
surprizite, en tiujn profundaĵojn
forfuĝis. La platformo ekkaptiĝis
kaj apartenis nun al La Palú,
sed li vetois ĉies entuziasmon
sekvi ilian predon en mallumajn
intestojn de la monto. Anstataŭe
li kolektigis lignon grandamase
kaj ĉe la enirejo bruligadis.
Vento leviĝis kaj enblovis nubon
venenan, kiun la kavernega gorĝo
glutis. Interne ĉiujn ĝi ekstermis.

“Tri mil homoj vivantaj kaj valoraj
krom bestoj dum minutoj sufokiĝis,
hide, doloroplene,” Abdiel
lakone rimarkigis. “Ni descendu
por ilin vidi.”

“Nee!” hororigite
mi kriis. La soldatoj konfuziĝis

pro voĉ' senkorpa kiun ili aŭdis
de ie tre proksime.

Abdiel
fulmorapide al herbej' senhoma
sur alian monton nin lokis for
kaj lante min rigardis. "Kio estas?"

"Vi volis *montri* al mi la kadavrojn!"

"Por atesti. Sur tiu ĉi vojaĝo
al la terura koro de la kozo
koncerne Luciferon kaj vin mem
necesas konfrontoj, iuj vere aĉaj."

"Ho ve, ho ve! Sed, kara Abdiel,
la tutan *Historion de l' Valdanoj*
far Wylie mi jam legis. Gutas el
ĝiaj paĝoj tiom da sufero: sango
kaj larmoj de ĉi popolo pleje sankta,
jarcenton post jarcento."

Li aldonis:

"Dum Dio helpis, ili baraktante
triumfis, ofte, super la fiuloj.
Ĉi-foje, malgraŭ faraĉoj kiel tiu
de La Palú per asfiksia fumo,
fine l' ekspedicio Katanea
fiaskis kaj proprasange sufokiĝis."

Spite al spleno, mi pri tio pensis,
ke nur malmultaj el ties dek ok mil
trans sian hejman sojlon povis piedon
remeti aŭ flari floron de l' edzino.
Ĉar korpoj kiuj iel malaperis

ili forputris en la interkrutejoj
aŭ rojoj de l' soldatmanĝantaj montoj.

“Ĉu vi memoras kiel ĉe Angrogna ili provis invadi la Pra del Tornon sur riska pado kontraŭ montoflanko klifa? Maleblis suprengrimpi. Sub si oni povis nur fali, multajn metrojn. Antaŭen streta rokobret' proponis vojeton, por ne pli ol du marŝontaj apud la aliaj. En tiu loko multego mortis kiam nigra nubo sobgrimpis, formakulanta la laŭiron. Sur la taĉmenton la Valdanoj rokojn de supre rulis, por frakase pisti la ulojn vekriantajn. Fro antaŭe ankaŭ aŭdacis kelkaj viroj veni kaj la stomakojn de l' murdontojn haki. Ĉiuj panikis kaj kun laŭtaj voĉoj fro l' morto sur la vojo nevidebla provis refuĝi. Interpuŝiĝe multaj mortigis unuj la aliajn aŭ defalis krie en la akvon sube.”

“Jes, Abdiel, mi ankaŭ tion legis sed ne deziras vidi la detalojn de proksime. Tial, mi petas vin, eĉ pri Valdanaj venkoj nur rakontu kaj de la buĉoj mem fortenu min.”

Li min rigardis tre atente, tiam—
post momentoj—kapjesis kun suspiro.
“Almenaŭ tion la ĉiel' koncedos.

“Sed estis pliaj fojoj.

“73 jarojn
poste, alia pap’ per La Trinità
denove en 1561
provis la Valdanojn kvazaŭ trudherbojn
forsarki, por eksemi drakodentojn
kaj sange ĉi dolĉan grundon mortveneni.
Sed inter la rev’ kaj ĝia efektivigo
ankoraŭ kontraŭluktis la popoloeto
kun musketoj, pikstangoj, ŝiraj glavoj
krom preĝoj ĉielenaj, pon kreneloj
de ĉi noblaj montoj.

“La Trinità,
tiu grafaĉ’ feroĉa, fanatika,
per tri kampanjoj dum dek kvin monatoj
celumis iel breĉi tra l’ remparo
kaj ĝispenetri en la Pra del Tornon
por mortponardi la Valdanan koron.
Sed ne okazis tio.

“Li ja provis.
La lastan fojon ĉe la streta faŭko
en la fatalan valon de Angrogna
memfide li enirigis kirasulojn
super la profundego. Puŝiĝante
antaŭen, taĉmentuloj premis sin
kun zorgo kontraŭ la altega klifo
kaj tenis la piedojn sur breteto
por ne degliti kaj mortige plonĝi
en la riveron kiu sube ŝaŭmis.

“Per akra voĉordon’ La Trinità
pelis ilin ĝis ekster sia vido,
kie seso da armitaj Valdanoj
aperis, kaj subite—paf’! paf’! paf’!—

komencis kadavrigi ilin. Korp’
sur korpo konvulsie amasiĝis
kaj blokis la antaŭeniron. Dume
aliaj super ili ĉeestiĝis.
Lertpieduloj, ili fortostreĉe
grandajn ŝtonojn el la montflanko ŝiris,
derulis kaj kvaz’ strutajn ovojn kapojn
frakasis de la sub si uloj. Ŝrikoj,
ĝemoj, obtuzaj en la riveron plonĝoj.
Iuj rekuris, sed kontraŭpremis ilin
tuta arme’ ankoraŭ avancanta.
Kaj tiam ĉiuj mortontoj panikiĝis,
puŝis kaj kun kriegoj falis, falis...

“Baldaŭ la akvo, jarcenton post jarcento
travideble klara, fariĝis ruĝa
kaj fluis al la suna loko kie
La Trinità atendis. Kun kia ĝoj’
li kriis: ‘Jen la sango de l’ Valdanoj
kaj nun ni povos fine, atingante
la enan neston, ĉiujn ĉi vipurojn
ekstermi!’ Tamen tiam, anhelante,
stumblis en lian vidokampon pokaj
postrestintoj de la arme’ rompita
kiun Angrogna tiun tagon glutis.
Ĉe tio, li ekmutis kaj por ĉiam,
kun ŝtoniĝinta koro, el ĉi valoj
fuĝis for.

“Kaj sekvis intertraktoj
sen li. La dukoj de Savojo, kies
soldatojn pleje manĝis la konflikto,
preskaŭ tuj koncedis al la Valdanoj
krom paco liberecon religian.”

Post ĉi rakontitaĵo, Abdiel
kun evidenta ĝuo min rigardis.
Ĉu li deziris, ke mi kunjubilu?

Mi tamen devis desaponti lin.
“Anĝel’ vengema,” mi en mi opiniis,
forgesante, ke ĉi tiu kapablis
facile sondi mian menson. “Ol mi
pli grandan cerbon kiel korpon li
posedas. Tamen al li mankas koro!”

Riproĉe li rigardis min kaj plendis:
“Kiel ofte tra niaj multaj jaroj
kune, vi ege dolorigis min.
Ĉu vi aŭ ajna hom’, escepte de
la Dia Homiĝinto, povas—eĉ
image—sin sinkigi en paseon
kiu profunde la tutan kosmon vundis
antaŭ la kre’ de ĉi planedo via?
Tiam ni ankoraŭ lin adoregis,
la senmakulan Luciferon, kiu
spegulis la sepoblan praperfekton
de l’ Eternulo mem. Sed li mistere,
iom post iom, tentis sin, dorlote
la propran mirindecon kontemplante,
malgraŭ ke Dio lin avertis. Fine,
pro sinamo, li plongis en l’ abismon;
kaj kun si miliardojn li fortrenis
kiuj lin amis pli ol la Sinjoron.
Ho, kiel la Lumul’ fatrasigis sin
kaj multajn pli.

“Mi havis inter ili
koramikon. Eĉ nun de temp’ al tempo,
memoroponte trans la grandan fendon,

mi lin sopiras, ofte scivolante,
ĉu li forgesis ĉion. Eble restas
iuj en li spuretoj de l' amikeco
kiujn ne voris hato. Min iufoje
tentas malfido, fia opinio,
ke l' universo estas tro danĝera,
fluante al la rando de terura
kosma akvofal' kaj kun ĉiuj steloj
ni same plonĝos pon la Lumportinto
en la tenebron.

“Sed ne. Jesuo Kristo
por ankaŭ ni anĝeloj sur la kruco
suferegis kaj ambaŭ brakojn streĉis,
por relogi la misirintojn, ĉiujn,
al lia am' mistera. Sed Lucifer'
kaj la aliaj kun li forfalintoj
ne volas, ankaŭ ne povas voli plu.”

Abdiel paŭzis kaj kun man' abrupta
forviŝis larmojn. Tiam, kvaz' demande,
li turnis al mi siajn okulojn verdajn.

Ŝokite, kun pentdoloro mi murmuris:
“Tiaĵon mi ne eĉ supozus.”

Ĉe tio
lia mien' rehelis, kvazaŭ l' suno
forpelus nubon el ĉiel' lazura.”

“Mi povas do sur la rakontovojo
de ĉi heropopol' persisti ?”

“Ne.
Abdiel, bonvolu min konduki

al iu tem' alia.”

“Kial, Edwin?”

“Ilia sort' fordrenas mian forton.
Laŭ Wylie, la mizeroj de l' Valdanoj
post La Trinità refluŝis, eĉ multe
pli mave. En 1655,
jarcenton pluen, ĉu oni ne atendus
pliajn toleron, mensan enlumiĝon?
Profunde, anstataŭe, la tenebro
diable daŭris, plidikiĝis kaj
en tiu jaro resangigis ilin.
John Milton bone tion ĉi bildigis.

“Alia ‘sankta patro’, kun mens' kaj koro
ankoraŭ Mezepoke ŝtonaj, pavis
sur Vatikana trono kaj satanis.
Kaj pretis plia duko de Savojo
kies militistaro sangsoifa
pie plenumos papan ekstermemon.

“Ilia sinjoro, Karlo Emanuel',
nur milda knabo dekkvinjara, mane
de Kristina, sia patrin'—l' antaŭa
regento—iĝis murdinstrument' cedema.
Ŝin naskis Marie de Medici, fervora
Katoliko, kiun en nigra horo
edzinigis Henrik' la kvara, perfida
Protestanto cinike konvertita
al ŝia eklezio, por aĉeti
la tronon de Francujo (‘ĉu Parizo
kandelon ne valoras ?’) kaj sin vendis
al la diablo. Li krome estis ulo
malĉaste virinema, kiu difekto

antaŭpreparis lin por tiu fia
apostateco de hom' apen' principa.
Mondfine, kune kun Satano, kiu
lin tentis, la infero rostos lin.”

Pri tio, ridete, Abdiel komentis:
“Li evidente ne multe al vi plaĉas.
Malgraŭ ĉi ĉio la Francoj nomis lin
la reĝo *bona*.”

Al kio mi tuj respondis:
“Sed nur post kiam Francŭa Ravajako,
tiu freneze pia Katoliko,
ponardis lin. Henriko la mortinto
iĝis Henriko bona. Forputris poste
eĉ lia edikto Nanta, garanti'
pri Hugenoata religilibero,
kiam lia nepo, la tiel nomita
sunreĝ', per sango en malluma horo
forviŝis ĝin. Kaj tiu sama Luizo
ordonis murdon ankaŭ de l' Valdanoj.

“Al tiaj brutalaĵoj De la Chaise,
lia konfesprenanto Jezuita,
kondukis trompe, kun supoz' ke nur
per ili kiel ŝtupetar' li povos
engrimpi la ĉielon—sed kontraŭe
ili ambaŭ grincigos siajn dentojn
en fajro kiu la mondfatrason voros.”

“Sed ĉu mi almenaŭ povu detali
la eventojn de tiu jar' tragika:
1655? Misuloj tiam
ruze penetris preter la defendojn...”

“Ne, anĝelo kara, ĉesu aflikti
per ajno plu pri la Valdanoj. Mi petas,
ke ni transiru al diferencaĵo!”

Momentojn li pripensis. Tiam, abrupte,
ni forlokiĝis en alian horon.

III

Iom retrosaltinte tra la jaroj,
ni estis aliflanke de la Alpoj.
Sub ni kuŝis la lago de Ĝenevo,
kaj l’ Monto Blanka, fingro de giganto,
al la ĉielo montris. Sune varmis.
La tago estis blua. Montovange
ni sidiĝis sur herba tapiŝeto.

Kvazaŭ por respondi al mia demando
ankoraŭ nedirita, Abdiel
klarigis: “Vi jam estis tie ĉi,
en via tempo, kaj la ĉirkaŭaĵon
rekonas. Tiam Ĝenevo ja pli grandos
sed malpli gravos religie. La dato?
1530. Antaŭ unu jaro,
ĉe Marburg, Cvingli kun Germana mul’
obstina debatis pri l’ konsekritaj pano
kaj vin’ eŭkaristiaj. Kriston mem
citante, Luther sur unu fraz’ Biblia
en la Latina martelis multripete:
‘Hoc est corpus meum!’ Kaj *est*, laŭ li,
aludas la *substancon* subkuŝantan,
kaj do ne temas pri la nuraj aĵoj,
kiujn fenomene sentumoj spertas.
Pri tio li duone Katolikis,
Aristotele.

“Nin anĝelojn tio
amuzis, malgraŭ lia koleriĝ’
larmiga. En ĉi kunteksto tiu *est*
funkcias kiel kopulo, egalsigno
inter du vortoj. Tial, per si mem,
ĝi estas nura gramatikilo. Tenson
ĝi ja indikas. Semantike, tamen,
por la elektro de l’ signifo ĝi
malhavas ajnan ŝargon. En iuj lingvoj,
ekzemple la Hebrea kaj la Rusa,
la prezenco ĝin simple preterlasas.
Tial Moseo, David, Daniel,
Jesaja, Ezra, ankaŭ la Savanto,
dirus ‘mi homo’, ne ‘mi estas homo’.

“Sed, ho Edwin, mi multe pardonpetas;
mi vidas, ke mense mi strabigis vin.
Ripozon nun, eĉ dormon, vi bezonas.
Dume mi gardovaĉos, kiel ofte
tra ĉiuj viaj jaroj.”

Mi malstreĉiĝis,
oscedis kaj sub la agrabla suno
baldaŭ sinkis en tiun pretersonĝan
regionon, kie la homo perdas,
abrupte, eĉ sin mem. Sed vekiginte
post kelkaj horoj, mi ree estis mi,
refreŝiginte, kaj ankaŭ scivolema.

La sun’ jam sidis sur la horizonto,
larĝa kiel telero. Transglitinte,
ĝi lante malaperis. Tiam steloj
pikis, unuj post la aliaj, tra
la teksaĵo de l’ vespero.

“Kien nun?”

mi demandis.

Li fingromontris okcidenten.

“Kurtan distancon en Francujon, trans
la landlimon. Tamen estas destinite,
ke mi ne akompanu. Iru sola,
nerimarkote. Tia vi restos, kondiĉe
ke vi ne enmiksiĝu en tio, kion
vi vidos. Ploru, ridu, tute laŭte
se vi volas; neniuj aŭdus vin.
Nur neniel intervenu. Se jes,
vi videbliĝus, kio Luciferon
krom liaj uloj de l’ Inkvizicio
per ĝoj’ infera plenplenigus.

“Pri vi

li tute ne forgesis, sed ĉasiste
tra la epokoj postsnufas vian spuron,
fro tiu horo ĉe la sankta monto
kiam li provis kapti vin. Nenio
pli kolerigas lin, ol ke viktimoj
eskapu el inter liaj drakoungoj.”

Ĉe tio, memorante la konfronton
koŝmaran piede de Sinaj, mi ekstremis
kun hororo. “Mi petas, Abdiel,
bonvolu veni kune.”

Li kapneis.

“Tre bedaŭrinde ne. Ordonis Iu.
Vi ja sekuros. Nur ne intervenu.”

Mi tamen timis, sed Ĝenev’, la suno

kaj la protektanĝelo malaperis
abrupte. Mi ekstaris en koridoro
duonluma kun pordoj ambaŭflanke,
sciante, iel, ke malantaŭ ili
kaŝiĝas ĉambroj, kontoroj, eble ĉeloj
kaj uloj de kiuj mia kor' forkaŭris.

Tiam ekfrapis mian aŭdon voĉ'
rompita de virino, kiu ploris
proksime. Tiam, "Ne, ho ne! Ne plu!"
ŝi kriis.

Vir' basvoĉa kaj triumfa
ektondris, demandante: "Ĉu vi cedas?"

Mi aŭdis plorsingultojn, kiuj min
timeman tiris. Tra porda aperturo
malfermita, mi vidis la duopon.
En sia man' levita, li—rikana
pastro—ankoraŭ tenis instrumenton
el fero. Ŝi estis amaseto da
doloro. Sango makulis la negliĝon
sur ŝia minca korpo. Ŝi eklevis
la vizaĝon. Kun ŝok' mi ŝin rekonis:
Ria, pri kiu Henoĥ antaŭlonge
promesis la revidon. Min unue
ĉi tio paralizis, sed mi aŭdis:
"Cedi, cedi? Neniam! Sed ĉu vi—
neniu en ĉi loko terurega—
ajnon pri l' Dia amo aŭ kompatato
scias?"

"Herezulin' obstina! Ĝis nun
vi nur gustumis mian ilon. Do..."

Ĉe tiu punkto mi antaŭen saltis.
“Fripooon’!” mi raŭke kontraŭkriis lin
kaj hake suprenfrapis al li la
kubuton.

“Kio!?” li konsternis bojis.
Metalo sur betonon sonoretis,
kaj surprizite ŝi eligis sonon,
sed kian mi ne plu memoras; ĉar—
subite—man’ giganta min ektiris
sur la piedojn.

“Jen mi havas vin!”
alia voĉ’ proklamis, kaj desupre
demonvizaĝo kun enormaj dentoj
min alrikanis tre proksime, rekte
en mian vizaĝon. “Ha, vi ĝena muŝo,
finfine! Nun kun kia ega plaĉo
la Ĉef’ avide vin de mi ekprenos,
kaj vin displukos, membreton post membreto.”

Ĉe tiu ĉi momento Abdiel
alestis, ordonante: “Tamen ne,
Misaĉulár. Lin lasu!”

Li kontraŭis:
“Sed li malrajte intervenis en
la fluo de l’ eventoj—malpermesaĵo.
Tial li estas nia predo.”

“Malgraŭe
ne al vi li apartenas. Pri tio
li rajtas mem decidi, do ne plu
surmanu lin aŭ tuŝu lin denove.”

Defie la fiulo min tenadis
kaj emis kun mi flugi for, sed tiam
alfulmis ankaŭ tiu Golbo Mirjan,
kies fajran tuŝon ĉe Sinaj eĉ
la princon de l' diabloj fortimigis.

“Abdiel, vi ŝajne min bezonas.”
Kaj ĉiron li etendis. Tiumomente
Misaĉulár, min faliginte, tuj—
kun la beleta anĝelvizaĝ' ankoraŭ
kolertordita—subite malaperis.

“Dankon, kolego!” diris Abdiel.

Se strangatrajta besto kiel Mirjan
kapablus tion, li ridetus. Certe
io pri li heliĝis. Tiam, senvorte,
ankaŭ li estis for.

“Ni same iru
de ĉi loko,” anoncis Abdiel
sed kun suspir' profunda.

“Ŝin kunprenu,”
mi petegis sed sen ŝi trovis min
denove super Ĝenevo ĉe la lag'
trankvila. Mi ploradis. “Kial ne
kaj kio estos al ŝi nun?”

“Ho, Edwin,
Ne plu demandu. Ĉiukaze tio
okazis antaŭlonge. Neŝanĝebla
ĝi estas kaj vi spektinto.”

“Sed kion ili

faris al ŝi plu, mizerulino?”

“Mi diris: ‘Ne demandu.’ La detaloj ion en vi detruus. Anstataŭe rigardu tiun lagon kaj l’ venteton sentu sur via haŭto. Vi nur sciu, ke ŝi ne cedis ĝis la mort’ kompata ŝin baldaŭ liberigis en senkonscion benatan. Ripozejo tomba, ankaŭ sentomba, konservas ĝis la releviĝo far Jesuo, kiu ĉi sanktajn homojn ĝoje al viv’ eterna bonvenigos.”

Kun kor’ ŝirita mi staradis tie,
muta, dum Abdiel atendis, ĝis—
resuspirinte—li nin prenis for.

IV

Wittenberg, ho Wittenberg, ĉi tie
martelo frapis, frapis ekster tiu
kastelpreĝejo, ankaŭ sur la pordo
de mia koro—ofte riglita kontraŭ
li kiu volas interneniĝi. Nun,
kun menso konfuzita kaj kolera,
mi tute ne deziris tian gaston.

La lokon, kompreneble, mi rekonis.
Somere de 1991,
post trajnvetur’ mi kun la karulino
jam estis tie ĉi. Varmis la suno
kaj zefireto blovis kampararomojn
en nian pacon. Hodiaŭ anstataŭe
korinterne la ŝtormo furiozis.

La milda voĉ' de Abdiel ekdiris:
“Nu, ni eniru.”

“Sed tion mi ne volas!
Mi scias pri l' interna predikejo
kaj la tomboj, unu apud l' alia
de du amikoj, Luther kaj Melanĥton.

“Post la angoro, kiun mi ĵus spertis,
mi estas frakasita. Kial do
vi min alportis tien ĉi? ”

Li gestis
Al du proksimaj benkoj. “Ripozu iom.”

Baldaŭ monaĥ' alestis. Sidiĝinte,
li nin rigardis per okuloj akraj
kaj eksterordinare brilaj, ankaŭ
suspektemaj. “Fremduloj, ĉu?”

Milde,
kun dolĉa rideto, Abdiel respondis:
“Nin tiris Wittenberg, magneta urbo,
per teologi' potenca. Morgaŭ matene
laŭ onidiro Luther ekvojaĝos
pro ordono de la imperiestro
al Worms kaj danĝero. Li sendube,
tamen, al sia forta fid' atestos!”

“Sed kiel vi, de ekster nia rondo,
ĉi ĉion elspionis?” Malkontentis
la nove alveninto. “Kiuĵ vi estas?”

Mi restis muta. L' anĝelo plu parolis:
“L' informo kiel flustro sur la vento

de tie ĉi jam multajn mejlojn flugis
kaj logis nin, kiuj kredas kiel li,
ke sole fido, sole Kristo, savas—
ne homfaraĉoj.”

Tiam li ekstaris,
ankoraŭ duba, kaj ekmarŝis for.

“Li estas mirindulo!” Abdiel
entuziasmis. “Li ĉe Worms staros,
fortika kverko nefleksebla, kontraŭ
la ŝtormo de l’ papismo, kiu tie
kaj poste provos lin forblovi.”

“Pri Luther
vi supozeble tion diris, ne
la monaĥo, ĉu?”

Ĉe tio li ekridis.
“Sed estis li!”

Mi forte konfuziĝis.
“Kaj la tomboj malantaŭ tiu pordo?”

“En la futuro, jes, sed nun ankoraŭ
la du herooj de l’ Reformacio
spirante ardas.”

“Tamen, ĉi monaĥo
mincas, dum Luther estis homo dika.”

“Nur en postaj jaroj pro mismangajtoj
kaj la biero. Pri dieto sana
malmulte sciis ĉi epoko. Tial
li, kiel aliuloj, ofte suferis—

kun vivoj ne tre longaj. Bedaŭrinde.

“Malgraŭe li iris kaj ĉe Worms klinis
la akson de la religia mondo
kaj ŝanĝis ĝian tutan historion.
La papistoj ne volis, ke li venu
por pludiskuti l’ ideon tre danĝeran—
kiun instruis la Valdanoj, Wycliffe
kaj Hus—pri la donaco de pardono
sen kost’ aŭ pentofaroj, sole ĉar Kristo
sur la terura kruco pendis. Ankaŭ
ke li mem estas nia interulo
kun la ĉiela Patro, sen pentofar’
aŭ pastro. Kaj l’ multekostaj indulgencoj?
Fatraso forĵetenda!

“Papo Leo

koleris. Lin ne multe interesis
la voĉ’ de Dio, kiu el la paĝoj
de la Biblio ofte lin admonis,
aŭ eĉ torditaj dogmoj ekleziaj,
escepte kiel monfarejoj. Unu,
purgatorio, pleje lin allogis.
Ĝi estas loko kiu ne ekzistas,
sed torturado tie imagata
por karaj aŭ gepatroj forpasintaj
povus per indulgencoj enirigi
al lia trezorejo abundegon
da mono Vatikane bezonatan.
Li devis pagi Rafaelon, inter
aliaj, kiuj arte tie multe
beligis la lukse glorajn konstruaĵojn.”

Mi interdiris: “Tion mi ja legis
kaj ankaŭ pri l’ nobeldevena Albert.

Ĉefepiskopo de Magdeburg li estis
kaj pluse ĉefepiskop' de Mainz. Li krome
administris la plian diocezon
de Halberstadt. Ho, kiel pia, luksa
enspezo: oro elĉiela! Kvankam
kontraŭa al leĝo de la eklezio.
Sed la papon li povis subaĉeti
por ĉion ĉi permesi. Leo bezonis
la monon kaj la bankieroj Fugger
ĉe Augsburg pruntedonus ĝin al Albert
kontraŭ la enspezoj per la vendado
de indulgencoj liateritorie.
Riĉan rikolton promesis ĉi negoco,
ĉar Tetzl estis talenta komercisto.
Kiel sankta transakcio! Kaj ĉiuj
povus aprobi tion—aŭ ĉu ne?

“Kelkajn afliktis duboj. Unu kuraĝis
malprosperigi ĝin, ĉi Martin Luther
tro konscienca. Leo, letargia
bestio, ne tuj blekis. Sed tiam Albert
alsendis la de Luther 95
propoziciojn. Tio endanĝeris
lin, ĉar enmiksiĝi inter papo
kaj lia mono estas kiel kiam
senprudentulo iritas nigran mambon,
obstaklante ĝian reiron al sia
truo. Serpento granda, la plej venena
de Sud-Afriko, ĝi rapidas kiel
ĉevalo galopanta kaj frapmordas
plurfoje. Post dudek minutoj sekvas morto.”

“Jes ja”, rimarkis Abdiel. “Ĉifoje,
tamen, okazis alimaniere.
Memoru la promeson de l' Sinjoro,

antaŭ sia ĉielenir' ĝojplena,
ke la disĉiplojn li ŝirmos kontraŭ eĉ
serpentoj. Tial, sur l' insulo Malto,
post ŝirperdiĝo, Paŭlo l' apostolo
kaj kunuloj por fajro lignamason
kolektis. El ĝi vipura kap' ekfrapis
kaj sur lian manon mordis. Ĉe tio
la rigardantoj atendadis lian
konvulsian morton. Sed ne. Li simple
forskuis la bestion en la flamojn
kaj poste daŭrigis sian karieron.

“Tiel estis pri Luther kaj la papo,
malgraŭ ke multajn fojojn tiu ĉi,
venenajdente, provis trafi lin.

“Unue, li strebis logi lin al Romo;
sed Frederick la Saĝa ne permesis,
ke sanktaj diabloj de l' inkvizicio
estingu tie la plej brilan lampon
de lia juna universitato.
Ion tute alian li aranĝis.

“En 1518 do Luther marŝis
al Augsburg por diskuto kun legato.
Studentoj hakilportantaj, liaj protektaj
anĝeloj, akompanis.

“Cajetan,
fajra, fiera kardinal', atendis.
En la debato tiu ĉi insistis,
pri papa rajt' eldoni indulgencojn,
dum Luther sur Biblia fundamento
kontraŭbatis. Tri tagojn furiozis
homŝtormo, ofte interkriegado.

Anticipe la pap' al Cajetan
ordonis, se necese, lin aresti.
Tamen Luther, avertite, eskapis
kaj sur ĉevalo preta fro la urbo
forrajdis en la nokton.

“Pasis jaro.
Ĉe Leipzig, la konflikto reĉendiĝis,
kvankam kun malpli tondra sed subtila
profesoro, d-ro Johann Eck.
Ĉi tiu volis enretigi lin
kaj pruvi, ke li estas ‘herezulo’.
En tio li sukcesis.

“Luther neis,
ke nur la papo rajtas interpreti
la Sanktajn Skribojn, krome asertante,
ke nek pontifikoj nek koncilioj
estas neeraripovaj.

“Pro tio,
laŭ Eck, li senmaskiĝis kiel nova
Jan Hus. Ĉi sanktan homon princoj kaj pastroj
ĉe Konstanz antaŭ jarcent’ bruligis.

“Leo
baldaŭ poste ekskomunikis Luther.
La papa mambo mordis, sed per veneno
senefika,” rimarkis Abdiel.

Ni sidis tie dum la sun’ ordiske
larĝiĝis kaj sinkis trans la horizonton.
Ambaŭ kvietis sed pensadis plu,
ke kontraŭ tiu fono nun al Worms
li devas voji, malgraŭ kontraŭdir’

feroca de l' papistoj; ĉar laŭ ili
ekskomunikon oni ne rajtas
permesi sin ekspliki.

Sed aŭdis lin
l' imperiestro Karlo plus la princoj
kaj ĉiaj universitatkleruloj
ĉe la Dieto.

Malgraŭe tre influa
legato de la Vatikan' sukcesis
bari debaton pri detaloj. Luther
devis unue nur agnoski ĉu li
ja verkis la librojn antaŭ li stakitajn
kaj due ĉu li forneos ilin.

Li diris,
do, ne multon; tamen pri lia kredo:
“Se ne konvinkita surbaze de
la Sanktaj Skriboj aŭ rezonado klara,
mi ne reprenas ion ajn fro tio,
kion mi elplumigis; ĉar danĝeras
por Kristano paroli kontraŭ sia
konscienco. Mi staras tie ĉi.
Alion mi ne povas fari. Dio
min helpu. Amen.”

De Abdiel pri tio
fluis la jenaj vortoj: “Ĉi momento
skuegis la fundamenton de l' epokoj.
Per siaj sekvoj ĝi ŝanĝis la futuron
kaj por la elektitoj mallongigis
la jarojn da aflikto.”

“Kiujn do?”

Mi ne komprenis, denove, ĉi anĝelon.

“La 1260 jartagoj de
la profetaĵoj, pri kiuj mi parolis.
Jesuo, sidante sur la Mont’ Oliva,
rigardis tra la estonteco. Liaj
okuloj en jarcentar’ tenebra trovis
tenere ĉiujn siajn geamatojn.
Ŝiris ilin l’ ungega papbestio
instigadata far demonaj flustroj,
kiujn ĝi kun la Dia voĉ’ konfuzis.

“Sed Jesu’ promesis de l’ temp’ terura,
por savi siajn elektitojn, kurtigon.
Sekve fro nun, per tiu hom’ ĉe Worms,
tutaj landoj fro si la serpentegon
deskuos.

“Luther, tuj post la Dieto,
estis far amikoj eskapigita;
ĉar oni lin forkaŝis en kastelo
alta, la Wartburg. Kaj el tiu loko
fontis de li Biblitraduko fama,
por kio, parenteze, la Germanan
li faris el diversaj dialektoj,
eĉ gravan elementon unuiĝan
por nacio far Bismarck kunigota.

“La tuta Nordokcidento de Eŭropo
sin forsave ŝiris teologie
el la ĉirkaŭvolvaĵoj de la papo
kiuj sufokis la homan intelekton.
Naskiĝis el la sino de l’ futuro
potencaj imperioj Protestantaj,
eĉ unu lando eksterordinara

transatlantika.

“La aflikto granda,
por tiuj regionoj kurtigita
per preskaŭ tricent jaroj, finiĝis antaŭ
1798. Dum tiu tempo,
kiel kutime, la besti’ muskola
tre klopodis konservi sian predon,
per la Hispanaj trupoj Nederlande,
armado kontraŭ l’ Angloj, kiujn ŝirmis
vento Dia, kaj tridekjara milito.
Dum ĉi tio irigis la Sinjoro
junan reĝon el Svedujo, Gustavon
Adolfon, kiu en plej kriza horo
ekrompis multajn dentojn de l’ bestio.

“Por tion scii kaj kuraĝigi vin
mi nun alportis vin al Wittenberg.”

Sed mi, ankoraŭ trista kaj moroza,
ne povis ne memori ŝin, kies korpon
torturis en la nomo de l’ Sinjoro
eklezianoj en Francujo—aŭ
la Valdanojn.

“Abdiel, vi do deziras,
ke mi turnu vizaĝon pli ĝojplenan
al tiu futuro, for de la paseo
tenebra al la lum’ de nova tago.”

“Vi tamen devas.”

“Anĝelamiko, homo
mi estas kaj malpli ne povas esti.”

“Kaj ankaŭ tia la Homfilo. Malgraŭe
li antaŭen vidis, eĉ fro la kruc’
horora, al celo preter nia mondo
kaj milionoj da jarcentoj: ĝojon
kaj plenumiĝon de la homa raso
ankor’ neimageblan por vi aŭ mi.”

Ni sidis iom plu. En mia menso
la bildoj de la tago turniĝadis,
ĝis leviĝis la bela stel’ dunoma,
nun la vespera kaj morgaŭ la matena.

V

En arba nordorienta ŝtat’ Usona
trans tiuj tri jarcentoj ni troviĝis.
Estis la dudektria de Oktobro,
post la horo kokokria. La nokto
jam malŝaltiĝis. Ĉie la sunbrilo
sur la aŭtunfolioj la rustiĝon
de la sezon’ flagrigis, multkolore:
brunaĵo, multnuanca oro, ruĝoj.

Sed sombraj homoj antaŭ dom’ farmista
ĉi ĉion belan ŝajne ne rimarkis.
Ni staris apud ili, nevideblaj.
Mi kompreneble konis tiun daton
korŝiran. La antaŭan tagon Jesuo
ne revenis. Ĉi damoj kaj sinjoroj,
vestitaj en Dimanĉe kirkaj vestoj,
estis Mileranoj dum la mateno
de sia Granda Desaponto.

“Vilĉjo,

kio nun?” Larĝbrusta vir’ demandis.
“Ni ekde l’ noktomezo ploris, ploris.
Najbaroj ĉiuflanke mokos nin
hodiaŭ kaj dum jaroj pli. Unu,
precipe. Se Kristano mi ne estus,
mi draŝus lin per mia ĉevalvipo!”

Respondis l’ alparolito nigrhara:
“Tommy, rezistu ĉiun tian tenton.
Memoru, kion la Reven’ koncernas.
Unuaj miaj paŝoj en la vojo
de l’ granda aventuro komenciĝis
kiam la dorson mi turnis sur arbaro
plena je duboj deismaj, skeptikulaj,
al li por savo, ĝojo kaj espero
pri viv’ pli longa ol la steloj mem
kiuj dum la nokto super ni briladas.
Lin sopirante ĉiam pli, mi serĉis
tra ĉiuj paĝoj de la Sankta Libro
pri la Reveno. El la profetaĵo
en la oka ĉapitro de Daniel,
verso 14, en mian menson fulmis
la tempindikaĵo pri la mondoĉeno.
Unu Ĉielulo klarigis al
alia: ‘Ĝis 2300 tagoj, tiam
la sankteĵ’ estos purigita.’ Kiel
ni ĉiuj bone scias, temas pri l’ tero
kaj kiam li revenos.”

“Jes. Sed, Vilĉjo,
hieraŭ la tutan tagon ĝis noktmeze
li restis for. Kaj nun, mokote, ni devas
retreni nin al agroj tro konataj,
por rikolti, tede, nian nutraĵon
krom la ĉiama bestfuraĝo—ankaŭ
mallumon en niajn korojn. Io ege

misas. Ĉu l' kalkulo?"

“Amiko, ne.

Denove, dum la horoj da angoro,
mi ĉiudetale sublupeigis tiun
en Daniel 9 klarigon orŝlosilan,
kiun la alfluginta Gabriel
post la preĝo de la profeto portis
el la ĉielo.

“Tommy, atendu iom.

Aŭskultu!”

Sed abrupte li turniĝis
kaj marŝis for. Plimulto sekvis lin,
dum la aliaj en la domon iris
kun la malgajvizaĝa William Miller.

“Abdiel, ĉi aĵojn mi ne komprenas.”

“Venu. Mi klarigos sed aliloke.”

Tie ni do troviĝis. Mi ekflaris
pomojn maturajn sur apuda arbo,
maizodoron kaj, ne malproksime,
lageton. Daŭre la ĉirkaŭ mi sezono
per verdo, oro, ruĝ', oranĝkoloro
kaj flavo multnuance ravis. Ŝtipo
sidon proponis. Abdiel de tie
kun ĝoj' proklamis: “Ho mateno glora!”

Mi estis mirigita. “Desaponta”,
mi kontraŭdiris.

“Por multaj Mileranoj

vivlonga veo, konsentite. Tamen grupo grava baldaŭ malkovros, ankaŭ sur ĉi planedo, kion ĉieluloj kun la cetera universo tuj salutis per Hosana. La nodajn homojn vi baldaŭ vidos, ĉar por ĝuste tio ni ĉi-lokeniĝis. Dume ni tamen rigardu ree la Kalkulon kiu la povrajn Mileranojn alvenigis, hieraŭnokte, en amaran sperton.”

“Sed ĝi baziĝas sur erar’, ĉu ne?”

“Aritmetike, tamen, ĝi ja ĝustas. Ankaŭ la jartageco, laŭ du tekstoj de la Tanaĥo: Nombroj, la 14-a ĉapitro, la 34-a verso, plus Jeĥezkel 4, vers’ 6. Kaj historie la 490 jaroj profetitaj kun l’ okazaĵoj plene koincidas. Do restas 1810 jartagoj. Ili finiĝis—kiam? Nu, hieraŭ!”

“Jes ja, sed misiris io; Jesu’ ne venis.”

“Kompreneble, kiel ni jam konstatis. Ni tamen mun atentu tiujn homojn.”

La du figuroj marŝis puŝe inter la maizoplantoj, ambaŭ vestitaj simile al ili kiujn ni antaŭe vidis ĉe la domo de William Miller.

Unu, haltinte, ekrigardis supren

kaj genuiĝis. Komence la alia
plupaŝis malkomforte tra l' trunketoj
sed tiam, turniĝinte, staris tie.
“Amiko kara, kio estas?”

L' alia
nur plu rigardis.

Kaj ĉe mia flanko,
ĝoje, ekscitita, l' anĝela voĉo:
“Jen Hiram Edson en vizio! Tiuj
kamaradoj, survoje por konsoli,
iel, la samkredanojn, kies revon
hieraŭnokte l' inkubo mortstrangolis,
nun povos pluen kaj kunporti novan,
vivigan fidmesaĝon. Lin aŭskultu!”

Edson, malgenuiĝinte, ekkriis:
“La sanktejo purigota ne estas
ĉi mondo, sed sanktejo efektiva
en la ĉielo! Mi ĵus vidi ĝin!
Rapidu. Ni kuraĝigu la amikojn
per nova lumo, kiu la tenebron
eksunos for.”

Ili baldaŭ malaperis
el nia vido, en la historion
de l' Adventistoj de la Sepa Tago,
iĝontan mi kun ĉiuj samkredanoj.

Kaj miaflanke Abdiel murmuris:
“En la kalkulo do nenio mankis;
la eraro fontis el miskompreno.
Temas pri kiam komenciĝis juĝo
fintempa, jomkipuro de la mondo.”

“Tion mi ne komprenas, Abdiel.”

“L’ antikvaj Judoj havis, sinsekve, du sanktejojn gravajn. Unu, ekde Sinaj, la Tabernaklon. Ĝian modelon Dio al Moseo sur tiu monto montris. Tio ĉi servis tra l’ dezertaj jaroj ĝis en la promesita lando. Poste, por pli ampleksa mirindejo, kiam reĝis Salomono, li ree montris al David la desegnon.

“La konstruaĵo enhavis, kun vual’ intera, du apartajn ĉambrojn. La unuan, nomitan la Sanktejo, la pastroj eniradis tagon post tago kun propeka sango ekstere, ĉe la buĉaltar’, verŝita. Sed en la dua, la Plejsanktejo, brilis la Kesto de la Interligo. Interne nestiĝis ŝtontabeloj kun la Dia Leĝo. Super ĉi tio glime kuŝis kovrilo ora de la kompatemo, kiun, kvazaŭ kontemple, rigardadis du kerubfiguroj; kaj inter ili sunis okulblindige lum’ kie loĝis ĉeesto de la Plejaltulo. Tien, dum ĉiuj tagoj de la jar’ neniun ordinarulo povis penetriĝi, krom la ĉefpastro—nur en unu tago kun sango kaj incens’ por obskurigi la tiean gloron. Sur la kovrilon li ŝprucigis gutojn de l’ buĉofero. Tiel renkontis Dion, sole per li,

pekintoj Izraelaj, kaj pardonon
ekhavis—sed ĉiam nur per sangoverŝo.

“Por Judoj ĝi estis tago de aflikto
kaj fasto, ĉiujara juĝo. Nun
la jomkipur’ ankoraŭ tia restas,
sed nur per piaj preĝoj kaj sen sango—
ĵetitaj vane en la venton, ĉar
per la krucumo de l’ mesio kaj
la templodetruo, buĉoferoj ĉesis.

“Tiu sanktej’ antikva, tiu templo,
estis tipoj, konsistigantaj kvazaŭ
konkretan profetaĵon pri l’ ĉiela
ofico de Jesuo. Li jam iĝis
la pekofero por la homa raso
kaj, ascendinte al la Patro, estas
homdia interulo. Krom la Savanto
neniun alian ĉefpastron la ĉielo
bonvenigus. Eŭkaristiaj preĝoj
de pap’ impertinenta aŭ pastro tial
ne povus mese tien suprengrimpi.

“Al nobla Hiram Edson tion hodiaŭ
rivelis la Sinjoro; kaj amikoj
konfirmos, profunde en la Vort’ fosantaj.

“En tiu 22-a de Oktobro,
1844, ĉefpastro nia,
Jesuo, antaŭ la eterna Patro
komencis por la tuta tero finan
fazon. Anĝelo, kiu mezĉiele,
laŭtvoĉe en l’ Apokalipso flugas,
proklamas: ‘Timu Dion kaj donu al li
gloron, ĉar venis la hor’ de lia juĝo.’”

Mi interrompis lin: “Sed, Abdiel, ekzakte kiel tiu teksto montras al la Jesua ĉefpastreco aŭ la enĉiela plejsanktejo? Eble apartas tiuj ĉi ideoj. Do por mia mens’ malnodu la problemon.”

“La Epistolon al la Hebreoj legu pri la ĉielsanktejo kaj l’ Sinjoro antaŭ la Patro por vi propetanta.”

“Sed ĝi lozas rilate al la juĝo kaj ne ligiĝas kun specifa tempo.”

“Vi pravas, Edwin. La Apokalipso, tamen, ĝin precizigas. Legu la finon de la dekunua ĉapitro kie trumpetas tiu sepa, lasta anĝelo de l’ tera homdestino. ‘Furiozis la nacioj’—kiel okazis dum la dudeka jarcento. Ankaŭ de Dio ‘venis kolero, kaj la tempo de l’ mortintoj por esti juĝataj kaj la tempo doni la rekompencan al Viaj servistoj, al la profetoj, kaj al la sanktuloj, kaj al la timantoj de Via nomo.’ Krome, ‘la detruantojn de la tero Li pereigos.’

“Sekvas tuj poste jena verso: ‘Kaj malfermiĝis l’ enĉiela templo de Dio, kaj vidiĝis en Lia templo la kesto de Lia interligo. Fariĝis fulmoj kaj voĉoj kaj tondroj kaj tertremo

kaj granda hajlo.’ Edwin, tiutekste
la Biblio en la Greka ne diras
hieron, ĝia ordinara vorto
por templo, sed *naos*, l’ interna ĉambro—
la Plejsanktejo! Jen la jomkipuro,
la enĉiela juĝo de la mondo.

“Tion instruas l’ Adventistoj de
la Sepa Tago. Ĝi estas, efektive,
ne nur doktrin’ sed daŭra profetaĵo,
ke post ĉi ĉio la Sinjoro venos,
kiel la Mileranoj antaŭdiris.”

Mi mutis, konvinkite.

Li aldonis:

“Tamen estis tubero en l’ afero.
Laŭ unu el la Ordonoj, la Sabata,
Dio insistas pri ripozo plena
en ĉiu sepa tago de l’ semajno.
Sed Mileranoj, kiel Protestantoj
entute, Dimanĉe al diservoj marŝis,
kiam kirkuroj per siaj sonorilaj
langoj vokis—dum la Sabatoveron
dorlotis en Usono nur obskura
eklezieto ĉiam pli ŝrumpanta,
la Baptistoj de l’ Sepa Tago.

“Antaŭ

1844, vidviniĝinta
Rachel Oakes, kun ili ĉe Verona,
en la Novjorka ŝtato, unuiĝis.
De ili ŝi akceptis la flagretantan
torĉon al estingiĝ’ proksime. Ĉiam
pli ame, ŝi vartadis la flameton,

sed baldaŭ kun filino devis postmigri
sian ambaŭan ĉiutagan panon
ĝis Vaŝingtono de la Novhamŝira
ŝtato. Sed tie mankis samkredanoj
pri la ripozotago. Tial ŝi
membrigiĝis kun la pia Fratar' Kristana,
kies diservojn Dimanĉe ŝi frekventis.

“Komence ŝi neniun povis varbi
el tiu grego de l' Sinjoro. Ili
estis Mileranoj sen intereso
por tia ĉi demando. Ĉies okuloj
fokusis sin sur la Reven', laŭ ili
baldaŭa. Tiam, tamen, predikanton
Metodista-Episkopalan, Frederick
Wheeler, Mileranon, ili invitis
por alparoli ilin. Li kun anĝela
elokvento klarigis pri la Dek
Ordonoj, kiujn ĉiu vera Kristano
devas, kun Dia help', observi. Rachel
aŭskultis kvaz' en tranco, surprizita.
Post la prediko ŝi al sia hejmo
invitis lin por te' kaj teologio.

“Ŝi lin demandis, ĉu li fakte kredas
pri ĉies daŭra devo plu obei
al tiuj Dek Ordonoj. Li fervore
jesis, kaj ŝi: ‘Mi ankaŭ. Tamen diru,
pastoro, kial vi el ili unu
profanas?’

“Konsternite, li respondis:
‘Kiun?’

“La kvaran. Ĝi postulas klare

ripozon en Sabat', la sepa tago,
ne en Dimanĉo, la unua tago
de la semajno.' Momento sortgraveda.
Ŝia admon' lin trafis kiel duŝo
glacia aŭ martelofrapo inter
la okulojn. Longajn momentojn li
sidadis. Tiam li elbalbutis ion
pri plustudado de la temo. Ŝi
afablis. 'Serĉu do, sed mi jam scias
kion vi en la Sankta Libro trovos.'

“Kion?”

“Nenion—krom ke la Sinjoro,
tra la epokoj konstantul', neniam
sian Leĝon ŝanĝis. Ni ĝin obeu.’

“Frederick Wheeler, vera hom' de Dio,
kvaz' ŝtoniĝinto fiksrigardis kaj tiam
malfermis pezajn lipojn por promesi
honestan konsideron. Tion farinte,
li al la Frataro prezentis sian
unuan predikon pri l' Sabatripozo
la 16-an de Marto dum la jaro
1844, do sep monatojn
antaŭ la Granda Desaponto. Tiel
li la torĉon pliheliĝantan prenis
de Rachel kaj pluportis.

“Plian frukton
de ŝia strebo post la Desaponto
ŝi plukis kiam ankaŭ William Farnsworth
al la Fratar' deklaris, ke la sepan
tagon li akceptis, kaj tiam Cyrus,
lia frato—kiu eĉ edzinigis

Delight, filinon de Rachel.

“El tiu rondo
la flam’ plukreskis, atingante pliajn
eksmileranojn, James kaj Ellen White,
kun arda fervorulo, Joseph Bates.
Al la Sabatovero tiu ĉi
konvertis Hiram Edson, kies vizio
malŝlosis por iliaj mensoj tiun
misteron de l’ Sanktejo—kun la Kesto
Interliga kaj en ĝi Dia Leĝo,
la Dek Ordonoj, kontraŭ kiuj dum
la enĉiela juĝo ĉiu estas
mezurata.”

Aŭdinte tiujn vortojn,
mi ekstremis, sed Abdiel konsolis.
“Sed ne forgesu pri pardono. Jesuo
antaŭ la tron’ eterna por vi pledas:
‘Mia sango, Patro, ho mia sango!’

“Sed la spiritaj posteuloj de ili
kiuj mokis la Mileranojn ankaŭ
pri ĉi eksplik’ ŝajnigas amuziĝon,
nomante ĝin fatras’ teologia.
Ili malamas la Ordonojn, ĉefe
la Sabaton. Ilin teruras l’ ideo
pri juĝ’ surbaze de la Dia Leĝo,
kaj prave; por kontraŭuloj li revenos
kiel subita fajro kiu ilin
konsumos, mondfinan stoplon postrikolte
senvaloran.”

La roĵo de l’ anĝela
voĉo ĉesis, sed miamense flustris

ankoraŭ eĥoj, kvazaŭ el folioj
en ĉi loko kaj horo susurantaj.
Super la gloro de l' aŭtunkoloroj
la suno pli leviĝis. Zumis tarda
abelo, dum mi de apude flaris
flavan floretan.

Abdiel denove
parolis: “La ĉirkaŭaĵo ege plaĉas,
ĉar ankaŭ tien ĉi sankteco tuŝis.
Sed ni devas supozeble foriri,
malgraŭ ke l' koro estas plurestema.”

Kaj tiam li kantis. La voĉo kaj muzik'
ekzaltis, kvankam tiajn mi neniam
antaŭe aŭdis, en skalo neludebla
sur pianoklavoj de nia tero.
Unuigita kun aŭtunodoroj
l' incens' de lia laŭdo supren fumis.
Apenaŭ en ĉi lingvon tradukebla,
ĝi iom pri l' Handela *Haleluja*
memorigis aŭ tiu lasta strofo
de poemo far Vondel ekstazita:

Sankta, sankta, trifoje sankta,
al Dio estu la honoro.
Sen li estas sekur' nenie.
Sanktas la Leĝo de l' Sinjoro
kaj genuigas en adoro.
Lian misteron profundegan
ni tial diskonigu ĉie.
Ĉiu faro aŭ vort' admona
de Dio fine estas bona.

VI

Fro tiam ni eksaltis pli antaŭen
en posttagmezon friskan, sortgravedan,
de Februar' 1929,
je l' dekunua. Jen antaŭ ni palaco,
la Laterana. Pompis apud ĝi
la katedralpreĝejo bazilika
de Romo. Ĉi palaco presk' jarmilon
estis la kuŝejo de l' pontifikoj.
Por papaj provoj superregi ĉiujn,
per reĝoj, imperiestroj, prezidantoj,
ĝi estis la nigraj kor' kaj cerbo. Nur nelge,
post ekzil' en Avignon, ili devis
grake transflugi al la Vatikano—
por plue predi.

Sed laŭ Abdiel
hodiaŭ ĉi antikva loĝoloko
re-almagnetis la dekunan Pion
pli-malpli bankrotan.

“Tie, interne,
subskribas nun Benito Mussolini
kaj l' pontifika ŝtatsekretario,
Gasparri, serpentruza kardinalo,
traktaton kiel ankaŭ konkordatton.
Tuj poste telefonita papo Pio
super la Sankt-Petra placo kun ĝojo
surbalkoniĝos, por beni homamason—
l' unuan fojon ekde 1870,
kiam la nova Italuj' formordis
por ŝmace gluti Romon, la porcion
lastan kaj plej bongustan, kiu restis
ankoraŭ de la multjarcenta papa

ŝtato.”

Leginte tion, mi rimarkis:

“Nu, tiuj dokumentoj gravis. Tamen
l’ afero iĝis historie svaga.
Eĉ la fian nomon de Mussolini,
faŝista diktatoro, multaj jaroj
jam presk’ forviŝis el la mondmemoro.”

“Edwin, tio supraĵas. Siatempe
la Katolikaj fervoruloj, ankaŭ
aliaj, kiel Nino Lo Bello, tute
alie taksis lin. Ĉi tiu aŭtoro
diris, ke por la Vatikan’ *il Duce*
faris—hodiaŭ—‘pli ol ajna homo,
klerul’ aŭ papo de l’ tuta historio.”

Mi preskaŭ ridis. “Kia pufa vantul’
li estis, grasa, orgojlema, sed
nur sako plena de vento; kaj vivfine
la akrapinta partizana kuglo
krevigis lin kun ĉiuj liaj revoj.”

“Rilate la faŝistreĝimon, jes,
sed por la Katolika eklezio
la avantaĝoj ĝis la mondfino
fruktos.

“Do en ĉi Februara tago
li ludas, kvazaŭ dum Kristnasko tarda,
la rolon de Sankta Nikolao. Li
alportis sakon plenan je donacoj,
kvankam interŝanĝe la pontifiko
agnoskos Italujon kiel landon.
Aldone l’ episkopoj devos ĵuri

lojalon al li kaj la Faŝista ŝtato.
Pio ankaŭ akceptos la forigon
el la parlamento de l' Populara
Partio Katolika, kies membroj
iĝos Faŝistoj. Tiel Mussolini
sin komplete diktatorigos.

“Ĉi ĉio
kompreneble malplaĉos al la papo,
sed li kaj liaj konsilistoj kredas,
ke la Faŝismo baldaŭ elĉerpigos,
kion frape pravigos la malvenko
kaj fia de Mussolini morto dum
la post nelonge Dua Mondmilito.

“Kaj Pio nur kvar jarojn ekde nun
en nigra Julio, 1933,
ankaŭ kun sia samkredano Hitler
konkordatos. Tio murdos la jam
malsanan Weimar-respublikon. La papo,
same kiel en Italujo, mem
distranĉos la gorĝon de ĝia Katolika
parti' tro demokrata. Ili kune
fortrenos el la Reichstag la kadavron.
Tiel Hitler ekhavos la plimulton
de l' voĉdonoj tie. Kaj baldaŭ poste
pacon li mortponardos, sangigante
la planedon. Imagu vian mondon
sen ĉi bestio, se tiu respubliko
iel resaniĝus. Ho, mankus tiom
da tomboj, ŝpatomordoj en la grundon
por korpoj de junuloj—ankaŭ unu
kiu englutis vian fraton Lucas!”

Ĝi estis hor' ĉarnira. Sur ĝi turniĝis

du futureblecoj alternativaj.

“En tiu jar’ subskribos por la papo
Eugenio Pacelli. Li admiras
Germanujon. En la militojaro
de 1939 li fariĝos
Pio la dek-dua. Li pleje, fie,
mutos pri l’ abomenindaĵoj kontraŭ
la Judoj. Malgraŭ tio, multaj ofte
en lia eklezio deziregos
lian sanktuligon, kiel ankoraŭ
dum la jaro 2014.

“Ni tamen
revenu iom al la deknua
Pio, Mussolini kaj la subskriboj.
Hodiaŭ el ĉi ties fontoplumo
fluos la eta ŝtato Vatikana,
kvankam *il Duce* tri monatojn fro nun
en la Ĉambro de Deputitoj moke
blagos: ‘La potenco teritoria
de la papo tie ne reviviĝis.
Ni enterigis ĝin’. Sed estos li
kies korp’ forputros dum la pontifiko
konservos ĉi donitaĵojn. Unu donaco
lin ankaŭ tre riĉigos.”

Mi gapis. “Kiu?”

“Ni devas konsideri tion per iom
ampleksa enkadrigo de l’ aferoj.
Sed unue, kiel aliaj ankaŭ
atendantaj, ni sidu tie, piede
de l’ obelisko. Rimarku kiom papoj
amas ĉi ŝtononadlojn ĉielenajn!”

Okule mi mezuris ĝian alton.
“Sed kial?”

“Jam l’ imperiestrojn fascinis
Egiptujo kun ĝiaj faraonoj
laŭdire diaj. Ankaŭ ilin logis
Satano trinki el pokal’ venena.
Pro tio multaj mortis kiel hundoj
aŭ baraktis en marĉo de mizero.
Se vi traserĉus Romon, vi malkovrus
ok obeliskojn ankoraŭ sub ĉi suno
en tiu temp’ alŝipigitajn, ekde
Aŭgust’ Cezaro. Li estis adorenda.
La tria imperiestro, Caligula,
eĉ pli. Li nomis sin la Nova Suno
(*Neos Helios*) kaj tre insistis
pri sia dieco kvazaŭ faraono.
Li regis l’ imperion malpli ol
kvar jarojn. Post evento sporta, grupo
da gvardianoj per pli ol tridek pikegoj
ĉi dion, ŝrikegantan, mortponardis.
Sed antaŭ tio li sadisme murdis,
ombre de sia obelisko, centojn
da Kristanoj.

Ĉi tiun fiobjekton
Siksto la kvina 1500 jarojn poste
movis multrimede, interalie
per granda ŝvitelspez’ de mil laborantoj.
Ĝi nun fiere ĉe l’ Vatikano pompas
en la placo de Sankt’ Petro. La papo
supozeble volis celebri tiujn
martirojn. Tamen, nu, la pontifikoj
amas obeliskojn.

“La sama Siksto
ankaŭ ĉi tiun fro l’ Circus Maximus
alportigis ĝis apud la palaco
Laterana, kiun li rekonstruis.
Ĝi estas la plej alta en la mondo.”

“Impona,” mi murmuris. “Sed, Abdiel,
precize kial papoj tiel ŝatas
la obeliskojn? Pri l’ imperiestroj
mi komprenas. Faraonimitantoj,
ili same soifis la diigon.
Ĉu vi sugestas, ke ankaŭ pontifikoj...”

“Precize! Kaj la apostolo Paŭlo
ĝuste ĉi tion antaŭdiris.”

“Kie?”

“En lia dua epistolo al
la Tesalonikanoj, ĉapitro du.
La Greka tekst’ originala hele
klaras, kiel suna maten’ sennuba.
Ŝteliĝos laŭ Paŭlo, en la eklezion
mem, apostatiĝ’ konsterna, per ulo
‘kiu sidos en la templo de Dio,
sin elmontrante kvaz’ li estus Dio.’
La granda apostolo nomis lin
la *ánomos*, la senleĝulo, kiun
Jesuo, revenante, neniigos.
Paŭlo ankaŭ skribis, ke la mistero
de l’ *anomia*, la senleĝeco, jam
en lia temp’ moviĝis, kvankam io
tiam ankoraŭ baris la pluiron...”

Mi kontraŭis: “Konata argumento de iuj Protestantoj. Sed ne mankis al la papismo leĝoj. Efektive en ĝia sistemo de kanonleĝaro ili abundas kvazaŭ ranoplago, kiel tiu iam en Egiptujo.”

“Malgraŭe la papoj sur la Dia Leĝo de Dek Ordonoj fekis.”

“Ĉu vere? Kiel?”

“Vi povas tion flari en la libroj Katolikaj, precipe katekismoj. Nur la tekston de la Biblio mem ili ne kuraĝis korupti. Tio estus reklam’ tro kruda pri la faritaĵo.”

“Bonvolu diri plu.”

“Plej okulfrape la Dua Ordono, strikte kondamnanta adorkliniĝojn antaŭ la idoloj, estis elstrekita, kaj ankaŭ multo de la Kvara pri la Sabatripozio. Ĉi-kaze la friponoj viŝis for la difinon, ke ĝi estu la *sepa* tago de l’ semajno, plus ĝian prakialon, ke Dio ĉion kreis, ankaŭ vin homidojn. Tial per Sabatripozioj vi lin celebru. Sed la *ánomos* por tio ĉi Dimanĉon substituis, la *dies solis* de l’ Sinjor’ Mitrao—sundio. La fortranĉoj tro videble reduktis la sanktan Leĝon al naŭ ordonoj.

Do por plenŝtopi l' embarasan truon
la falsistoj amebigis la Dekan
kontraŭ fideziroj por io ajn
apartenanta al la proksimulo.
Ĉi tion ili fendis per duigo:
'Vi ne deziru de la proksimulo
l' edzinon' kaj 'liajn aĵojn ne deziru'.

“Dio ne rekte verkis la Bibliion;
ĝin peris homoj. Unu parteton, tamen,
li mem aŭtoris sur la ŝtontabeloj,
ne en angul' obskura sed ĉe Sinaj,
kaj laŭtvoĉe fro l' sankta mont' proklamis.
Kion viasupoze li opinias
pri, kaj ĉe la Reveno faros al,
friponoj kiuj aŭdacis fuŝredakti
lian plej specialan Skribon?

“Iam

pro la idoloj kaj Sabatolezoj
dek tribojn de l' antikva Izraelo
li el ilia nordo forbalais
kaj per la Babilona skurĝo ankaŭ
Judujon el la sudo, samsevere,
pelis. Jerusalemo, kun la templo
mirinda, tute ruiniĝis. Ĉi Judoj
devis dum sepdek jaroj de tiuj pekoj
en la lando inter la du riveroj
saniĝi, kvaz' lepruloj. Nur post tio
la Sinjoro rajtigis la reiron.

“Nuntempe ĉi afero plu skandalas
kaj feke fetoras ĝis en la naztruoj
de l' ĉieluloj. Tamen jen atentu.”

Subite sonoriloj kune kantis,
kolomboj suprenflirtis, kaj alestis,
ĉe la pordego antaŭ ni, la verda
kaj luksa limuzino. Kvar gardistoj
elsaltis. Mussolini, post saluto
al figur' kun bele skarлата vesto
kaj ruĝa ĉapo, peze en ĝin grimpis.
Tiam la veturil' mallaŭte startis
kaj kun li al la futuro glitis for.

Malaperis ankaŭ la scivoluloj
ĉirkaŭ ni. Ni do poste restis solaj.

Tiam la voĉ' de Abdiel leviĝis
denove. “Nu, mi elujigu pli
de la trezoroj per kiuj Mussolini
la papon, presk' bankrotan, ĵus riĉigis.
Unue la eklezi' Romkatolika
estos por Italujo oficiale
la sola religio. Geedziĝoj
validos se en ĝiaj kirkoj. Ĉiuj
infanoj de la ŝtatlernejoj devos
el ĉi pokalo sorbi ĝiajn falsojn.
Kaj kiu pagos? L' Itala registaro.
Ankaŭ la salajrojn por ĉiuj pastroj
en la tuta lando, ekzemple dum
1975, almenaŭ 30,000—
nutrataj el ĉi sama porkotrogo.”

Malgraŭ ke la informoj tre mirigis,
mi protestis: “Sed, Abdiel, ĉu vere
ke ilin ĉiujn vi konsideras *porkoj*?”

“Ne tion mia metafor' sugestas.
Kelkaj, kiel ĉiam tra la epokoj,

estas homoj sanktaj, kiuj ne scias,
honeste, ke ilin regas l' Antikristo.”

Kontenta, iujn sekundojn mi silentis
sed tiam, scivolema, pridemandis:
“Do tio estas de Pio la riĉigo
al kiu vi aludis?”

“Ĝi koncernis
eĉ multon, tre multon pli. Mi jen detalu.

“Fro la jaro 1798
kiam Berthier ekzilis Pion la sesan,
por tiel senkapigi la papismon,
ĝia ŝtato baraktis, eĉ por spiri
kaj en 1870 sufokiĝis,
ŝajne mortante. Tiam la naŭa Pio
en profundojn de l' Vatikano fuĝis
kaj ne plu montris sin al fideluloj
ekster ĝiaj fenestroj. Same postaj
papoĵ. L' Italuja pitono preskaŭ
ilian tutan ŝtaton mortasfiksiis.
Sed lastmomente Mussolini de tio
peceton respirigis. La pontifiko
fariĝis reĝ' denove, la Vatikano
landeto suverena, kune kun
diversaj lokoj eksterteritoriaj,
ekzemple ĉi palaco, baziliko
kaj obelisko, gigantofingro kiu
montrante supren postulas la ĉielon.

“Por la perdo de la iama papa
ŝtato *il Duce* donis en kontanto
l' ekvivalenton de 90 milionoj
da dolaroj, 150 milionoj

pli en obligacioj registaraj
kaj liberigon de ĉiu ajn imposto.

“La pontifiko havis siaserve
financan magiiston, Bernardinon
Nogaran. Per nigraj artoj de la borso
dum unu jardeko li ĉi tiun sumon
transmutis en miliardojn.”

“Kiel?” Mi miris.

“Malpli ol naŭ monatoj ekde nun
ekonomicunam’ la teron trafos.
Du tagojn antaŭ ol ĉi Oktobro
finspasmos, la Usona bors’ kolapsos,
kaj monde katastrofa depresio
senlaborigos grandajn homamasojn.
El ties buŝoj ĝi subite ŝiros
la ĉiutagan panon. Mortmalsato
ilin konfrontos, sed Nogara, lerta,
ridetos, kunfrotante siajn manojn;
ĉar prezoj plonĝos. Multaj komercejoj
simple bankrotiĝos. Ilin la kriz’
englutos, dum aliaj ĉar solventaj
supervivos, sed kun akcioprezoj
draste malaltigitaj.

“Nogara tiam
investos, en Italujo, ankaŭ trans
la Alpoj. Ĉe l’ komenco de la Dua
Mondmilito li multon el ĉi havaĵo
sekure transmariĝos al Usono.
Tie, per la armila fabrikado,
ĝi riĉe rikoltos.

“En Italujo estis
du bankoj kun kuriozaj nomoj.
Kune ili fariĝis partoj de
la oktopodo, kies tentakloj poste
la mondon ĉirkaŭbrakos. Unu estis
la Banko de l’ Spirito Sankta. Ĝin
heredis de siaj antaŭuloj Siksto
la kvina, l’ obeliskamanto kies
memoro tiom al ĉi lok’ kroĉiĝas.
Tiun titolon blasfeme pian al li
ĝi ŝuldis. Poste ĝi kaj la Bank’ de Romo
kunfandiĝis sed restis por la papoj
kara. L’ alian oni nomis ne banko,
sed Institut’ por Faroj Religiaj.
Tamen publik’ pli honesta ĝin titolis
la Banko Vatikana.

“En Oktobro
ĉi-jare vi jam kvin monatojn kuŝos
en la utero. Tiam la ĉielo
min jam asignis por estadi via
gardanĝelo tra iom longa vivo
dum temp’ terura kaj danĝeroplana.”

“Ĝis kiam?” mi demandis.

“Mi ne diros.
Escepte de zorgplenaj ekzekutotoj
ne estas permesate al la homoj
koni la manieron aŭ la horon
de sia morto.”

“Abdiel, mi petas.
Kial ne?”

“Ĝi estas afero flanka
kiu ne tuŝas nian nunan temon.
Mi simple diru, ke ĉi-speca scio
aldonus al la ŝarĝo de mizero,
kiun la homa raso portas—ankaŭ,
ke pro planoj siaj Dio ne volas.”

“Tamen...”

“Ne, Edwin, eĉ ne vorton plu!”

“Almen’ ĉi tion diru: Ĉu vivfine
li min kalkulos inter la feliĉaj?”

Triste nubigis al li la vizaĝo.
“Mi estas nur anĝelo. Por ankaŭ mi
la Patro certajn aferojn forvualas.
Mi esperante kaj laŭeble provas
protekti vin kaj gvidi sur la vojo
kiu kondukos ĝis la oraj stratoj
de l’ nova Jerusalemo.”

Min stringis timo.

“Ĉio do malfortas! Malgraŭ strebado,
inferofaŭko eble min atendas.
Mi faru...kion?”

“Memoru de Jesuo,
kiu vin sur la kruc’ por si aĉetis,
averton kaj promeson specialajn:
‘Abundus *anomia*—senleĝeco.
La amo de l’ plejmulto malvarmiĝos,
Sed kiu ĝis la fin’ eltenos, tiu
estos savita.’ Dume la ĉielo,
ĉion provadas—eĉ gvidante vin

per ĉi vojaĝo eksterordinara
trans spacotempan maron, kun malcertoj,
ŝtormoj kaj rifoĵ—por konduki fine
al la haven’ de paco sopirata.

“Kiom mi jubilos ĉe la Reveno,
se vi en tiu tombejo de McAllen
vekiĝos aŭ, ankoraŭ viva, soros
por ĝoje renkonti lin en la aero.
Veninte, li rikoltos siajn garbojn
por grenejo en kiu neni’ pereas.
Sed kiom da larmoj por la gardanĝeloj
atendantaj, malcerte, la reviviĝon
de vartitoj kiuj dormos jarmilon
pli, ĝis damno kaj l’ neniiga fajro.”

Li turnis sombran kaj malsekan vangon.
Tiam, abrupte, ni alihoreniĝis
el Italujo en la futuron for.

VII

Post kelkaj sekundoj, aŭ ŝajne, ni ekstaris
antaŭ alia bela konstruaĵo,
la kapitol’ ĉefurba de Usono.
Tuj, per siaj aŭtomobilmodeloj,
ĉi tiu periodo sin reklamis
esti la mia. La tempon Abdiel
precizigis kiel 2017.

Mi do murmuris: “Centa datreven’
de kiam la pacama majstro mortis.
Samideanoj nomis ĝin la jaro
de Zamenhof.”

L' anĝelo seke tuis.
“Ankaŭ la jar' de prezidento Trump,
la mense malkohera, krom la jaro
dum kiu lerta Jezuita papo—
laŭdinte Luther—unu grandan fiŝon,
hokitan tra la lango, en triumfo
trenas al sia Vatikana kajo.
Francisko kun aliaj kuiristoj
ĝin pretas tie unue senkapigi
kaj poste en la pato friti. Tiam,
ŝmaclipe, ili ege frandos ĝin:
la mondfederacion de l' Luteranoj.”

Tio min mistifikis. “Abdiel,
vi ŝercas, ĉu?”

Malĝoje li kapneis.
“Hodiaŭ en Romo, l' unuan de Aprilo—
la tago de stultuloj—la ĉeful'
en la Vatikana fako por aferoj
ekumenaj apud la pap' fieris.
Ili anoncis aktualigitan
reskribon de kvinjarcenta historio,
laŭ kiu Protestantoj *egale* kun
la Katolikoj kulpas je la murdoj
kaj eĉ militoj pro la diferencoj
teologiaj de la pasinteco.
Ankaŭ grava trompito Luterana
aŭskultis kaj fiksrigardis fiŝokule
kun kor' mortinta.

“La ĉielo juĝas
tute alie. Antaŭ 500 jaroj
Luther fervore fiksis la tezon
kontraŭ indulgencoj sur tiun pordon

kastelokirkan. La profundmordantaj najloj frapiĝis ankaŭ en la cerbon de l' deka Papo Leo monavidan. Li devis pagi Renesancartistojn, lerte kaj multekoste beligantajn la novan Sanktan Petron. Por enspezi li vendis biletojn el Purgatorio (kiu ne ekzistas), por ke spiritoj de la mortintoj (kiuj same ankaŭ ne ekzistas), el ĝiaj turmentoj fuĝu.

“Post duonjarmilo tiu batado de la martel’ Luthera pleje iĝis obtuza, pro la tempdistanc’ apenaŭ aŭdebla. Jam tro multaj mortidevaj generacioj kiel herbo kreskis, velkis, forpolviĝis. Por ĉieluloj senmortaj, tamen, ĝi ankoraŭ laŭtas kiel dum ĵusa posttagmez’ antaŭa.

“Sed ankaŭ sciu, ke la papbestio havas memoron longan krom apetit’ enorme ambicia, por engluti kaj fordigesti la Reformacion; ĉar novajn Mezepokojn ĝi sopiras—futuron nigran kiel la paseon.”

“Tamen, Abdiel, la pap’ Francisko almenaŭ pro fioj kontraŭ la Valdanoj pardonpetis.”

Sed ironiridete respondis la kunulo. “Rozbukedo por unu tombejo de la historio en kiu putras, buĉite, milionoj.

Rimarku, ke li tamen ne kondamne
nomis specifajn pontifikfriponojn
aŭ eĉ atentis murdojn unuopajn
kies sango ankoraŭ gutas, gutas
en la mens' de Dio. Ne. Tiu ulo
tre Jezuite nur deziris bildon
ekumene plaĉan, por logi iel
planedon en la papan ĉirkaŭbrakon.
Sed la ĉiel' memoras, malestime.

“Feroce kario de la papoj
tra la epokoj lasis sangan spuron,
ruĝe dementante ĉiujn pretendojn
pri l' apostolsinsekvo, unuescepte:
ne de Petro sed l' apostolo Judas—
la filo de perdiĝo, laŭ Jesuo.”

Silentiĝinte por digesti tion,
mi vortojn retrovis. “Sed bonvolu diri
kial ni flugis ĝuste tien ĉi.
Vi ion sugestis pri la stranga Trump,
en kies kapo certe mankas klapo.”

“Ne tiom malrespektu lin! Li estas
malgraŭe, per balot', sanktoleita
reĝo de tiu ĉi enorma lando.”

Mi indigniĝis. “Stultuloj por li voĉdonis,
ne mi!”

“Mi scias. Tamen konsideru
ĉu stultis la plejmulto de Usono?
Ilin cetere svingas la ekstretoj
ĉiamaj de ĉi lando: la jinjango
ekonomia, interluktigante

la du partiojn, nome Demokratojn
kun em' Socialista ekspluatanta
la riĉulojn, kaj la Respublikanojn,
kiuj malamas ĉiun tendencon tian.
Unu emfazas komunumajn rajtojn
ekscese; l' alia, la individuon
kiu rabeme predas por si mem,
sen amo al la proksimuloj. Ĝi
en ambaŭ partioj mankas, egoismaj
egale, kiel Marx kaj Donald Trump.

“Ni ĉiukaze lasu tiun temon
por noti pligravaĵon. Senskrupuloj
Trumpon manipulas. Pri teologio
li tiom scias, proksimume, kiom
tiu katino kiu ĉiunokte
sur vian liton saltas, streĉas sin
kaj nur ronronas.”

“Kiel Rosmareno?

Vi min amuzas!”

“Ridu, se vi volas.

Sed Evangeliuloj ekumenaj
dum la elekto promesigis lin,
ke por apog' ilia li disrompu
la muron inter religi' kaj l' ŝtato.
Vicprezidento Pence, politikisto
sperta kaj lerta, same emas—iam
sin nomis evangelia Katoliko.
Rome ĉi ĉio estas papoplaĉa.

“Antaŭ jam pli ol cent kaj dudek jaroj
la Adventista profetino skribis,
ke unuiĝos en Uson' la ĉefaj

eklezioj Protestantaj surbaze
de la doktrinoj inter si komunaj.”

Mi kapjesis. “Kio jam komenciĝis.”

Kaj li: “Ŝi ankaŭ tion antaŭdiris,
ke ili trans l’ abismon etendos manon
por ekpreni tiun de Rom’ fatale.
Ĉu tio ĉi ne jam okazas?”

“Nu,
almenaŭ iugrade. Sed, Abdiel,
antaŭ tiuj vortoj ŝi elplumigis,
ke l’ Protestantoj same manon fie
etendos trans fendegon eĉ pli larĝan
al la Spiritistoj.

“Iam Saul’
ĉe En-Dor per aŭguristino provis
konsulti Samuelon, jam mortintan.
Demon’ respondis, ĉar la forpasintoj
konscion ne plu havas. Ili iĝis
ekshomoj. Por tiaĵo la Sinjoro
dekretis ekzekuton. Izraele
ĉi tio pleje estas per ŝtonumo.
Pro tiu faro kondamnita, Saul’
la postan tagon stomake sur sian glavon
falas. Por ke ne la Filiŝtoj lin
trapiku aŭ ekkaptu, li sin buĉis.

“Same per la modernaj medioj
trans la tombon trompitoj provas vekti
la voĉojn kaj vizaĝojn de ili kiuj
ne plu estas. Tia nekromancio
estas, por Kristano, abomenaĵo,

fratiĝo kiu ĝis nun ankoraŭ mankas.”

“Nu, mi koncedas, ke l’ triobla ligo
inter ĉi tiuj laŭ la profetaj’
en ŝia granda libro apartenas
al la futuro. Sed ekumena sopir’
por papa ĉirkaŭbrako jam fortiĝas.

“Nenio tiom Satanon orgojligas
kiom la papismo. Longe kovate,
ĝi iun tagon el lia frunto saltis
dum diservo de l’ eklezio. Tie
lia kukola bebo kreskis, ĉiam
pli fortiĝanta. Bela, ŝajne sankta
ĝi elkikis rapide la infanojn
de Dio kiuj ĝenis ĝin. Hodiaŭ
ĝi estas anstataŭulo de l’ Sinjoro
por tuta mondo, kiun ĝi el la lum’
ĉiela kondukas en la nokton for.

“Koncerne l’ originon de l’ bestio
legu Danielon, ĉapitron 7,
pri kvar tre strangaj bestoj kiuj grimpis
el la Granda Maro—antikva nomo
por via amata Mediteraneo.
Ĝi fonas por Apokalips’ 13,
laŭ kiu la bestio same grimpis
sur la plaĝon de tiom da popoloj.
Multlingvas tiu akvo, kaj ĝi estas
por tio ankaŭ amnia fluidaĵo.
La mar’ koncipis per la draka spermato
de Satano kaj poste naskis ĝin
ĉe la Itala strando. Ĝi hejmas tie
kaj dum 1260 jaroj ŝiris
korpojn milionope en Eŭropo.

“Sed lastatempe sian vizaĝon turpan
ĝi turnis okcidenten, fikstrigarde
sur Usono, kaj nun sirenokante
fro tie logas ĉiujn, kiuj aŭdas,
al sia sin’ venena:

‘Venu al mi,
venu, venu, venu al mi.’

“Ho kiel dolĉe kantas la besti’!

“Danĝere ĝi delogas, kvankam nun
ankoraŭ ne sufiĉajn. Tamen baldaŭ,
en kur’ fatala, ili kungreĝiĝos
impete kaj trans kliforandojn plongos,
fervore, kiel lemingoj de la mito,
por naĝi, naĝi ĉiam pli diste fro
la strando for—ĝis, laciĝinte, ili
glugle dronos en la profunda, ĉion
glutanta maro.”

Li triste deturniĝis.
“Atendas la elnodiĝo de ĉi dramo.”

VIII

Senaverte ni estis aliloke,
altege inter montoj. Sub ni kuŝis,
vareto herba kie genuiĝis
fuĝintoj. Supren ili por savhelpo
el tiu hor’ alvokis la ĉielon.
Kvazaŭ verda mankavo de l’ Sinjoro
la lok’ protekte ilin tenis. Tamen
alproksimiĝis ankaŭ homohordo

kun ĉaspafiloj, klaboroj, tranĉilegoj
por trakugli, mortbati, senintestigi.

Kolere mi riproĉis: “Abdiel,
ĉu ĉi denove estas Alpoj kaj tiuj...
Valdanoj? Mi ne povas plu toleri
pri ili spekton!”

Li ridetis. “Ne.
Ĉi mortiguntoj pli modernas, estante
Usonanoj, kaj la valet’ nestiĝas
en la Rokmontaro. Rigardu ankaŭ
tiun sesopon, aĝle alflugintan
por ŝirmi kontraŭ l’ predaj homvulturoj.”

Subite ili staris tie, kvazaŭ
inter du palpebrumoj, disigante
la grupojn, en uniformoj—sed nur ses.

Mi spasme spiris, surprizite, kaj tiam
diris: “Tro pokaj! Kiel ili povos
digi ĉi homtorenton impetantan?”

“Ili sufiĉos,” li rimarkis, tute
trankvila. “Multloke, ĉie en la mondo,
tiaj simile baros la fiulojn.
Ni nun troviĝas en la finaj tagoj
antaŭ la Reveno. Sekve la sango
de la martiroj ne povas servi plu
kiel sem’ por savi pliajn konvertitojn.
Tiujn fidelulojn ja mortipretajn,
malgraŭ ilia timo kaj angoro,
la Plejaltul’ indulgos.

“La mondrikolto

liveris sian lastan, oran garbon
por la grenejo de l' Sinjoro. Fine,
post preskaŭ du jarmiloj, ĉi-planede
la Dia graco elĉerpiĝis. Jesu',
ĉefpastro dum jarcentoj da homvivoj,
ankaŭ la jomkipuran mondojuĝon
kompletigis, deĵetis l' incensilon
kaj forpaŝante el la Plejsanktejo
ĉiela, deklaris: 'Nun la maljustulo
ankoraŭ estu maljusta, la malpurulo
ankoraŭ estu malpura; kaj la justulo
ankoraŭ estu justa kaj la sanktulo
ankoraŭ estu sankta.' Li ne plu
por pekadantoj antaŭ l' Patro petos
pro sia ĉe Golgoto sangoverŝo.
Li jam ne estas por la homa raso
interulo. Kaj la Spirito Sankta
mutas, ĉar ĝi neniam provos plu
al pento tiri. Fine la kolombo
de l' kompato forflugis senrevene."

Tio teruris min, do mi demandis:
"Abdiel, en kiu jaro ni estas?"

"Mi ne diros. Ĝi restu nekonata,
ĉar malgraŭ multaj signoj profetitaj,
la Plejaltulo laŭ la Sanktaj Skriboj
gardadas la sekreton. Mi ja scias,
ke post ĉi vojaĝado via plumo,
ne ĉiam diskreta, ĉion ĉi rakontos.
Sufiĉas, ke vi atestu la eventojn.
Rigardu tie!"

Laŭta kun kolero
la atakunta hordo altajdiĝis

ĝis eble dudek metroj fro l' gardantoj,
el kiuj unu avertan manon levis.
Momente ili haltis sed poste krie
avancis. Tiam, ek, la militistoj
celumis. De ĉi ties armoj la pintoj
fajreris. Flamoj la kanajlojn falĉis,
Korpo post korpo falis en angoro,
mallonge kriaĉante, kaj cindriĝis.
Kelkajn minutojn iuj provis repafi,
sed iliaj kugloj nenion faris
aŭ vaporigis. Tiam ankaŭ ili
malaperis. Nur du aŭ tri forkuris,
kiujn la militistoj lasis iri.

Baldaŭ helikoptero kiel venĝa
kondor' anoncis sin kaj tuj atakis
maŝinpafilo kaj per raketaro.
Sed io ĉirkaŭ la seso tiujn salvojn
senefikigis.

“Energia ŝildo”,
l' anĝelo miaflanke ekmurmuris.

Tiam armo en unu man' levita
pli longe fajron sputis, kaj tiun birdon
predeman flame el la aer' forlekis.

Ĉe tio la savitoj, jam surpiedaj,
ekantis dankohimnon. La seso ilin
mane salutis kaj tiam malaperis.

“Kiuj ĉi tiuj estas, Abdiel?”

“Mi opinius, ke vi jam divenus.
Taĉmenteto de la Sinjoro mem,

la Kristiĝinta Mikaelo. Li,
kiu baldaŭ venos, ilin antaŭekspedis
por protekti la siulojn. Aliaj
anĝeloj ilin gardas dum la noktoj
kaj kontraŭ troa suno, ankaŭ zorgas,
ke al ili ne manku pan' aŭ akvo.”

Iom paŭzinte, Abdiel anoncis:
“Sed nun ni devas mem fro tie ĉi
forfulmi. Restas multo pli videnda.”

Ni tuj forplongis en obskuran lokon.

“Enŝaltu iom da lumo, Abdiel!”

“Kiuj vi estas?” alia voĉo vokis.

“Amikoj!” gaje mia kunul' respondis,
sed multe pli mallaŭte.

Alumeto
flagretis, kaj kandelo lumon verŝis.

Sur litorando junulino sidis.
Pri Ria ŝi pensigis sed pli blonde,
kun okuloj intense bluaj, kiel
neforĝesumino. Ŝia beltrajta
vizaĝo portis spurojn de sufero,
dum ŝia robo ruĝa kaj bonstila
pro troa surhav' komencis ĉifoniĝi.

Kontraltis ŝia voĉo. “Se amikoj,
venu iom pli proksimen kaj sidu
ĉe tiu tablo, ke mi vidu vin.”
Kun kandelo enmane, ankaŭ ŝi

alstumblis kaj en seĝon sin mallevis
sed kun grimaco de doloro. “Mi
fro ĉi mateno ne plu marŝas bone.
Pro la torturo. Vi fremdulas, ambaŭ.
Ni nin prezentu. Mi nomiĝas Mary
McDowell el Aberdeen, Skotlando. Kaj vi?”

La gorĝo al mi sekis, pro la vort’
torturo; sed, ĉar la anĝelo mutis
tro longe, mi eligis la respondon:
“Edwin de Kock kaj Abdiel”, al kiu
mi gestis.

Mi ridetigis ŝin. “Nu, via
familia nomo Flandras, sed lia
pensigas pri anĝelo el Miltono.”

Ĉe tio li parolis. “Kaj Biblia,
kvankam obskura en la Sankta Skribo”.

“Mi tion ne sciis, kvankam prelegante
pri literaturo, antaŭ ol Annette
de Klerk—iam korespondamikino
kaj tro Katolika—min al ŝi invitis
en Bruĝo. Sed vi estas misterulo.
La Anglan vi parolas kun akĉento
tro bona por iu de ĉi tiu lando.
Kaj via familia nomo estas...?”

“Koncerne tion mi klarigos poste.
Sed ĉu vere, ke iu vin torturis?”

“Ili komencis ĉi-matene. Unue,
multsemajne, kaĵolis kaj Annette
kaj ŝia fripona pastro Zwart, kun koro

nigra kiel lia nomo. La flatoj
ne mankis aŭ teologio stranga.
Sed mi rezistis ĉiun ratinvadon
de mia menso. Tiam ili minacis
kaj ĉi-matene alportis instrumentojn
metalajn por persvadi mian karnon.
Pri morgaŭ mi ne volas pensi...”

“Mary,

tion ĉi forpuŝu el via menso;
mi ĝin preventos!” Abdiel koleris,
sed lia voĉ’ en ŝia vizaĝo ĉendis
esperon.

“Kiel?”

“Vi vidis. Sed unue,
klarigu kiumaniere vi
en ĉi kaptilon stumblis.”

“Annette perfida

allogis min viziti ŝin en Bruĝo
kun ĝia Mezepoke bela placo,
kiujn indulgis jarcentoj da militoj.
Unu ĝia trezoro ’stas relikvo
en baziliketo de l’ ‘sankta sango’.
Laŭdire dum la dua krucmilito
iu ĝin en malgranda uj’ alportis.
Ĝi supozeble venis el la vejnoj
de Kristo krucumita. Nu, la placo
min ĉarmis, sed la sango estas fraŭdo,
kaj ne el Palestino sed Bizanco.
Tamen la superstiĉaj Katolikoj,
kiel Annette, kredegas, ke unufoje
en ĉiu jaro dum la alta meso,

tiu substanc' likviĝas kaj refluas
por savi fidelulojn. Bedaŭrinde
nian amikecon mi malsingarde
lezis per faktoj. Jam estis tri teruraj
monatoj. Nun mi kuŝas tie ĉi.

“Mi estas Adventista papilio
ruze kaptita en la radodentojn
el fero de l' terura best' ciborga
pri kiu Daniel rakontis. Nun
ĝi maĉas min, senhelpan tie ĉi
en ĉambro sub la kirko Katolika!”

“Sed por vi ni rompos ĝian makzelon!
Ni flugos kun vi for”, li ekanoncis.

“Flugos? Abdiel, vi estas...kiu?”

“Anĝelo de l' Sinjoro.”

Lian parolon
abrupte distranĉis pordo apud ni
kun knar' apertjetite. Ankaŭ voĉoj
invadis kun porka pastro kaj virin'
krianta. Post ili entrudiĝis tri
fortuloj.

“Halt'!” laŭtvoĉe Abdiel
ektondris, ĉe kio lum' sen evidenta
originopunkto la tutan ĉambron
plenigis. Videbliĝis eĉ haretoj
kaj ŝvito sur la peza makzel' de Zwart,
razita ne tre bone.

Tiu ĉi

unue kaj defie sian langon
retrovis. “Kiu vi estas kaj ĉiloke
kion faremas?”

“Al Bruĝ’ hastigis min
pli alta Patro ol la ul’ en Romo
al kiu via menso genuiĝas,
por ĉi sanktulinon al li karegan
forlevi! Vi aŭdacis enretigi
kaj eĉ torturi ŝin. Pro ĉi fifaroj
vi jam meritas morton, do ne provu
malhelpi min.”

Sed Zwart rikane mokis.
“Ni estas kvin kaj vi apenaŭ du,
ĉar la oldulon kun vi mi kalkulas
je vir’ duona. Krome, kvar el ni
pistolojn portas!”

Abdiel suspiris.
“Kial vi Satanidoj tiom emas
al perfortaĵoj? Avertiĝu do:
farantoj de fiagoj ofte mem
gustumos similaĵojn, plus la fajron
mondfinan. Ĝi la karnon de viaj ostoj
formordos. Kompreneble tio ĉi
ne estos sen doloro...”

Graŭlis Zwart,
kaj unu el la aliuloj manon
al sia poŝ’ mallevis.

La anĝelo
murmuris: “Mi bedaŭras.” Fulmorapide
li per ilet’ en sia man’ celumis

kaj en unu stomako post l' alia
ĉendis por ĉiu viro geĥeneton
ŝrikigantan. Poste ili cindriĝis.

Annette plorkriis kaj planken falis. Mary
kvazaŭ el ŝtono kelk' sekundojn staris.

Sed urĝis Abdiel. "Ni rapidegu.
La bruo ensvarmigis multajn pli,
kaj mi ne volas, ke ankaŭ tiuj brulu.
Unue, tamen, tiun litkovrilon
prenu. Ni hastos al la Rokmontaro
kie la noktoj, eĉ dum ĉi somero,
iom malvarmas. Ankaŭ la kusenon."

"Sed miajn dokumentojn kaj monujon
Annette kaj ŝia fipastro de mi rabis!"

Fro la planko leviĝis ĝem' obtuza.

Li gaje ridis. "Mary, identigilon,
pasporton, flugbiletojn vi neniam
plu bezonos!"

Kun miro de la lito
ŝi la aĵojn levis. Tiam la muroj
kun ĉio ĉirkaŭ ni—la seĝoj, tablo
kaj lito—forsolviĝis. Preskaŭ tuj
ni staris inter homoj en la verda
valeto kiun mi antaŭe vidis.

"Saluton, Abdiel. Ni vin atendis.
Sidiĝu kun ni. Mi estas Norman Gulley,
kaj tiuj ĉi sendube Edwin, kiu
tra la epokoj aventuris, de antaŭ

ĉi ter' ĝis nun. Kaj tiu devus esti
Mary, nelge ŝirita el la faŭko
de l' bestio, kiun tro multaj kultas.”

Abdiel miregis. “De kiu vi
ĉi ĉion aŭdis? Ĝi estis tre sekreta.”

“Fro Ángel Guerra. Li el trans la montoj
alportas, krom manĝaĵ', informabundon
pri la eventoj kiuj la planedon
tuŝas. La Plejaltulo evidente
jam per la lastaj profetitaj plagoj
vipas la fine nepentintojn. Baldaŭ
Jesuo venos...”

Abdiel interrompis:

“Norman, sed kiu estas Ángel? Ĉu eble—
kiel lia Hispana nom' sugestas—
anĝelo? Al mi plaĉus vidi lin!”

“Kaj kial ne?” alia voĉ' eksonis.
Kvaz' el nenio korpiĝinte, kun ni
sidis figur' aldona, Hispaniko
ridetvizaĝa.

“Ha, mi vin rekonas,
malgraŭ tiu maskaĵo Meksikana!”

Gulley rigardis de unu al la alia,
la tuta grupo iĝis aŭskultema,
kaj senspire silenta, ĝis laŭtavoĉe
parolis Mary: “Mi aŭdis Abdielon
deklari sin anĝelo de l' Sinjoro!
Kial ne ankaŭ via Ángel Guerra?”

“Bone!” ĉi tiu diris. “Abdiel, fineventoj rapide formartelas vualajn murojn inter ili kaj nia sfero. Ni tial povas pli aperte helpi ĉi elektitojn, dum la lastaj horoj ankoraŭ gutas tra l’ klepsidro preskaŭ malplena de ilia mondo.”

Kapjesis Abdiel kun ĝojrideto.

“Parolu iom pri la sep kaj finaj plagoj kiuj nun pluvas el la pelvoj de l’ Dia kolero, laŭ l’ Apokalipso.”

De ie apud ni virina voĉ’ demandis: “Kial entute bona Patro elverŝas ilin?”

Abdiel respondis:

“Por forturni atenton kaj mildigi la persekutojn de la siaj: vi kaj aliaj nun ĉasataj kiel perdrikoj, kiuj mallerte fuĝas en kaŝlokojn ne tre efikajn. Kaj por venĝi vin.

“L’ antikva Egiptujo faraona nome de siaj dioj Izraelon sklavige premis. Tial la Plejalta el la bastono de Mose’ fluigis dek plagojn pune. Simile ankaŭ nun li draŝas ĉi lastatempajn malamikojn.

“L’ unua pelvo verŝis dolorigajn ulcerojn stinkajn sur haŭtojn de la homoj kiuj la markon de l’ bestio havas

kaj al ĝia bildo adorkliniĝas.

“La dua pelv’ alportis por estaĵoj
en la maro morton kaj ĝin sangigis.

“La tria tute same transmutis akvon
al sango en la fontoj kaj riveroj...”

Mi plendis: “Abdiel mi ne komprenas!”

“Ni pli atente studu la simbolojn
de l’ Apokalipso. D-ro Ben
le Roux, bonvolu tion plu lumigi.
Antaŭ nelonge li ĉe l’ Seminario
de nia Andrews-universitato
ankor’ instruis niajn predikantojn
magistriĝontajn.”

Triste ruĝharulo
ekstaris. “Min simple nomu Ben. La grado
signifon perdis kiam fanatikaj
studentoj de Notre Dame la karan Andrews
subite, dum Sabat’, invadis. Ili
el la preĝej’ nin pelis kaj sisteme,
en unu mateno, forbalais ĉiujn
konstruaĵojn, per bomboj grandamase
en nigraj ŝarĝaŭtoj alveturigitaĵ.
La ĉambro kie mi dum dudek jaroj
prelegis pri Bibliveraĵoj iĝis
nur rubo kaj memoro.”

Plorsingulton
li subpremis.

Sed Abdiel konsolis.

“Ben, ĉar vi fidelis, vi lokon gajnis
sekuran en la universitato
de la neniam rubigota nova
Jerusalem. Kaj intertempe nun
al vi la vorto.”

Tio lian vizaĝon
radiigis. “Ho dankon! Miaj streboj
ne estis do senfruktaj. Nu, aŭskultu.”
Li sin al ni direktis. “Por kompreni
la plagojn, la studento devas paĝi
en la Apokalipso al ĉapitroj
12, 13 kaj 14 sinsekve ĝis
la tria anĝel’ fluganta. En ĉi tekstoj
kunrolas bestkvaropo de l’ malbono.
Dum tenebraj 1260 jaroj
ili mordis kaj murdis la sanktulojn
de la Sinjoro.

“Ĉapitro 12 desegnas
la ĉefan instiganton, la Fiulon—
Satanon—kiel grandan ruĝan drakon,
serponton, efektive. Per la praa
pek’ ĉiele li iĝis mensogisto
kaj homomortiganto. Krom ĉi signif’
primara, rilate la diablon mem,
la draksimbolo havas ankaŭ plian
kaj sekundaran: grandajn mondpotencojn,
kiuj dum jarcentoj liajn projektojn
antaŭenigis: malsciaj akolitroj,
ekzemple la Romia imperi’
pagana.

“Tiuĉapitre li konfrontas
virinon sunbrile gloran, la popolon

de Dio tra l' epokoj. Per Herodo,
sia ido, la drako provis vori
Jesuo kiel bebon. Poste, dum
lia tuta viv' surtera, li lin ĉasis,
vundis per vortoj, akraj langovipoj
de lia popolo ĝis Romiaj skurĝoj,
dornokrono kaj najloj sur la kruco...

“Malgraŭe, ĉe la tombo de Jozefo,
tiun trian tagon nia Sinjor'
deskuis la mortkatenojn. Post kvardek tagoj
la Patro lin al sia tron' forigis.
La furiozigita drak', frustrite,
sin ree turnis kontraŭ la virino—
por detruo ŝiri ĉi puran, veran,
de Dio amegatan eklezion.
Ŝi fluge fuĝis en sovaĝejon for,
kaj tie 1260 jarojn ŝirmis
la Alpoj, ankaŭ la dezert' Sahara.
Preter ĉi tio kaŝiĝis Etiopaj
kredantoj, ankaŭ Hindaj ĉe l' marbordo
Malabara. Longtempe tie ilin
l' ungegoj de l' bestio ne atingis.

“Tiam, post ĉi tempo por li senfrukta,
la drako kolerege forturniĝis
por plu militi kontraŭ la restintaj
de la virino posteuloj. Tiuj
aŭdacas plu obei la Diordonojn
kaj krome havas l' ateston de Jesuo,
la spiriton de profetado.”

Ben

ĉe tiu punkto paŭzis, emocia.
Unu post la alia, li per rigardo

niajn vizaĝojn tuŝis. “Estas ni!”
li kriis. “Nun la drako fajron sputas,
kaj ni same en altajn montojn fuĝis.”

“...kie hieraŭ vin el ĝiaj ungoj
la ses anĝeloj savis,” Abdiel
aldonis. “Kuraĝe do klarigu plu.”

Ĉi tion li faris, sed kun prologeto.
“La numero 13 laŭ superstiĉo
malbonaŭguras. Eble koincide
tradukintoj en sia tekstaranĝo
de la Apokalipso ĝin asignis
al la sombra ĉapitro nun traktota.

“Sur Mediteraneo ondoŝvela
ĝi malfermiĝas. El ĝi, sur la plaĝon,
paŝis besti’ koŝmara, kunmetita—
kvazaŭ frankenŝtajne—el korpopartoj
de kvar estuloj. Iuj el ni, studentoj
de l’ profetaĵoj, tion tuj komprenis.

“Ankaŭ la libro Daniel, ĉapitro
sep, vidigas ilin, tamen aparte:
kvar bestojn el la sama Granda Mar’
el sub la ondoj, kun simbolklarigoj.
La unua, leono flugilhava,
estis Babilono; la dua, urso,
la Medopersa imperio; la tria,
kvarkapa leopardo, la Helenoj;
la lasta, best’ feroĉa kun dentegoj
el fero, ungoj el bronzo kaj dek kornoj,
Romio plus Eŭropo okcidenta.

“Sed kiam Johan’ l’ Apokalipson verkis,

pro temp' intera kaj la historio
eventoriĉa jam fluintaj for,
vicorde la simboloj inversiĝis.
Unue, elplaŭdis leopard' enorma,
ĉar komenciĝis la apostatiĝo
en periodo Grekromia, kiam
Platono, Aristotelo kaj Plotino
l' evangelion de Jesu' kotigis
per Helenaĵoj. Due, ĝin koruptis
la ursa elemento Medopersa
pli antikva per sundio Mitrao.
Kultanto ĝia, l' unua Konstanteno,
kun Kristo amalgamis ĝin. Kaj trie,
el pasinteco eĉ pli dista, leona
Babilono infektadis. Pro tio
la papismo ĝis nun ankoraŭ estas
mikspota religi' duonkristana.”

Alia voĉ' virina interrompis:
“Supozeble ĉi tial la Sinjoro
tiun sistemon tiom abomenas.”

“Rebeka, ne estas tute tiel.” Ángel
ŝin kontraŭdiris.

“Ĉu? ”

“Sendube ja
al li malplaĉas ĉiu fals' doktrina.
Dum sia kariero ĉi-planede
la Savanto avertis kontraŭ loloj
semitaj far la Malamiko. La mondo,
tamen, plenplenas je la misideoj,
kaj malperfekta estas ĉio homa.
Sed pro sia granda amo, multaĵojn

li toleris. Kaj ankaŭ ni anĝeloj,
servante homojn, nin devas ofte hardi.
Esti tagon post tago apud iuj
protektocele kaj por savi ilin,
se eble—malgraŭ vivoj fuŝegitaj
de alkoholo plus aliaj drogoj,
perforto, seksaj misoj aŭ io ajn—
similas al deĵor’ ĉe malnovmoda
kaj stinka necesejo.

“Ne nuraj dogmoj
fuŝe miskredaj tiom kolerigas
la Plejaltulon kontraŭ la bestio,
sed ĝiaj multaj murdoj kaj torturo
de homoj kiuj obeemis Dion.
La ‘sanktaj patroj’ kaj l’ ofico sankta
tiel sin senmaskigas kiel idaron
de tiu draka instiganto, kiu
kun ili brulos iam en l’ infero.
Sed Ben daŭrigu vian klarigadon.”

“Nu, bone, sed unue mi aldonu:
Apokalips’ 13 ja rekte diras,
ke la bestio sian aŭtoritaton
akiris de la drako. Sekundare
pri tio temas, ke la pap’ heredis
de Romi’ pagana teritorion,
kulturon kaj fidfuŝan sinkretismon—
sed primare Satan’ diable dotis
el sia koro galan kruelegon.
Kiel longe? Dum 42 monatoj
profetaj, la samaj 1260 jaroj
laŭliteraj kiujn mi jam menciis.

“Multe martelita dum la Reformo,

ĉefe far Martin Luther, la bestio
en nord-Eŭropo malsaniĝis. Febla,
neniu ĝin protektis aŭ turnis for
la glavon de generalo Berthier.
Nuke li trafis ĝian sepan kapon,
kiu ŝajnis morti kaj flanken falis.
La Francaj trupoj de l' Revolucio
fortrenis la malsanan sesan Pion
en ekzilon, kaj tie ĉe Valenco
la pap' elspasmis sian lastan spiron.

“La dato estis 1798,
1260 jaroj ekde kiam
alia generalo, Belizaro
el Bizanco pli fruan pontifikon
kaj la papisman savis, forpelante
armeon Ostrogotan, kiu Romon
dum pli ol jar' sieĝis.”

Mi interrompis,
ne tre ĝentile, kaj Abdiel kuntiris
la brovojn. “Ĉi rakontojn ni jam konas,
sed estis ankaŭ alia bestsimbolo,
ĉu ne?”

Kun milda ton' riproĉa, Ben
respondis: “Ne multaj, miaopinie,
jam aŭdis pri l' eventoj de la jaro
538. Sed ĉiuokaze
1260 jaroj inter tiuj
du datoj kuŝas.

“La tuj posta besto
ne el la akvo, fro la multpopola
ŝtataro ĉirkaŭ-Mediteranea,

sed home magra ter' de dista lando
emergis. Unue la profetokuloj
nenion vidis krom la grundo plata,
sed baldaŭ eltrudiĝon kiel enorman
talpejon. Tiam el la ter' naskiĝis
kreaĵ' alia kun kornoj ŝafidsimilaj,
kiu per draka voĉo blekis.”

“Usono,
ŝafidsimila kaj dukorna!” Rebeka
diris.

Ángel, tamen, denove sian
kapon skuis. “Kial ne draksimila?”

Ŝi estis perpleksita.

Ben daŭrigis:
“Nur la du kornoj estis, laŭaspekte,
ŝafidaj. Uriah Smith klarigis, ke tio
simbolas la sistemon de Usono
respublikan kaj funde Protestantan,
sed kun konstituci' apartiganta
religiaĵojn dis la politiko.
Aliflanke, tamen, kiam milit'
civila nubis super lia lando,
dum multaj laŭdis ĝin pro egaleco
kaj libero (sed ne por ajna sklavo),
li nomis ĝin ‘ĉi besto hipokrita’.

“Ĝi iĝis, post du jarcentoj, la plej forta,
riĉa, influa lando de l' panedo,
kaj ege inĝenia, teknologie
miraklisto—kapabla subenigi
el la ĉielo fajron: nukleajn bombojn,

brulojn de spacoŝipoj revenantaj,
laserdetruojn, antaŭ miranta mondo.

“Unue ĝi malamis la bestion
sepkapan kaj dekkornan, sed laŭgrade
la drako ilin kunen ĉarmis. Ĉiam
pli arda, sekse juka, la Usona
besto al la sepkapa enamiĝis.
Logiĝis ekumene Protestantoj
inter la brakojn de l’ Katolikismo.”

“Plej strange”, ekmurmuris Michael Scheifler,
kiu per tio al si atenton tiris,
“sed—kiel ni atestis—tiu antikva
serpent’ Usonon ĝis idoligo sorĉis.
Ĉi tiu al la terloĝantoj diktis,
ke ili skulptu kvazaŭ imitaĵon
de la sistem’ papisma: statuan bildon,
kiel simbolas ĝin l’ Apokalipso.
Kaj tion ĝi per leĝoj vivantigis,
novan mondordon.”

“Kial?” mi scivolis.

Respondis Ángel: “Pli ol ordinare
kruelis la naturo kaj la homoj.
Tertremoj multloke ŝiris fundamentojn
de sub urboj, aŭ fajro manĝis ilin.
Subitaj uraganoj kun tornadoj
domojn renversis, rompis, forbalais,
kaj superakviĝoj tegmentoalten grimpis
kun damaĝ’ financa nekalkulebla.
Invadis tropikaj pestoj kaj forfalĉis
infanojn, ankaŭ feblajn maljunulojn.
Abundiĝis krome la kruelaĵoj

de hom' al homo. Multaj teroristoj
per aeroplanoj importis sin
el landoj de Islamo, por iel plaĉi
al dio fremda per murdoj sinmortigaj.
Dume Kristanojn konservemajn naŭzis
kaj kolerigis samseksamaj nuptoj,
surekrana pornografi', kanabo—
ĉio en Usono laŭleĝigita.
Krom tio ĉi, la lando enkotiĝis
en unu post alia nefinebla
milito ie sur la sanga tero.
Hejmen flugigite revenis multaj
kadavroj kaj rompitaĵoj.

“Ĉi ĉio estis vaste atribuitaj
al ŝipperdiĝo de l' morala mondo,
en predikejoj kaj komunikiloj
ekster la kirkoj, kun diabla lerto
per granda elokvento far langoj piaj.
Naskiĝis tio mondordon novan,
belan statuan bildon de l' bestio.
Vi scias, tamen, ke tiuj uloj estis
servantoj de la ruĝa drak', Satano,
kiu trompiste povas ĉion tordi—
pro kio vi fine al ĉi loko fuĝis.

“Usono estis proklamita lando
Kristana. Ĉio en ĝi, supozeble,
baziĝis sur montprediko de Jesuo
apud la Galilea lago kaj l' Dek
Ordonoj. Tio inkludis eksplicite
sanktan ripozotagon en *Dimanĉo*.”

“Sed ĝi estas la marko de l' bestio!”
Ben resaltis fajre en la diskuton.

“Ni Adventistoj de la Sepa Tago
ne mutis sed indigne kontraŭhakis
per l’ akra glavo de la Sankta Skribo.
Neniam la Sinjor’ la tagon ŝanĝis.
Tion faraĉis Konstanten’ l’ unua
kaj spalir’ da papoj. Ĉi tio faktas,
malgraŭ ke Protestantaj teologoj
ĝin kontraŭbeis, dum ili ŝafe sekvis
gregestron mitran kun la hokbastono.

“Falsistoj far la ŝtat’ potencigitaj
ne bezonas alian argumenton
krom leĝdevigoj. Unue la bojkoto,
kun rajto vendi kaj aĉeti nur
por dimanĉistoj. Sed tio ne sufiĉis.
Do sekvis, due, la dekret’ laŭ kiu
la ŝtat’ fortiris sian protektombrelon
de super ĉiu sabbatulo. Tial
kanajloj rajtis kunboje ataki kaj
mortigi nin.”

Ridetis Abdiel.

“Sed—puf!—ne povis, ĉar la Plejaltulo
protektis. Dume, la tria anĝel’ minacis
per infera fajro la mondloĝantojn,
se ili sur la frunt’ aŭ man’ ricevus
la markon de l’ bestio, por tiele
adorkliniĝi al ĝi kaj ĝia bildo.

“Kaj kompreneble nun por ili ĉiuj
jam tro malfruas. La kompatopordo
fermiĝis. La Savanto ne plu pledas
por la mispaŝadantoj de ĉi mondo
sed baldaŭ venos, venĝe, por la siaj.”

Ĉe tio maltrankvila voĉ' elvokis:
“Ve al ni pekemuloj! Ni staras, ĉiuj,
sur abismorando. Sufiĉus glito
malgranda por plonĝi en profundon for.”

La anĝel' al ŝi turniĝis. “Sed, Johana,
viaj piedoj neniam plu mispaŝos.
Vi estas sigelita kaj sekura
en li kies vol' por vi nun plenumiĝas.
Jam pasis la noktomezo de l' animo.
Brilas en vi la matenstelo. Baldaŭ
la sun' leviĝos. Ankaŭ por vi!”

Li ĉiujn

inkludis per sia ambaŭbraka gesto,
kaj eĉ min ĉi tio esperigis.
Sed Abdiel ĉe mia orelo flustris:
“Ĉi hor' ne estas, tamen, via nuno,
ĉar vi ankoraŭ nur vizitas ĝin.”

La kapon mi mallevis, bone sciante
kion li celis. Kaj li mem forŝuntis
la diskuton al sia antaŭa temo.
“Ben, ni revenu al la plagoj. Tri
jam draŝis la homaron. Restas kvar.”

“Ne plu!” anoncis iu nova—brila
estul' giganta—surprize alfulminta
ĝis en nia mezo.

“Elizu!” Anĝel
salutis lin. “Vi venas oportune,
poŝtisto kun novaĵo.”

La homoj miris

pri ĉi anĝelo kiu sen kamuflo
ekvenis kiel ĉielul', malkaŝe.
Ili rigardadis, sed li ignoris
la okulojn. "Aŭskultu. Ĉi-matene
fortulo ankaŭ jam la kvaran pelvon
en la blankardan sunon malplenigis.
Ĝi sur la teron kaj ĉies kapon ŝutis
kvaz' fajrajn karbojn. Tamen vi, kiel ankaŭ
aliaj samkredanoj, estis ŝirmitaj
en via valo. Baldaŭ, aliloke,
la herbo, perdinte sian verdon, brulis;
altaj arboj kiel kandeloj flamis,
kune kun lignaj stangoj kiuj portas
draton elektran; klimatiz' kolapsis;
urboj da belaj domoj konsumiĝis;
kaj kuŝas milionoj da kadavroj,
homaj kaj bestaj, ĉie trans la mondo.
Ĉi plago daŭris unu detruan tagon,
alie pereus ĉiuj. Dio, tamen,
ne volas senpopoligi la planedon
antaŭtempe. (Tion ŝatus Satano
por iel elreligi la Revenon
kun la konfronto inter la Savanto
kaj l' mortiguntoj de sanktuloj liaj.)"

Silento ĉi rakonton sekvis. Poste
Ángel rimarkis: "Mi pri io multe
scivolas. Ĉu ĉi skurĝ' ankoraŭ ne
fro antaŭ ĉies mensokuloj ŝiris
la trompbandaĝon de la predikantoj
kiuj tiom mensogis al la mondo?"
"Jes", Elizu respondis tristmiene.
"Nun klaras ĉio, sed ankaŭ, ke por ili
ne eblas plu repaŝi de l' abismo
en kiun la perditoj fundeniĝos.

Tial la pro ĉi plagoj suferantoj
ne por siaj misoj aŭ pekoj pentis,
malbenante Dion. Satano ridis,
sed ne por longe; li faris al si zorgon:
malemigus troa demoralizo
liajn homajn hundojn vin ĉasi plu
kaj ĝis morto mordi. Li pro tio kovis
alian trompon. Vi ne divenus ĝin.”

“Divenus? Ne, Elizu, sed ni *scias!*”
mi ekparolis.

Kun surpriz’ li turnis
al mi okulojn antikvajn kaj profundajn,
kiuj spektis la kreon de ĉi mondo,
ankaŭ eble de l’ galaksioj. “Kion
vi scias kaj kiel?” Li ridis bonvoleme.

“Antaŭdiris ĝin nia profetino:
La fiulo falsos pseŭdo-Revenon
dum kiu li sin maskos kiel Kristo
portretita en la Apokalipso
far Johano, la apostolo. Harojn
li havos blankajn kiel lan’ aŭ neĝo.
Liaj piedoj pensigos pri latun’
brilanta. Liaj okuloj similos fajran
flamon. Lia vizaĝo brilos kiel
la suno. ‘Lia voĉo estos kiel
la voĉ’ de multaj akvoj.’”

Li manon levis.

“Edwin, vi tute pravas. Gratulon! Sed,
malgraŭe, ne estante mensleganto,
vi efektive ne *sciis* kion mi

dirontis. Tion mi prefere nomus
intuicio—vere stranga trajto
ĉe iuj homoj, viroj kaj virinoj.
Fascine! Bonvolu fini la rakonton
surbaze de tiu profetaĵ’ iama
far via karmemora Ellen White.
Poste ni povos mense plu navigi
kelkajn aspektojn pli de la afero.”

Mi hezitis. “Unu problem’, Elizu,
en tio tamen ŝajnas nesuperebla
baro. Vidinte tian gloron, Johano
ĉe la piedoj de l’ Sinjoro falis
kiel mortinto. Nur kiam tiu sur lin,
maltimigante, manon metis, li povis
restari. Ĉu tiel ankaŭ la pseŭdo-Kristo?”

“Ne tute, ĉar anĝel’ ne estas dia.
Li per aspekto mildigita sin montros
sur televidekranoj de la mondo
sed same eligos melodiajn benojn
kiel Jesuo dum maten’ lazura
kontraŭ la montoflanko ĉe la Lago,
por tiel narkote dupi la aŭdantojn.
Ekstaze ĉirkaŭ la ter’ leviĝos voĉoj:
‘Kristo venis! Kristo venis!’ kaj ĉie
preskaŭ ĉiuj al li adorkliniĝos—
mirplene eĉ ateistoj ĝistiamaj.

“Ege konvinka ŝajnos tiu trompo,
kvankam du aferoj ĝin tuj dementos.
Al li kun lia anĝelaro fia
ne estos permesate sur la nuboj
alveni, nur per spacoŝipo fraŭda,
laŭ li fro l’ Oriona nebulozo.

Kaj li pretendos, ke l' ripozotagon
li de Sabato al Dimanĉ' transigis.
Sed tiuj Adventistoj malplaĉegas,
sapeante la belan fundamenton
subkuŝigitan por mondordo nova.
Tial la teron batis katastrofoj
naturaj kaj ankaŭ nun torturaj plagoj
de Dio, kiu ja koleras. Tamen
ili ne lin malbenu, sed detruu
la sabatistojn, universalan peston.”

Ĉe tio ĉi, Rebeka, zorgvizaĝa,
komentis: “Ni tial povas atendadi
pli da vipuraj provoj mordi nin
per liaj uloj, kiel la antaŭaj.”

“Sed same sendentigotaj!” Ángel diris.

“Kaj ne por longe,” aldonis Abdiel,
“ĉar baldaŭ malpleniĝos la kvina pelvo
je sia plago sur la Vatikanon.
Profunda kaj mistera tenebriĝo
ĉion englutos. Ĉiu lumigilo,
elektra aŭ alia, malfunkcios.
La oficistoj, pastroj, kardinaloj
kaj l' pontifiko unue ĉirkaŭstumblos
sed poste devos simple sidi tie.
Pro l' jamaj doloregoj de la plagoj
ĝis tiam, ili siajn langojn mordos,
kaj kion faros pli? Ĉar ne pentemaj,
ĉiuj—eĉ la papo—blasfemos Dion!”

“Do tiel,” mi diris, “la plano de l' diablo
kaputos. Ruinigite, ĝi kolapsos,
kaj lia ruzo tute bankrotiĝos.

Pro tio, supozeble, li rezignos
pri tiaj manovroj.”

Abdiel ridetis.

“Anĝeloj de l’ Sinjor’ pli bone scias.
La Satana menso, profunda puto
de la malbono, daŭre bobeligas
intrigojn. Unu rilatos ironie
al la sesa plago, kiun ne multaj
komprenas. Tiu lia elturniĝo
ekestos kontraŭvola enturniĝo,
ĉar sian nukon li trudos en maŝnodon,
kiu subite stringos.”

Kapjesis Ángel

kaj Elizuzo, sed nin homojn ĉi vortoj
mistifikis.

Post paŭzo Ben rimarkis:

“Pri tiu sesa plag’ enigmas multo,
kaj almenaŭ mi ne tute komprenas
koncerne la diablon.”

Abdiel

daŭrigis: “Vi ja legis, ke tri ranoj
eliĝos rukte fro la buŝoj de l’ drako,
bestio kaj profeto falsa—nom’
alternativa por l’ eltera besto
kun tiuj du ŝafidsimilaj kornoj.
Pri kio temas?”

“Mi provu ĝin ekspliki,”

respondis Ben. “Ni scias, ke la drako
simbolas la diablon krom popoloj
sen Kristo; la bestio, la papison;

kaj l' dukorna besto, Usonon, pleje
Protestantan—en tiu ĉi fintempo
misfrata bando kontraŭ la Sinjoro.

“Koncerne la tri ranojn, l' Apokalipso
nomas ilin demonoj, kiuj dupos
la hordojn de l' perditoj per mirakloj.
Tio aludas, laŭ mi, la Spiritismon.
Ĝi unuige rompos tra l' bariloj
de kredmalsamaj kiuj dum jarcentoj
instigis homojn al aĉa batalemo
teologia. Per siaj ĉarmaj kvakoj
ili pretendos esti la spiritoj
de mortintoj, kvankam ĉi ties buŝoj
ne plu posedas voĉojn, terŝtopitaj
en la tombejo, tute malkonsciaj.”

“Ĝuste, Ben, sed kien ilia falso
kondukos?”

“Nu, laŭ tiu profetaĵo,
ili trompos ‘la reĝojn de l' tuta mondo
por kolekti ilin por la milito
de l' granda tago de Dio.’ Abdiel,
bonvolu komprenigi, ĉar ĉi-punkte
de mia menso staŭlis la motoro.
‘Kolekti reĝojn por milito?’ Longe
ĉi enigmaj vortoj min cerbumigis,
ĝis mia kap' pri tiu temo haltis.
kaj ekde tiam ne povis plu restarti.”

“Sed trovi la ŝlosilojn por malfermi
la pordon al kompreno tre facilas.
Plupaĝu en la tekst' Apokalipsa
ĝis ĉapitro 19 kaj vers' 19.

Renkontu tie tute parencajn vortojn
kun vizaĝo tre konata.”

“Ĝi kion
diras?”

Cerb’ anĝela memoron havas
kiu je la unua vid’ aŭ aŭdo
parkeras kaj neniam plu forgesas.
Li citis: “Mi vidis la beston kaj la reĝojn
de la tero kaj iliajn armeojn
kunigitajn, por fari militon kontraŭ
la sidanta sur la ĉeval’ kaj kontraŭ
armeo lia.’ Tion nun komparu
kun Apokalipso 16 kaj tiu
14-a verso pri la kolektitaj
reĝoj. Kaj konsideru, ke la Greka
originalo diversforme uzas
tute la saman vorton por *kolekti*
kaj *kunigi*. La ‘reĝoj’ estas ĉiaj
regantoj. Ne nur ili kolektiĝos
sed ankaŭ la armeoj, kaj per tiuj
ili provos militi kontraŭ Kristo
kaj la anĝeloj, kiam li revenos.
Ĉu nun ‘kolekti la reĝojn’ kal l’ ‘milito
de l’ granda tago de Dio’ ne pli klaras?”

Ben kapjesis, sed tiam li ruĝiĝis.
“Tre ofte mi prelegis pri l’ Sinjoro
ĉe la Reven’ simbole portretita
sur blanka ĉevalo, militestro glora.
Same elrajdos post li la anĝeloj
sur ĉevaloj blankaj, ĉiu armita,
atakopretaj kontraŭ l’ malamikoj.
Mi atentigis eĉ pri tiu verso

far vi citita, sed neniam vidis
konekton kun la sesa plago kaj l' reĝoj
far tiuj demonoj trompe kolektitaj
por la milito en la granda tago
de Dio. Kial mi estis tiel stulta?!”

“Tamen ne *stulta*, estimata Ben.
Vi simple, kiel multaj antaŭ vi,
permesis al la menso forvojiĝi
de la principo fundamenta unue
kompari la en la Biblio mem
skribitaĵon kun skribitaĵo. Tial
briluloj stumblis el la luma vero
en sian tenebron kaj perdiĝis tie.
Sed ne vi.

“Ni revenu ĉiukaze
al mia deklaro antaŭa.”

Konfuzite
post tiu diskuto, mi al li demandis:
“Kiun?”

Abdiel ridetis, komplete.
“Mi citu min, rilate al demonoj
trompontaj la regantojn de la tero
kaj Satano, kiu instigos ilin:
'Tiu lia elturniĝo ekestos
kontraŭvola enturniĝo, ĉar
sian nukon li trudos en maŝnodon, kiu
subite stringos.' Ĉu vi nun memoras?”

“Jes, sed ne komprenas.”

Ben respondis:

“Mi provu. Per ĉi demonoj la diablo spiritiste la perditojn allogos, kungregigante tiujn stultajn ŝafojn por granda buĉo.”

“Sed kial?” mi scivolis.

“Al Satano tute, pro l’ plagoj, klaras, ke ĉesis pardoneblo por la pekoj aŭ ajna sav’ el liaj drakoungoj. Ĝi nur alportus perdon sen profito kun bankrotiĝ’ por liaj entreprenoj. Ĉu ne estos en tio aliaĵo?”

Abdiel respondis: “Lerta rimarko! Por ĉi milit’ Satano mobilizos la homojn kaj scipovon de l’ planedo, kun unu celo: lukti kontraŭ Kristo kaj lia taĉmentaro. Ili uzos fuzinukleajn bombojn, laserarmilojn kaj raketojn por pafe diserigi la Revenanton plus lia kunularo ankoraŭ en la spaco.”

Surprizite,

mi ekkriis: “Maleblaĵo! Li iĝis nemortigebla, kaj li estas Dia.”

“Sed ĉu ne ankaŭ homa? La diablo ĉi tion ne forgesis, supozante: ‘Unu fojon, kruce, mi lin mortigis. Eble ree mi rikoltos sukceson kaj lin tute vaporigos. Kaj se supervivos iel tiu en li dieco, la hom’ Jesuo ne estos plu, ne reĝos kaj ne turmentos min’.

“Sed kompreneble

ne tio ĉi okazos. Li descendos
kiel fajro kiu l’ armeojn voros
kvaz’ sekajn stoplojn. Liaj flamokuloj
tuŝos la Vatikanon, kaj kun ĝi
ekbrulos ŝrike fina pontifiko.
Incendiiĝos same la Kongreso
interne de l’ Kapitol’ en Vaŝingtono,
dum debato senfrukta kaj senfina.
El la karno duone karbigita
soriros akra stinko. Birdoj frandos
dum festeno, kiun Dio preparis,
la restaĵojn de homoj agresemaj.”

“Do tiel,” Ben konkludis, “la Sinjoro
tiujn ratojn en sian kaptilegon
logos!”

“Tio estos ĉe la Reveno.
Antaŭ ĝi ankoraŭ frapos la lasta
kaj sepa plago. Elizu, Ángel, Ben
aŭ aliulo, ĉu vi pritraktos ĝin?”

Tamen mi objetis: “Unue, mi petas,
rakontu, rilate la batalon, pri l’ drako
kaj lia sorto!”

Abdiel daŭrigis:

“Satano, provizore, pro teruro
kun siaj fuĝos panike al la luno,
kiel dum la diluvo. Tio estos
maldaŭra, lasta fojo kiam ili
povos forlasi tiun ĉi planedon.
Sed ne pri ili ni parolu nun.

Do kio koncerne tiun sepan plagon?”

Elizu gravmiene reparolis:
“Kiam ĉi pelvo estos elverŝita,
eliros de la tron’ en la ĉiela
plejsanktejo laŭta voĉo, dirante:
‘Fariĝis!’ Ĝuste tiel fro l’ kruco kriis
l’ oferita Kristo: ‘Estas finite!’
Sekvos fulmoj, aliaj voĉoj, tondroj,
kaj tertremego skuos ĉi planedon,
pli granda ol iam ajn fro kiam sur ĝi
loĝis homoj. Ĝi konvulsios kiel
giganto kiun frapis dolorega,
mortiga vundo. Montoj iĝos rubo,
kaj ĉie maroj glutos la insulojn.
Ekfalos tutaj urboj kun la domoj
multekostaj por kiuj elspeziĝis
vivoj vane per pena laborado.
Tiam hajlregoj talantopezaj,
kvindekkilogramaj, el la ĉielo
frakase falos sur homoj kiuj ne
jam kuŝos sub la enfalintaj muroj.
Ankaŭ ili ne pentos sed malbenos
la Plejaltulon tiom afliktantan.”

Gulley, dum ĉi diskutoj silentema,
demandis: “Kio pri ni?”

Respondis Ángel:

“De tiu hajlo trafos viajn kapojn
eĉ ne unu splito. La man’ de Dio
tegmentos vin en via eta valo.
Vi sekuros, ĉi tien rifuĝinte,
kvazaŭ vi estus jam en la ĉielo,
al kiu vin baldaŭ levos la Sinjoro.”

Intertempe jam komenciĝis mola
vespero, odoranta je jasmeno—
strange en tiu loko altamonta.
Fro ie grilo ĉirpis kaj Venuso,
nia fratinplanedo, super ni
de fore verŝis sian benignan brilon.

Tiam, unuj post la aliaj, voĉoj
leviĝis ĝis ĉiuj alhimnis la Kreinton:

La tag' en l' okcidento mortas
kaj kun ripozo la ĉielo
la teron tuŝas. Diserva horo
lumigas la vesperolampojn
en adoro.

Sankta, sankta, sankta
Dio kaj Sinjoro.
De vi la universo plenas.
La tero kaj ĉiel' vin benas,
en ĉi vespera horo.

Dolĉe sekvis ankaŭ la pliaj strofoj,
sed dum ankoraŭ kantis la sanktuloj
en tiu lok' mirinda, Abdiel
alflustris min: “Ni finiĝis tie ĉi,
kaj estas bone nun ŝteliri for.”

IX

Ni tiel glate el tiu horo glitis,
ke unue, kelkajn sekundojn, ŝajnis
kvazaŭ ni restus tie. Sed la homoj
kun tiuj du anĝeloj malaperis.

La montvaletoj tre similis, kvankam
ĝiaj konturoj ankaŭ revenigis
al mi sugeston pri konataj' iama.

Kun ĝojo miaj menso kaj okuloj
akomodigis. Mvenyane! Tie,
infan', mi floris kaj ludis kun fratinoj,
Blossom kaj Marjorie. Sed poste ili
igis maljunaj kaj forvelkis. Sepdek
jaroj kun ili de tiam fluis for.

Nur okjarulon, alihejmiĝo min
kaj mian koron el tiu lok' amata
ŝiris, kvankam en iu mensangulo
kun ĝia sentempeco ludas ankoraŭ
la tri infanoj.

Ni sciis, ke en la domo
laboras panjo, eble kun Maggie, ankoraŭ
ne sub la steloj mortpikita. Paĉjo,
verŝajne inter amataj fruktoarboj,
revas pri mondo antaŭ mia mondo.

Kvaz' mensa palpebrumo okdek jaroj
forpasis. Pekabundo, suferado,
plezuroj kiel mielgutoj, sango
en tempo vizaĝita kiel Hitler,
Stalino, Mao Zedong, Pol Pot, Amin...

Perdita paradizo forfuminta,
escepte el mi.

Tra la konscio ankaŭ
drivis la flagoj kun naciaj himnoj

de du respublikoj Buraj. Ili flirtis
nur kvindek jaroj dum ĉi popolojtoj
kantis liberon sub ĉielo blua—
ĝis porka imperio de la Britoj
gruntis pretekste pri homrajtoj, sed
orame formitralis la kolorojn
fro iliaj stangoj kaj anstataŭe
sian standardon hisis. Brave incensis
iliaj laŭdoj Dion kaj l' Reĝinon
el multaj bruligitaj farmodomoj
kaj tiuj tomboplenaj koncentrejoj,
kiuj mortisufokis dudek ses milojn
da virinoj kaj infanoj. Ĉar tiel
la soldatoj de la tenacaj Buroj,
ploreme mutaj, post milit' trijara
el bataletoj kaj insulprizonoj
peliĝis en la gloran Britan pacon.

Dudek ok jaroj de tiam kalejdoskopis,
ĝis jaroj kaj eventoj min elskuis.
Mian beban, ankoraŭ estiĝantan
menson salutis poste, en Sud-Afriko
subjugigita, monarkia himno
kaj fremda flago ruĝa, blanka, blua.
Tri krucoj, unuj super la aliaj,
kvazaŭ religie dekoris ĝin.
Sed logis apud ĝi la novaj flago
kaj himno kun memoroj antaŭulaj,
kio certigis koron dividitan.

Tamen unu afero ne ŝanĝiĝis:
malriĉo, restaj' tutviva en la spuro
de l' militlavango forbalainta
amatajn respublikojn. En Transvalo,
post la bruligo de nia farmodomo,

la koncentrejo apud Middelburg
preskaŭ la tutan familion glutis.
Soldatoj tien pelis aŭ transportis
kiel brutaron la avinon kun ŝiaj
infanoj, sed Josias Alexander,
la plej aĝa—kaj poste mia patro—
ankoraŭ dekkvarjara ekforkuris
kaj tiam kun la patro, militante,
Britojn pafis.

Ho frua hejmo kara
kiun barbaroj de la rabinsul'
al la flamoj donis kaj fruktarbar' unua!
Poste karbminejo kun nom' perfida,
Albion, uzurpis l' amatan farmon
kaj kompreneble riĉegiĝis el nia
grundo, kiam la famili' malhava,
senigite je ĉio krom memoroj,
forknaris en du vagonoj okstiritaj.
Alportis ilin al ĉi Mvenyane
Edwin James Knusen, laŭ kiu mi nomiĝis.
Li estis adoptita orfo Angla—
Matthews, origine—kiu tre amis
la stifgefratojn, inter ili ankaŭ
mian avinon kun ŝia familio.

Ĉi tie ili volis enradikiĝi
kaj frukti abunde en la nova grundo
kiel farmistoj, sed ne tre prosperis.
La vivo estis dentorompe dura.
Unue, por perlabori, la gepatroj
devis denove migri al la Nordo
kaj poste, dum mallonga tempo, nesti
en Mvenyane...

Ĉi-punkte Abdiel
atentontire tuisis.

“Revenu, Edwin,
el viaj pase-nebuloj al la nuno,
preter bedaŭroj, misoj, perditaĵoj,
por futuro trankvila sub la suno.”

“Kaj kion ni faras ĝuste tie ĉi?”

“Ni vidos la Sinjoron revenanta!”

Ho mirindaĵo!

Unue ni moviĝis
al inter tomboj pleje neglektitaj,
iuj jam tute plataj kun kapskriboj
ne plu legeblaj. Tie antaŭuloj
apud najbaroj en stretaj terolitoj
dormis generacioj-longan dormon,
dum super ili ĉirkaŭ la planedon
svingiĝis, fojon post fojo, suno kiu
la grundon bakis kaj luno karesanta
en la ombroj sub oldiĝantaj arboj
nomojn sur tombŝtonoj. Forpasintoj.
Ventŝtormoj hurlis. Pluv’ post ofta pluvo
enpenetriĝis. Laŭgrade ĝi formanĝis
ĉerkajn kovrilojn, fine ankaŭ karnon,
kaj lasis nur la ostojn kompatindajn.

Pri tio atentigis Abdiel.

Inter aliaj en ĉi loko kuŝis
almenaŭ du el miaj prageavoj
kaj kelkaj de iliaj, iam karaj

gepatroj, sed pri la detaloj svagis
mia memoro.

Dum mi en kompato
rigardis, meditema pri la morto
venkanta ĉiujn, alestiĝis fulme—
apud iuj tomboj—la lumaj formoj
de anĝeloj. Al unu tre proksima
mia kunul' kapsignis saluteton,
sed en mistera tasko absorbite
li ne atentis nin.

Scivole mi flustris:
“Abdiel, pri kio ĉi tie temas?”

Kaj li: “Momentoj sanktaj. Por ne plu ĝeni,
pli bonus alilokiĝi iomete,
al kie nin aŭdi kaj vidi eĉ por ili
maleblus.”

Ni subite ŝvebis. Sub mi
malcertis la piedoj sed ekstaris
sur roksolida planko el aero,
je mia miro.

La kunul' klarigis:
“Ni pendas en bobel' spactempa, ekster
la ordinario de la universo.
Baldaŭ ĝi ankaŭ vin protektos, kiam
la atmosfero malaperos kiel
kunvolviĝas antikva skribrulaĵo.
Sed ne pri tio ni parolu nun.
Rigardu ilin.”

“L' anĝeloj min perpleksas.

Kial ili alvenis tie ĉi?”

“Por bonvenigi al la viv’ eterna
mortintojn amatajn kies gardanĝeloj
ili estis! Tiuj ĉe l’ releviĝo
ne estu konfuzitaj. Kiam ili
mortis, la tomboaperturo ŝajne
estis klappordo al morna nenieco;
sed, ree malfermite, ĝi nun iĝis
la enirejo al ekzist’ senfina.”

“Kaj por l’ anĝeloj kia rekompenco!”
mi eksklamis grandadmire. “Do ŝajne
almenaŭ iuj miaj antaŭuloj
saviĝos. Mi vidas tie, ĉe la centraj
tomboj, kvar anĝelojn brilantajn preskaŭ
kune, kvaz’ ili estus unu stelo.”

“Sed ne forgesu,” Abdiel aldonis,
“pri viaj antaŭuloj aliloke,
patrinoflankaj. Estis Van den Heever,
ŝia avo, farmisto sanktiĝinta,
pri kiu la anĝeloj miris. Tiom
al Dio li sopiris, ke li ofte
sur sia agro ekstaris, eĉ haltigis
la oksojn kiuj tiris la plugilon,
kaj fro la kap’ levinte la ĉapelon
preĝis kun vizaĝ’ radia.

“De li
vi tute same kiel Christiaan Maurits,
via patrino kuz’ (verkisto granda
en l’ Afrikansa lingvo), heredis tiun
kapablon vian ŝpini versabundon.”

“Tion mi suspektis. Sed al mi mankas
tia kortuŝa pio. Kia homo!
Mirindus renkonti ĉi ĉiujn relevotojn!”

“Vi povus, se Jesuo ankaŭ por vi
aljuĝus tian sorton novateran.”

Mi mutiĝis, pro tiu sombra *se*,
verŝita sur mian ardon kvaz’ glacia
akvo, kaj Abdiel ne emis ĝin
diskuti. Kapjesis, en leviĝanta briz’,
tombejcupresoj.

Tiam la ter’ skuiĝis,
la kvieton ŝiris trumpet’ enorma
kaj jen Jesuo trans la horizonton
alrajdis en fajra glor’ kun multaj miloj
da anĝeloj. Lia vizaĝo brilis
kiel la suno, kaj liaj okuloj flamis.
Kun voĉo ĉien penetranta, li vokis:
“Vekiĝu, vi dormantoj en la polvo!”

Pordetoj malfermiĝis al la tomboj
sur kies sojloj ekaperis lumaj
formoj de revivantoj. Post konvers’
mallonga ili kune kun l’ anĝeloj
ĝoje en la aeron supren soris
al la Sinjoro.

Kiel ĥor’ fluganta
la tuta kompanio plumoviĝis,
kaj ni kunŝvebis. Jesuo ĉie vekis
la siajn, sed tre multaj tomboj restis
riglitaj kiel pordoj al prizono.

Mi do demandis: “Kio pri l’ aliaj?”

Tristiĝis la mien’ de Abdiel.
“Ili devas dormi mil jarojn pli,
ĝis ankaŭ ilin la voĉo de l’ Sinjoro
vokos kaj vekos al koŝmaro, kiu
finiĝos, bedaŭrinde, en l’ infero.”

Mi tremis. “Post mil jaroj, Abdiel,
sed kial ne jam nun?”

Li svingis manon.
“Diskurson propran tiu tem’ meritas
en sia tempo. Dume nur rigardu.”

Ni apud la majesta procesio
triumfa glitis, trans multajn horizontojn.
Ĝi haltis, fro temp’ al tempo, por ke ĉie
l’ anĝelaj rikoltistoj de l’ Sinjoro
kolektu siajn orajn garbojn. Ĝojkrie
la revivantoj, ĉiuj june belaj,
supren al li flugis. Same sanktuloj
ankor’ vivantaj.

Tamen la plejmulto,
kiun delogis al sia serv’ Satano,
provis en kavernojn aŭ ien ajn
rifuĝi, kriante: “Falu sur nin rokoj
kaj montoj, por nin kaŝi fro l’ vizaĝo
de Dio kaj la kolero de l’ Ŝafido;
ĉar venis granda tago de kolero,
kaj kiu povas stari?”

Ankaŭ mi,
timemigite, petis, ke l’ kunulo

forprenu min de ĉi terura gloro,
sed li rifuzis. “Eltenu por atesti.”

Do sub ni plue glitis valoj, montoj,
duondezerto, agroj kultivitaj...
Kaburbon ni atingis. Novedzino
de l’ antikva Atlantiko, ĉe Clifton
ĝi restis, kelk minutojn, tiel bela
kiel dum mia juno kaj ankoraŭ
en 2016. Mi tiam, oldul’, kun Ria
revizitis tie post sesdek jaroj.
Kontraŭ la monto, kiel ĉiam, pendis
palacaj domoj sub la dolĉa suno
inter ĉiellazur’ kaj blua maro.
Sed nun tertremo ĉion ĉi deskuis
en subitan rubon.

“Ho, Abdiel,
kolapsas mia koro!”

Li komplete
min tuj forplukis, kaj mi jen troviĝis
sub granda pin’, je paco odoranta
post ĉi tumulto tago. Mi rekonis
la Pra del Tornon, sed troe elĉerpita
por scivolemi. Kaj l’ anĝelo diris:
“Nun dormu iomete.”

Tiam poste,
ĉe la vekiĝo, mi estis pli trankvila.
La suno tuŝis la ĉiean verdon
kaj ĝis en mia koro. Tamen, laŭgrade,
io min ĝenis: kvieto absoluta.
Neniu bru’ frotetis kontraŭ mia
konscio por indiki vivantojn ie.

Mi ne plu kuŝis. Side mi demandis:
“Sed kie oni estas, Abdiel?”

Li ridetis. “Survoje al la ĉielo!”

“Kaj kiam ili translokiĝis tien?”

“Dum vi dormis, en sia rondvojaĝo,
Jesu’ alvenis kun ĉirkaŭantaro
jubila de glorigitoj kaj l’ anĝeloj.
Riĉegis la rikolto de Valdanoj
el tiu ĉi multjarcenta martirejo.”

“Sanktigita per sango,” mi murmuris.
“Do jam en la ĉielo...”

“Ne. Mi diris:

survoje al la ĉielo. Ili ascendas,
ankoraŭ nun, al tiu centra mondo
al kiu iam Henoĥ vin kondukis.
Teran semajnon daŭros la vojaĝo,
sur stela raŭto, preter l’ Orionan
Nebulozon. Unu ripozotagon
laŭ l’ kvara de la sanktaj Dek Ordonoj
ili survoje festos. Bela mondo
gastigos ilin kaj neniam tion
forgesos. Poste ili plurapidos
kun ĝojo al la Nova Jerusalemo,
por ili pretigita laŭ promeso
de la Savanto antaŭ liaj morto
kaj reviviĝo.”

“Kiel mi nun bedaŭras,
ke pro febliĝ’ ne ankaŭ mi akompanis
ilin!” mi plendis.

Tamen Abdiel
rifuzis la ideon. “Tute maleblus
jam nun kuniri. Memoru: ĉi eventoj
al via futuro apartenas. Tiam
vi povos kunflugi aŭ eventuale
ankoraŭ putri en la tombo, kiel
aliaj atendantaj mil jarojn pli.”

“Kun la damnitoj!”

“Espereble ne.
Sed ĉiukaze vi kaj nia atento
restu iom pli longe sur ĉi tero.
Korŝire, preskaŭ ĉie, kuŝas kadavroj
kaj murfalajoj, mondocivilizo
skue ruinigita. Tiel ĉio
mil jarojn restos, pleje sensanĝa, ĝis
Jesu’ denove venos.”

“Kiel *sensanĝa*?
Dum tiom da tempo la vetero multon
formanĝos, kaj de siaj ostoj stinka,
mortinta karno putros.”

Ironie
li demandis: “Sed kiuj flaros ĝin
kiam ĉiu nazo mortis?”

“La diabloj!”

Li ridis. “Unu punkton vi forgesis.”

“Kion?”

“Plenan mankon de oksigeno,
pro baldaŭ forŝirota atmosfero.
Mi jam pri tiu evento atentigis.”

“Abdiel, mi scias, sed sen kovranta
protektilo de nia atmosfero
detruus ankaŭ la varioj grandaj,
en diurnaj temperaturoj. Ĉu ne?”

“Nu, Edwin, pri tio vi pravas, kompreneble;
sed ili ja ne stinkos!”

“Supozeble
vi ŝercis pri la nazoj.” Mi kontentis,
ĉar unu fojon mi ne tute perdis
kontraŭ li argumenton, malgraŭ ke
koncerne faktojn mi mispafis.

“Nun
ni revizitu la ‘eternan urbon.’”

Kaj tuj ni estis tie. Ho, la kadavroj
kaj rubamaso en la Vatikano
de l’ iam bela bazilik’, nomita
honore al humila Judo, Petro,
fiŝisto!

Sub la pecigitaj muroj
mil jarojn kuŝos plu la pontifikoj
por sia rendezuo kun geheno.
Mi ankaŭ pensis pri l’ rompitaĵoj revoj
arkitekturaj de la majstroj Bramante,
Mikel-Anĝelo, Maderno kaj Bernini.

Al la papa palaco ni plumarŝis.

Pli da rubo. Mi sciis, mem artisto
per povraj vortoj, ke tie iam estis
la kapelo Sistina, kaj mi mornis
ĉar dispeciĝis la plafona gloro
kun la vizio de Mikel-Anĝelo.

Muta, multajn momentojn, mi staradis
apud la kunulo tre pacienca
kaj vane provis el la menso puŝi
la ĉirkaŭ mi mortintojn. Tiam mi vidis
figuron altstaturan almarŝanta.
Lucifero!

Li haltis kaj elkriis:
“Almenaŭ unu el vi poltronoj restis
kaj ne kun li forflugis!”

Abdiel
rigidiĝis. “Lumportinto, vi ankoraŭ
nin prikotas, lojalulojn, per tiu
malbela vorto. Kial?”

“Nur pro timo
vi daŭre laŭdas lin, Kaj nun mi vidas,
ke vi degeneris eĉ multe pli:
al nura ĉiĉeron’ por ĉi hometo,
kiu strange tra l’ tempo ĉirkaŭsaltas
kiel pulo. Li estas senvalora.”

Mi indignis. “Ne tion vi opiniis,
strebante min delogi, dum la jaroj
de Moseo. Mi kontraŭstaris. Tiam
vi korpe min minacis. Estis Mirjan,
la Golbo, kiu min el viaj grefoj
savis.”

Li rikanis. “Sed kiom mi ĝuis
ĝis tiam vian timon. Tamen nun
por mi vi iĝis tute senvalora.
La tempo estas granda instruisto
kaj ĉion montris kion mi bezonis.”

Li ridis, sed baldaŭ poste iĝis sombra.
“Sed nenio en ĉi rompita mondo
plu gravas. Mi memoras mian unuan
momenton, feliĉan kaj damnindan, kiam
la Kreinto min vokis el mistera
nenieco...kaj la iaman gloron
de mi mem. Mi brilis, pli ol ceteraj
anĝeloj, kiuj ĝoje min obeis;
kaj kiam ni adoris lin, la ĥoron
mi gvidis kaj kunkantis fervorege.
Sed dum nia laŭdo, ankaŭ miavoĉe,
incensis lin, ĉu li malice pensis
kun anticipa ĝuo pri ĉi horo
kaj la torturoj por ni pretigitaj?”

Mia kunulo tranĉe kontraŭdiris:
“Ho iam mirinde glora Lumportinto,
ne tiacele li vin kreis. Vi mem
laŭgrade, per mistraktoj de ĉi mondo
kaj ĝiaj homoj, satanigis vin.”

Ĉe tio la ankoraŭ belvizaĝa
Lucifer’ grimacis. Senvorte li
turniĝis kaj abrupte marŝis for.

Mi postrigardis lin, kaj Abdiel
avertis: “Estu fidela por ke li
neniam denove venu apud vin

post la mil jaroj kiuj komenciĝis.”

Frostiĝis mia koro, ĉar mi sciis,
ke li aludas al mallonga tempo
post la releviĝo de la damnitoj,
kiam Satan’ dominos la planedon
ekster la urbo kie reĝos Kristo.

Subite l’ atmosfero malaperis,
la sun’ brutale pikis kaj ni mem
ekŝvebis alte super la surfaco
de l’ tero, sufiĉe por ke videbliĝis
ĝia kurvo.

“Ĉi tie ni sekuros
de li kaj lia demona taĉmentaro,”
anoncis Abdiel.

Tre surprizite
mi mutis, ĉar unue ĉiu vorto
en mia gorg’ kroĉiĝis. Baldaŭ, tamen,
miaj lango kaj pensoj loziĝintaj
lasis min demandi: “Kial *sekuras*?
Ĉu ajno vin dubigis?”

“Jam ne nun”,
li diris. “Sed ni nin trovis tie solaj
inter diabloj. Unu el ili, ĉi ĉefa—
kolerigita—estas la plej danĝera
fiulo en la tuta universo.”

Nova timo min mordis, kaj mi plendis:
“Sed kio ĉi tie kontraŭ li protektos?
Li flugas facile tra la spaco!”

“Ne plu.

Dio tiun kapablon de li kaj liaj nelge forigis, kvazaŭ distondante iliajn flugilojn. Li povas, kiel struto, marŝi aŭ multe kuri sed ne leviĝi eĉ unu colon de la grundo.”

“Bone!”

Mi malstreĉiĝis. “Supozeble, tamen, tiuj lertuloj povos, kiel homoj, elpensi kaj fabriki flugmaŝinojn.”

“Ĉi tiu ideo kompreneble tuj en pli ol unu demonan menson saltis; sed, pli inteligenta, Lucifer’ ordonis kontraŭ ajna tia provo, timante plimavaĵon, eĉ paralizon.

“Studento de la profetaĵoj, li legis atente la Bibliion kaj precipe l’ Apokalipson. Libron materian lia mirinda menso kompreneble ne bezonas. Li ĝin parkeris baldaŭ post kiam ĝi emerĝis el la Johana plumo sur la antikvan papiruson. Tio pereis, kvankam ĝian tekston skribistoj, mem malaperontaj, multfoje kopiis. Lia memor’ neforviŝebla ĝin tamen konservadis. Ĉapitro 20 trans la jarcentoj lin teruris, dum li vidis la fineventojn proksimiĝi, kaj nun li devas koŝmare vivi ilin.”

Mi rimarkis: “Ankaŭ min ĝi impresis, sed iuj en ĝi aferoj ŝajnas al mi

problemaj.”

“Poste ni pritraktos ilin.
Unue tiun tekston ni atentu.”

“Nu, bone,” mi respondis. “Sed mi legis,
ke ĝi profetas la plej longan punon
prizonan por krimuloj, mil jarojn; aĉajn
cirkonstancojn; kaj poste ekzekuton
per fajro—longedaŭra por Satano.
Ĉu tio estas justa?”

Li min strange
rigardis kaj tiam koleriĝis. “*Justa?*
Nur konsideru milionojn kiujn
en mallumaj ĉeloj, liainstige,
l’ inkvizicio ‘sankta’ entombigis
inter torturo kaj tortur’ bestiaj
por rompi ilian fidon en Jesuo—
kaj poste sub rikana suno rostis,
malrapide, dum tedeumis pastroj!
Justa? Ĉi tia pens’ venena antaŭ
jam multaj jaroj fie enlikiĝis
vian menson. Do sciu, ke ĝi estas
el tiu de Lucifero sekrecio!”

Li paŭzis. Mi interne tumultiĝis
pro tiom da martiroj, ankaŭ Valdanoj.
Post kelkaj sekundoj da embaraso kaj
angoro, mi konfesis: “Abdiel,
vi pravas.”

Li kapjesis sed restis sombra.
“Kion vi opinias pri l’ nuna stato
de Satano?”

“Laŭ mi li estas mense
malsana.”

“Certe. Kaj jam multajn jarojn!”

Subita ide’ min frapis. “Li eble pensos,
dum la jarmil’ venonta, pri sinmortigo.”

“Por la homo, kun tiel kurta vivo,
preskaŭ naturas tia voj’ tenebra
eskapi el sia mensa labirinto
en la mallumon. Ekde l’ infanaĝo
li aŭ ŝi scias, ke l’ homidoj—ĉiuj—
devas iumaniere suferi
estingon per la morto. Sed anĝelo,
multjarmila, estiĝis kun l’ ekspekto
de viv’ senfina. Tial por Satano
la nura ideo, ke li devos morti
alportas netolerindan abomenon.
Krom tio, niaj korpoj ne konsistas
el materio ordinara. Mi dubas,
ĉu ni kapablas senvivigi nin.
Se jes, Jesuo revenanta simple
lin vekos por la sufero destinita.
Ne, li devas, kun sia kolegaro
atendi tra ĉi longaj juĝojaroj.
Li havos la okazon multe mediti
pri tiom da mizeroj ĉi-planede,
kreskintaj el unu sem’ de egoismo
ribela, kiun li jam fro temp’ antikva
en si dorlotis—kaj vere koni sin.”

“Sed kiucele?”

“Por konfes’ publika
antaŭ la universo. Per tio ĉiuj
komprenos pli bone pri neces’ komuna
subiĝi al Dio kaj obei liajn
ordonojn.”

“Ĉu tiakaze la Sinjoro
pardonos lin kaj liajn fianĝelojn?”

“Ilia natur’ tordiĝis tro profunde
por vera ŝanĝo. Ho, la milionoj
kiujn li delogis! Neni’ kompensus
por tio, la multaj buĉoj kaj bruligoj
de l’ martiraro aŭ ĉi tuta planedo
ruinigita. Tamen ĝi eble povus,
per pli rapida neniigo, redukti
lian teruran en la fajro punon.”

Mi silentis, kaj tiam li daŭrigis:
“La mondo, por li kaj l’ kunularo, iĝis
malliberejo, kiun tiu ĉapitro
de la Apokalips’ l’ abismo nomas.”

“Kial?”

“Tio estas la sama vorto
en Genezo 1, la dua verso,
de l’ Septuaginta traduko Greka.
Dum mil jaroj la mondo reĥaosos,
kaj kiam ĝi forturnos sian vizaĝon
de l’ suno, ili plonĝos en mallumon.”

“Kaj kion simbolas la katen’ per kiu
la drak’ ĉeniĝos?”

“Mi tion jam menciis.

Satano kun l’ aliaj ne povos plu
forŝiri sin por flugi fro l’ planedo,
kaj devos atendadi, dum la juĝo
enĉiela la sorton konsideros
de ili ĉiuj kaj l’ damnitaj homoj.”

“Tion mi ne komprenas, Abdiel.
Mil jarojn Dio por juĝi ne bezonas.”

“Sed ne pri tio temas. Laŭ la profeto,
juĝos surtronigita tribunalo
de la savitoj, precipe ili kiujn
la drako kaj la du bestioj lezis:
‘La senkapigitaj pro l’ atesto de
Jesuo kaj pro la vorto de Dio.’ Ankaŭ
la homoj ‘kiuj ne adorkliniĝis
al la bestio, nek al ĝia bildo,
kaj ne ricevis la markon sur sia frunto
kaj sur sia mano.’ Ĉi tiuj ‘reĝis
kun Kristo mil jarojn.”

“Eksterordinara
aranĝo!” mi rimarkis.

“Kaj unika.

Ĝi iusence kompletigos tiun
juĝlaboron de l’ jomkipur’ ĉiela
far Kristo la Sinjoro, komencitan
dum la jaro 1844,
ĝis tre proksime al la Dua Venio.
En tiu tempo li decidis mem:
ĉu homo reviviĝos aŭ pludormos
eterne kaj, koncerne relevotojn,
savitecon aŭ damnon.”

Mi interrompis.

“Sed miaj predikantoj kaj gepatroj
ĉiam rakontis pri du alternativaj
destinoj postmortaj. Vi mencias tri!”

Li estis tre afabla. “Amiko mia,
eĉ teologoj ne komprenas Dion
kaj lian favorkorecon, opiniante,
ke bonvenigos la ĉiela pordo
aŭ fajra faŭko de l’ infero glutos
ĉiun naskiĝintan sur ĉi planedo,
kiu por iuj estas mizerejo.”

“Kiuj por ĉiam entombiĝis—kial?”

“Ekzemple iuj sklavoĵ, kies mastroj
al fikondutoj ilin devigadis
kaj ĝisfunde misformis. Iuj vokis
el tiu stato, kaj l’ Sinjor’ kompata
ilin savos. Aliaj simple cedis
al siaj posedantoj kaj pekado,
kun karakteroj kiuj maltaŭgigis
por la ĉielo. Ilin li ne punos
sed lasos post la morto plu ripozi.
Ofte misedzaj viroj estis voktoj
super siaj iamaj karulinoj.
Pri tiuj ĉi simile. Kaj infanoj,
bebe mortintaj, kies gepatroj ambaŭ
perdiĝis. Iujn, tamen, amis parenco
savita, kiel avo aŭ avino,
kiu por ili preĝis. Ĉe l’ reviviĝo
anĝeloj ilin metos inter ties
brakojn aŭ vartos mem kaj edukados
ĝis plenkreskuleco.

“Sed ni flanken pensu
dis tiu grupo de nerelevotoj
al juĝoj antaŭ kaj post la Dua Venio.
Por tio estas klarige konsideri
du diferencajn vortojn en la Greka
originalo. L’ unua estas *krisis*,
la juĝdecido, kiun ĉiam faras
nur la homdia Kristo. Eterna viv’
aŭ morto nur de li dependas. L’ alia
vorto estas *krima*, juĝpuno. Pri tio
detalojn la savitoj konsideros
mil jarojn.”

“Speco de reĝaj ĵurianoj,”
mi murmuris.

“Ni povus tion diri
kaj ankaŭ por ĝi trovi paralelon
ĉi-tere en l’ Usona jursistemo.
Post decido, ke akuzito kulpas,
sekvas juĝpuna faz’ dum kelkaj tagoj.
Tiel en la kortum’ de l’ Eternulo.
Ĉar tio tuŝos la eternan sorton
de miliardoj, ĝi mil jarojn daŭros.”

“Dankon, Abdiel, vi prilumigis
la tutan aferon admirinde. Tamen
mi tre malŝatas tiujn ĉi amasojn
da ruinaĵoj kaj mortinta karno
kuŝantaj ie sub ni. Ĉu vi bonvolos
min nun preni for?”

“Ankoraŭ demando
restas—ĉu ne?—pri kio ĉi ĉio temas.”

“Por pravigi Dion,” mi tuj respondis,
iom kiel John Milton.

“Tamen kiel?”

“Forŝiras la proceso ĉiun maskon
belvizaĝan de Lucifer’, por montri
la turpaĵojn sube.”

“Interalie.”

Mi pensis pri multflanka degenero
kun fiaj malsanoj, kiuj sekvis la spuron
de la diablo tra ĉi trista mondo,
falĉintaj karulojn unuj post l’ aliaj.

Kiam ni laste al lia dom’ veturis,
Jim Watt ankoraŭ vivis. Sur sia lito,
nur haŭt’ kaj ostoj, li per basa voĉo
mallaŭte ion diris. Dolorplene
li provis rideti; l’ interna fajro de
la kancero pankreata lin jam preskaŭ
tute bruligis for. Kvar tagojn poste
la morto ĝin estingis. Isabel,
kiu vartis lin, dum tiuj finmomentoj
al la oldulo diris: “Jim, mi vin amas,
kaj amas vin via kirka familio!”
Ekspastro de l’ Eklezio Episkopa,
li Adventistiĝis, preskaŭ okdekjara...

Denove la anĝela voĉ’ parolis.
“Nun pensu plu. La nura senmaskiĝo
iujn spektantojn ne plene kontentigus.”

Ĉi vortoj min konfuzis. “Bonvolu do klarigi.”

Kaj ĉi tion li faris jene:
“Ankaŭ la plej alta Dio, la sankta Triunuo, dum tiu tuta tempo—
fakte per la konflikto de l’ epokoj—
sin elmetadis mem al la demandoj
far univers’ skrupule enketanta,
kiu post ĉio plene persvadiĝos.”

Kaj tiam ni ne pendis tie plu.

X

Trans dek jarcentojn eksaltinte, ni vidis
sur la horizonto la vespersunon
kiel grandan, ruĝan siklon.

Apudis

la rubamasoj kiuj iam estis
Jerusalem. Ĉe l’ randoj kuŝis blokoj,
la renversitaj muroj Sulejmanaj.
Mi sciis, ke sterniĝis ie, ankaŭ
frakasita, kvazaŭ floro el or’,
kupolo sur la Roko—Bizancastile
Muzulmana, de kiam la Araboj
kaj Ortodoksuloj frukte kunkulturiĝis.
Same la Okcidenta Mur’ antikva
de l’ Dua Templo falis kie Judoj
veadis. En 1985,
kiam mi vizitis, ĉi ĉio estis
ankoraŭ vidindaĵoj.

Kun Abdiel

mi forturniĝis kaj vidis oriente,
preter Kidron, la Monton Olivarban
kun ĝia tombejo, kiel ĉiam kalvan.
Iam dum forna varmo de Aŭgusto
mi sur ĝin grimpis. Preskaŭ ĉe la supro,
Arabo, afable monavida, malŝlosis
kirketon, kie li belgeste montris
antikvan rokon. Sur ĝi, li certigis,
Jesuo staris, ĉielen sorironte.
Liaj plandoj bruligis en ĝin markojn
post preskaŭ du jarmiloj plu videblajn.
Ho mitoj, ho mensogoj, kiujn la tempo
ŝpinis!

“Kial ni estas tie ĉi?”
mi demandis.

Kun vizaĝ’ radia l’ anĝelo
diris: “Jesuo Kristo al ĉi lok’
revenos. Liaj piedoj la Monton tuŝos
por krei grandan valon. Multo sekvos,
laŭ la promesoj en la Sankta Skribo!
Sed ĉu vi ne rimarkis la aeron,
kiun ni spiras?”

“Jes, la atmosfero
denove nin ĉirkaŭas. Eĉ briz’ leviĝas.
Kiam kaj kial tio ĉi okazis?”

“Antaŭ nelonge. Baldaŭ miliardoj
kun miro kaj konfuzo revekiĝos.
Kiel post Harvey, ĉe Houston uragano,
por ili bezonatos vestoj, nutro,
loĝigo kaj konsiloj.”

Mi komentis:
“Varti ŝafojn por poste buĉi ilin!”

“Vi miskomprenas, pro straba maniero
rigardi la aferojn. El la marĉ’
de via menso ŝimas pli mavaĵoj.
En ĝi mi vidis eĉ Aŭsviĉajn bildojn!

“Sed ne al la Sinjoro mi aludis.
Estas Satano kiu ilin helpos,
kun multaj milionoj da stabanoj
demonaj. Dum jarmilo, precipe kiam
ĝia fino alproksimiĝis, ili
planis kaj konspiris pri l’ farendaĵoj.”

Ree embarasite, mi murmuris
mallaŭte, iom raŭke: “Mi bedaŭras!”

Li senkomente daŭrigis la rakonton:
“Dum la lasta jarcento ĉi-jarmila
la tuta de Lucifero anĝelar’
formike laboregis, konstruante
kazernojn milionope, kaj tiujn ankaŭ
stokis je manĝaĵo.”

“Sed akirita
de kie? Nek best’ nek planto plu ekzistas
sur ĉi planedo. Mi ja vidis, antaŭ
jarmilo, kiel senatmosferigo
fro ĝia surfaco ĉiujn vivantaĵojn
forfrotis.”

“Certe, kaj ĉe l’ Tria Venio
Jesu’ ne reestigos manosvinge
aŭ vortovoĉe, ke saltu el la grundo

agroj da gren' aŭ arboj kun maturaj
fruktoj manĝipretaj. Sed la anĝeloj
konas ankaŭ aliajn manierojn
produkti nutron. Memoru la manaon
por Izrael', antikve zigzaganta
post la Eliro—kvardek jarojn—inter
Sinaj kaj la landlimo Kanaana,
tra vastoj de l' dezerto.

“Ĉiun tagon,
krom en Sabatoj, manĝ' haviĝis kiun
iuj nomis pano el la ĉielo.
Anĝeloj inĝeniaj tion faris.
Simile kapablas ankaŭ la demonoj.”

Mi diris: “Supozeble ni povus nomi
ilian provizaĵon malmanaŭ!”

Li ridetis. “Mi ŝatas la aludon!
Sed nun ni devas iom formoviĝi.”

Supren en l' aeron kaj flanken multajn
mejlojn, disde la olda Jerusalemo,
ni flugis kaj tie pendis kiel agloj.

Subite Abdiel ekkriis: “Jen,
ili estas!”

Sur la Olivarban Monton
sobvenis nubo. En ĝi mi distingis—
iel, supernature, ebligite—
la sune brilan formon de Jesuo,
kaj ĉirkaŭ li la gloran sanktularon
jubilantan. Liaj piedoj tuŝis
la supron, kaj la blankan monton fendis

kvazaŭ per hakil' giganta. La pecoj
disiĝis, estigante ebenaĵon
pli grandan ol la tuta Israelo.
Tamen la kompani' ne restis tie,
pro kio mi scivolis, sed Abdiel—
tre ekscitita—supren fingromontris.

Unue mi ekvidis ion etan
kiel insekto kiu falis. Rapide
ĝi sobvenante kreskis kaj iĝis vasta
urbego juvelita, multkolora,
per kies bildoj Gabriel Johanon
ravis laŭ finvizi' Apokalipsa.
Ĝi malrapidiĝis, ŝvebis kaj eknestis
sur l' ebenaĵo por ĝi preparita.

Jesu' kun la justuloj reaperis,
kaj li kondukis ilin en la urbon.

Mi petis: “Abdiel, ĉu ankaŭ mi
finfine povas eniri? Mi tre ŝatus
interne paŝti, sur ĝiaj belegaĵoj,
miajn okulojn.”

Mi tion diris, kvankam
rifuzon mi atendis. Je mia surprizo
granda li tamen diris: “Kial ne?
Sed provizore vi povas nun ricevi
nur mallongedaŭran vizitovizon.
Por la savitoj ĝi estis jam jarmilon,
kaj dum l' eterno restos, ilia hejmo.”

Subita ĝoj' inundis mian koron,
kaj baldaŭ mi ekstaris—li apude—
inter gloraj estuloj sur la strato

el or' kaj vitro. Brila ĉirkaŭ mi,
la urbo mem el tia materi'
konsistis, preskaŭ ĉiamdaŭra, ĝis
la kosmo post eonoj eltriviĝos.
Dio la ĉielojn kvaz' oldiĝintan
veston ŝanĝos aŭ preter la spactempo
estigos novan ordon.

Tra ĝia mezo
fluis kristale klara la river'
de l' vivo. Ambaŭflanke arbotrunkoj
kreskis kaj supre unuiĝis. Branĉoj,
riĉaj je fruktoj, pendis tre proksime.
Mi etendis manon por pluki unu,
sed lia anĝela voĉo min severe
avertis: "Kiel post lia pek' Adamo
ne plu rajtis ĝin manĝi, ankaŭ vi
en via nuna stat' ne tuŝu ĝin."

Memorigite, la manon mi retiris.

"La rivero fluas el tiu lumo,
la tron' kaj koro de la Plejaltulo.
Ne marŝu tien; vi mortus. Anstataŭe
rigardu ĉirkaŭ vi la heredaĵon
de la savitoj.

Al mia livo estis
domo pli luksa ol tiuj de l' riĉuloj
kiujn mi suburbe ĉe Edinburg
enviis.

"Kies?" mi, gestante tien,
demandis.

“Eble la via. Kaj l’ persono
loĝanta tie eble estas vi!”

“Ĉu tiel, Abdiel, vi fine nun
ĝojigas min per tia ĉi riveloj?”

“Mi ne rajtas diri ĉu vi saviĝos.
Tamen ne deprimiĝu. Se ne ekzistus
por vi esper’, Jesuo—kiu vin
ĝissange amas—ne al vi destinus
ĉi tiun tra l’ jarcentoj vojaĝegon,
kaj ankaŭ esplorigi vin pri vi.”

Mi konsoliĝis kaj ne plendis plu,
sed en ĝarden’ admiris florabundon
kaj la majestajn branĉojn de pekano.

Al pluraj kaj variaj tiaj ejoj
ravaj li direktis mian rigardon
kaj memorigis pri l’ vortoj de Jesuo
al la disĉiploj antaŭ Getsemane:
“Mi iras por pretigi por vi lokon”
kaj “mi revenos kaj ricevos vin
al mi mem, por ke vi ankaŭ estu tie,
kie estas mi...”

Ĉe tio mi preĝis,
subite larma, kaj mian kapon klinis:

“Jesu’, Sinjoro, vi estas mia justo
same kiel mi estas via peko.
Vi sur vin prenis tion, kio estas
la mia, kaj tion al mi donis kio
estas la via. Sur vin vi prenis tion,
kio vi ne estis kaj donis al mi

tion, kio ne estis mi.”

Ĉi tiel
en fora jaro skribis Martin Luther
al frat’ monaĥa, kiu vane strebis
anstataŭ trinki savan akvon, kiun
la Krucumit’ el vivoput’ proponas.

Senvorta, kompreneme, Abdiel
premetis mian ŝultron. Poste li
atentigis, ke multaj de l’ savitoj nun
rapidas el la urbo.

“Ni sekvu ilin,”
li diris. Mi obeis, kvankam tre
sopirante resti multajn horojn pli.

“Por kio?” moviĝante, mi demandis.

“Hodiaŭ vi atestos mirindaĵon
sed scenojn ankaŭ tristajn.”

Ekster la urbo
la luman kompanion antaŭiris,
majeste, la Sinjor’, la Fil’ de Dio.
Subite, kiel bildŝanĝ’ en filmo, ni ĉiuj
nin trovis fro tie multajn mejlojn for.

Ni staris sur ebenaĵo nun senhoma,
inter la du riveroj, kie iam
tra la jarcentoj bunte procesiis
popoloj multkulturaj babilemaj,
kun revoj kojnoskribe postlasitaj.
Tie Jesu’ parolis al la polvo,
kaj tiuj ekshomoj tuje refariĝis

variavestaj, bunte ĉiuepokaj.

Kiel ĉe sia vek' ekzekutoto
ĝemas ĉar hodiaŭ lia koŝmaro
pludaŭras, hida realaĵo, tiel
ŝoke vekigis ankaŭ la damnitoj.
Jesuon ili vidis, unue silentaj.
Poste leviĝis voĉoj, kiuj laŭte
veis: "Benita estas tiu, kiu
venas en la nomo de la Sinjoro!"

Ĉi tio mirigis min, ĝis Abdiel
murmuris, ke kvankam ili lin malamas,
tiun agnoskon el iliaj buŝoj
lia gloro devigis.

Tiam, kiel
kandelflamet' ekblove estingita,
Jesuo kaj l' sanktuloj malaperis
kaj tie lasis nin.

Mi surprizite
al la kompan' turniĝis, demandante:
"Sed kien ili iris?"

"De lok' al loko
sur la planedo, por veki pli kaj pli
ĝis preskaŭ ĉiuj iam ajn vivintaj
revidos la sunon. Kion vi rigardis
kaj aŭdis, tio milfoje ripetiĝos.
Ni restas por observi la sekvaĵon."

Mi tremis. "Kiam baldaŭ li kiel fojnon
puŝos ilin en la mondfinan fajron."

“Ne estos tute tiel. Li permesos
al ili kaj l’ Fiulo mem decidi
la manieron konkludi ĉi ŝakludon
mizeran.”

Dume ĉirkaŭis nin konfuzo:
koler’, plorgemoj de l’ forlasiteco
kaj murmuraĵ’ obtuza.

“Kion ni faru?”
proksima voĉo kriis, senespere.
Baldaŭ aliaj, tiam multaj pli,
refrene pri sia stat’ demandosignis.

Tiam silentis ĉiuj. Staris tie
la luma formo de estul’ majesta.
“Mi helpos!” li belvoĉe klarionis
ĝis trans la horizonto.

Iu demandis:
“Kiu vi estas?”

“La princo de ĉi mondo,
kiun de mi forrabis uzurpanto,
kies ĉefurbo—nova Jerusalem—
juvelas ĉe l’ Okcidenta Maro. Sed
anstataŭ tion prizorgi, viaj bezonoj
kuŝas pli proksime al mia koro,
kaj por asisti pretas milionoj
da kolegoj kun rimedar’ abunda.”

Ĉe tio fulme aperis inter ili
estuloj brilaj.

“Edwin, ni devas urĝe

rapidi el ĉi danĝera loko for!”

Subite nin ĉirkaŭbrakis, sekurige,
la altaj muroj de la sankta urbo,
kiu forbarus ĉiun invadunton.
Ni staris denove sur la ora strato
apud la river’ kun tiu arbego
per kiu alie efemeraj vivoj
ĉiamiĝas.

Ankoraŭ min tremigis
teruro. Ni troviĝis inter tiom
da diabloj! Kvankam ne demandita,
l’ anĝelo realudis la danĝeron:
“Mi vidis en la mensoj de demonoj,
ke Lucifer’, tro okupita, al ili
delegis kapti vin; ĉar vian korpon
li volas, dum iu duonhor’ libera,
persone ĝui per lanta disŝirado,
pecon post peco. Sola, mi ne povis
kontraŭbatali ilin kune. Tial
ni devis rapidege ĉi-tieniĝi!”

Mi preskaŭ svenis, imagante ties
drakungojn kaj min senhelpan inter ili.
Li daŭrigis, kun voĉo zorgoplana:
“Ripozon vi bezonas kaj sanigan
dormon. Vin sternu tie sur la herbo
kie aromaj rozoj ambaŭflanke,
ruĝaj kaj flavaj, vian menson flegos.”

Min vekis voĉoj. Al iu scivolema
Abdiel klarigis ion. Mi aŭdis
piedpaŝojn marŝantajn for. Mi tiam
stariĝis.

“Bonvenon el via songolando!”
li gaje min salutis, aldonante:
“Ĉar ĉi tie neniu plu laciĝas,
ies dormo—ne bezonata—atenton
logas, kaj vi evidente ne estas
loĝanto. Tion ĉi proklamas ankaŭ
viaj vestoj kaj korpo ne lumanta.
Tial, por eviti pli da okuloj
ni nun transsaltu kelkajn urboblokojn
al loko malpublika.”

Kaj tiel estis.

“Kia ĝarden’!” mi diris, rigardante
herbon ĉirkaŭe, multnuance verdan,
arbustojn ĉiukolore florajn kaj
la arbojn. Iuj majeste etendiĝis
alten. Aliaj estis bonodoraj,
branĉopezige fruktabundaj. “Ho!”
mi elkriis, “kvazaŭ tiu paradizo,
kiun la Plejaltulo iam plantis
oriente de Edeno! Fro tie
Adam’ kaj Eva elpeliĝis, tristaj,
post la unua peko.”

Abdiel

korektis min. “Ne *kvazaŭ*. Ĝi estas ĝuste
la paradizo!”

“Ĉu vi nin jarmilojn
en foran pasintecon resaltigis?”

“Ne tio. Ni ankoraŭ restas ĉi tie,
proksime al la koro de la urbo.”

“Mi tute ne komprenas.”

“Mi rakontu.

Post la ekzil’ abrupta de l’ gehomoj
unuaj, el ĉi feliĉejo kun
senfina vivo, en la regionojn
kie ĉio—ankaŭ ili—rompitos
kaj estos mortidevaj, malfermiĝis
fonto ol larmoj pli profunda, kun daŭra
sopir’ reiri al la amata, hejma
paradizo. Sed la Sinjor’ ekspedis
kerubojn kaj flaman glavon turniĝantan,
por bari la vojon al la vivoarbo.
Neniu povis ĉe la elirejo
eviti ĝian fajron aŭ trovi ie
engrimpejon, ĉar la anĝelokuloj
senlace, ĉiumomente, vaĉe gardis.

“Pentaj posteuloj, dum kelkaj jaroj,
alportis tien, al la enirejo,
piajn preĝojn kaj sangajn pekoferojn.
Sed en unu mateno ili venis
vane. Malaperis la paradizo.”

Mi multe miris. “Kien?”

“Al la ĉielo.

Jarmilojn poste, kiam la Sinjoro
komencis la kapon de l’ serpent’ frakasi
per morto sur la kruco, li revenis—
venkinto—kaj al la anĝelar’ ordonis
tie konstrui Jerusalemon novan.
En ĝi la paradizon li inkludis
kiel specimenon de l’ kre’ unua,

pli longe daŭran ol la galaksioj.

“Por la savitoj ĝi estas lok’ amata
en kiu vi ordinare plurajn vidus,
sed ne nun. Jesuon ili sekvis
por ĉeesti la duan revivigon
de la mortintoj, kiun vi observis—
kvankam nun la homtajdo reenfluos
inter ĉi murojn. Dume ni parolu
pri l’ regno de Satano, kun aranĝoj
por la sieĝo.”

Tio min mistifikis.

“Kie li reĝos, Abdiel, por kiel
longe kaj kion poste li sieĝos?”

“La tutan mondon krom ĉi-urbe, multajn
monatojn. En tiu temp’ li mobilizos
grandegajn homamasojn kaj demonojn
por konkero de l’ nova Jerusalemo.”

“Tio maleblas.”

“Ne laŭ liaj kalkuloj.

“Unue la perditajn li kaŝolos.
Kiam Jesu’ revokis ilin el
la polvo, ili ne ekhavis—kiel
liaj savitoj—freŝon de l’ mateno,
ĝojon, vervon, reestigitan vivon
eternan, sed melankolion, feblon,
teruron pri la fajro atendanta.
Satano sin prezentos kiel solvon
por ĉiuj ĉi problemoj. Kun sia stabo
de demonoj, li tuj fortigos ilin

kaj orde forkondukos al la nelge,
anticipe por ili preparitaj
ejoj, kiujn mi jam menciis. Tie
loĝlokojn kaj manĝaĵon ili trovos,
ankaŭ kuraĝigon; ĉar espereton
li kvazaŭ patro, tre politikiste,
reĉendos.”

“Kial ili kredos lin,
la diablon?”

“Sian identecon li maskos
kaj ne al ili diros, ke li estas
Satano. Lerte ĉi granda mensogisto
ŝpinos araneaĵon kaj ilin kaptos
per sia mito pri la uzurpanto—
Kristo—kiu supozeble forrabis
lian planedon. ‘Tamen ties ĉefurbon
ĉe Mediteraneo, kun nur pokaj
defendantoj, ni miriade multaj
konkeros tre facile...’”

“Abdiel,
ĉu ne ĉi tiun trompon kontraŭdiros
la eks-Adventistoj de la Sepa Tago,
kiuj apostatis? Ili ja konas
la veron, kvankam ili mokis ĝin
kaj judasiĝis, denunciante siajn
fidgefratojn. Pro timo aŭ pekamo
ili akceptis la markon de l’ bestio.
Tial ili vekigis el la tombo
kun ĉiuj damnitoj, jarmilon tro malfrue,
sed ankaŭ ili iam legis libron
far profetino Ellen White. Ŝi en ĝi
precize antaŭdiris kion ili

spektos: ruze li ne rivelos sian
diablecon. Kial tiuj silentos?”

“Ĉar apud ĉiu el ili daŭre staros
demon’ minacvizaĝa, por sigeli
babilemajn buŝojn.”

Ĉe tio lian
vortofluon ĉesigis vizitantoj,
kaj li moviĝis. “Bedaŭrinde, Edwin,
ni devas el ĉi ĉarma lok’ foriĝi.
Ni povos en alia horo vidi
kiel finiĝos la dramo de l’ epokoj.”

Denove ni pendŝvebis en bobelo
kiu nin de la spacotemp’ kutima
eksterenigis. Baldaŭ mi ekaŭdis,
fro tute proksime, laŭtan trumpetadon,
marŝmuzikon kvazaŭ sur paradejo
kaj voĉojn ordonantajn.

“Jen, ili venas!”
diris Abdiel. “Kaj ankaŭ rigardu
la urbon!”

Mi tuj la kapon tien turnis.
Proksime supren etendiĝis la mur’
altega, kies ĉiuj pordoj estas
perlegoj. Tien alrampis la kolumnoj.

“Kion ili nun faros?” mi demandis.

“Miraĝis el la menso de Satano
sieĝo, verŝajne longa, fina sturmo
kaj forŝiro de la pordegoj grandaj.

Interne ili uzus specialajn
armojn por ĉiujn ekstermi aŭ forpeli.
Li ankaŭ fantaziis pri reĝiĝo
kaj kiel kaŭterizi la planedon
de ĉio, kio aŭdacus lin kontraŭi.

“Kompreneble ĝi estas febrosongô,
sed antaŭ ĉi monatoj li preparis
kun la demonoj. Li konsultis ankaŭ
plurajn de tra l’ epokoj konkerintojn,
kiuj verŝis multe da sango, kiel
Aleksandron, la supozeble grandan,
sin faraone diigintan (li mortis
pro vundoj, malario, alkoholo);
Julion Cezaron, senkoran hombuĉinton
de Gaŭlo; kaj Napoleonon. Ĉi tiu
sian revatan vojon al glor’ pavimis
per kadavroj, sango kaj vasta veo.”

Pri unu afer’ en tio mi aparte
scivolis kaj demandis: l’ armilaro—
kia kaj kiom?

“Punkto interesa,”
li respondis. “Ofte dum la jarmilo
Lucifero kaj sia kolegaro
ĝin kovis. Pri la Nova Jerusalemo
ili jam sciis pro l’ Apokalipso
kaj multe, antaŭĝue, ĝin delectis.
Tial neniun atombombon ili
faris. La urbon kun ĝiaj mirindaĵoj
ili volis okupi, ne detruiri.
Kaj poste, dum multloke fabrikejoj
jam produktis varian armilaron,
radi’ mistera fulmis el la urbo

kaj voris ĉiun aviadilon. Tankoj,
maŝinpafiloj kaj ĉio infanteria
estis permesitaj, eĉ la laseroj
por pripalpli la murojn, sed ne transflugoj.

“Tamen vidu!”

La alrampinta tajdo
de homoj kaj demonoj, kun Satano
antaŭe, haltis proksime al la muro
kaj l’ urbon ĉirkaŭfluis. Poste ili
turnis siajn vizaĝojn supren.

Tie,

pli alte ol la urbo, videbliĝis
fundamento vasta el brila oro.
Ĝi subportis la grandan blankan tronon
sur kiu sidis la homa fil’ de Dio
kun sia savitaro ĉirkaŭ si.
Al ĉiuj damnitoj teruro glaciigis
la korojn, ĉar la gloro de la Patro,
pli hela ol la suno, lian vizaĝon
briligis.

Ĉe tio Lucifero kriis:

“Kuraĝon! Ne lin lasu vin timigi!”

Sed malgraŭ tio lia kompanio,
kvaz’ plantita en la tero, senmove
Jesuon rigardadis. Apud li
anĝelo nobla, altstatura, havis
kronon multjuvelan en sia mano.
Sur la kapon de la Sinjor’ li metis
ĝin. La tuta homar’ atestis tiel,
dum jubilegis lia sanktularo,

lian reĝigon super la planedo
por ĉiam. La ŝton' fariĝis granda monto,
plenigante la teron, kiel iam
en sia sonĝo vidis Nebukadnecar.

Jesuo, tuj post sia enoficigo,
gestante vokis por la protokoloj
pri l' ekstermenduloj. Tim' ilin draŝis.
Dum vanaj vivoj ili lin rifuzis,
per far' post fia faro, deklarante:
“Ni ne deziras, ke ĉi tiu reĝu
super ni.”

Sed nun, dum kelkaj sekundoj,
fajre liaj okuloj transkuris ilin—
rigardo kiu en ĉies vizaĝon tuŝis,
pri ĉiu pek' memorigante.

Kruco

super la tron' aperis. Panorame
disruliĝis la scenoj de l' Adama
tent' kaj falo, kun poste ĉiu etapo
en la plano de l' granda Reaĉeto.

Unue bebiĝis Dio la Savanto.
Tiam, plenkreskulo, li siajn saĝon,
sanigojn kaj konsolon malavare
semadis en la eta Palestino,
facile tramarŝebla lando. Poste
li iĝis, sur Golgoto, buĉofero,
kuŝis, kadavrigite, en roktombo
kaj l' trian tagon revivigis sin.

Ĉi ĉion terurite spektis Annas,
ĉefpastro, kun Kajafas, fia Herodo

kaj Pilato. Ĉi tiu de siaj manoj
en vano provis lavi la senkulpan
sangon de Jesuo, kiu avertis
pri siaj dieco, glora ven' kaj juĝo.
Tion ilin revidis kaj priĝemis,
sed la sanktuloj ĉe la tron' kliniĝis,
kun granda ĝoj' kriante: "Por mi li mortis!"

El la malgranda bedo de la Juda
lando, la greno de l' Evangelio
dispersiĝis en agrojn trans la tero,
por ĉe la mondo fin' rikolto riĉa.
Sed semis ankaŭ la Prafripono: lolojn
inter tritiko, kiujn kultivadis
liaj teologoj, entuziasmaj
pastrar' kaj pontifikoj. Tra l' epokoj
ili per torturoj kaj fajromurde
altrudis sian groteskan religion.
En la panoramo ili ĉi tion
ree spektis kaj veis anticipe
pro l' fajro, kiu ankaŭ ilin fritos.

Ĉiuj fiaskintoj de la epokoj
sian komprenis rolon priplorindan
en tiu vivdramo kaj ĝemante kriis:
"Kia stultul' mi estis!" Kiel Faŭsto
ili sin vendis por pasemaj ĝuoj
de la momento kaj l' eternon perdis.
Ili rigardadis kaj tre enviis
la sanktajn beatulojn super si
kaj ĉe Jesuo, saĝe rifuzintajn
fatalan transakcion kun Satano.

Kaj tiam, sub l' okuloj de l' Sinjoro,
la kor' en ĉiu ŝrumpis. Genuiĝante,

ili konfesis lian justan juĝon.

Dume ankaŭ Lucifero kontemplis
la viditaĵojn. Ili en li vekis
memorojn pri frua temp' antikvajn, longe
sub siaj fiaj faroj entombigitajn.
Tiam ancor' neniŭ ŝarĝo premis
sur lia konscienco. Simplaĝoje
li oficis ĉe l' trono de la Patro
kaj en la ĥor' ĉiela, far li gvidata,
kunkantis fervorege. Dion li ame
laŭdis, pre ol la narcisisma nubo
leviĝis, laŭgrade, el iu mensprofundo
kaj ĉion formakulis krom la propra
imago. Milionojn da anĝeloj
li ruinigis kaj pleje ĉi planedon
kun ĝiaj homoj. Ankaŭ sin li tute
misfaris, neripareble.

Maltaŭgigito

por daŭro eterna, fine ankaŭ li
akceptis, genuiĝante, punpokalon
amaran, por ke li ne estu plu.

Sed tiam ribelo ree en li flagris
kaj surpiedigis lin kun flama hatu.

Li provis vervon vekti en l' aliaj
por tamen breĉi, per truo enireja,
tra la jaspiso de l' malmola muro;
sed ili jam ne emis lukti aŭ plu
aŭskulti lin, sciante tion vana.
Anstataŭe ili atakis lin,
kaŭzinton de ĉies suferado.

Ĉe tio

la flamoj falis kiel pluv' inunda
kaj ĉie el la ter' sputiĝis lafo,
ĝis la planedo iĝis lago fajra,
sur kiu flosis tiu sankta urbo
kiel arkeo. En ĝi la savitoj
sekuris. Ekstere ĉiuj maljustuloj
kiel stoploj al cindro konsumiĝis.

Tamen ne samtempe. Iujn la fajro
dum kelk sekundoj voris, sed aliaj
sufervis multajn tagojn—laŭ la mezur'
de siaj pekoj aŭ mizeroj kiujn
ili trudis al siaj proksimuloj.

Papo post papo, herezulĉasintoj,
grandaj generaloj, kies manovroj
soldatojn per gas' sufokis aŭ senbride
ŝovis en faŭkojn de la karnonmaĉa
militmaŝin', gardistoj ĉe Aŭsviĉo
kaj riĉeguloj, kiuj eksode el siaj
laboristoj ŝviton aŭ sangon suĉis...

Ilin la enferiĝo ne mirigis
kiujn inkuba horo ofte vekis
ĉirkaŭ la noktomezo. Akraj duboj
ŝvitige mordis iliajn konsciencojn.
Nun ili do ne povis ne agnoski
la juston de torturo meritita.

Sed jen aliaj, kiuj sin imagis
bonuloj, atendante tutan vivon
lokiĝon enĉielan. Ilin surprizis
kaj hororigis merg' en fajrolagon
por bruli kun la cetera homfatraso.

Tial ili demandon kun riproĉo
suprenĵetis al la Surtronigito,
kaj li en iliajn mensojn tuj respondis:
“Mankis al mi manĝaĵoj, io trinki
kaj vestoj. Mi malsanis kaj mizere
kuŝis en prizonĉelo. Sed vi ne venis
por helpi aŭ almenaŭ min konsoli.”

Ili scivolis: “Sed, Sinjor’ Jesuo,
kiam vi suferis ĉi tian sorton
sen ke ni atentis? Ni rapidegus
por helpi vin!”

Malĝoje li klarigis:
“Kiom tiaĵojn vi ne faris al miaj
gefratoj, tiom vi al mi ne faris!”

Kaj super ili ĉirkaŭ la trono staris
multaj kiujn l’ unua releviĝo
same surprizis. Dum la viv’ surtera
ili neniam konsideris sin
aparte bonaj, nek atendis laŭron
aŭ laŭdon en la ludoj Olimpiaj
de l’ destino. Malgraŭe la Sinjoro
ilin tenere kun ĝojo bonvenigis
en la ĉielan regnon. Li klarigis:

“Mankis al mi manĝaĵoj, io trinki
kaj vestoj. Mi malsanis kaj mizere
kuŝis en prizonĉelo. Sed vi venis
por helpi aŭ almenaŭ min konsoli.”

Ili scivolis: “Sed, Sinjor’ Jesuo,
kiam vi suferis ĉi tian sorton

kaj ni atentis aŭ provis helpi vin?”

Kaj li aldonis: “Kiom vi tion faris
al miaj gefratoj, tiom vi faris al mi!”

Ĉi ĉio min malsanigis, ĉefe l’ konstato
ke iuj devas suferi multajn tagojn.
“Abdiel, forprenu min, mi petas!”

“Post kiam mi krokizis la ceteron.”

“Nu, unue, kial ili ne kune
kaj tuj viŝiĝas for. Ho kiel teruras
l’ infero!”

“Edwin, vi civitaniĝis
en Usono kaj ĝian konstitucion
ŝatas. Unu el ĝiaj klaŭzoj kontraŭas
‘kruelan kaj nekutiman punon’. Nu,
la dia Patro ne estas Usonano
kaj havas principojn tre aliajn, ekzemple
ke l’ puno al la krimo konformiĝu.

“Sufero multe pli longe por Satano
daŭros ol ajna homo aŭ demon’
alia. Kiam ili jam ne estos,
li sur sia fajrolito tra l’ dentoj
ĝemos: ‘Ĉu ne sufiĉas tio ĉi?’
Kaj: ‘Kreinto, kial vi ne respondas?
Mi scias, ke vi bone aŭdas min.’

“Sed la Sinjoro daŭre nur silentos.

“Fine ankaŭ iuj el la sanktuloj
por li propetos, sed la Plejaltulo

ŝajne surdos. Li tamen en si mem
kunveos, kiel ĉe la kruchororo,
kiam Jesu' en agoni' baraktis.”

Tiam ni de tie eksaltis for
en ĝardenon Irlande verdan. Niajn
sensojn salutis bugenvila bunto
kaj fruktoarboj tiel maturodoraj
ke flari estis preskaŭ gustumi ilin.
La suno super lagakvo proksimiĝis
al sia vespera horizonto.

“Kie
kaj kiam ni nun estas, Abdiel?”

“Sur la alia vango de l' planedo
fro kie lumas la nova Jerusalem,
jam dek jarmiloj en la estonteco,
kaj baldaŭ komenciĝos la Sabato.”

“La refarita tero?”

Li kapjesis.
“Morgaŭ ĉiuj loĝantoj en la Urbo
ĉeestos por la granda, ĉiusemajna
kunveno kaj diservo. Tie denove
ili vidos Jesuon kaj la Patron,
kun multaj amikoj transgeneraciaj.
Ankaŭ, kompreneble, la anĝelaron.”

Jesaja pri tio verkis.

Li daŭrigis:
“Mirindas, ke la mondo liberiĝis,
por ĉiam, de l' koŝmaro. La diabloj

kaj pekemuloj ne estas plu, iĝinte
memoro de la dista pasinteco.
La savitaro povas trankvile planti
arbojn kaj manĝi mem iliajn fruktojn
kaj domojn konstrui por propra enloĝado
longa. Ilin ankaŭ gastigos aliaj
mondoj en multaj, multaj galaksioj.

“Kaj nia univers’ antaŭen kuras
al celoj preter la nuna mensatingo
de homoj aŭ anĝeloj. Ni intertempe
nur laŭdas. Granda estas la Sinjoro!”

Mi tute ne sciis kion diri, kaj
silentis, kelkajn minutojn, ankaŭ li.
Dume ni frandis la vesperon.

“Mi loĝas
ĉi tie, en tiu domo”—li gestis al ĝi—
“kun homamikoj, kiujn tra l’ jarcentoj
mi rikolte akiris, gardanĝelo.
Kaj ankaŭ vin mi kore nun invitas,
post kiam vi finos vian teran, ĉi-korpan
vivon por longa tempo kun ni gastis.

“Sed pli al vi aĝablos la renkontoj
kun viaj antaŭ- kaj iuj posteuloj,
kiuj bonvenige brakumos vin.
Ne plu disigos la nigra man’ de l’ morto
aŭ lastaj adiaŭoj.

“Vi konatiĝos
kun la patrino, kiun vi ne komprenis;
ŝiaj plendem’ pro kordoloroj, ankaŭ
larmoj, vin forpuŝis dum l’ infanaĝo

kaj junvireco.”

Lia paŭz’ akuza
hontigis min.

“Amare mi konfesas
mian egoismon. Ho Abdiel,
mi tiom bedaŭras, tro zorga pri mi mem.”

“Jes, pro tio vi devos pardonpeti,
kvankam ja estis tiu fina fojo
kiam post infarkto vi vidis ŝin.
Ŝi tre kvietis, vi tenis ŝian manon
kaj tio estis lasta ĝisrevido.
Dum ŝia tuta vivo ŝiaj preĝoj
por vi ascendis kiel incenso al
la ĉiela Patro, kiu min komisiis
vin gardi speciale.

“Ŝi ankaŭ ĵonglis
per rimedoj, iuj tre malprobablaj,
sendigi vin al kolegi’ multkosta
kie Arnon vi renkontis kaj kie
esence via vivo komenciĝis.”

Mi hontis; tiom da jaroj mi ĉi ĉion
ne atentis, kaj intertempe ŝin
englutis ombroj. Ho la rado de Ĥronos
ne estas retroturnebla!

Abdiel
legis miajn pensojn. “Sed vi imagas
pagane, laŭ tiu via mond’ antaŭa.
Tamen la Nova Ter’ por siaj homoj
proponas rekomencon. Relevite,

l' infanojn, sed precipe vin, ŝi serĉos.
Tial, Edwin, ne desapontu ŝin.”

“Mi certe volas veni tien ĉi!”

“Sed estos iuj ŝanĝoj. Ne surpriziĝu,
ke ne troveblas viroj kaj virinoj.
Ĉiuj senseksas kiel ni anĝeloj,
ĉar tion Jesu' klarigis al Sadukeoj,
kiuj skeptikis pri la releviĝo.
Ankaŭ multe kreskis via patrino
al la staturo de Adam' kaj Eva
en la komenco. Same la Sinjoro.

“Inter la ekshominoj estas Ria—
pri via intereso ŝi eksciis
kaj scivolema volas vin renkonti—
ankaŭ via samnoma karulino
jam sesdek ses vivinta kun vi jarojn.
Ne desapontu ilin, kaj ne min,
per forestado. Ne iĝu ploriganto.
Ĉiujn larmojn Dio forviŝos, ankaŭ
tiajn ĉi terurajn, la plej amarajn.
Sed mi vin multe petas, ne fariĝu
eterna nul', en ies menso ombro.

“Pensu kun kia ĝojo vi renkontus
Uriah Smith, Hipoliton, ankaŭ Newton,
Joakim de Fiore kaj tiom da
verkintoj pri la profetaĵoj. Kun ili
estos la reĝo David, Daniel,
Jesaja kaj multaj aliaj kies voĉoj
el inter la paĝoj de l' Tanaĥo noble
flustris aŭ laŭte trans l' epokoj vokis,
krom Johano, la apostolo—kiun

Jesu' aparte amis—apud Paŭlo
kaj Petro fro la Nova Testamento.
Ho kia ekscita klubo! Ankaŭ pri vi
ili scias kaj viaj profetaĵaj libroj.
Vin tiu rondo volos bonvenigi
al la diskutoj pri la historio
kaj la granda konflikto de l' epokoj.
Ĉeestos fidfratino Ellen White...
Ne desapontu!

“Ankaŭ grandeguloj
poetaj: la Bibliaj, fro Moseo,
kiu verkis Ijobon, la psalmisto
David, de Izrael' kantinto dolĉa,
Salomono kun tri profundaj libroj—
krom aliaj: epopeistoj Milton,
Dante kaj Vergilio, tiu *anima
naturaliter Christiana*...”

“Ankaŭ
la granda Shakespeare!” mi entuziasmis.

La vizaĝo de Abdiel sombrigiĝis.
“Sed malfeliĉe ne. L' infera faŭko
lin glutis. Kia geniul' mirinda
li estis per vortoj kaj sondis la profundojn
de aliuloj multvarie! Tamen
li rifuzis cedi al la Savanto.
Domaĝe! Domaĝe! Tion vi ne faru
kaj lin, kiu amas vin, ne desapontu.”

Tiam, suspirante, li ekanoncis:
“Edwin, venis la horo. Kun ĉi tasko
kompleta, mi devas hejmenigi vin.”

Subite jen mi trovis min en mia
studoĉambro ĉe tablo tre konata.

Kaj tie baldaŭ Abdiel diris: “Nun
mi devas, bedaŭrinde, adiaŭi
kaj malvidebliĝi. Tamen mi vin daŭre
tra l’ resto de via ekzisto tera ŝirmos
kontraŭ la Malamiko.

“Luktu kuraĝe,
por iam loĝi sur la Nova Tero
kaj, se vi volas, levinte tiun plumon,
pri la konflikto de l’ epokoj verku!”

Edinburg, Teksaso
La 19-an de Aprilo 2021

Notaro

L. 1, viii: “Noa”. Biblia nomo. Genezo 6-9.

L. 1, viii: “Jarok”. Fantazia nomo.

L. 1, viii: “Lusufro”. Kaŝnomo de Lucifero dum la erao antaŭdiluva.

L. 1, x: “Lagaŝ”. Antikva Sumera urbo en la sudorienta Mezopotamio.

L. 1, x: “Iŝakú”. La pastro-reĝo de Lagaŝ.

L. 2, i: “La fil’ de Amram”. Moseo.

L. 2, iii: “Do Faraon’, juvelojn-kolektanto, / per ordonet’ forplukis mian perlon.” Genezo 12:15-20.

L. 2, iv: “Maro de Amurru”. Unu el la antikvaj nomoj por Mediteraneo. Amurru estis Amorida reĝlando, establita ĉirkaŭ 2000 antaŭ Kristo kaj detruita 800 jarojn poste far la Marpopoloj, ĉirkaŭ 1200 antaŭ Kristo.

L. 2, iv: “Mari”. Antikva urbo Semida, komerca centro inter la Eŭfrata kaj la okcidenta regionoj.

L. 2, iv: “Ĥaran”. Ankaŭ “Paddan Aram” kaj “Aram Naharaim”. Post kiam Abraham pluen iris al Kanaano, tie postrestis la aliaj posteuloj de ilia patro Teraĥ kaj de Naĥor, frato de Abraham.

L. 2, vi: “Rivero Flava”. En Ĉinujo. Ĝi havas longon de 5,464 km. En ĝia valo originis la antikva civilizo de tiu lando.

L. 2, vi: “Han”. Ĉino.

L. 2, vi: “Veramej’.” Fiktiva nomo.

L. 2, vi: “Ur”. La originejo de Abraham en la suda Mezopotamio.

L. 2, vi: “Mohenjo-Daro”. Antikva urbo en Hindujo.

L. 2, viii: “Matatiele”, proksime al la Drakmontaro. Mi naskiĝis tie en la Taylor Bequest-Hospitalo. Kiam nia familio poste transloĝiĝis tien, mi estis mezlerneano ĉe la King Edward High School.

L. 2, viii: “Cedarville”. Urbeto Sud-Afrika en kiu mi unue eniris la lernejon. Kiam la gepatroj akiris farmon, mi devis pasigi tie kelkajn monatojn en loĝejo por malriĉulidoj. Ĝi apartenis al unu el la Calvinistaj eklezioj. Kvankam Adventisto de la Sepa Tago, mi devis—kun ĉiuj infanoj—Dimanĉe frekventi la lokan kirkon por aŭdi ĉiujn predikojn. Pro mistraktado mi forkuris hejmen kaj poste loĝis kun geonkloj en la sama urbo.

L. 2, viii: “Jona, la profet’ kun galo / pro Dia emo al Asirianoj...” La tuta libro Jona, precipe ĉapitro 4.

L. 2, viii: “homaranismo en Jesaja...” Tiu libro profeta estas tre bonveniga al popoloj ne-Judaj, ekzemple ĉapitro 60:1-9.

L. 2, viii: “psalmo / kun tia fraz’: ‘La Eternulo notos, / enskribante la popolon: ĉi tiu / tie naskiĝis.’” Psalmo 87.

L. 2, viii: “kiam Mikaelo refariĝis— / proleta stalobebo en Bet-Leĥem / freduloj alkamelis pon la stelo, / ĉi pramisteron iel malĉifrinte / el noktorunoj aŭ la propraj libroj?” Sankta Mateo 2:1-12.

L. 2, ix: “Skraŭe”. Fiktiva nomo por supozita sunsistemo en unu el la Magelanaj Nebulozoj, malgrandaj galaksioj videblaj el la suda hemisfero.

L. 2, ix: “Kere...Samuna”. Fiktivaj nomoj por estuloj imagitaj.

L. 2, x: “Schwarzschilda limo”. Tio koncernas t.n. ‘nigran truon’ en la spaco, el kiu nenio, eĉ ne lumo, povas eskapi. Ĉi tion kalkulis Karl Schwarzschild, Germana astronomo, en 1916, rilate al la teorio de la ĝenerala relativeco.

L. 2, x: “ŝofar”. Blovinstrumento Hebrea, farita el la korno de virŝafo. Per ŝofaro oni blovis por kunigi Izraelidojn aŭ Judojn por gravaj festenoj, ankaŭ por batali.

L. 2, x: “Perfida frato”. Aaron, la frato de Moseo estis la unua ĉefpastro Hebrea.

L. 3, i: “Ho kuro, / kuro de la ĉevaloj de la nokto!” Aludo al la latina frazo *O lente, lente currite noctis equi*, en la Angla dramo *Doctor Faustus* de Christopher Marlowe (1564-1593). Faŭsto vendis sian animon al la diablo interŝanĝe por grandaj saĝo kaj plezuroj. Poste li devos iri en ĉiaman inferon. Li diris tiujn vortojn dum sia lasta horo, atendante la diablون kaj sian infernigon.

L. 3, i: “Galaktogramo”. Mesaĝo transgalaksia.

L. 3, i: “Hundejo apud Siriuso”. Siriuso estas, disde la tero, la plej brila stelo en la Konstelacio de la Hundo.

L. 3, ii: “Abraham kaj la Princino”. Ĉi lasta vorto aludas *Saraj*, la origina nomo de Sara kaj signifas *mia sinjorino* aŭ *mia princino*.

L. 3, ii: “Tien Nebukadnecar al ekzilo / ĉenitajn, sune kaj tra polv’, retrenis / inter soldatmokantoj la rompitojn / kun pensoŝarĝ’, silenta ploro, preĝoj, / el rubamaso de Jerusalemo.” Nebukadnecar II (605-562 a.K.), la granda reĝo de la nov-Babilona imperio, detruis la tempon, kiun konstruigis Salomono, kaj forkondukis la Judojn al Mezopotamio.

L. 3, ii: “la Rok’ altara...” La roko sur kiu staris la antikva templo Izraela kune kun sia altaro por buĉoferoj.

L. 3, ii: “kaj kiam Li deskuis la katenojn / de l’ morto en ĝardenkaverno, multaj— / rekorpiĝinte (ho surpriz’!)—sin levis / kaj ĉirkaŭmarŝis en Jerusalemo...” Sankta Mateo 27:52, 53.

L. 3, ii: “Sed kvardek tagojn poste... / Li kun si portis, triumfire: / kaptitojn foje de la mortprizon’ / sed jam liberajn nun por viv’ senfina— / unuajn garbojn kiuj garantias / rikoltabundon kiam Li revenos.” Al tio aludas Efesanoj 4:8.

L. 3, iii: “Ebed...Dina”. Fiktivaj nomoj.

L. 3, iii: “Buz”. Nomo Biblia (1 Kroniko 5:14), sed ĉi tiu fiktiva rolulo en la epopeo havis kun li nenian rilaton.

L. 3, iii: “Esli...” Biblia nomo (Sankta Luko 3:25). Ĉi

tie, tamen, ankaŭ ĝi koncernas personon fiktivan.

L. 3, iii: “en Ĥeŝbon’ laĝeto”. Ĥeŝbono estis urbo oriente de Jordano. En La Alta Kanto de Salomono 7:4 ni legas: “Viaj okuloj [estas] kiel la laĝetoj en Ĥeŝbon...”

L. 3, iii: “Abraham...ĉe Mamre...Unu estis Sankta Sinjor’...urbojn de la Valo, krom estigi por ni prapatron per uter’ velkinta.” Genezo 18.

L. 3, iii: “Tiu, kies kor’ elserĉis / Hagaron, inon aĉe mistraktitan / de niaj antaŭuloj.” Genezo 21.

L. 3, iii: “Tamen unu nokton ektranĉis en la patron murdordono. /...mont’ moroza en Morija, kie / dentaĉas grize holmo homkrania...” Tio aludas Genezon 22 sed ankaŭ la krucmorton de Jesuo, ĉirkau du jarmiloj poste, en la sama ĉirkaŭaĵo.

L. 3, iii: “Papatro Jakob...ĉe la vadej’ Jaboka...Esáv—trompita, venĝema frato, kiu lin atendis—meze de la luktado kun si mem...fine tuŝis Tiun kaj firme tenis...kun nomo nova, kiun ni portadas.” Genezo 32. Tiu nova nomo estis Izrael.

L. 3, iii: “Kaj jen memoru, kiel li mortsojle...murmuris pri l’ Anĝelo, kiu lin / forplukis el mavaĵoj kaj danĝer’...” Genezo 48:16.

L. 3, iii: “li vidis antaŭ si subite vastan / Viron...” Josuo 5:13-15.

L. 3, iii: “l’ Anĝelo por la patroj tre klopodis / deteni Bileamon, misprofeton, / kiu orame al la Moabidoj / sin vendis, por malbeni Izraelon...Fine eĉ azen’ parolis...” Nombroj 22.

L. 3, iii: “Lael”. Biblia nomo (Nombroj 3:24), kvankam ĉi tiu estas alia persono fiktiva.

L. 3, iv: “Akvoŝaloj Viktoriaj...Iguaĉú”. La Viktoriaj Akvoŝaloj estas en Zimbabveo, Afriko, kaj Iguaĉú en Brazilo, Sud-Ameriko.

L. 3, iv: “Itamar”. La origina Itamar estis filo de Aaron, la unua ĉefpastro de Izrael. 1 Kroniko 7:3.

L. 3, iv: “Skeptik’/ aŭ kredo fine tra la menso fluas / kiel la vol’ elektas; ĉar sub ĉio / la font’ ne estas pensoj sed deziroj, / el kiuj tiom de la hom’ bobelas.” Tiujn vortojn mi verkis antaŭ 1992. Mi ĵus, kun plezuro, malkovris en 2017, ke tiun ideon instruis ankaŭ la Skota pensisto David Hume antaŭ 1776 en *A Treatise of Human Nature*, kiun mi neniam antaŭe legis.

L. 3, iv: “post la servut’ sablanda”. La longa sklaveco de la antikvaj Izraelidoj en Egiptujo.

L. 3, iv: “arbus’ malkonsumiĝe flametadis”. Eliro 3:1-2. Alia nomo por Horeb estas Sinaj.

L. 3, iv: “Subite Lael staris tie sola ... / kaj ploris tiu tuta komunumo.” Ĉi tuta apero de la Anĝelo al la Izraelidoj estas priskribita en Juĝistoj 2.

L. 3, v: “ŝafista knabo kiu kronon portos.” David.

L. 3, v: “kanajloj tre laŭplaĉe agas.” Juĝistoj 17:6; 21:25.

L. 3, v: “Ŝimŝon kaj, ho ve, eĉ Jiftaĥ!” Pri Jiftaĥ legu Juĝistoj 11-12. Pri Ŝimŝon legu Juĝistoj 13-16.

L. 3, v: “la teroristojn, / kiuj bruligis homojn per benzino / pro nealiĝ’ al sama politiko, / laŭras, ornamas honornome kiel / liberobatalantojn, patriotojn.” Tio okazis en Sud-Afriko dum la periodo tuj antaŭ 1994, kiam tie la Afrika Nacia Kongreso—post elektoj—transprenis la reĝimon. Kaj la bruligantoj kaj la bruligitoj estis nigraj, ne blankuloj.

L. 3, v: “Boaz kaj Rut.” La pri ili tre bela amrakonto legeblas en la Biblia libreto Rut.

L. 3, v: “Saul’!” La nomo Saulo estas Biblia, sed ĉi tie ĝi koncernas personon fiktivan.

L. 3, v: “Raĥab.” Legu pri ŝi en Josuo 2; 6:21-23.

L. 3, vi: “tre reĝina Miĥal kun malŝato / sin turnis for, ĉar David vulgarule / dancis publike kun aliaj viroj, / sed ĉefe la knabinoj.” Miĥal, kiun li unue edzinigis, estis la filino de la reĝo Saul. 2 Samuel 6:14-16.

L. 3, vi: “Bat-ŝeba, iam dolĉe peka pomo, / kiun ŝtelplukis li el la ĝarden’ / de la najbaro, ruĝe murdaĉita /

far lia ruza menso.” La plej aĉaj faroj de David, laŭ 2 Samuel 11.

L. 3, vi: “abrupte gril’ / silentis.” Mi origine finis ĉi epopeon per tiuj vortoj en 1992.01.07. Mi jene rekomencis ĝin 23 jarojn poste en 2015: “Tiam Ezra faris ion / okulkonfuze rapidege...”

L. 3, vi: “Kiel iam de l’ nobla Abner. Davidon / vi tiam ŝarĝis per daŭra sangoŝuldo / ankoraŭ ne pagita.” 2 Samuel 3:22-39.

L. 3, vii. “Li fine, rifuĝanto, en la sanktejon / kuris, kaj tie sendit’ de Salomono / kiel obstinan bovon buĉis lin.” 1 Reĝoj 2:29-34.

L. 3, vii: “Sed ne forgesu provon surtronigi / Adonijan.” 1 Reĝoj 1.

L. 3, vii: “la sepdek jaroj kiujn Di’ ordonis, / laŭ profetaj’ far Jeremia...” Jer. 29:10.

L. 3, vii: “ekde Saul’ / ĝis Cidkija de l’ dinasti’ Davida.” Saul estis, antaŭ David, la unua reĝo Izraela kaj Cidkija la lasta de la suda reĝlando Juda.

L. 3, vii: “Ĥiskija...Joŝija...Uzija...Manase...” Reĝoj de tiu Juda ŝtato.

L. 3, vii: “Tamen serpentovoj, / kiujn l’ iama koro de Manasse / demetis, malgraŭe elkoviĝis. Morde / l’ idaro mortvenenis nian ŝtaton / Judan, al mi karegan.” Pri liaj malbono kaj posta konvertiĝo rakontas 1 Reĝoj 21 kaj 2 Kroniko 33.

L. 3, vii: “la reĝino de la sudo, / el Ŝeba, kun kargo da demandoj krom / donacoj karavanis Jerusalemon...” 1 Reĝoj 10:1-10 kaj 2 Kroniko 9:1-9.

L. 3, vii: “antaŭ duonjarmil’ Moseo / pri li profetis en la Readmono.” Readmono 17:14-17.

L. 3, vii: “ili lin elektu / el inter si, ne el popolo fremda. / Krom tio li avertis lin pacame / eviti predemon kaj la militismon. / Kaj tial nek ĉevalojn, nek edzinojn / li amasigu—kiel Salomono.” Readmono 17:15-17.

L. 3, vii: “Salomono kunjungis seksan jukon / kaj aliancojn politikajn. Krom / konkubinoj (tricent!), li enlitigis / principon post princino.” Laŭ 1 Reĝoj 11:3 li havis “700 ĉefajn edzinojn kaj 300 kromvirinojn.”

L. 3, vii: “Laŭ la Bona Libro / li *amis* multajn fremdulinojn.” 1 Reĝoj 11:1.

L. 3, ix: Ĉi tiu ĉapitro estas bazita sur Daniel 2.

L. 3, ix: “Asjas”. Afrikansa vorto, signifanta “sentaŭgulo”. Mi ĝuis elekti ĝin.

L. 3, ix: “Granda Maro”. Alia antikva nomo por Mediteraneo. Poste la Romanoj, kun ĉirkaŭkuŝanta imperio, ĝin nomis “Mare Nostrum” (nia maro).

L. 3, ix: “Uriah Smith” (1832-1903). Li verkis en la Angla *The Prophecies of Daniel and the Revelation* (La Profetaĵoj de Daniel kaj la Apokalipso).

L. 3, ix: “Battle Creek” Michigan, Usono. Dum la dek-naŭa jarcento ĝi estis grava centro por la Adventistoj de la Sepa Tago.

L. 3, ix kaj aliloke: “Hipolito” (170-235). Lia *Komentario pri la Profeto Daniel* en la Greka estas la plej antikva tia verko kiu ankoraŭ transvivas.

L. 3, x: “Makabeoj”. Judaj patriotoj kiuj dum 167-160 antaŭ Kristo ribelis sukcese kontraŭ la Grekaj superregantoj sub Antioko IV, kiu provis subpremi ilian religion.

L. 3, x: “Miĥa trumpetis: ‘Bet-Leĥém Efrata, / malgranda en Judujo...’” Miĥa 5:1. Mirinda profetaĵo pri la venonta Mesio.

L. 3, x: “ankaŭ Jesaja: ‘Al ni, infan’ naskiĝis’ ...” Jesaja 9:6, 7.

L. 3, x: “Sur lin la Eternulo / ĵetis la kulpon de ni ĉiuj...” Jesaja 53:12.

L. 3, x: “En unu psalmo, / preskaŭ mil jarojn antaŭ ĉi ofero, / per sekaj lipoj de la Posteulo / li kriis: ‘Ho mia Dio, mia Dio, / kial Vi min forlasis...?’” Psalmo 22:1-18.

L. 3, x: “‘ĉar en li’, kiel Paŭlo Akropole / al la Atenanoj

diris, ‘ni vivas / kaj moviĝas kaj ekzistas.’” Agoj 17:19-25.

L.3, x: “Laŭ la Evangelio de Johano, / ĉio estiĝis per li, la Vort’ eterna. / ‘En li estis vivo, lumo de l’ homoj.’”

Sankta Johano 1:3, 4.

L. 3, x: “laŭ Luko. / Ĝi diras, ke Jesuo estas la fil’ / de Set, la fil’ de Adam...la fil’ de Dio.” Sankta Luko 3:38.

L. 3, x: “‘Sinjoro, / kiam vi al via regno venos / memoru min!’” Sankta Luko 23:39-42.

L. 4, i: “Same kiel mi li ekvivis / denove kun la Krucumito.” Sankta Mateo 27:52, 53.

L. 4, ii: “Antaŭe, dum ankoraŭ dista jaro, / 1985, mi staris tie / inter la bruoj de la busstaci’ / Araba”. Tion mi priskribis en mia poemo “Momentoj Israelaj” (*Vojaĝoj kaj Aliaj Poemoj*, 1992).

L. 4, ii: “soldatoj... por li la krucon / jam surŝultrigis al la Kirenano”. Sankta Marko 15:21.

L. 4, ii: “Filinoj de Jerusalemo, / pro mi ne ploru sed pro vi kaj viaj / infanoj...” Sankta Luko 23:28

L. 4, iii: “sentencis Salomono: / ‘Ĉu vi vidas homon, kiu estas / saĝa en siaj okuloj? Estas pli / da esper’ por malsaĝulo ol por li.” La Sentencoj de Salomono 26:12.

L. 4, iii: “Patro, pardonu ilin, ĉar nesciajn / pri tio, kion ili faras.” Sankta Luko 23:34.

L. 4, iii: “Tagmeze ĉerkotuko de mallumo / subite sur lin falis...”

L. 4, iii: “fro ĉiu tera vido lia Patro / la lastajn horojn de la Filo kaŝas. / Krome li mem ekvenis tien ĉi / kaj apud li en la mallum’ suferas.” Ellen E. White en *The Desire of Ages*.

L. 4, iv: “Ekzemple legu kion verkis Luko, / fosinte la detalojn el memoroj / de homoj kiuj lin renkontis...” Sankta Luko 1:1-3 rakontas kiel li verkis sian evangelion, surbaze de esplorado, ĉar li ne mem spertis la koncernajn okazintaĵojn.

L. 4, iv: “Sen ajna pens’ pri ina digno ili / kuris kaj kuris al la apostoloj...” Sankta Mateo 28:8.

L. 4, iv: “kiuj rifuzis kredi la novaĵon; / ĉar ili—ĉu ne estuloj malsuperaj?— / pro strangaj emocioj supozeble / nur fantaziis”. Sankta Luko 24:11.

L. 4, iv: “li ŝalomis...” Sankta Luko 24:36. La Hebrea vorto *ŝalom* signifas “pacon”, kaj ankaŭ nuntempe la Judoj uzas ĝin kiel saluton.

L. 4, iv: “Li vokis / al si Tomason, por palpi lian korpon. / Tiu kun ĝoj’ elkriis: ‘Mia Sinjoro / kaj mia Dio!’ Ankaŭ al li Jesu’ / riproĉis: ‘Ĉar vi vidis min, vi kredas; / feliĉaj estas tiuj, kiuj ne vidis / kaj tamen kredos.’” Sankta Johano 20:24-29.

L. 4, iv: “Tion Petro, ne mi, respondu. / En epistolo sia li deklaris: / ‘Ni ne sekvis subtilajn elpensaĵojn...’” 2 Petro 1:16-18.

L. 4, iv: “Petro post tio skribis: ‘Ni krome havas / la vorton profetan, eĉ pli certan. Se vi / atentos ĝin vi bone faros; ĝi estas / lampo lumanta en malhela loko, / ĝis ektagiĝos, kaj la matenstelo / leviĝos en viaj koroj.’” 2 Petro 1:19.

L. 4, iv: “Ĉu la statuon vi memoras / pri kiu antaŭ sescent jaroj sonĝis / Nebukadnecar, kaj de Danielo / la klarigojn, kiujn vi mem kun Ezra / aŭskultis?” Vidu L. 3, ix.

L. 4, iv: “Hipolito...Uriah Smith.” Pri ili bonvolu vidi la antaŭan noton rilate al L. 3, ix. “la de Hipolit’ klarigon. / Ĝi estas mirindaĵo ĉar identa, / aŭ preskaŭ, kun tiu de Uriah Smith, / naskiĝonta dek sep jarcentoj post lia / morto.”

En sia *Komentario pri la Profeto Daniel* Hipolito klarigis la simbolismon de la 2-a kaj 7-a ĉapitroj en tiu Biblia libro, ĝuste kiel la epopea teksto indikas. Temas pri sinsekvo de kvar imperioj: la Babilona, la Medo-Persa, la Greka kaj la Romia. Post ĉi lasta venis dek Eŭropaj reĝlandoj en kies mezo pompis la Antikristo. Tio finiĝos per la regno de la revenonta Kristo.

L. 4, iv: “Por Hipolito, la profetitaĵoj / plurdetale restis nur tiaj kaj / atendis realiĝon per eventoj / ankoraŭ sen substanco. Pri ili li / nur fidis, sed neniam vidis... / penetris. Tamen la Romia aglo / super kaj ĉirkaŭ Mediteraneo / ankoraŭ ŝvebis...” Ligu kun la supraĵo.

L. 4, iv: “dek du jarcentojn, inter Justiniano / kaj Franca general’ revolucia?” Efektive 1260 jaroj, priskribita aliloke en ĉi tiu epopeo. Justinianon fakte reprezentis propra granda generalo Belisario en ja jaro 538. La generalo de la Franca revolucio, kiu en 1798 kaptis kaj ekzilis la papon, estis Louis-Alexandre Berthier (1753-1815).

L. 4, iv: “*il papa re*”. Itala titolo, kiu signifas “la papo-reĝo”.

L. 4, iv: “laŭ Konsilio—neeraripova / pri ĉio teologia aŭ morala.” La unua Konsilio Vatikana de 1869-1870 faris tiun ĉi deklaron.

L. 4, iv: “‘Aktoj de la fido’”. *Akto de la fido* estas traduko de la Portugala **auto da fé**. Ĝi estis rito de publika pentofaro por kondamnitaj herezuloj aŭ apostatoj. Tio okazis post kiam la inkvizicio Hispana, Portugala aŭ Meksikia decidis ilian punon. Pri tio respondecis la civilaj aŭtoritatoj, ofte per bruligo.

L. 4, iv: “La iloj eksponiĝas en / muzeo ĉe la ĉirkaŭmurigita / Karkasono, kie la Albigensoj / provis vane forbari la armeon / de la murdema pontifiko.” Pri tio mi verkis iom longan poemon “Rekviemo por la Albigensoj” (1992-1993) . Ĝi aperis en *Sub Fremdaj Ĉieloj*, (2007).

L. 4, iv: “El la volvaĵoj de via cerbo ludu / denove kion Moseo al vi diris / en Mohenjo-Daro. La Eternul’ / memoros kie kaj kia ĉiu hom’ / naskiĝis, kun ties tuta mensa fono.” Vidu L. 2, vi.

L. 4, iv: “Kaj ankaŭ Paŭlo / ĉe l’ enirejo de la Akropolo / informis Areopage la saĝulojn: / ‘La tempojn de la nesciado Dio / preterrigardis, sed li nun proklamas / ke ĉiuj homoj pentu’...” Pri tio rakontas La Agoj 17:19-30. La Areopago

mem estis malgranda roka elstaraĵo ekster la Akropolo en Ateno. Tie estis juĝejo.

L. 4, v: “Ie la Dekunuo kaŝis sin...” Johano 20:19. La dek unu apostoloj de Jesuo restantaj post la perfido kaj sinmortigo de Judas Iskariota. Ili fermis la pordojn, timante la Judojn.

L. 4, v: “Romia / prokuratoro kun lavemaj manoj”. Pilato, kiu kondamnis Jesuon al krucmorto sed volis senkulpigi sin, lavante la manojn. Sankta Mateo 27:24.

L. 4, v: “Memoru, ke li al Maria diris: ‘Ne tuŝu min, ĉar mi ankoraŭ ne / al mia Patro supreniĝis.’” Sankta Johano 20:17.

L. 4, v: “Atendis anĝelaro bonveniga... / La Patro lin brakumis, / kaj per ĝojplena voĉ’ proklamis: ‘Ĉiuj / anĝeloj lin adoru!’” Laŭ Ellen G. White en *The Desire of Ages*.

L. 4, v: “li longe, / ok mejlojn, dum ĉi posttagmezo / kun Kleopas kaj la kredant’ alia...” Sankta Luko 24:13-36.

L. 4, v: “Eterna? Ne! Ĉi tio estas alia / doktrino de l’ diablo, subfosanta / la kredindecon pri la Dia justo, / amo aŭ proporci’.” Adventistoj de la Sepa Tago kredas, ke Dio fine detruos la damnitojn, kiel instruas la Biblio, ekzemple en Malaĥi 4:1 kaj Apokalipso 20:9.

L. 4, v: “Princo Blücher / kun helptrupoj Prusaj.” Gebhard Leberecht von Blücher, Fürst von Wahlstatt (1742-1819). Per sia armeo li helpis la Anglan generalon Velingtonon venki Napoleonon ĉe Vaterlo.

L. 4, v: “La eta kaporalo / kun siaj revoj enmarĉiĝis kaj / forsinkis en la nokton sur insul’ / obskura.” Post lia malvenko ĉe Vaterlo, la aliancanoj ekzilis Napoleonon al Sankta-Helena, insulo sud-Atlantika, kie li mortis sep jarojn poste.

L. 4, v: “Ĉu la poto riproĉu la potiston / aŭ pridemandu: ‘Kion vi faraĉas?’ Jesaja 45:9.

L.4, vi: “Valens”. Flavius Juliius Valens Augustus (328-378), orienta imperiestro Romia.

L. 4, vi: “Fritigern”. Visigota reĝo (mortis ĉ. 380).

L. 4, vi: “Odoaker”: Flavius Odoacer aŭ Odovakar (433-493), la unua, Herula, reĝo de Italujo.

L. 4, vi: “Romulon Aŭgustulon”. Ĉi tiu lasta imperiestro de la Okcidenta Romia Imperio estis en la Latina, oficiale, *Romulus Augustus* (ĉ. 460-476). Sed oni ŝerce nomis lin *Romulus Augustulus*, t.e. la malgranda *Augustus*.

L. 4, vi: “Oriente, ĉe l’ Ora Korno / alia imperiestro...”
La Ora Korno estas enirejo al Bosporo ĉe Konstantinopolo. Tiu alia imperiestro estis Zeno.

L. 4, vi: “Zeno”: Orient-Romia (Bizanca) imperio dum 474-491. Lian regnon perturbis ribeloj kaj religia malpaco.

L. 4, vi: “Dua Romo”. La origina nomo de la orienteŭropa urbo kiun fondis Konstanteno I kiel novan ĉefurbon de la Roma Imperio. Poste ĝi alinomiĝis kiel Konstantinopolo: la urbo de Konstanteno.

L. 4, vi: “Teodorikon, l’ Ostrogoton” (475-526). Ankaŭ konata kiel Teodoriko la Granda, li estis la reĝo de Italujo.

L. 4, vi: “kiu mortis unufoje / sed nun eterne vivas.”
Apokalipso 1:18.

L. 4, vi: “la Filo al / la Patro sin submetos, ‘por ke Dio / estu ĉio en ĉio.’” 1 Korintanoj 15:28.

L. 4, vi: “ili estis unu el la tri kornoj / pri kies forŝiro sonĝis Daniel.” Daniel 7:8.

L. 4, vi: Ho ve, fanatikul’ teologia, / Justinian’...”
Justinianus I (482-565), la Granda, kiun kun malbonaj sekvoj interesis la teologio.

L. 4, vi: “per siaj generaloj / Belizaro kaj Narses, Italujon / mortigis...” Ilin uzis Justiano por neniigi la regadon de la Ostrogotoj. Pereis 15 aŭ 16 milionoj.

L. 4, vi: “Belizaro...” Flavius Belisarius (ĉ. 505-565), granda generalo, per armeo el Konstantinopolo invadis la Nordan Afrikon, kie li detruis la Vandalan reĝlandon kaj poste invadis sinsekve Sicilion kaj Italujon. Li grandaparte rompis ankaŭ la potencon de la Ostrogotoj.

L. 4, vi: “Narses...” (478-573), eŭnuka generalo Armena de Justiniano, kiu sekvis Belizaron kaj pli-malpli kompletigis la detruon de la Ostrogota regado en Italujo.

L. 4, vi: “Prokopio...” *Procopius Caesariensis* (ĉ. 500-554) de Cezareo en Palestino estis la historiisto kiu rakontis pri la Bizancaj ekspedicioj rekonkeri la Okcidenton. Li fakte akompanis Belizaron.

L. 4, vi: “Mediolanum”. Antikva nomo de Milano en Italujo.

L. 4, vi: “De tie la okuloj / de Jesuo transkuras ĉi planedon, / kiu en la komenc’ per li kreiĝis...” Sankta Johano 1:1-3 kaj Hebreoj 1:1-2.

L. 4, vi: “Helvidio”. Helvidius (340-390).

L. 4, vi: “Hieronimo” (347-420). Homo asketa, kiu tradukis la plej grandan parton de la Biblio en la Latinan kaj ankaŭ tre interesiĝis pri la virina vivmaniero religia.

L. 4, vi: “la Vulgato”. Pleje la verko de Hieronimo, ĉi tiu traduko poste fariĝis la oficiala Biblio de la Romkatolika Eklezio.

L. 4, vi: “Joviniano”. Jovinianus (ĉ. 405).

L. 4, vi: “Vigilantio”. Vigilantius (ĉ. 400).

L. 4, vii: “Tiu drak’ antikva...sputanta akvon...” Laŭ Apokalipso 12.

L. 4, vii: “Edenpordego”. Kiel asertis Ellen G. White.

L. 4, vii: “putin’ en riĉaj vestoj kaj juveloj...” Laŭ Apokalipso 12.

L. 4, vii: “ Sed kion la Sankta / Vort’ prediris pri ŝiaj finatempaj / posteuloj? Eĉ pli kolere tiu / drako militon ĉendos kontraŭ ili, / fidelaj al la Diordonoj, ĉiuj, / havantaj krome l’ ateston de Jesuo, / la spiriton de profetado.” Apok. 12:17 kaj Apok. 19:10.

L. 4, vii: “Tiel ankaŭ / la plej feroca lia dorlotbesto / el ĝia kuŝejo borde de Tibero...” La pontifikaro. Apokalipso 13:4.

L. 4, vii: “ili la de Di’ ordonojn tenos— / kaj l’ fidon de

Jesuo.” Apokalipso 14:12

L. 4, vii: “Daniel / duloke enrulaĵigis ĝin. Tiam, / sescent jarojn poste, l’ Apokalipson / Johano verkis papiruse. Li / aldonis kvin menciojn brule urĝajn, / diverscifere esprimitajn: tri / kaj duona jaroj, kvardek du monatoj / kaj 1260 tagoj.” Daniel 7:25; 12:7; Apokalipso 11:2; 11:3; 12:6; 12:14; 13:5.

L. 4, vii: “Ĉe Helderberg / vi instruiĝis...” Helderberg College, SomersetWest, Sud-Afriko, kie mi finstudis la teologian kurson en 1950 kaj pri ĝi diplomiĝis.

L. 4, viii: “Dum 753 transfuĝis vintre / stumblema papo al Pepin’ la Kurta. / Stefan’ la tria.” Pepino (ĉ 714-768) estis reĝo de la Frankoj. Stefano II aŭ III (mortis en 757) regnis kiel papo de 752 ĝis 757.

L. 4, viii: “ĝojmesaĝo, ke la pap’ Silvestro / de tiu fimalsano lin purigus, / se li konsentus Katolikiĝi. Tiel, / laŭ l’ fraŭda dokumento, ja okazis.” Tio estis mensogo. Silvestro I estis papo ekde 314 ĝis sia morto en 335.

L. 4, viii: “Tordesillas”. Urbo en la centra Hispanujo. Temas pri papa traktato dividi la mondon inter Hispanoj kaj Portugaloj surbaze de malkovroj far iliaj navigistoj.

L. 4, viii: “Aŭ tiel argumentos— / surbaze de l’ Donaco— Borĥa papo...” Papo Alexander VI (1431-1503), kiu naskiĝis Rodrigo de Borja.

L. 4, viii: “Sed la Apokalips’ precize tion / pri l’ Antikrista besto antaŭdiris / per fokuso sur 666.” Apokalipso 13:18.

L. 4, ix: “Kaj mi memoris la alian fojon, / mil jaroj en la estontecon, kiam / mi kaj la karulino sidos tie / kun tre similaj pensoj.” Vidu “Aŭskultante la ŝtonojn” en *Vojaĝoj kaj Aliaj Poemoj* (1992).

L. 4, ix: “Klaŭdo”. *Claudius de Torino* (episkopo tiurbe ekde 817 ĝis lia morto en 827). Li estis ikonoklasto kaj rilate al diversaj doktrinoj speco de Protestantismo preskaŭ 700 jarojn antaŭ Martin Luther.

L. 4, ix: “Pro la Dua / Ordon’ de Dio...” Temas pri la dua de la Dek Ordonoj: “Ne faru al vi idolon, nek bildon de io, kio estas en la ĉielo supre aŭ sur la tero malsupre aŭ en la akvo sub la tero; ne kliniĝu antaŭ ili kaj ne servu ilin; ĉar Mi, la Eternulo, via Dio, estas Dio severa, kiu la malbonagon de la patroj punas sur la idoj en la tria kaj kvara generacioj de Miaj malamantoj, kaj kiu faras favorkoraĵon por miloj al Miaj amantoj kaj al la plenumantoj de Miaj ordonoj”.

L. 4, ix: “Martin Luther”. D-ro Martin Luther (1483-1546), Germana profesoro de teologio, pastro, monaĥo, komponisto, kiu antaŭ 500 jaroj—en 1517—komencis gravan Reformon protestantan.

L. 4, ix: “Teofilakto”. Teofilakto I (antaŭ 864-924/925), la grafo de Tusculum, kiu efektive regis Romon de ĉirkaŭ 905 ĝis sia morto. Liaj posteuloj regadis la papecon dum la postaj cent jaroj.

L. 4, ix: “la senmoraligita Teodora, / kun du filinoj. Unu estis samnoma / kiel ŝi. La alia, Marozia, / se eble eĉ pli fiis.” Teodora estis la edzino de Teofilakto.

L. 4, ix: “Anĝelo Sankta”. Ĉi tio koncernas la *Castel Sant’ Angelo*, papan kastelon en Romo. Ĝi antaŭe apartenis al la Ostrogotoj, kies granda reĝo Teodoriko ĝin por si konstruis kiel maŭzoleon. La nomo devenas de la legendo, ke tiuloke aperis la ĉefanĝelo Mikaelo.

L. 4, ix: “la deknaŭa / Johano, mem la filo de Sergio / la tria.” Papo Johano XI (910?-935/936), filo de Marozia kaj eble de Papo Sergio III (ĉ. 860-911).

L. 4, ix: “Marozia, la adulta”. La filino de Teofilakto kaj Teodora, ŝi estis nobelino kun la senprecedenca titolo de *senatrix* (senatorino). Ŝi naskiĝis ĉ. 890. Pri ŝia mortodato la fontoj malkonsentas. Papo Johano XI estis ŝia filo.

L. 4, ix: “Roma reĝo Hugo”. Hugo de Arles aŭ Hugo de Provenco (880/1-947) kaj edzo de Marozia.

L. 4, ix: “filin’ de Hugo, Alda...” Alda Bosonid (920-

967), kies patro estis Hugo de Arles, reĝo de Italujo. Ŝi poste edziniĝis kun Alberiko II de Spoleto.

L. 4, ix: “Alberiko, / la duonfrato.” Alberiko II (912-954), filo de Alberiko I, Duko de Spoleto.

L. 4, ix: “Gregori’ la kvina...” Papo Gregorio V (ĉ. 972-999). Li estis pontifiko nur tri jarojn ekde 996 kaj mortis ankoraŭ junulo.

L. 4, ix: “Otto la tria...” Otto III (980-1002) imperiestro de la sankta Romia imperio por ses jaroj ekde 996. Ankaŭ li mortis ankoraŭ juna.

Lv. 4, ix: “El ĉiuj reĝoj de Juduj’ antikva / Manase, kiun naskis Ĥefci-Ba / por tiu bonegulo Ĥiskia / plej aĉis. Al Dio li la dorson turnis, / Baalon kultis...Kaj li verŝis / sitelojn da sango en Jerusalemon / de bonaj, sanktaj homoj”. Manase (ĉ. 697-642 a.K.), estis reĝo de la antikva Judujo. Legu pri li en 2 Reĝoj 21, 2 Kronikoj 33 kaj Jeremia 15:4. Baalo, kies nomo signifas *Sinjoro*, estis Kanaana dio, kiun oni sinkretisme konfuzis kun Javé, la dio Hebrea. Aŝtar, supozeble estis la edzino de la plej alta dio, eĉ—laŭ idolanoj—de Javé.

L. 4, x: “Sed fine Bonifaci’ la naŭa povis / trableti tiun malentuziasmon / kaj sian plej amatan dorlotbeston / Borelli...” Bonifacio IX (ĉ. 1530-1404), la dua pontifiko de la Okcidenta skismo. Franceso Borrelli estis lia Franciskana inkvizitoro.

L. 4, x: “kiel / kanajloj iufoje dum Judea / nokto subite venis por Jesuo.” Laŭ Sankta Mateo 2:16, la senditoj de la reĝo Herodo iris al Bet-Leĥem por murdi Jesuon baldaŭ post lia naskiĝo en tiu urbeto.

L. 4, x: “Inocent’ la oka kaj Kataneo, / la ĉefdiakono ĉe Cremona...” Latine *Innocentius VIII* (1432-1492). Li regis kiel pontifiko dum nur ok jaroj ekde 1484. Alberto Cataneo, ĉefdiakono de Cremona en la norda Italujo, estis lia papa legato.

L. 4, x: “la gloraĵojn de la tria / Inocento, kiu la

Albigensojn / voris...” Latine *Innocentius III* (1160 aŭ 1161-1216). Potenca kaj tre influa papo, li interalie ĉefe respondencis pri la detrua krucmilito kontraŭ la Aligensoj.

L. 4, x: “Ĉar ili estis reformistoj, simplaj, / efikaj, longe antaŭ Hus kaj Luther.” Antaŭa noto klarigas pri Martin Luther. Jan Hus (ĉ. 1369-1415), Ĉeĥa pastro, filozofo, magistro, dekano kaj rektoro ĉe la Karlo-universitato en Prago, kiun oni bruligis kiel herezulon ĉe Konstanco ĉar en gravaj rilatoj li deflankiĝis de la Katolikismo. Liaj doktrinoj multrilate similis al tiuj de Luther, cent jarojn poste.

L. 4, x: “Norde de l’ Alpoj ili koloniis / krom sude en la monta Kalabrio / kie l’ Itala boto pintas.” Kalabrio estas la plej suda parto de la kontinenta Italujo, nordoriente de Sicilio.

L. 4, x: “Karlono / la okano, kiu en Francujo reĝis, / kaj l’ duan dukon de Savojo (ankaŭ / Karlo) ili delogis partopreni / pro Katolika pio.” La Franca reĝo estis Karlo VIII (1470-1498), kiu ankaŭ konkeris la kontinentan parton de Italujo. La duko de Savojo estis Karlo I (1468-1490). Lia patrino estis Yolande de Valois, fratino de la Franca reĝo. Ĉi tiuj du Karloj do estis kuzoj.

L. 4, x: “Jesuo antaŭdiris tian tempon / kiam la mortigantoj de l’ disĉiploj / supozos, ke al Dio ili plaĉas.” Sankta Johano 16:2.

L. 4, x: “kie restaĵo Albigensa, post / mortiga ŝtormo el la pia koro / de Inocent’ la Tria, ree kreskis.” La t.n. Albigensoj efektive havis sian plej gravan centron ĉe Tuluzo, en Sud-Francujo. Ili religio tre similis al tiu de la Valdanoj, kun tre puraj vivoj; sed iuj detaloj malklaras, ĉar iliaj malamikoj grandparte detruis iliajn verkojn. Ili ĉiukaze malakceptis la Katolikismon kaj la aŭtoritaton de la papo.

L. 4, x: “bestio ĉe Tiber’ instigis. / Ĝi longe vivas. Laŭ la apostolo / Paŭlo jam siaepoke ĝia feto / en la utero de la tempo kikis. / Li antaŭdiris ĝian plueniĝon / ĝis la Reveno,

kiam la Sinjoro / per sia gloro mortbruligos ĝin.” 2
Tesalonikanoj 2:3-8. Temas pri la granda apostateco, kiun
el la plej fruaj jarcentoj gvidadis la papoj.

L. 4, x: “La orgeno / kaj l’ voĉo de la karulin’ Sabate /
en sud-Teksasa urbo al la Sinjoro / laŭdon levas, kaj estos
kvinent jarojn / de nun.” La Anglalingva preĝejo de la
Adventistoj de la Sepa Tago en Mission, proksime al
Edinburg kaj McAllen en la suda Teksaso.

L. 4, x: “dume tiun urbon / sud-Teksasan kaj nian
eklezion / la bestio—kies vundita kapo / resaniĝis—plej
certe ne indulgos, / pro la sabat’ Biblia, malamata / ĉar ni
defiis, jarcenton post jarcento, / ies ajn rajton Dian leĝon
ŝanĝi.” La unua bestio de Apokalipso 13. Ĉi tie mi parolas
pri *nia* eklezio, ĉar ni Adventistoj konsideras nin fintempa
restaĵo de multe pli fruaj kredintoj—kiun profetaĵe simbolas
la virino priskribita en Apokalipso 12, surbaze de verso 17.

L. 5, i: “Ankaŭ Miltona”. Tio aludas John Milton (1608-
1674), granda Angla poeto, kies ĉefverko estas *Paradise
Lost* (Paradizo Perdita), 1667. Laŭ la lastaj kvar paĝoj en
Libro V de tiu verko, Abdiel estas anĝelo kiu, kontraŭinte
la Luciferan ribelon, restis fidela al Dio.

L. 5, ii: “Do / ni nun ascendu al kie La Palú / kun siaj
sanglekemaj hundoj jam / ĝisgrimpiis.” Efektive la sinjoro
de Palu, eble Hugues de la Palu.

L. 5, ii: “krom / Valdana perfidulo, kiun timo / aŭ Judasa
subaĉeto konvertis / fro Krist’ al Romo.” Laŭ Sankta Mateo
26, Judas Iskariota, unu el la dek du apostoloj, vendis
Jesuon al liaj malamikoj. En Getsemane li eĉ identigis lin
per kiso.

L. 5, ii: “la tutan *Historion de l’ Valdanoj* / far Wylie mi
jam legis.” J. A. Wylie [1808-1890]: *The History of the
Waldenses*, Londono: Cassell and Company, 1860.

L. 5, ii: “La Trinità / denove en 1561 . . .” Efektive la
grafo La Trinità. Ĉi tion priskribis Wylie en ĉapitro 9, “The

Great Campaign of 1561”, *The History of the Waldenses*.

L. 5, ii: “John Milton bone tion ĉi bildigis.” Ĝin faris tiu granda poeto Protestanta en fama sia soneto “On the Late Massacre in Piedmont.”

L. 5, ii: “Alia sankta patro, kun mens’ kaj koro / ankoraŭ Mezepoke ŝtonaj, pavis / sur Vatikana trono kaj satanis.” Tiu estis Aleksandro VIII (1599-1667).

L. 5, ii: “Henrik’ la kvara, perfida / Protestanto cinike konvertita / al ŝia eklezio, por aĉeti / la tronon de Francujo (‘ĉu Parizo / kandelon ne valoras ?’) kaj sin vendis / al la diablo.” *Henri-Quatre* (1553-1610), la unua Burbona reĝo de Francujo.

L. 5, ii: “Tamen nur post kiam Ravajako, / tiu freneze pia Katoliko, / ponardis lin.” François Ravailiac.

L. 5, ii: “lia edikto Nanta, garantio / pri Hugenota religilibero...” *La édit de Nantes* far Henriko IV daŭris ekde Aprilo 1598 ĝis Oktobro 1685, kiam ĝin nuligis lia Katolika nepo Luizo XIV.

L. 5, ii: “De la Chaise, / lia konfesprenanto Jezuita...” Père François de la Chaise (1624–1709).

L. 5, iii: “Antaŭ unu jaro, / ĉe Marburg, Cvingli kun Germana mul’ / obstina debatis pri l’ konsekritaj pano / kaj vin’ eŭkaristiaj.” Huldrych aŭ Ulrich Zwingli (1484-1531) estis grava Svisa Reformisto. La “Germana mul’ obstina” estis Martin Luther.

L. 5, iii: “Marburg.” En la kastelo de tiu urbo en Hesse, Germanujo. Tiu debato daŭris ekde la 1-a ĝis la 4-a de Oktobro 1529. La baza demando estis ĉu en la eŭkaristio la pano kaj vino transformiĝis en la veran korpon kaj sangon de Kristo aŭ ilin nur simbolas.

L.5, iii: “Luther sur unu fraz’ Biblia / en la Latina daŭre marteladis: / ‘Hoc est corpus meum!’ Kaj *est*, laŭ li, / aludas la *substancon* subkuŝantan, / kaj do ne temas pri la nuraj aĵoj, / kiujn fenomene sentumoj spertas. / Pri tio li duone Katolikis, / Aristotele.” Aristotelo (394-322 a.K.), antikva

Greka filozofa, en siaj verkoj modifis la pensadon de Platono kaj multe influis Romkatolikajn ideojn, kiujn parte heredis Martin Luther. Sub unu el siaj difinoj de *substanco*, PIV konstatas: “La distingo inter la substanco kaj ĝiaj akcidentoj estas la bazo de la Aristotela doktrino kaj estis alprenita de la katolika eklezio por formuli la dogmon de la eŭkaristio.” Sed en la frazo ‘Hoc est corpus meum’ (tiu estas mia korpo) la verbo *est* havas nenian signifon semantikan, nur funkcion gramatikan. Ĝi do estas speco de egalsigno (=). Tiel la Hebrea kaj la Rusa moderna, en la prezenco, simple ellasas ĝin.

L. 5, iv: “Luther ekvojaĝos / pro ordono de la imperiestro / al Worms kaj danĝero.” La Dieto ĉe Worms (*Reichstag zu Worms* en la Germana) de 28 Januaro ĝis 26 Majo 1521. Ĝi estis formala kunveno de la Sankta Romia Imperio, okazinta ĉe la Heylshofa ĝardeno en Worms. Nuntempe ĝi situas en Germanujo, sed tiam ĝi estis libera urbo imperia. Prezidis la imperiestro Karlo V. Tiu dieto famiĝis pro la Edikto de Worms (*Wormser Edikt*), kiu pritraktis la problemon de Martin Luther kaj la Protestanta Reformo.

L. 5, iv: “La papistoj ne volis, ke li venu / por pludiskuti l’ ideon tre danĝeran— / kiun instruis la Valdanoj, Wycliffe / kaj Hus—pri la donaco de pardono / sen kost’ aŭ pentofaroj, sole ĉar Kristo / sur la terura kruco pendis.” John Wycliffe (ĉ. 1320-1384) estis frua Angla Protestantano kaj tradukinto de la Nova Testamento en sian nacian lingvon. Subtenantoj tradukis ankaŭ la Malnovan. Jan Hus (ĉ. 1369-1415) estis Ĉeĥa Reformisto, kiun la Katolikoj bruligis kiel herezulon ĉe Konstanz, Sud-Germanujo.

L. 5, iv: “Kristo...mem estas nia interulo / kun la ĉiela Patro, sen pentofar’ / aŭ pastro”. Vidu 1 Timoteo 1:5.

L. 5, iv: “Papo Leo...” Leo X (1475-1521).

L. 5, iv: “nobeldevena Albert. / Ĉefepiskopo de Magdeburg li estis / kaj pluse ĉefepiskop’ de Mainz. Li krome / administris la plian diocezon / de Halberstadt.”

Albert de Brandenburg (1490-1545). Li krome estis kardinalo kaj elektisto de Mainz. Dum la imperiestra elekto de 1519 ĉi Princ-Ĉefepiskopo de Mainz laŭdire ricevis grandan monsumon por elekti Karlon I de Hispanujo, kiu fariĝis la imperiestro Karlo V.

L. 5, iv: “Tetzel estis talenta komercisto.” Johann Tetzel (1465-1519).

L. 5, iv: “Cajetan, / fajra, fiera kardinal’, atendis.” Grava teologo Romkatolika kaj legato de la papo. Lia Dominikana nomo estis Tommaso De Vio (ĉ. 1468-1534).

L. 5, iv: “Ĉe Leipzig, la konflikto reĉendiĝis, / kvankam kun malpli tondra sed subtila / profesoro, d-ro Johann Eck.” Alia grava teologo Romkatolika. Li unue instruis ĉe la universitato de Freiburg kaj post 1510 ĉe la universitato de Ingolstadt. Lia vera nomo estis Johann Maier von Eck (1486-1543). Li naskiĝis en Eck, urbo Ŝvaba, kiu nun kuŝas en Bavarujo.

L. 5, iv: “nacio far Bismarck kunigotan.” Ekde la Eŭropa mezepoko Germanujo konsistis el multaj landetoj. Dum la deknaŭa jarcento ilin unuigis Otto Eduard Leopold, Princo de Bismarck, Duko de Lauenburg (1815-1890). Tiu unueco kompletigis en 1871. Tamen estas dubinde, ke tio okazus sen komuna lingvo.

L. 5, iv: “lando eksterordinara / transatlantika.” Usono.

L. 5, iv: “La aflikto granda, / por tiuj regionoj mallongigita / per preskaŭ tricent jaroj, finiĝis antaŭ / 1798.” Rilate al tio bonvolu relegi la noton sub L. 4, iv pri “dek du jarcentojn, inter Justiniano / kaj Franca general’ revolucia?”

L. 5, iv: “armado kontraŭ l’ Angloj...” La fiaskinta armado Hispana (*Grande y Felisísima Armada*) de 1588, sendita por detruigi la Protestantan reĝimon sub Elizabeta I en Anglujo.

L. 5, iv: “tridekjara milito. / Dum ĉi tio irigis la Sinjoro / junan reĝon el Svedujo, Gustavon / Adolffon, kiu en plej kriza horo / ekrompis multajn dentojn de l’ bestio.” La

terura tridekjara milito (1618-1648) kaŭzis la morton de ok milionoj da homoj kaj grandaparte ruinigis Germanujon. Ĝi komenciĝis kiel konflikto dum kiu la Katolikaj landoj provis detru la Protestantismon. Gustav II Adolf (1594-1632), plej bone konata kiel Gustavus Adolphus (Latina varianto de lia nomo) estis juna Sveda reĝo kaj militista geniulo. En gravaj bataloj li venkobatis la Katolikajn armeojn kaj savis la Protestantismon.

L. 5, iv: “la bela stel’ dunoma, / nun la vespera kaj morgaŭ la matena.” La planedo Venuso. La antikvaj Egiptoj kredis, ke temas pri du apartaj steloj, kiel—unue—ankaŭ la Grekoj, kies nomoj estis *Phosphoros* kaj *Hesperos*.

L. 5, v: “Ĉi damoj kaj sinjoroj, / vestitaj en Dimanĉe kirkaj vestoj, / estis Mileranoj...” William Miller (1782-1849), iam farmisto, fariĝis Baptista predikanto kaj antaŭdiris la Duan Venon de Jesuo.

L. 5, v: “Tiun daton korŝiran...Granda Desaponto.” 22 Oktobro 1844, kiam la Mileranoj vane atendis la Revenon de la Sinjoro.

L. 5, v: *Tanaĥo*: La Hebrea nomo por la Malnova Testamento.

L. 5, v: “Denove, dum la horoj da angoro, / mi ĉiudetale sublupeigis tiun / en Daniel 9 klarigon orŝlosilan, / kiun la alfluganta Gabriel / post la preĝo de la profeto portis / el la ĉielo.” Daniel 9:20-22.

L. 5, v: Hiram Edson: Milerano kiu post la Granda Desaponto de 1844 konstatis, ke ekzistas ĉiela sanktejo, en kiu Jesuo estas la ĉefpastro. Per tio, plus la ripozo tago en Sabato, originis la Adventistoj de la Sepa Tago.

L. 5, v: “Tio ĉi servis tra l’ dezertaj jaroj, / ĝis en la promesita lando.” Nombroj 32:13.

L. 5, v: “La konstruaĵo / enhavis, kun vual’ intera, du / apartajn ĉambrojn.” Kune kun siaj diservoj, ĉi ĉio estas priskribita en Eliro 25-31, 35-40.

L. 5, v: “Timu Dion kaj donu al li / gloron, ĉar venis la hor’ de lia juĝo.” Apok. 14:6, 7.

L. 5, v: “La Epistolon al la Hebreoj legu / pri la ĉielsanktejo kaj l’ Sinjoro / antaŭ la Patro por ni propetanta.” Hebreoj 9:1-14.

L. 5, v: “La Apokalipso, / tamen, ĝin precizigas. Legu la finon / de la dekunua ĉapitro kie / trumpetas tiu sepa, lasta anĝelo / de l’ tera homdestino. ‘Furiozis / la nacioj’—kiel okazis dum / la dudeka jarcento. Ankaŭ de Dio ‘venis / kolero, kaj la tempo de l’ mortintoj / por esti juĝataj kaj la tempo doni / la rekompenco al Viaj servistoj, al / la profetoj, kaj al la sanktuloj, kaj / al la timantoj de Via nomo.’ Krome, / ‘la detruantojn de la tero Li / pereigos.’” Apokalipso 11:18-19.

L. 5, v: la Sabatoveron / dorlotis en Usono nur obskura / eklezioto ĉiam pli ŝrumpanta, / la Baptistoj de l’ Sepa Tago.” Ili originis dum la 1650-a jardeko en Londono, Anglujo. Ilia unua ano Nord-Amerika estis Stephen Mumford, kiu alvenis en Rhode Island en 1665. Iliaj doktrinoj similas al tiuj de aliaj Baptistoj kaj diferencas ĉefe en tio, ke ili observas la ripozotagon en Sabato, laŭ la Dek Ordonoj de Eliro 20. Ili do originis du jarcentoj antaŭ la Adventistoj de la Sepa Tago. Nuntempe estas en la mondo ĉirkaŭ 50,000 da Baptistoj de la Sepa Tago, kontraste kun la pli ol 20 milionoj da Adventistoj de la Sepa Tago.

L. 5, v: “Antaŭ / 1844, vidviniĝinta / Rachel Oakes, kun ili ĉe Verona, / en la Novjorka ŝtato, unuiĝis.” Rachel (Harris) Oakes Preston (1809-1868).

L. 5, v: “predikanton / Metodista-Episkopalan, Frederick / Wheeler, Mileranon, ili invitis / alparoli ilin.” Poste li fariĝis predikanto de la Adventistoj de la Sepa tago kaj mortis preskaŭ centjara, vivinte de 1811 ĝis 1910.

L. 5, v: “Tamen diru, / pastoro, kial vi el ili unu / profanas?” “Konsternite, li respondis: / ‘Kiun?’ ““La

kvaran. Ĝi postulas klare / ripozon en Sabat', la sepa tago, / ne en Dimanĉo, la unua tago / de la semajno.” Laŭ Eliro 20:8-11.

L. 5, v: “William Farnsworth” (1807-1888). Laŭdire la unua Adventisto de la Sepa Tago.

L. 5, v: “El tiu rondo / la flam' plukreskis, atingante pliajn / eksmileranojn, James kaj Ellen White, / kun arda fervorulo, Joseph Bates.” Ĉefaj fondintoj de la Adventistoj de la Sepa Tago. Joseph Bates (1792-1872) evidente lernis pri la Sabata ripoztago de Frederick Wheeler—do nerekte de Rachel Oakes—kaj konvinkis James Springer White (1821-1881) kaj lian edzinon Ellen Gould White (1827-1915).

L. 5, v: “Handela *Haleluja*.” Ĥoro en la *Messiah* de Georg Friedrich Händel (1685-1759).

L. 5, v: “Tiu lasta strofo de poemo far Vondel ekstazita.” Tradukita el *Lucifer*, dramo de Joost van den Vondel (1587–1679), granda poeto dum la ora epoko de la Nederlanda literaturo.

L. 5, vi: “Benito Mussolini” (1883-1945), Itala diktatoro Faŝista.

L. 5, vi: “Pontifika ŝtatestretario, Gasparri.” Pietro Gasparri (1852-1934), Romkatolika kardinalo kaj diplomato.

L. 5, vi: “Nino Lo Bello” (1922-1997). Li estis Usona aŭtoro kaj ĵurnalisto kiu specialiste verkis pri Vatikanaj aferoj.

L. 5, vi: *Il Duce*. La Itala titolo de Mussolini, kun la signifo de “ĉefo” aŭ “gvidanto”. *Der Führer*, la Germana titolo de Adolf Hitler, havas la saman signifon.

L. 5, vi: “vivfine / la akrapinta partizana kuglo / subite lin kaj liajn revojn krevigis.” Dum la finaj tagoj de la Dua Mondmilito, Mussolini kune kun sia kunvivantino, Claretta Petacci, estis mortpafitaj far partizano, verŝajne la komunisto Walter Audisio. Tio okazis la 28-an de Aprilo

1945 en Giulino di Mezzegra, norditala vilaĝo, du tagojn antaŭ la sinmortigo de Adolf Hitler. La kadavroj oni transportis al placo en Milano, kie granda kolera homamaso insultis kaj mistraktis ilin. Poste oni pendigis ilin kun la kapoj malsupre.

L. 5, vi: “Sankta Nikolao” (270-343). Li estis la sanktulo patrona de ĉiaj homoj, inkluzive de ŝtelistoj pentintaj. Pro sia kutimo de sekreta donemo, li fariĝis la tradicia modelo por Kristnaska donacanto, precipe al infanoj. En la Angla oni nomas lin Santa Claus kaj Sinterklaas en la Afrikansa.

L. 5, vi: “la pontifiko / agnoskos Italujon kiel landon.” Por pli ol mil jaroj, ekde la oka jarcento ĝis 1870, proksimume trionon de Italujo regis la pontifikoj. Kiam en tiu jaro ili perdis la lastan parton de la papoŝtato, ili ĝis 1929 rifuzis agnoski tion.

L. 5, vi: “Tio murdos la jam / malsanan Weimar-respublikon.” Germane la *Weimarer Republik*, ĝi ekzistis ekde post la Unua Mondmilito inter 1919 kaj 1933. La nomon ĝi akiris el la urbo Weimar, kie okazis ĝia unua, estiganta kunveno. Oficiale ĝi konservis la nomon *Deutsches Reich* (Germana Imperio).

L. 5, vi: “Ho, mankus tiom / da tomboj, ŝpatomordoj en la grundon / por korpoj de junuloj—ankaŭ unu / kiu englutis vian fraton Lucas!” Mi poste vizitis ĝin kaj en 1987 verkis pri ĝi poemon, “Elegio por mia frato” (*Vojaĝoj kaj Aliaj Poemoj*, 1992).

L. 5, vi: “Reichstag”. La Germana parlamento.

L. 5, vi: “En tiu jar’ subskribos por la papo / Eugenio Pacelli.” Eugenio Maria Giuseppe Giovanni Pacelli (1876-1958), kardinalo kaj Vatikana ŝtatestro, kiel ankaŭ nuncio al Germanujo. Poste, en 1939, li fariĝis Papo Pio XII.

L. 5, vi: “Aŭgust’ Cezaro” (63 a.k.-14), la unua Romia imperiestro. Origine li estis Gaius Octavius, nevo de la murdita Julio Cezaro. Por la Romanoj li estis, Latine,

Imperator Caesar Divi Filius Augustus.

L. 5, vi: “Caligula.” Tio estis ŝercnomo. Formale li estis, en la Latina, Gaius Julius Caesar Aŭgustus Germanicus (12-41).

L. 5, vi: “Siksto la kvina.” Papo Siksto V (1521-1590). Agnoskite kiel signifa en la Kontraŭreformacio, li interalie ekskomunikis kaj la Anglan reĝinon Elizabeta I kaj la reĝon Francan Henricon IV.

L. 5, vi: “Circus Maximus” en la Latina, la plej granda stadio de la antikva Romo, en kiu okazis ĉarkonkursoj kaj gravaj kunvenoj.

L. 5, vi: “ranoplago, / kiel tiu iam en Egiptujo.” Eliro 8:5-6.

L. 5, vi: “la *dies solis* de l’ Sinjor’ Mitrao.” Latine la “Tago de la suno”, Dimanĉo, la sankta tago de tiu dio.

L. 5, vi: “Iam / pro la idoloj kaj Sabatolezoj / dek tribojn de l’ antikva Izraelo / li el ilia nordo forbalais...” Temas pri la triboj de Ruben, Simeon, Isaĥar, Zebulun, Dan, Naftali, Gad, Aŝer, Efraim kaj Manasse. Ilia reĝlando, estiĝintan en 930 a.K., detruis en 722 a.K. la Asirianoj, kiuj forkondukis multajn nordulojn al orientaj regionoj. Iuj tamen restis en sia lando kaj poste, laŭ 2 Kronikoj 34:6-9, unuiĝis kun la Judoj en ilia suda reĝlando. Alivorte la ideo pri triboj perditaj estas mito. Ni ekzemple legas en la Nova Testamento, Sankta Luko 2:36, pri la profetino Anna “el la tribo de Aŝer.”

L. 5, vi: “la jaro 1798 / kiam Berthier ekzilis Pion / la sesan, por senkapigi la papismon.” Pri la generalo Louis-Alexandre Berthier de la Franca Revolucio kaj la 1260 jartagoj jam estas noto sub L. 4, iv. Pio VI (1717-1799), origine grafo Giovanni Angelo Braschi estis papo dum dudek ses jaroj, ekde 1775 ĝis sia morto.

L. 5, vi: “Bernardinon Nogara” (1970-1958), financa konsilisto inter 1929 kaj 1954 sub papoj Pio XI kaj Pio XII. Per lia helpo la Vatikano tre riĉiĝis tempe de kaj post la

Granda Depresio.

L. 5, vi: “la naŭa Pio / en profundojn de l’ Vatikano fuĝis / kaj ne plu montris sin al fideluloj / ekster ĝiaj fenestroj.” Pio IX (1792-1878) pro la perdo de la papa ŝtato dum 1870 propravole retiriĝis en la Vatikanon por “interna ekzilo”.

L. 5, vi: “la iama papa / ŝtato...” Oficiale la *Ŝtato de la Eklezio*, tio estis teritorioj en Italujo kiujn regis la papoj dum pli ol mil jaroj, ekde la oka jarcento ĝis 1870.

L. 5, vi: “la oraj stratoj / de l’ nova Jerusalemo.” Ĉi tiu urbeĝo estas priskribita en Apokalipso 21 kaj 22.

L. 5, vi: “Memoru de Jesuo, / kiu vin sur la kruc’ por si aĉetis, / averton kaj promeson specialajn: / ‘Abundos anomia—senleĝeco. / La amo de l’ plejmulto malvarmiĝos, / Sed kiu ĝis la fin’ eltenos, tiu / estos savita.” Sankta Mateo 24:12. La vorto *anomia* (senleĝeco) estas laŭ la Greka originalo.

L. 5, vi: “Kiom mi jubilos ĉe la Reveno, / se vi en tiu tombejo de McAllen / vekigis aŭ, ankoraŭ viva, soros / por ĝoje renkonti lin en la aero.” Ĉi suprensorono dum la releviĝo de la mortintoj mencias 1 Tesalonikanoj 4:16, 17.

L. 5, vii: “prezidento Trump / la mense malkohera...” Komence de 2017 Donald John Trump (1946-) fariĝis prezidento de Usono kaj ofte mirigis per strangaj diraĵoj.

L. 5, vii: “krom la jaro / dum kiu lerta Jezuita papo— / laŭdinte Luther...” Temas pri Jorge Mario Bergoglio (1936-), kiu antaŭ sia elekto kiel papo Francisko apartenis al la Jezuita ordo. Li laŭdis preskaŭ ĉiujn, eĉ—iom, kvankam kompreneble ne tute—Martin Luther, la grandan reformiston.

L. 5, vii: “Francisko”. Vidu supre.

L. 5, vii: “l’ apostolo Judas— / la filo de perdiĝo, laŭ Jesuo.” Sankta Johano 17:12.

L. 5, vii: “Kiel Rosmareno?” Mia katino. En la Angla ŝia nomo estas *Rosemary* kaj *Roosmaryn* en la Afrikansa.

L. 5, vii: “Vicprezidento Pence...” Michael Richard Pence (1959-), Politikisto kaj juristo, kiu ekde Januaro 2017 estis la 48-a vicprezidento de Usono. Antaŭe, ekde 2013 ĝis 2017, li estis la guberniestro de Indiano.

L. 5, vii: “Jam Saul’ / ĉe En-Dor per aŭguristino provis / konsulti Samuelon, jam mortintan.” 1 Samuel 28:3-25.

L. 5, vii: “Antaŭ jam pli ol cent kaj dudek jaroj / la Adventista profetino skribis, / ke unuiĝos en Uson’ la ĉefaj / eklezioj Protestantaj surbaze / de la doktrinoj inter si komunaj.” En *The Great Controversy Between Christ and Satan* far Ellen Gould White (1827-1915). Ĉi libro unue aperis en 1888. Kun la subtitolo “The Conflict of the Ages in the Christian Dispensation”, ĝi estas la kvina volumo en tiu serio. La titolo de mia epopeo, *La Konflikto de la Epokoj*, estas traduko de “The Conflict of the Ages”.

L. 5, vii: “Por tiaĵo la Sinjoro / dekretis ekzekuton.” 1 Kroniko 10:13, 14: “Tiamaniere mortis Saul pro siaj malbonagoj, kiujn li faris antaŭ la Eternulo, ne plenumante la vorton de la Eternulo; ankaŭ pro tio, ke li turnis sin al antaŭdiristino, por demandi, sed ne demandis la Eternulon.”

L. 5, vii: “via amata Mediteraneo.” Aludo al mia poemo “Lasta Sopiro” de 12.11.1969, kiu aperis en *Poemaro kaj Prozeroj* (1970). En ĝi mi diris, interalie: “sed antaŭ ĉio / vagadi ĉirkaŭ tiu lago Mediteranea, / sur kiu nun ankoraŭ ŝipas— / post la forŝlifo de la tempo / kaj iuj knabaj fantazioj— / nedetruoble / brunpruaj cigoj de Homero.”

L. 5, vii: “en kur’ fatala, ili kungreĝiĝos / impete kaj trans kliforandojn plonĝos, / fervore, kiel lemingoj de la mito...” Laŭ PIV *Lemingo* estas alternative por *lemo* 2: “Malgranda mamulo el la ordo de ronguloj, fam. de musedoj, kun flava k nigra koloroj, vivanta en nordaj Eŭropo k Azio, konata pro siaj amas-migradoj.” Ilia intenco sinmortigo ja estas mito.

L. 5, viii: “Sekve la sango / de la martiroj ne povas servi plu / kiel sem’ por savi pliajn konvertitojn.” Antaŭ 1800

jaroj Tertuliano, frua teologo Kristana en Kartago, Nord-Afriko, asertis, ke la kuraĝa morto de martiroj plifortigas la eklezion, ĉar tio konvertas spektantojn.

L. 5, viii: “forpaŝante el la Plejsanktejo / ĉiela, deklaris: ‘Nun la maljustulo / ankoraŭ estu maljusta, la malpurulo / ankoraŭ estu malpura; kaj la justulo / ankoraŭ estu justa kaj la sanktulo / ankoraŭ estu sankta.’” Apokalipso 22:11.

L. 5, viii: “al ili ne manku pan’ aŭ akvo.” Jesaja 33:16.

L. 5, viii. “pastro Zwart, kun koro / nigra kiel lia nomo.” *Zwart* en la Nederlanda signifas *nigra*.

L. 5, viii. “terura best’ ciborga / pri kiu Daniel rakontis.” Daniel 7:7, 19. Ĝi havis erojn metalajn.

L. 5, viii. “Norman Gulley.” La nomo de granda teologo Adventista, amiko mia.

L. 5, viii. “Fro Ángel Guerra.” Ne efektiva nomo por persono al mi konata. La nomo *Ángel* en la Hispana signifas “anĝelon” kaj *guerra* “militon”.

L. 5, viii: “D-ro Ben le Roux...” Fiktiva nomo, eble Sud-Afrika. Pro Hugenoataj enmigrintoj iamaj, tiu familia nomo Franca sufiĉe abundas en Sud-Afriko.

L. 5, viii: “nia Andrews-universitato...” La plej grava Adventista universitato, en Berrien Springs, Michigan.

L. 5, viii: “Notre Dame...” Grava Katolika universitato en Indiana, iom proksime al Andrews-universitato.

L. 5, viii: “Rebeka”. Fiktiva nomo.

L. 5, viii: “Michael Scheifler...” Tre kara amiko mia.

L. 5, viii: “ĉar malgraŭ multaj signoj profetitaj, / la Plejaltulo laŭ la Sanktaj Skriboj / gardadas la sekreton.” Laŭ Sankta Mateo 24:36 neniu krom la ĉiela Patro scias kiam Jesuo revenos.

L. 5, viii: “la Kristiĝinta Mikaelo.” Jam menciita plurfoje en ĉi tiu epopeo, Mikaelo estas dia estulo, la Filo de Dio, kiu enkarniĝis kiel Jesuo Kristo.

L. 5, viii: “sur la frunt’ aŭ man’ ricevus / la markon de l’ bestio. . .” Apok. 13:16; 14:9, 10.

L. 5, viii: “La tag’ en l’ okcidento mortas...” Traduko de la Angla himno “Day is dying in the west...”

L. 5, viii: “finaj / plagoj kiuj nun pluvas el la pelvoj / de l’ Dia kolero, laŭ l’ Apokalipso.” Apokalipso 16.

L. 5, viii: “tial Dio / el la bastono de Mose’ fluigis / dek plagojn pune. Tre simile nun / li draŝas ĉi lastatempajn malamikojn.” Eliro 4:2-4 kaj ĉapitroj 7 kaj 8.

L. 5, viii: “homoj / kiuj la markon de l’ bestio havas / kaj al ĝia bildo adorkliniĝas.” Apokalipso 16:1.

L. 5, viii: “Per Herodo, / sia ido, la drako provis vori / Jesuon kiel bebon.” Sankta Mateo 2:13-18. La diablo estas la drako laŭ Apokalipso 12.

L. 5, viii: “Malgraŭe, ĉe la tombo de Jozefo, / tiun trian tagon nia Sinjor’ / deskuis la mortkatenojn.” Sankta Luko 23:50-53; 24:1-6.

L. 5, viii: “Preter ĉi tio kaŝiĝis Etiopaj / kredantoj, ankaŭ Hindaj ĉe l’ marbordo / Malabara.” La Kristanismo de tiuj regionoj malsamis al la papa. Sed la Portugaloj, post la unua ĉirkaŭ-Afrika vojaĝo de Vasco da Gama (ĉ 1460-1524) en 1497-1499, alportis la inkvizion kaj klopodis perforte trudi al ili la Romkatolikismon.

L. 5, viii: “la drako kolerege forturniĝis / por plu militi kontraŭ la restintaj / de la virino posteuloj. Tiuj / aŭdacas plu obei la Diordonojn / kaj krome havas l’ ateston de Jesuo, / la spiriton de profetado.” Apokalipso 12:17; 19:10.

L. 5, viii: “generalo Berthier.” Pri li vidu noton sub L. 4, iv.

L. 5, viii: “Belizaro / el Bizanzo pli fruan pontifikon / kaj la papismon savis, forpelante / armeon Ostrogotan, kiu Romon / dum pli ol jar’ sieĝis.” Vidu noton sub L. 4, vi.

L. 5, viii: “ĉi besto hipokrita”. J. N. Andrews, brila Adventista teologo, nomis Usonon tia antaŭ ĝia milito civila, ĉar tiom en ĝi defendis la sklavecon.

L. 5, viii: “montprediko de Jesuo / apud la Galilea lago kaj l’ Dek / Ordonoj.” La montprediko de Jesuo legeblas en

Sankta Mateo 5-7 kaj la Dek Ordonoj en Eliro 20.

L. 5, viii: “per l’ akra glavo de la Sanktaj Skriboj.”
Hebreoj 4:12.

L. 5, viii: “Unue la bojkoto, / kun rajto vendi kaj aĉeti nur / por dimanĉistoj aŭ Romkatolikoj. / Due, finfine, la dekret’ laŭ kiu / la ŝtat’ fortiris sian protektombrelon / de super ĉiu sabatisto. Tial / kanajloj rajtis kunboje ataki kaj / mortigi nin.” Apokalipso 13:17.

L. 5, viii: “Dume, la tria anĝel’ minacis / per infera fajro la mondloĝantojn, / se ili sur la frunt’ aŭ man’ ricevus / la markon de l’ bestio, por tiele / adorkliniĝi al ĝi kaj ĝia bildo.” Apokalipso 14:9-11.

L. 5, viii: “Kristo / portretita en la Apokalipso / far Johano, la apostolo.” Apokalipso 1:12-15.

L. 5, viii: “same eligos melodiajn benojn / kiel Jesuo dum maten’ lazura / kontraŭ la montoflanko ĉe la lago...”
Sankta Mateo 1:1: “Kaj vidinte la homamasojn, li supreniris sur la monton...” Tio okazis apud la lago Galilea.

L. 5, viii: “Birdoj frandos / dum festeno, kiun Dio preparis, / la restaĵojn de homoj agresemaj.” Apokalipso 19:17, 18.

L. 5, viii: “Satano, provizore, pro teruro / kun siaj fuĝos panike al la luno, / kiel dum la diluvo. Tio estos / maldaŭra, lasta fojo kiam ili / povos forlasi tiun ĉi planedon.” Aludo al L.1, ix.

L. 5, viii: “Sekvos fulmoj, aliaj voĉoj, tondroj, / kaj tertremego skuos ĉi planedon... / Tiam hajlerecoj talantopezaj, / kvindekkilogramaj, el la ĉielo / frakase falos sur homoj kiuj ne / jam kuŝos sub la enfalintaj muroj.” Komparu kun Apokalipso 16:17-21.

L. 5, viii: “La tag’ en l’ okcidento mortas / kaj kun ripozo la ĉielo / la teron tuŝas. Diserva horo / lumigas la vesperolampojn / en adoro,” k.t.p. Traduko de la Angla himno “Day is dying in the west...”

L. 5, ix: “Mvenyane”. Regiono en Sud-Afriko, proksime al Cedarville. Origine ĝi estis nordorienta parto de la Kaba Provinco. Poste oni transigis ĝin al Kwazulu-Natal.

L. 5, ix: “mi floris kaj ludis kun fratinoj, / Blossom kaj Marjorie. Sed poste ili / iĝis maljunaj kaj forvelkis. Sepdek / jaroj kun ili de tiam fluis for.” Fakte iom pli ol sepdek jaroj. Jen iliaj vivodatoj: Blossom Dorothy (1931-2017); Marjorie (1933-2015).

L. 5, ix: “Ni sciis, ke en la domo, / eble kun Maggie, laboras panjo. Paĉjo, / verŝajne inter amataj fruktoarboj, / revas pri mondo antaŭ mia mondo.” Jen ili:

L. 5, ix: “Panjo”, Susanna Elizabeth, n. Olivier (1891-1972).

L. 5, ix: “Maggie”. Nigra servistino, kiun mi tre amis. Dum 1979 mi verkis apartan poemon pri ŝi, “Dankon al Du, I” (*Saluton al la Suno*, 1983).

L. 5, ix: “Paĉjo”, Josias Alexander (1891-1957).

L. 5, ix: “du respublikoj Buraj.” *La Oranĝa Liberŝtato* (1854–1902) kaj la *Sud-Afrika Respubliko* de Transvalo (1852–1877, 1881–1902). La sendependecon de ĉi lasta interrompis anekso far la Britoj. La Buroj en 1880-1881 dum triumfa trimonata milito sin ree liberigis.

L. 5, ix: “Sud-Afriko / subjugigita, monarkia himno / kaj fremda flago ruĝa, blanka, blua. / Tri krucoj, unuj super la aliaj, / kvazaŭ religie dekoris ĝin. / Sed logis apud ĝi la novaj flago / kaj himno kun memoroj antaŭulaj, / kio certigis koron dividitan.” La monarkia himno estis “God save the Queen/King” kaj tiu Brita flago la *Union Jack*. La koloroj de la nova Sud-Afrika flago estis oranĝa, blanka kaj blua, sed interne de ĝi troviĝas flagetoj de la du Buraj respublikoj kune kun la Brita. Tion uzis la Unio de Sud-Afriko. Ĉi-lasto poste fariĝis la Respubliko de Sud-Afriko. Tiam forfalis la apude kunuzita *Union Jack*. La nacia himno de la Unio de Sud-Afriko estis, Afrikanse, “Uit die blou van onse hemel ...” (El la blu’ de nia ĉielo).

L. 5, ix: “Ho frua hejmo kara.” Tiu koncernas miajn geavojn kaj patron. La nomo de ilia farmo estis *Brugplaas* (Pontofarmo) ekster Middelburg en la Transvala Respubliko.

L. 5, ix: “Albion...” Alia nomo por Anglujo. La nomo de tiu karbminejo estis Albion Collieries.

L. 5, ix: “la Nordo...” Johanesburgo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, kie mia patro laboris, interalie kiel trajnkonduktoro kaj en orminejo.

L. 5, ix: “Christiaan Maurits [van den Heever]” (1902-1957). Dr-o van den Heever estis, krom elstara profesoro universitata pri la Afrikansa kaj la Nederlanda, bona poeto kaj la plej granda romanverkisto en la Afrikansa.

L. 5, ix: “Ĝi haltis, fro temp’ al tempo, por ke ĉie / l’ anĝelaj rikoltistoj de l’ Sinjoro / kolektu siajn orajn garbojn.” Sankta Mateo 13:37-39.

L. 5, ix: “Sed la plejmulto / provis en kavernojn aŭ ien ajn / rifuĝi, kriante: “Falu sur nin rokoj / kaj montoj, por nin kaŝi fro l’ vizaĝo / de Dio kaj la kolero de l’ Ŝafido; / ĉar venis la granda tago de kolero, / kaj kiu povas stari?” Apokalipso 6:16.

L. 5, ix: “Ili ascendas, / ankoraŭ nun, al tiu centra mondo / al kiu iam Henoĥ vin kondukis. / Teran semajnon daŭros la vojaĝo, / sur stela raŭto, preter l’ Orionan / Nebulozon. Unu ripozotagon / laŭ l’ kvara de la sanktaj Dek Ordonoj / ili survoje festos. Bela mondo / gastigos kaj neniam tion ĉi / forgesos.” Apokalipso 8:1 tekstas: “Kaj kiam li malfermis la sepan sigelon, fariĝis silento en la ĉielo por ĉirkaŭ duono de horo.” Laŭ la tagjara ekvivalento, tiu profeta tempo egalas unu semajnon. En “My First Vision”, *Early Writings*, p. 16, Ellen G. White skribis, ke post sia releviĝo el la morto, la savitoj ascendas sep tagojn al la ĉielo. Ie ŝi supozeble ankaŭ skribis pri tiu Sabatripozozo survoje tien.

L. 5, ix: “la Nova Jerusalem, / por ili pretigita laŭ promeso / de la Savanto antaŭ siaj morto / kaj reviviĝo.” Johano 14:1-3.

L. 5, ix: “en la Vatikano / de l’ iam bela bazilik’, nomita / honore al humila Judo, Petro, / fiŝisto!” Li estis, kiel multaj el la dek du apostoj de Jesuo, fiŝisto ĉe la Galilea lago. La Romkatolikoj konsideras lin la unua papo kaj ŝatas citi koncerne lin Sanktan Mateon 16:13-17. Alte en la Baziliko de Sankta Petro mi en 1985 legis parton de tio en la Latina: “Tu es Petro, et super hanc petram aeficabo ecclesiam meam” (vi estas Petro, kaj sur ĉi tiu roko mi konstruos mian eklezion). Supozeble ĉiuj papoj, ĉu bonaj, ĉu malbonaj, kvazaŭ reenkarniĝe heredis lian oficon. Protestantoj ne kredas tion.

L. 5, ix: “la urbo kie reĝos Kristo.” La nova Jerusalemo, laŭ Apokalipso 22:13.

L. 5, ix: “poste sub rikana suno rostis, / malrapide, dum tedeumis pastroj!” Aludo al la Romkatolika himno en la Latina, “te Deum laudamus” (Dio, ni laŭdas vin), tradicie kantata okaze de publika ĝojado. Verkante ĉi tion, mi memoris la rolon de ne simple pastroj sed la papo mem kiam la novaĵo pri la nokta masakro de Hugenoj ĉe Parizo dum la 23-24-a de Aŭgusto 1572 atingis Romon. Ĝoja Gregorio XIII ordonis tedeumon kaj la faron de medaliono kun la latinaj vortoj *Ugonottorum strages 1572* (renverso aŭ buĉo de la Hugenoj).

L. 5, ix: “kiun tiu ĉapitro / de la Apokalipso l’ abismo nomas.” Apokalipso 20:1-3.

L. 5, ix: “Laŭ la profeto, / juĝos surtronigita tribunalo / de la savitoj, precipe ili kiujn / la drako kaj la du bestioj lezis: / ‘La senkapigitaj pro l’ atesto de / Jesuo kaj pro la vorto de Dio.’ Ankaŭ / la homoj ‘kiuj ne adorkliniĝis / al la bestio, nek al ĝia bildo, / kaj ne ricevis la markon sur sia frunto / kaj sur sia mano.’” Apokalipso 20:4.

L. 5, ix: “Ekzemple iuj sklavoj, kies mastroj / al fikondutoj ilin devigadis / kaj ĝisfunde misformis. Iuj vokis / el tiu stato, kaj l’ Sinjor’ kompata / ilin savos. Aliaj simple cedis / al siaj posedantoj kaj pekadoj, / kun karakteroj kiuj

maltaŭgigis / por la ĉielo. Ilin li ne punos / sed lasos post la morto plu ripozi.” Tion skribis fidfratino Ellen White. Diversaj malamikoj atakis la ideon pri la nereleviĝo de tiaj sklavoj kiel nebiblian. Sed mi rigardas ŝiajn vortojn kiel pruvon de Dia inspiro, ĉar ili konformas al liaj amo kaj kompatemo.

L. 5, ix: “Por pravigi Dion,” mi tuj respondis / iom kiel John Milton.” Ĉe la komenco de Libro 1 en sia epopeo *Paradise Lost* (Paradizo Perdita), Li petis, ke Dio kaj precipe la Sankta Spirito lin helpu, “that to the highth of this great Argument / I may assert Eternal Providence, / And justifie the wayes of God to men” (ke al la alto de ĉi granda Argumento / mi povu aserti Eternan Providencon, / Kaj justigi la agojn de Dio al la homoj).

L. 5, ix: “Jim Watt (1935.03.29–2017.08.16)”, kara amiko de mi kaj Ria.

L. 5, ix: “Isabel, / kiu vartis lin...” Isabel Vela.

L. 5, x: “la renversitaj muroj Sulejmanaj.” Dum 1535, kiam Jerusalemon estis parto de la imperio Otomana, Sultano Sulejmano I ordonis, ke oni rekonstruu ĝiajn ruinigitajn murojn. Tio fariĝis en kvar jaroj, inter 1537 kaj 1541.

L. 5, x: “kvazaŭ floro el or”, / kupolo sur la Roko— Bizancastile / Muzulmana, de kiam la Araboj / kaj Ortodoksuloj amike kunkulturiĝis.” Bonvolu noti la vorton “kunkulturiĝis”. Religie ili multe diferencis. La arkitektura stilo de tiu kupolo estis malgraŭe tre influita de Bizancaj preĝejoj.

L. 5, x: “Same la Okcidenta Mur’ antikva / de l’ Dua Templo falis kie Judoj / veadis.” La Judoj preĝas kontraŭ nur parto de tiu muro, konstruita tempe de la reĝo Herodo la Granda. La templon kaj Jerusalemon mem post sieĝo detruis la Romianoj en 70 p. K.

L. 5, x: “En 1985, / kiam mi vizitis, ĉi ĉio estis / ankoraŭ vidindaĵoj.” Vidu mian poemon “Momentoj Israelaj” en *Vojaĝoj kaj Aliaj Poemoj* (1992).

L. 5, x: “Ho mitoj, ho mensogoj...” kiujn ĉiĉeronoj kaj aliaj rakontas al pilgrimantoj kaj turistoj vizitantaj Israelon.

L. 5, x: “Liaj piedoj la Monton tuŝos / por krei grandan valon.” Laŭ Zeharja 14:4.

L. 5, x: “Kiel post Harvey, ĉe Houston uragano...” Ĝi frapegis Houston, la plej grandan urbon en Teksaso, Usono, dum Aŭgusto 2017. Precipe per inundego ĝi detruis domojn kaj aliajn konstruaĵojn je la valoro de ĉirkaŭ \$200 miliardojn.

L. 5, x: “la manaon / por Izrael’...” Eliro 16.

L. 5, x: “Rapide / ĝi sobvenante kreskis kaj iĝis vasta / urbeĝo juvelita, multkolora, / per kies bildoj Gabriel Johanon / ravis laŭ finvizi’ Apokalipsa.” Apokalipso 21:10-21.

L. 5, x: “la kosmo post eonoj eltriviĝos. / Dio la ĉielojn kvaz’ oldiĝintan / veston ŝanĝos...” Hebreoj 1:10-12.

L. 5, x: “domo pli luksa ol tiuj de l’ riĉuloj / kiujn mi suburbe ĉe Edinburg / enviis.”

L. 5, x: “la majestajn branĉojn de pekano.” Grandega nuksarbo.

L. 5, x: “Mi iras por pretigi por vi lokon” / kaj “mi revenos kaj ricevos vin / al mi mem, por ke vi ankaŭ estu tie, / kie mi estas...” Johano 14:1-3.

L. 5, x: “Benita estas tiu, kiu / venas en la nomo de l’ Sinjoro!” Matt. 21:9.

L. 5, x: “la paradizo, / kiun la Plejaltulo iam plantis / oriente de Edeno.” Genezo 2:8.

L. 5, x: “Ĝi subportis la grandan blankan tronon / sur kiu sidis la homa fil’ de Dio...” Apokalipso 20:11-15.

L. 5, x: “la Sinjoro sendis / kerubojn kaj flaman glavon turniĝantan...” Genezo 3:24.

L. 5, x: “Pentaj posteuloj, dum kelkaj jaroj, / alportis tien, al la enirejo, / piajn preĝojn kaj sangajn pekoferojn.” Laŭ Ellen G. White.

L. 5, x: “Ili rigardadis kaj tre enviis / la sanktajn beatulojn super si / kaj kun Jesuo, kiuj saĝe rifuzis / fatalan

transakcion kun Satano.” Sankta Mateo 4:8-11.

L. 5, x: “la paradizon li inkludis / kiel specimenon de l’ kre’ unua.” Laŭ Ellen G. White.

L. 5, x: “Dum vanaj vivoj ili lin rifuzis, / per far’ post fia faro, deklarante: / “Ni ne deziras, ke ĉi tiu reĝu / super ni.” Sankta Luko 19:14.

L. 5, x: “Ĉi ĉion terurite spektis Annas, / ĉefpastro, kun Kajafas, fia Herodo / kaj Pilato. Ĉi tiu de siaj manoj / en vano provis lavi la senkulpan / sangon de Jesuo, kiu avertis / pri siaj dieco, glora ven’ kaj juĝo.” Sankta Marko 14:61, 62.

L. 5, x: “Sed semis ankaŭ la Prafripono: lolojn / inter tritiko, kiujn kultivadis / liaj teologoj, entuziasmaj / pastroj kaj pontifikoj.” Sankta Mateo 13:24-30, 38-39.

Libro 5, x. “Iujn la fajro / dum kelkaj sekundoj voris, sed aliaj / suferis multajn tagojn.” Ĉi tion kaj multon pri tiuj okazontaĵojn priskribas *The Great Controversy Between Christ and Satan* de Ellen G. White.

L. 5, x: “Mankis al mi manĝaĵoj, ion trinki / kaj vestojn. Mi malsanis kaj mizere / kuŝis en prinzonĉelo. Sed vi ne venis / por helpi aŭ almenaŭ min konsoli.” Sankta Mateo 25:41-45.

L. 5, x: “Mankis al mi manĝaĵoj, ion trinki / kaj vestojn. Mi malsanis kaj mizere / kuŝis en prizonĉelo. Sed vi venis / por helpi aŭ almenaŭ min konsoli.” / ... Kaj li klarigis: “Kiom vi tion faris / al miaj gefratoj, tiom vi faris al mi!” Sankta Mateo 25:34-40.

L. 5, x: “Jesaja pri tio verkis.” Jesaja 66:22, 23.

L. 5, x: “Vi konatiĝos / kun la patrino...” Susanna Elizabeth de Kock, nask. Olivier (1891.11.10–1972.1.2).

L. 5, x: “Ŝi ankaŭ ĵonglis / per rimedoj, iuj tre malprobablaj...” Unue ŝi bredis kaj vendis kokinojn. Poste ŝi petis monan helpon de fonduso kreita memore al Dan Pienaar (1893-1942), elstara generalo Sud-Afrika. Lin alte estimis kaj amis kolegoj, ankaŭ liaj soldatoj. Ŝokis ilin lia subita morto dum la dua mondmilito, kiam la aviadilo per

kiu li vojaĝis hejmen falis en Kenjo. La fonduso celis financan subtenon por eduki la infanojn de soldatoj batale mortintaj. Mia patrino skribis al la koncernuloj pri mi, la *frato* de Lucas, kun la argumento, ke se li supervivus, li estus finance subteninta siajn malriĉajn gepatrojn. Li pereis dum 1944 en la Gota linio, Italujo. Kun humila danko mi memoras, ke mi tiom ŝuldas al la morto de du homoj tre specialaj.

Libro 5, x: “sendigi min al kolegi’ multkosta...”
Helderberg-Kolegio.

Libro 5, x: “Kie Arnon vi renkontis kaj kie / essence via vivo komenciĝis.” Arno Kucharzik (nask. 1929.11.02.), Germano, kun kiu mi tie konatiĝis en Januaro 1947. Post pli ol 70 jaroj ni ankoraŭ restas amikoj. Pri lia influo, krom tiu de aliuloj, ĉe la kolegio rakontas la biografia sekcio de *Sub Fremdaj Ĉieloj* (2007).

Libro 5, x: “la rado de Ĥronos / ne estas retroturnebla!” Ĥronos (Χρονος en la Greka), kiu signifas “tempo”.

Libro 5, x: “Tion Jesu’ klarigis al Sadukeoj, / kiuj skeptikis pri la releviĝo.” Sankta Mateo 22:23-31.

Libro 5, x: “Joakim de Fiore...” En la Itala *fiore* signifas “floro”, sed ĝi ankaŭ estas loknomo. Temas pri Gioacchino da Fiore (c. 1135 –1202), Katolika klariginto pri la Bibliaj profetaĵoj, kiu en postaj jaroj forte influis la Protestantojn.

Libro 5, x: “kaj viaj profetaĵaj libroj.” Vidu p. 9.

Libro 5, x: “la psalmisto / David, de Izrael’ kantanto dolĉa...” 2 Samuel 23:1. *Ne'im Z'mirot Yisrael* en la Hebrea.

Libro 5, x: “Salomono kun tri profundaj libroj”: La “Sentencoj”, “Predikanto” kaj “Alta Kanto”.

Libro 5, x: “Vergilio, tiu *anima / naturaliter Christiana*” en la Latina. Tio signifas “animo laŭnature Kristana”. Ĉi esprimon oni pasintece ofte uzis por priskribi Vergilion. Li fariĝis la gvidanto por Dante tra “La Infero” en la *Dia Komedio*.

Glosaro

Adamo	la unua homo kaj viro, laŭ la Biblio.
agresi	ataki la unua, ne estante mem minacata.
ajno	io ajn.
aĝo	tempaĝo, epoko.
Akropolo	fortikaĵo alte situanta de la Helenaj urboj, precipe de Ateno, kun brilaj artrestaĵoj.
akĉento	karakteriza maniero paroli.
amara	maldolĉa.
Amorido	ano de antikva popolo loĝinta en kaj ekster Kanaano.
Anakido	ano de gigantopopolo Kanaanida.
Andromedo	galaksio najbara al la nia.
Anĝelo	la Dieca estulo de la Malnova Testamento, Kristo antaŭ lia homiĝo.
Anĝelo de la interligo	la Angelo. <i>Vidu supre.</i>
antidorko	saltantilopo.
apen'	apenaŭ.
aperta	ne kovrita, ne fermita, facile alirebla.
apokalipso	finokazaĵoj, io enigma aŭ terura, kiel en la samnoma libro de la Biblio.
arkaja	Zamenhofa varianto por <i>arkaika</i> .
ascendi	supreniri.
asegajo	indiĝena lanco nelonga de Sud-Afriko.
aspra	raspsurfaca, krude raspeca; senkompate doloriga.
Atlantido	fabela insulo en Atlantiko, pratempe malaperinta.
atombombo	ege detrua bombo utiliganta nuklean energion.
aŭdaca	riskema, trokuraĝa.
aŭstera	severmora, frostetosa.
Aŭŝvico	Auschwitz, Pollando, kie lokiĝis fifama

	ekstermejo en kiu la Naziaj Germanoj amase murdis Judojn dum la Hitlera periodo.
avanci	antaŭeniri.
ba	interjekcio de senzorgeco.
Babelo	Babilono.
barbeo	Valdana predikanto kaj saĝulo.
basa	malalta (ankaŭ morale).
baŭmi	stariĝi sur la maltantaŭaj piedoj.
bavi	(ntr.) ŝaŭme salivi.
bebo	infaneto.
benzino	substanco ekstraktita el petrolo kaj uzata kiel brulaĵo en motoroj.
Bet-Leĥemo	urbo Izraela, la originejo de la reĝo Davido, en kiu naskiĝis ankaŭ lia posteulo Jesuo.
bido	globforma peco el ligno, vitro k.t.p.
bobeli	estigi veziketojn en likvaĵo.
bonsaĵo	arbo miniaturigita laŭ Japanaj metodoj, por krei la impreson de grandeco kaj aĝo profunda.
Boŝmano	ano de ĉasista raso primitiva kaj malmultnombra de la Suda Afriko.
braĝo	parte bruligita ligno aŭ karbo, fajrorestaĵoj.
braĝi	braĝe ardi.
Brita Insularo	Britujo kaj la ĉirkaŭaj insuloj.
brizo	malforta venteto.
bunta	plurkolora, mikskolora.
Buro	ano de blanka popolo Afrikanslingva kiu originis en Afriko el diversaj ingrediencoj, nome 35% Nederlanda, 34% Germana, 13% Franca, 7% ne-Blanka k.t.p.

busi	vojaĝi per buso.
cico	homa mampinto.
cis	maltrans.
ĉendi	ekbruligi, malestingi.
ĉipa	malmultekosta.
ĉit	silentiga krio.
debila	malsanema, sane malforta.
delica	intense plezuriga.
delirio	ekstrema deliro.
Delto,	
la verda	la delto de Nilo.
desaponti	seniluziigi. (Zamenhofa formo).
descendi	malsupreniri, malsupreniĝi.
despero	malespero.
dina	maldika.
dirigento	direktanto, muzika kondukisto.
dirta	malpur(eg)a.
dis	disde, forde.
dista	malproksima.
diurno	tagonokto de 24 horoj.
Drakmontaro	la plej grava montaro de Sud-Afriko, plimalpli proksime al ĝia orienta marbordo.
drogo	narkotaĵo.
Du Tabeloj	la Tabeloj de la Interligo, t.e. la Dek Ordonoj, aŭ baza leĝo, kiun la Eternulo transdonis al Moseo.
dupo	naiva trompeblulo aŭ trompito.
dura	malmola, malmilda.
efemero	efemeraĵo.
eksklami	laŭte ekdiri ion, ekkrii.
Ektelmondoj	imagitaj mondoj, ie en la kosmo.

elano	antaŭensvingiĝo.
elektrumo	antikva miksaĵo de oro kaj arĝento.
Elohimo	Hebrea vorto por Dio.
emergî	eliri el medio, trapasinte ĝin.
enorma	grandega.
-es-	la korelativa finaĵo <i>-es</i> , uzita kiel adjektiviga sufikso, ekzemple “naĝe en tenebresa ocean’...”
Eva	la unua virino, laŭ la Biblio.
Etiopo	ano de la ĉefgento loĝanta en Etiopujo.
fajna	ekstrakvalita, pursubstanca.
falva	tre hele flava, preskaŭ senkolora.
far	fare de.
fascini	(tr.) senigi je ĉia povo de forkuro aŭ kontraŭstaro per intense fiksata rigardado; nerezisteble allogi.
fatraso	aĉaĵaro, forĵetindaĵoj.
febla	malforta.
Fenicia	rilate al Fenicio.
feroca	atakeme sovaĝa; lupe kruela.
flako	malgranda kvanto da akvo aŭ alia likvaĵo, staranta en surfaca kavo.
frida	malvarma.
friska	malvarmeta.
fro	disde, ekde, for de.
Fruktodona	
Duonluno	Mezopotamio, Sirio kaj Kanaano.
futuro	estonteco.
galaksio	astroamasego enhavanta multajn milionojn da steloj, konsistiganta unuon de la kosmo.
Galaktogramo	Mesaĝo transgalaksia.

geja	samsekse amora.
geno	kromosoma elemento kiu kondiĉas heredajn karakterojn.
giri	rotacii.
glimi	glimbrili.
glugli	fari la bruon de akvo fluanta el botelo.
gnomika	konsistanta el maksimumoj, aforismoj.
golbo	fantazia estulo inteligenta kaj fortega, alimondano.
Goto	ano de unu el la Ĝermanaj triboj enirintaj la Romian imperion dum la 3-a, 4-a kaj 5-a jarcentoj.
Granda Maro	antikva nomo de Mediteraneo, i.a. en la Malnova Testamento.
graŭlo	minaca gorĝobruo, precipe besta.
grefo	sovaĝbesta ungego.
gvati	kaŝobservi, ŝtelatendi.
ĝangalo	praarbaro en Hindujo, Afriko, Sud-Amerika, k.t.p.; pluvarbaro.
Hagaro	kromvirino de Abraham kaj la patrino de Iŝmaelo.
hanti	fantomi; ofte vizitadi.
hasti	urĝiĝi, rapidi.
hati	malami.
Henoĥ	Zamenhofa formo por Ĥanoĥ, Biblia patriarko.
Herkuleso	Heraklo.
hida	malbelega.
hipnoti	(ntr.) troviĝi en hipnota stato.
Hispaniko	Usona nomo por Meksikanoj k.t.p.
hm	interjekcio esprimanta ĝenatecon, konfuzitecon.
holmo	monteto.

hororo	sento de teruro miksitita kun abomeno.
humida	malsek(et)a.
hurli	ululi.
Ĥamido	unu el la idaro de Ĥam, laŭ la Biblio.
Ĥamsino	vento dezerta.
Ĥetido	Hitito.
idiolekto	lingvaĵo de specifa individuo.
incendio	brulego; granda brulo, kiu atakas konstruaĵojn, minacante aliajn.
incizi	metode dividi molajn partojn per tranĉa instrumento; entranĉi.
jinjango	termino el la Ĉina filozofio. Ĝi priskribas ŝajne kontraŭajn tendencojn kiuj tamen eble estas komplementaj kaj interdependaj.
jakto	jaĥto. Ŝipo aŭ barko, ordinare vela, uzata por privataj plezurvojaĝoj kaj konkursoj.
jomkipuro	la plej sankta tago en la Juda kalendaro religia.
Josuo	postirinto de Moseo, Izraela konkerinto de Kanaano.
jubili	ĝojkrii.
Judas	la disĉiplo de Jesuo kiu lin perfidis.
Justiniano	granda imperiestro Romia (6-a jarcento), kiu kompiligis faman kodon juran kaj klopodis milite reakiri Italujon krom aliaj partoj de la imperio transprenitaj far popoloj Ĝermanaj.
ĵonko	Ĉina ŝipo platfunda, provizita per veloj el pajla mato.
Kaburbo	havenurbo ĉe la Bonespera Kabo, ĉefurbo

	Kabolanda en Sud-Afriko.
Karkasono	sud-Francuja urbo, antaŭe aparteninta al la Kataristoj, tute ĉirkaŭita de murego.
Karlo	alia formo de <i>Karolo</i> , ankaŭ la dua filo de la poeto.
kelk	kelka(j).
ki'	kio.
kiki	pedbati, bruske svingi la piedon, ion celante.
kirko	Kristana preĝejo.
kitono	tuniko Helena aŭ Helentipa.
klono	biologia duplikato.
kloŝo	sonorilo.
Knoso	palaca ĉefurbo de la Minoa Kreto.
kompano	kunmanĝanto, kunulo, kolego.
Konstanteno	la unua Kristaniĝinta imperiestro Romia.
Kontempli	(tr.) longe kaj medite rigardi per la okuloj aŭ spirite.
koŝmaro	terursonĝo.
kozo	afero, aĵo, objekto.
krabli	(ntr.) iri kiel multpedaj bestoj kaj insektoj, i.a. flanken aŭ malantaŭen.
kralo	vasta brutokorto, ofte fermita per palisoj, aŭ similaĵo.
kriĉi	krii kiel akcipitro; altigi la voĉon ĝis tonoj orelagacaj.
krokizi	(tr.) rapide skizi per skribilo aŭ peniko.
kubismo	artskolo de la dudeka jarcento, kiu prezentas objektojn laŭ geometriaj figuroj.
kulmo	kulmino; tigo de graminacoj.
kurta	mallonga.
kvaz'	kvazaŭ.
lanĉi	ellasi ion al ĝia elemento, ekz. ŝipon, ideon aŭ novan aferon.

lanta	malrapida.
lasciva	avida je amorĝuoj, malĉastema.
Latini	esprimiĝi per la lingvo
leĝera	malpeza.
liki	(ntr.) tralasi likvaĵon.
liva	maldekstra.
lo	(<i>l'o</i>), substantiva formo de la artikolo <i>la</i> , kiu prezentas la sekvantan adjektivon substantivigita; io, kio estas.
lolo	malagrable trudherbo grenkampa, kies semoj estas venenaj (L. <i>temulentum</i>).
lontana	malproksima.
loza	malstreĉa, malkompakta.
Lucifero	ĉefo de la ribelintaj anĝeloj, nomo de Satano.
Lusufro	fantazia varianto de Lucifero.
madzo	peza bataloklabo metalkapa.
magra	malabunda; malgrasa.
mambo	granda kaj rapida serpento ege venena de la Suda Afriko.
Mateo	Hebredevena nomo, i.a. de unu el la evangeliistoj.
mava	malbona (<i>Z</i>).
Mediterraneo	maro enfermita inter Eŭropo kaj Afriko.
men	malpli.
menoro	sepbranĉa kandelringaro, ekzemple templa aŭ sinagoga.
Mikaelo	anĝelĉefo, Kristo antaŭ lia homiĝo.
minca	maldika.
mini-	prefikso signifanta <i>malgrandeta</i> .
mitralo	maŝinpafilo.
Moabido	posteulo de Moab, loĝanto de la lando Moab.
Mohenjo-	

Daro	tre antikva urbo de la Indusa civilizo.
Monto Olivarba	Ĝi kuŝas tuj ekster Jerusalemo.
morna	malĝoje premata.
mutacio	subita ŝanĝiĝo en geno, kiu kaŭsas modifon de la koncerna karaktero.
nazia	pri membro de la partio nacisocialisma Hitlera.
Neandertalo	valeto apud Rejno; la homo de Neandertalo.
Nebulozo	
Magelana	galaksia astroamaso ekster nia propra galaksio.
nefi	esti malpermesata.
neforĝesumino	miozoto.
nelge	antaŭ nelonge.
nepro	nepraĵo.
noci	malutili.
Novjorko	Nov-Jorko.
nuklea	rilate al atomkerno.
nupto	geedziĝa festo.
objeti	(tr) kontraŭmeti al iu refutan argumenton aŭ malfacilaĵon.
obskura	malhela, malklara.
oĉjo	karesformo de <i>onklo</i> , ofte uzata ankaŭ inter amikoj.
Okcidenta	
Maro	Mediterranio
olda	maljuna, malnova.
Olda Regno	la plej malnova stadio de la Egipta civilizo, dum kiu oni konstruis la grandajn piramidojn.
orgojlo	tro granda memŝato, ne sufiĉe pravigebla

kaj akompanata de malŝato por ĉiu alia.

pado	mallarĝa vojo, ĉefe tera, en kampoj, arbaro k.s.
palpiti	pulsadi.
pansi	(tr.) meti sur vundon iajn substancojn, por purigi, kuraci kaj ŝirmi ĝin.
paseo	pasintaĵo; estinteco.
paterni	uzi kiel model(foli)on, por laŭekzempligi.
paŭti	antaŭenigi la lipojn en grimaceto, por montri malbonan humoron, malkontentiĝon k.s.
permanenta	daŭranta sen interrompo aŭ ŝanĝiĝo.
perturbi	(tr.) kaŭzi perturbon, laŭlitere aŭ figure.
plaĝo	marbordo sabloriĉa kaj ebena.
plaŭ	onomatopeo formita el <i>plaŭdi</i> (Z).
plonĝi	jetiĝi en akvon, k.t.p.
pojno	manradiko, manartiko.
poka	malmulta.
polmo	maninterno, manplato.
poltrono	malkuraĝulo.
pon	malantaŭ.
popfesto	festo popmuzika.
porciumi	limigi la kvanton de tiu aŭ alia nutraĵo, k.t.p., kiun ĉiu rajtas ricevi.
pre	(vorto) tempe antaŭ.
pre ol	antaŭ ol.
prea	tempe antaŭa.
predo	ĉio, kion oni kaptakiras perforte aŭ ruze.
preventi	antaŭmalhelpi, malebligigi.
primavero	printempo.
prizono	konstruaĵo, en kiu oni tenas personojn kondamnitajn al malliberiga puno aŭ atendantajn sian juĝon.
pro ke	pro tio, ke.

Provenco	Franca province inter Rodano, Alpoj kaj Mediteraneo, foje aparta ŝtato kun propra lingvo.
pruo	la plej antaŭa parto de ŝipo aŭ boato, kie ĝi komencas retroarkiĝi.
pterodaktilo	prareptilio flugilhava.
putino	prostituitino, ĉiesulino.
rankoro	obstina malpardonemo, venĝema resento.
raŭto	vojlino por iradi de unu loko al alia.
re kaj re	multripete.
retro	prefikso aŭ vorto signifanta <i>malantaŭen</i> .
Ria	mallongigo de Maria, t.e. (<i>Ma</i>)ria, kaj ordinara voknomo por la edzino de Edwin de Kock, kiu ŝin plurfoje aludas en siaj poemoj.
Rivero Flava	Hoang Ho, granda rivero en Ĉinujo.
rojo	mallonga kaj malprofunda rivereto.
Romano	loĝanto de Romo; Romiano.
Romio	la Romana Imperio.
Romiano	civitano de la Romia Imperio.
ronĝi	mordeti, dentoskrapi.
ronroni	fari bruon surdan kaj kontinuan, ordinare pro kontenteco, kiel kato aŭ leonado.
rufa	ruĝe flava.
Ruĝa Maro	nomo de la maro inter Afriko kaj la Araba duoninsulo.
rumoro	konfuza kolektiva voĉbruo.
Sala Maro	antikva nomo de la Maro Morta.
Sankta(j)	
Skribo(j)	la Biblio.
Satano	nomo de la diablo.
saŭro	komuna nomo por rampuloj escepte de testudoj kaj serpentoj.

scintili	(ntr.) brili, lumetante de tempeto al tempeto.
sinki	malrapide malsupreniri.
sinkretisto	homo kredanta je religio sinkretisma.
Siriuso	la plej brila stelo videbla fro la tero, en la konstelacio de la Hundo.
sob	malsupren (Z).
softa	mallaŭta.
solidografo	bildeca reprezentaĵo tridimensia kaj solidaspekta.
sombra	malhela, malgaja.
sor	supren (Z).
sori	suprenĝlisi.
sproso	verda ĝermo sur branĉo.
spuro	signo sur tero, neĝo k.t.p., postlasita de besto aŭ homo tie, kie ĝi pasis; piedsigno.
Stalino	Sovetia diktatoro (1879-1953) kaj amasmurdinto de milionoj da homoj.
strebi	energie streĉi la fortojn de la korpo aŭ de la spirito por atingi celon.
streso	aganto kiu trudas novajn kondiĉojn al organismo; streĉiteco.
streta	mallarĝa.
stinki	malbonodor(aĉ)i.
stringi	(tr.) forte ĉirkaŭpreni, ĉirkaŭstreĉi.
stuci	forigi la ekstremajn partojn, la pintojn de branĉoj, folioj aŭ radikoj.
stulta	ne inteligenta, sensprita.
Suda Kruco	konstelacio krucforma (<i>crux</i>) videbla en la suda hemisfero.
surfo	ŝaŭmo kaj tumulto de rompiĝantaj marondoj.
svaga	malfacile definebla, malcerta.
ŝalom	la Hebrea vorto por <i>paco</i> . Diri ĝin estas

	Juda maniero saluti.
ŝalti	Fermi elektran cirkviton per aparato.
Ŝamaŝo	antikva sundio de la Proksim-Oriento.
Ŝemido	posteulo de Ŝem, prapatro de la Semidaj popoloj.
ŝlifi	(tr.) erode akriigi.
ŝofaro	Izraela kaj Juda blovinstrumento el boka korno.
ŝriki	(ntr.) eligi akutan krion.
tanĝi	apenaŭ tuŝeti.
tarda	malfrua.
taverno	pli-malpli luksa drinkejo, kie oni povas ankaŭ manĝi.
tedeumi	kanti "te Deum laudamus" (Dio, ni laŭdas vin), Latine.
tenebro	mallumaĵo.
tenera	havanta la efikon de ama aŭ amika varmo, delikato kaj dolĉeco.
Teodora	Helena virinnomo, i.a. de la fama imperiestrino Bizanca (6-a jarcento), kies edzo estis Justiniano.
Teodoriko	fama reĝo Gota de Italujo (6-a jarcento), kies ĉefurbo estis Ravenna. Plejgrandparte tolerulo pri Romkatolikoj, li provis konservi kaj eĉ revivigi la Romian civilizon.
Teraĥo	la patro de Abraham.
Terorismo	agoj murdaj aŭ perfortaj far aŭ ŝtatoj aŭ individuoj en la nomo de iu idealo, kontraŭ homoj sensuspektaj aŭ nekapablaj defendi sin.
testi	science elprovi.
Tito	Romia generalo kaj poste imperiestro, venkinta la Judojn en 70 p.K., kiam ankaŭ

tomasi	estis detruita Jerusalemo kaj ĝia templo. skeptiki kiel la apostolo Tomaso. Vidu Sankta Johano 20:24-29.
trejni	submeti al instruado kaj ekzercado por konduki ĝis la dezirata stato de kapableco.
trista	malĝoja, malgaja.
trivi	eluzi.
turpa	malbela.
uvra	malfermita.
vaĉo	garda deĵoro.
vadio	rivereto Proksim-Orienta tute seka en la sezonoj senpluvaj.
vori	manĝegi.
vrako	ruino de ŝipo, aviadilo, aŭto k.t.p.
Zimbabveo	antikva nigrula regno en la Suda Afriko, de kiu postrestis ruinoj; moderna lando proksimume samregiona, inter la riveroj Zambezo kaj Limpopo.